

eLIBRO

*Jaroslav Hašek*

# La brava soldato Švejk

*3 • Glora batregalo*



INKO

*Jaroslav Hašek*

**AVENTUROJ DE LA BRAVA SOLDATO**

**ŜVEJK DUM LA MONDMILITO**

**Parto 3: Glora batregalo**

*Tradukis Vladimír Váňa*

**eLIBRO**

*Aranĝis: Franko Luin*


**ISBN 91-7303-093-7**

*inko@omnibus.se*

*<http://www.omnibus.se/inko>*

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

JUNIO 2001



## 1. TRANS HUNGARION

**F**ine ĉiuj ĝisatendis tiun momenton, kiam oni ŝtopis ilin en vagonojn en proporcio de kvardek du viroj al ok ĉevaloj. Ĉevaloj kompreneble vojaĝis pli komforte ol la viraro, ĉar ili povis dormi stare, sed tio ne gravis. Soldata trajno ree veturigis en Galicion novan grupon da homoj, pelataj al milta buĉejo.

Sed ĝenerale tiuj kreaĵoj sentis kompreneble tamen nur malpeziĝon; kiam la trajno moviĝis, estis tio jam io certa, sed antaŭe temis nur pri turmenta necerteco, paniko, ĉu oni veturos jam hodiŭ, aŭ morgaŭ, aŭ postmorgaŭ. Iuj sentis sin kiel mortkondamnitaj, kiuj kun timo atendas, kiam venos por ili la ekzekutisto. Kaj poste sekvos trankviliĝo, ke tio estos jam finita.

Tial ia soldato kriegis el vagono kiel frenezulo: "Ni veturas, ni veturas!"

La ĉefserĝento-kontisto plene pravis, kiam li diris al Ŝvejk, ke ne necesas rapidi.

Antaŭ ol venis la momento por grimpi en vagonojn, pasis kelke da tagoj, ĉe kio oni senĉese parolis pri konservaĵoj kaj sperta Vaněk proklamis, ke tio estas nur fantazio. Konservajĵoj? Pa, milita meso, tiu jes, ĉar tiel tio estis ankaŭ ĉe forveturo de la antaŭa marŝko. Se estas konservaĵoj, la milita meso forfalas. En mala okazo la milito meso estas kompenso por konservaĵoj.

Kaj tiel anstataŭ gulaŝkonservaĵoj aperis ĉefkurato Ibl, kiu mortigis tri muŝojn per unu bato. Li servis la militan meson por tri infanteriaj batalionoj samtempe, al du el ili donis benon por la vojo en Serbion kaj al la tria en Rusion.

Li parolis ĉe tio kun granda entuziasmo kaj vidiĝis, ke la materialon por sia parolo li prenis el soldataj jarlibroj. Estis tio tiel kortuŝa parolo, ke kiam ili trajne rapidis al Moson, Ŝvejk, kiu estis kune kun Vaněk en vagono adaptita al kancelario, rememoris tiun parolon kaj diris al la ĉefserĝento-kontisto: "Tio estos tre bela, kiel diris tiu feldkurato, kiam la tago kliniĝos al vespero, la suno kun siaj oraj radioj subiros malantaŭ montojn kaj sur la batalejo oni aŭdos, kiel li diris, tiun lastan spiron de mortantoj, henon de falintaj ĉevaloj, ĝemojn de vunditaj viroj kaj lamentadon de la loĝantaro, al kiu brulas la kabanoj super la kapo. Al mi tre plaĉas, kiam homoj babilas tiajn idiotajn idiotajojn."

Vaněk konsente kapjesis: "Estis tio diable kortuŝa okazintaĵo."

"Tio estis tre bela kaj instrua," diris Ŝvejk; "mi memoras tion tre bone, kaj kiam mi revenos el la milito, mi rakontos tion en 'Ĉe la kaliko'. Kiam li, sinjoro kurato, tion al ni rakont-

tis, li dismetis la krurojn tiom, ke mi timis, ke la piedaĉo al li ne flankenglitu, li ne falu sur la militan altaron kaj ne disbatu al si la cerbujon je la hostimontrilo. Li donis al ni tian belan ekzemplon el la historio de nia armeo, kiam ankoraŭ soldatis Radecký kaj kun vespera ĉielruĝo kunfandiĝis fajro de brulantaj garbejoj sur batalkampo, kvazaŭ li tion vidus.”

Kaj la saman tagon la ĉefkurato Ibl estis jam en Vieno kaj tie al alia marŝbataliono denove rakontis la kortuŝan historion, kiun menciis Ŝvejk kaj kiu plaĉis al li tiom, ke li nomis ĝin idiota idiotaĵo.

”Karaj soldatoj,” oratoris la ĉefkurato Ibl, ”imagu do, ke estas la jaro 1848 kaj ke venke finiĝis la batalo ĉe Custozza<sup>1</sup>, kie post dekhora furioza batalo la itala reĝo Alberto devis cedi la sangokovritan batalejon al la patro de niaj soldatoj, la marŝalo Radecký, kiu en okdekkvara jaro de sia vivo<sup>2</sup> akiris tiel brilan venkon.

Kaj jen, karaj soldatoj! Sur altaĵo antaŭ la konkerita Custozza haltis la maljunega militestro. Ĉirkaŭ li liaj fidelaj komandantoj. Seriozeco de la momento falis sur la tutan grupeton, soldatoj, ĉar en malgrandeta distanco de la marŝalo vidiĝis soldato, luktanta kontraŭ la morto. Kun frakasitaj membroj sur la kampo de honoro sentis vundita standardisto Hrt, kiel lin rigardas la marŝalo Radecký. La brava vundita standardisto en spasma entuziasmo ankoraŭ premis oran medalon per rigidiĝanta dekstra mano. Ĉe ekvido de la nobla marŝalo ankoraŭfoje vigliĝis lia korbatado, la kripligitan korpon penet-

- 1 en la batalo ĉe Custozza (26.7.1848) la armeo de la marŝalo Radecký venkis kontraŭ itala reĝo Karolo Alberto, kiu al la Aŭstrio devis poste cedi Lombardion
- 2 en la jaro de la batalo ĉe Custozza Radecký aĝis okdek du jarojn

ris lasta resto de forto kaj la mortanto kun superhoma peno provis rampi renkonten al sia marŝalo.

'Trankvile kuŝu, mia brava soldato,' vokis al li la marŝalo, descendis de sur la ĉevalo kaj volis prezenti al li la manon.

'Tio ne eblas, sinjoro marŝalo,' diris la mortanta soldato, 'mi havas ambaŭ manojn forhakitaj, sed mi petas pri unu afero. Sciigu al mi la nudan veron: Ĉu ni venkis en la batalo?'

'Plene, kara knabo,' diris la feldmarŝalo afable; 'domaĝe, ke vian ĝojon malserenigas viaj vundoj.'

'Kompreneble, nobla sinjoro, mi estas ĉe la fino,' diris la soldato tombvoĉe, agrable ridetante. 'Ĉu vi soifas?' demandis Radecký. 'La tago esti varmega, sinjoro marŝalo, ni havis pli ol tridek gradojn.' Post tio Radecký, preninte ladbotelon de sia adjutanto, prezentis ĝin al la mortanto. Tiu satrinkis, farinte profundan gluton. 'Dio rekompencu vin milfoje,' li ekvokis, klopodante kisi la manon de sia komandanto. 'Kiel longe vi soldatas?' demandis ĉi tiu. 'Pli ol kvardek jarojn, sinjoro marŝalo! Ĉe Aspern mi akiris oran medalon. Mi estis ankaŭ ĉe Lepsiko, ankaŭ kanonkrucon mi havas<sup>3</sup>, kvinfoje mi estis mortvundita, sed nun venis mia definitiva fino. Sed kia feliĉo kaj ĝojo, ke mi ĝisvivis la hodiaŭan tagon. Kial mi bedaŭrus mian morton, se ni akiris gloran venkon kaj al la imperiestro redonita lia teritorio!'

En tiu momento, karaj soldatoj, eksonis el la tendaro majestaj tonoj de nia himno 'Gardu, Dio, Lian moŝton', poten-

3 la ordenon (pli precize insignon) "kanonkruco" fondis Francisko Jozefo la unua por soldatoj, kiuj eminentiĝis en batalo kontraŭ Napoleono ĉe Lepsiko (16.-18.10.1813). La ordenon (insignon) en la formo de kruco oni fabrikis el kanonoj, militakiritaj en la menciita batalo. La batalo mem estas konata ankaŭ sub la nomo "la batalo de nacioj"

ce kaj noble flugis tra la batalejo. La falinta soldato, adiaŭanta la vivon, provis ankoraŭfoje retrovi la fortojn.

'Gloron al Aŭstrio,' li vokis entuziasme, 'gloron al Aŭstrio! Oni daŭrigu tiun brilan kanton! Gloron al nia militestro! Vivu la armeo!'

La mortanto ankoraŭfoje klinis sin al la dekstra mano de la marŝalo, kiun li kisis, sinkis kaj mallaŭta lasta ĝemo elliris el lia nobla animo. La militestro staris ĉi tie nudkape antaŭ kadavro de unu el la plej bravaj soldatoj. 'Tiu ĉi bela fino estas vere enviinda,' diris la emociita marŝalo, klinante sian vizaĝon al interplektitaj manplatoj.

Karaj soldatoj, ankaŭ mi al vi deziras, ke vi ĉiuj ĝisatendu tian belan finon."

Rememorante tiun ĉi parolon de la ĉefkurato Ibl, Ŝvejk vere povis lin nomi idiota idioto sen tio, ke li eĉ ajnete lin honorofendus.

Poste Ŝvejk komencis paroli pri konataj ordonoj, kiujn oni legis al ili antaŭ la envagoniĝo. Temis pri arma ordono subskribita de Francisko Jozefo kaj ordono de la arkiduko Jozefo Ferdinando, la ĉefkomandanto de la orienta armeo kaj korpuso, kiuj ambaŭ koncernis la okazaĵojn en la intermonto ĉe Dukla la 3an de aprilo 1915, kiam du batalionoj de la dudekoka regimento eĉ kun oficiroj transiris al la rusoj<sup>4</sup> ĉe sonoj de la regimenta kapelo.

Ambaŭ ordonojn oni legis al ili tremvoĉe kaj ili tekstis en la ĉeĥa traduko:

Armea ordono, eldonita la 17an de aprilo 1915:

"Superplenigita de doloro mi ordonas, ke i.r. infanteria regimento nro 28 estu forstrekita el mia armeo pro malkuraĝo

4 vera dato kaj okazintaĵo

kaj ŝtatperfido. La standardo de la malhonoriginta regimento estu deprenita kaj transdonita al la armea muzeo. Ekde la hodiaŭa tago ĉesas ekzisti regimento, kiu, morale venenita el la hejmo, ekmarŝis sur batalkampon por kulpiĝi pri ŝtatperfido.”

Francisko Jozefo la unua

Ordono de la arkiduko Jozefo Ferdinando:

”Dum la militiro ĉeĥaj trupunuoj trompis niajn esperojn, precipe en la lastaj bataloj. Ili trompis precipe ĉe la defendo de pozicioj, en kiuj ili estis sufiĉe longan tempon en tranĉeoj, kion ofte eluzis la malamiko por ligi interrilatojn kaj kontakton kun damnindaj elementoj de tiuj ĉi trupunuoj.

La atakoj de la malamiko, subtenata de tiuj ĉi perfiduloj, ĉiam plejparte celis kontraŭ tiuj partoj de la fronto, kiujn okupis tiaj trupunuoj.

La malamiko ofte sukcesis surprizi niajn trupunuojn, preskaŭ sen rezisto penetri en niajn poziciojn kaj militkapti egan, grandan kvanton da defendantoj.

Milfojan malhonoron, malestimon kaj malrespekton al tiuj ĉi senhonoraj fiuloj, kiuj perfidis la imperiestron kaj la regnon kaj makulas ne nur la honoron de gloraj standardoj de nia eminenta kaj brava armeo, sed ankaŭ la honoron de tiu nacieco, kiun ili proklamas kiel sian.

Pli aŭ malpli frue atingos ilin kuglo aŭ ŝnurego de la ekzekutisto.

Devo de ĉiu unuopa ĉeĥa soldato, kiu havas la honoron en la korpo, estas anonci al sia komandanto tian fiulon, provokulon kaj perfidulon.

Kiu tion ne faros, mem estas tia perfidulo kaj fiulo.



Tiun ĉi ordonon oni tralegu al ĉiuj soldatoj ĉe ĉeĥaj regimentoj.

Laŭ la ordono de nia monarko la i.r. regimento nro 28 estas jam strekita el la armeo kaj ĉiuj kaptitaj transkurintoj de la regimento pagos la pezan kulpon per sia sango.”

La arkiduko Jozefo Ferdinando

”Oni legis al ni tion iom tro malfrue,” diris Ŝvejk al Vaněk, ”mi ege miras, ke oni legis al ni tion nur nun, se sinjoro imperiestro eldonis tiun ordonon jam la 17an de aprilo. Tio povus vekti supozon, kvazaŭ pro iaj kaŭzoj oni ne igus legi al ni tion tuj. Se mi estus sinjoro imperiestro, mi ne lasus min tiel forpuŝi. Se li eldonis ordonon la 17an de aprilo, do ankaŭ la deksepan oni devas legi ĝin ĉe ĉiuj regimentoj, okazu kio ajn.”

Kontraŭ Vaněk ĉe alia flanko de la vagono sidis la kuiristo-okultisto el la oficira kuirejo kaj ion skribis. Malantaŭ li estis la servosoldato de la ĉefleŭtenanto Lukáš, la barba giganto Baloun, kaj telefonisto Chodounský, alkomandita al la dekunua marŝko. Baloun maĉis pecon da soldatpano, konsterne klarigante al la telefonisto Chodounský, ke tio ne estas lia kulpo, se en tiu hompuŝiĝo dum envagoniĝado li ne povis trapuŝi sin en oficiran vagonon al sia ĉefleŭtenanto.

Chodounský lin teruris, ke nun ĉesas ĉia amuzo, ke tion oni punos per kuglo.

”Kiam estos jam fino de tiu turmento,” lamentis Baloun, ”jam foje mi estis en mortdanĝero dum manovroj ĉe Votice. Tie ni marŝis, malsatante kaj soifante, kaj kiam ĉevalrajdis al ni bataliona adjutanto, mi ekkriis: ’Donu al ni akvon kaj pannon!’ Li turnis la ĉevalon al mi kaj diris, ke se tio estus en milito, mi devus elliri el la vico kaj li igus min mortpafi kaj ke

nun li malliberigos min ĉe garnizono, sed mi havis grandan feliĉon, ĉar kiam li rajdis por anonci tion ĉe la stabo, lia ĉevalo dumvoje konfuziĝis, li falis kaj, dank' al dio, rompis al si la nukon.”

Baloun profunde ekĝemis kaj sufokiĝe ektusis pro pangluto en la gorĝo, kaj respirinte, li avide ekrigardis du sakojn de la ĉefleŭtenanto Lukáš, kiujn li gardis.

”Ili ricevis, sinjoroj oficiroj,” li diris melankolie, ”hepatkonservaĵojn kaj hungaran salamon. Havi almenaŭ peceton.”

Ĉe tio li rigardis tiujn du sakojn de sia ĉefleŭtenanto tiel avide kiel hundeto forlasita de ĉiuj, kiu malsatas kiel lupoj kaj sidas ĉe pordo de fumajista vendejo, enspirante vaporojn el kuirata kolbaso.

”Ne malutilus,” diris Chodounský, ”se oni atendus nin ie kun bongusta tagmanĝo. Kiam komence de la milito ni veturis en Serbion, ni troviĝis en ĉiu fervoja stacio, kiel oni nin ĉie regalis. El anseraj femuroj ni tranĉis ŝtipetformajn viandpecetojn de la plej alta kvalito kaj ludis kun ili ’Ŝafejo’n sur tabuletoj da ĉokolado. En la kroata Osijek du sinjoroj-veteranoj alportis al ni en vagonon rostitan leporaĵon en granda kaldrono, kaj tion ni jam ne eltenis kaj elverŝis ĉion al ili sur la kapon. Sur ĉiuj trakoj ni faris nenion alian ol tion, ke ni vomis el vagonoj. Kaporalo Matějka en nia vagono troŝtopis sin tiom, ke ni devis meti al li tabullignon sur la ventron kaj sur tiu salti same kiel ĉe piedpremado de saŭkraŭto, kaj nur tiam li sentis malpeziĝon kaj iris tio el li tra la supra kaj suba truo. Kiam ni veturis trans Hungarion, en ĉiu stacio oni ĵetadis al ni en vagonojn rostitajn kokinojn. El tiuj ni manĝis nenion alian ol cerbon. Hungaroj en Kaposfalva ĵetis al ni en vagonojn tutajn pecojn da rostitaj porkoj, kaj kamarado rice-

vis per rostita porka kapo tian baton sur la kranion, ke tiun donacinton li poste pelis kun soldatzono trans tri fervojliniojn. Aliflanke en Bosnio ni jam ne ricevis eĉ akvon. Sed antaŭe, kvankam tio estis malpermesite, ni havis da diversaj alkoholaĵoj kiom la apetito deziris kaj vinon en kvanto de la tuta lago. Mi memoras, ke en iu stacio moŝtulinoj kaj fraŭlinoj regalis nin per biero kaj ni urinis en ilian ladkruĉon kun biero, kaj tiuj kuregis de la vagono!

Dum la tuta vojo ni ĉiuj estis kiel sub narkotiko, mi ne perceptis eĉ la pikan ason, kaj antaŭ ol ni tion ekkonsciis, subite ordono kaj ĉio elvagoniĝi, ni eĉ ne finludis kartojn. Kaporalo, mi jam ne memoras lian nomon, kriis al siaj soldatoj, ke ili kantu: 'Kaj la serboj devas vidi, ke ni, aŭstrianoj, venkas, venkas.' Sed iu de malantaŭe lin piedbatis kaj li rulfalis sur relojn. Poste krio, ke oni starigu la fusilojn piramidforme<sup>5</sup>, la trajno tuj sin turnis kaj malplena veturis reen, kaj kiel en tia paniko okazas, ĝi kompreneble forveturigis nian dutagan provizon. Kaj en la distanco kiel de ĉi tie al tieaj arboj jam komencis krevi tie ŝrapneloj. De la alia flanko alrajdis bataliona komandanto kaj kunvokis ĉiujn al konsiliĝo, kaj poste venis nia ĉefleŭtenanto Macek, ortodoksa ĉeĥo sed parolanta nur germane kaj diris, pala kiel kreto, ke veturi plu ne eblas, ke oni eksplodigis la relojn en aeron, ke la serboj nokte transveturigis sin trans riveron kaj nun ili troviĝas sur la maldekstra alo. Sed tio estas de ni ankoraŭ malproksime. Nin laŭdire plifortigos pluaj trupoj kaj poste ni ilin dishakos. Se io ko-

5 3-6 soldatoj starigas siajn fusilojn per la kolbo teren tiel, ke la fusilo reciproke sin subtenas kaj memorigas do tiel piramidon. Tiu ĉi ordono signifis ripozon post longa marŝo, sed ankaŭ tion, ke tiu ĉi ripozo ne daŭros longe

menciĝus, neniu kapitulacu, serboj laŭdire detranĉas al militkaptitoj orelojn, nazojn kaj elpikas al ili la okulojn. Ke nemalproksime de ni kreas ŝrapneloj, pri tio ni ne faru al ni zorgojn. Laŭdire nia artilerio pliprecizigas al si la celon. Subite ie malantaŭ monto oni aŭdis: tatatatatatata. Tio estas laŭdire provpafado de niaj aŭtomataj fusiloj. Poste de maldekstre eĥis kanonado, ni aŭdis tion la unuan fojon kaj kuŝis surventre, transflugis nin kelke da grenadoj kaj ekbruligis la stacidomon, de la dekstra flanko super ni komencis fajfi kugletoj kaj el maproksimo oni aŭdis salvojn kaj tondrantajn pafilojn. La ĉefleŭtenanto Macek ordonis dismeti la piramidojn kaj ŝargi fusilojn. Ĉefserĝento-kancelariestro iris al li kaj diris, ke tio tute ne eblas, ĉar ni havas ĉi tie tute nenian municion, ke Macek ja bone scias, ke oni decidis distribui municion nur ĉe la sekvanta etapo antaŭ nia pozicio. Ke antaŭ ni veturis municia trajno kaj tiu ŝajne jam falis en serbajn manojn. La ĉefleŭtenanto Macek staris momenton kiel ŝtoniĝinta kaj poste, mem ne sciante, kial, li donis ordonon 'Surmeti bajonetojn!', nur tiel en senespero, por ke oni ion faru. Sufiĉe longe ni staris denove batalpretaj, poste ni alteriĝis sur ŝpalojn, ĉar aperis aeroplano kaj suboficiroj kriegis: 'Ĉiuj en kaŝejon, en kaŝejon!' Poste montriĝis, ke temis pri nia aeroplano kaj nia artilerio pro eraro ĝin forpafis. Ni do denove leviĝis, kaj neniu ordono, estis ripozo. De unu flanko impetis al ni kavaleriano. Ankoraŭ de malproksime li kriis: 'Kie estas la bataliona komandejo?' La komandanto de la batalino iris al li renkonten, la kavaleriano enmanigis al li paperfolion kaj jam denove forrajdis dekstren. La batalionestro legis tion dumvoje kaj kvazaŭ li subite freneziĝus. Li eltiris sabron kaj kuregis al ni. 'Ĉiuj cedi, ĉiuj cedi,' li kriegis al la ofi-

ciroj, 'direkte al la valo, unu post la alia!' Kaj poste tio komenciĝis. Kvazaŭ oni tion atendus, oni komencis pafi kontraŭ ni de ĉiuj flankoj. Ĉe la maldekstra flanko estis maiza kampo kaj tie dancis ĉiuj diabloj. Ni ŝovrampis helpe de la kvar membroj en la valon, dorsosakojn ni lasis sur tiuj damnindaj ŝpaloj. La ĉefleŭtenanton Macek trafis tio de flanke en la kapon kaj li ne diris eĉ vorton. Antaŭ ol ni forkuris en la valon, estis multe da mortigitoj kaj vunditoj. Tiujn ni tie lasis kaj kuris ĝis vespero, kaj la regiono antaŭ ni jam aspektis, kvazaŭ la niulojn iu el ĝi elbalaus. Ni vidis nur disrabitajn trajnotruojn. Fine ni venis al fervoja stacio kie ni ricevis jam novajn ordonojn sidiĝi en trajnon kaj veturi reen al la stabo, kion ni ne povis plenumi, ĉar la tuta stabo falis la antaŭan tagon en kaptitecon, pri kio ni eksciis nur matene. Poste ni estis kiel orfoj, neniuj volis ion pri ni scii kaj oni alvicigis nin al la sepdektria regimento por cedi kun ĝi, kion ni faris kun la plej granda ĝojo, sed unue ni devis proksimume unu tagon marŝi antaŭen, ol ni venis al la sepdektria regimento. Poste ni..."

Jam neniuj lin aŭskultis, ĉar Ŝvejk kun Vaněk ludis mariaĝon, la kuiristo-okultisto el la oficira kuirejo plu skribis longan leteron al sia edzino, kiu dum lia foresto komencis eldonadi novan teozofian revuon, Baloun dormetis sur benko, kaj tiel al la telefonisto Chodounský restis nenio alia ol ripeti: "Jes, tion mi ne forgesos..."

Li leviĝis kaj iris kibici al mariaĝo.

"Vi povus almenaŭ ekbruligi al mi la pipon," diris Ŝvejk amike al Chodounský, "se vi jam venas kibici. Mariaĝo estas pli serioza afero ol la tuta milito kaj ol tiu via damninda aventuro ĉe la serba limo. — Tian idiotaĵon mi faris, mi min

vangobatus. Kial mi ankoraŭ momenton ne retenis tiun reĝon, ĝuste nun venis al mi damo. Mi estas idioto.”

Intertempe la kuiristo-okultisto finis sian leteron kaj legis ĝin kun senduba kontento, kiel bele li skribis tion por super-ruzi la soldatan cenzuron.

”Kara edzino!

Kiam vi ricevos tiujn ĉi liniojn, mi estos jam kelke da tagoj en trajno, ĉar ni forveturas al la fronto. Tio min ne tro ĝojigas, en la trajno mi devas maldiligenti kaj ne povas esti utila, ĉar en nia oficira kuirejo oni ne kuiras kaj la manĝon oni ricevas en staciaj etapoĵ. Mi ĝojis, ke dumvoje tra Hungario mi kuiras al niaj sinjoroj oficiroj gulaŝon laŭ la Szegeda maniero, sed mia espero ne plenumiĝis. Eble kiam ni alveturos Galicion, mi havos la okazon kuiri veran galician soŭleton, anseron stufitan en grio aŭ rizo. KREDU al mi, kara Helenja, ke mi vere klopodas kiom eble plej multe agrabligi la zorgojn kaj penon de niaj sinjoroj oficiroj. De la regimento oni min translokis al marŝbataliono, kio estis mia la plej arda deziro, por ke mi povu, eĉ se per malriĉaj rimedoj, levi la oficiran militkuirejon en la fronto al la plej alta nivelo. Ĉu vi memoras, kara Helenja, ke vi deziris al mi ĉe mia rekrutiĝo al la regimento, ke mi ricevu bonanimajn superulojn? Via deziro plenumiĝis, kaj ne nur ke mi tute ne povas plendi, male, ĉiuj sinjoroj oficiroj estas niaj veraj amikoj, kaj precipe al mi ili kondutas kiel la patro. Kiom eble plej baldaŭ mi sciigos al vi la numeron de nia feldpoŝto...”

Tiu ĉi letero estis eldevigita de cirkonstancoj, kiam la kuiristo-okultisto definitive faris al si malbonan sangon ĉe la kolonelo Schröder, kiu ĝis nun tenis super li sian protektan manon, sed por kiu pro malfeliĉa hazardo ĉe adiaŭa vesper-

manĝo kun oficiroj de la marŝbataliono denove ne restis porcio da bovida renlumbaĝo, kaj la kolonelo Schröder sendis lin kun marŝko al la fronto, konfidinte la oficiran kuirejon de la regimento al kompatinda instruisto de la blindulinstituto en Klárov.

La kuiristo-okultisto ankoraŭfoje fluglegis, kion li skribis kaj kio ŝajnis al li esti tre diplomata por teni sin tamen nur iom pli malproksime de la bataalkampo, ĉar, oni diru kion ajn, estas tio tamen nur eskapo ankaŭ en la fronto.

Aliflanke, kiam ankoraŭ en la civila vivo li estis redaktoro kaj posedanto de okulta revuo por postmortaj sciencoj, li skribis longan meditplenan artikolon pri tio, ke neniu timu la morton kaj pri metempsikozo.

Ankaŭ li alpaŝis al Ŝvejk kaj Vaněk por fari kibicon. Inter ambaŭ ludantoj tiutempe vidiĝis neniu diferenco en la soldata rango. La mariaĝon ludis jam ne tiuj du, sed tri, kun Choudounský.

La kuriero Ŝvejk vulgare insultis la ĉefserĝenton-kontiston Vaněk: "Mi miras al vi, ke vi povas ludi tiel idiote. Ja vi vidas, ke li ludas betlon<sup>6</sup>. Mi havas neniujn karojn, kaj vi ne elmetis la okon, kiel la plej stulta bruto vi ĵetas la trefbubon kaj li, senspritulo, gajnis la ludon."

"Tiom da kriego pro unu malgajnita betlo," sonis deca respondo de la ĉefserĝento-kontisto, "vi mem ludas kiel idioto. Mi elsuĉu el la fingro la karoan okon, se ankaŭ mi havas neniujn karojn, mi havis nur altrangajn pikojn kaj trefojn, vi, gastejaĉulo."

6 en la kartludo mariaĝo, betlo havas avantaĝon antaŭ normala ludo kaj durĥo havas avantaĝon antaŭ betlo. Se do iu anoncas intencon ludi durĥon, ne eblas, ke alia ludanto povu ludi betlon

”En tia okazo, sagaculo, vi povis ludi durĥon,” diris Ŝvejk kun rideto, ”tio estas same tiel kiel foje sube en ’Ĉe Valŝa’, tie ankaŭ tia sentaŭgulo havis kartojn por durĥo, sed li ne ludis ĝin, la plej malaltrangajn kartojn li ĉiam formetis en talonon kaj ebligis al ĉiu ludi betlon. Sed kiajn kartojn li havis! De ĉiuj koloroj la plej altrangajn. Kiel nun mi havus nenion el tio, se vi ludus durĥon, ankaŭ tiam mi gajnus nenion kaj same ankaŭ neniu el ni; kiel tio rondirus, ni senĉese al li pagus. Fine mi diras: ’Sinjoro Herold, estu tiel afabla, ludu durĥon kaj ne faru idiotaĵojn.’ Sed li malfermis al si la faŭkon, ke li povas ludi kion li volas, ni tenu la langon malantaŭ la dentoj, li laŭdire finstudis universitaton. Sed por tio li pagis kare. La gastejestro estis nia konato, la kelnerinon ni konis eĉ tro intime, tiel ni klarigis al patrolo, ke ĉio estas en ordo. Unue, ke estas de li arogantaĵo rompi la noktan silenton kaj voki patrolon, se li ie antaŭ gastejo falis sur glacikovrita vojo kaj glitis sur ĝi per la nazo, ĝis li ĝin al si rompvundis. Ke ni lin eĉ ne tuŝis, kiam li falsludis mariaĝon, kaj kiam tio malkaŝiĝis, li elkuris tiel rapide, ke li falegis. La gastejestro kaj la kelnerino konfirmis, ke ni kondukis al li eĉ tro ĝentlemane. Li meritis ankaŭ nenion alian. De la sepa horo vespere ĝis la noktomezo li sidis mendinte nur unu bieron kaj sodakvon kaj ŝajnis sin dio scias kia sinjoro, ĉar li estis universitata profesoro, kaj mariaĝon li komprenis kiel bovo muzikon. Do, kiu nun havas la devon disdoni kartojn?”

”Ni ludu cvikon<sup>7</sup>,” proponis la kuiristo-okultisto, ”por unu kaj du dudekhelerojn:”

- 7 komence de la ludo ĉiu ludanto metas en la bankon interkonsentitan sumon (Jurajda proponas dudekheleran moneron) kaj ricevas kvar kartojn; kian ajn kvanton da ili li rajtas ŝanĝi por aliaj. Poste li povas aŭ rezigni la ludon, aŭ provi akiri iun prenon; sed se li ne ha-



”Prefere diru al ni ion pri metempsikozo,” proklamis la ĉefserĝento-kontisto Vanĉk, ”kiel vi rakontis tion al fraŭlino en la kantino, kiam vi frakasis al vi la nazon.”

”Pri tiu metempsikozo mi ankaŭ jam aŭdis,” ekparolis Ŝvejk, ”foje antaŭ jaroj mi ankaŭ decidiĝis, ke, kiel oni kun via pardono diras, mi memkleriĝos por ne resti neinstruita, kaj mi vizitadis la legoĉambron de la Industria unuiĝo en Prago, sed ĉar mi estis vestita en ĉifonoj kaj sur miaj sidvangoj lumis truoj, mi ne povis kleriĝi, ĉar oni min tien ne enlasis kaj elkondukis eksteren, opiniante, ke mi iris ŝteli vintrajn surtutojn. Mi surprenis do paradan veston, foje iris en muzean bibliotekon kaj kun mia amiko mi elpruntis libron pri tiu metempsikozo kaj tie mi legis, ke certa hinda imperiestro post la morto ŝanĝiĝis en porkon, kaj kiam tiun oni buĉis, li transformiĝis en simion, el la simio li iĝis melo kaj el la melo estis ministro. Poste en la soldatservo mi konvinkiĝis, ke en tio devas esti iom da vero, ĉar ĉiu, kiu havis ian rangosteleton, nomis soldatojn aŭ marporkoj aŭ per alia bestonomo, kaj el tio eblus konkludi, ke antaŭ mil jaroj tiuj ĉi simplaj soldatoj estis gloraj militestroj. Sed se eksplodis la milito, estas tia transmigrado de animoj tre stulta afero. Diablo scias, kiomfoje la homo devas transformiĝi ol li iĝos, ni diru, telefonisto,

vas eĉ unu prenon, li devas ĉe la sekvanta ludo pagi pli altan interkonsentitan sumon (Jurajda proponas du dudekheleraĵajn monerojn). Ĉiun el la kvar prenoj akiras tiu, kiu metis sur la tablon la plej alt-rangan karton de la elmetita koloro, aŭ, se li tian ne havas, karton en koloro de atuto. Pri koloro de atuto decidu karto, reversigita sur la tablo kiel la lasta post disdono de karto al ĉiuj ludantoj. Tiun karton povas la ludanto disdonanta kartojn preni (alproprigi al si); se temas pri sepo aŭ aso, li devas ĝin preni. Se li poste rezignas, li pagas duobligitan bazan sumon, aŭ la saman sumon, kiu estas en la banko, se li ne rezignis kaj ne akiris almenaŭ du prenoj

kuiristo aŭ infanteriano, subite disŝiros lin grenado kaj lia animo eniros en ĉevalon ĉe artilerio, kaj kiam tiu veturas al iu montpinto, la tutan kompanion trafas nova grenado kaj mortigas tiun ĉevalon, en kiun la mortinto enkorpiĝis kaj la animo tuj transloĝiĝas en bovinon ĉe trajnotrupo, el tiu bovino oni kuiras gulaŝon por la viraro kaj la animo tuj migras el la bovino ekzemple en telefoniston, el la telefonisto...”

”Mi miras,” diris la telefonisto Chodounský, okulfrape ofendita, ”ke ĝuste mi devas esti celo de idiotaj spritaĵoj”.

”Ĉu tiu Chodounský, kiu havas privatan detektivan instituton kun la okulo kiel la Dia Triunuo<sup>8</sup>, ne estas via parenco?” demandis Ŝvejk senkulpe. ”Mi tre ŝatas privatajn detektivojn. Foje antaŭ jaroj mi soldatservis ankaŭ kun privata detektivo, laŭnome Stendler. Tiu havis la kapon tiel elipsoida, ke nia ĉefserĝento ĉiam al li diris, ke dum dek du jaroj li vidis jam multe da soldataj kurbaj kapoj, sed ke pri tia elipsoido li eĉ enmense ne havis imagon. ’Aŭdu, Stendler,’ li diris al li ĉiam, ’se nunjare ne estus manovroj, via elipsoida kapo eĉ ne taŭgus por la soldatservo, sed tiel ĉi la artilerio laŭ via elipsoido almenaŭ pliprecizigos al si la celon, kiam ni venos en regionon, kie ne estos pli bona punkto por orientiĝo.’ Stendler trafis de li multe. Kelkfoje dum marŝo la ĉefserĝento sendis lin antaŭen je kvincent paŝoj kaj poste ordonis: ’Direkte al la elipsoida kapo.’ Sinjoro Stendler havis ĉiuflanke egan malbonŝancon, ankaŭ kiel privata detektivo. Kelkfoje li rakontis al ni en kantino pri tio, kian turmenton li ofte havis. Li rice-

8 en Vodička-strato en Prago estis iam privata detektiva instituto de Stefano Chodounský, kiu proponis siajn servojn en gazetoj kaj sur afiŝoj kun emblemo de granda nigra okulo en triangulo, kun radioj elirantaj de la bildigita okulo, tiel ke la emblemo vere memorigis katolikan geometrian emblemon de la Dia Triunuo

vis ĉiam tiajn taskojn, kiel ekzemple elesplori, ĉu edzino de kliento, kiu venis al ili tute senspire, ne priflaris sin reciproke kun iu alia, kaj se ŝi jam iun priflaris, kiun ŝi priflaris, kie kaj kiel ili sin priflaris. Aŭ male. Iu tia ĵaluza ulino volis elesplori, kun kiu virinaĉo ŝia edzo vagas, por povi hejme ankoraŭ pli al li tondri. Stendler estis klera homo, li parolis nur per elektitaj vortoj pri rompo de la geedza fideleco kaj ĉiam preskaŭ ploris, rakontante al ni, ke ĉiuj volis, ke li traftruvo ŝin aŭ lin in flagranti<sup>9</sup>. Iu alia eble pro tio ĝojus, se li trovus tian paron in flagranti kaj havus la okulojn kvazaŭ sur pedunkloj, sed tiu sinjoro Stendler, kiel li al ni rakontis, estis el tio tute konfuzita. Li diris ĉiam tre inteligente, ke li jam ne povis eĉ nur rigardi tiujn maldecajn senbridaĵojn. Al ni ofte fluis salivoj el la buŝo kiel al salivumanta hundo, preter kiu oni portas kuiritan ŝinkon, kiam li rakontis al ni pri ĉiuj tiuj diversaj pozicioj, en kiuj li trovis tiujn parojn. Kiam ni havis malpermeson forlasi la kazernon, li ĉiam tion al ni desegnis. 'Tiel ĉi,' li diris, 'mi vidis tiun sinjorinon kun tiu sinjoro...' Li sciigis al ni ankaŭ adresojn. Kaj li estis tre malĝoja. 'Kiom da vangobatoj mi ricevis de ambaŭ flankoj,' li diris ĉiam, 'kaj tio min ne ĉagrenis tiom kiel tio, ke mi prenis subaĉetojn. Unu tian subaĉeton mi ne forgesos ĝismorte. Li nuda, ŝi nuda. En hotelo kaj ili ne riglis la pordon, idiotoj! Sur divano ili ne havis sufiĉe da loko, ĉar ambaŭ estis grasaj, ili do petolis sur tapiŝo kiel katidoj. Kaj la tapiŝo estis tute tretdifektita, polvokovrita kaj kuŝaĉis sur ĝi cigarstumpoj. Kiam mi eniris, ambaŭ eksaltis, li staris kontraŭ mi kaj tenis la manon kiel figfolion. Kaj ŝi dorsturnis sin al mi kaj sur ŝia haŭto vidiĝis, ke ŝi havas

9 (el la latina): ĉe la faro (traftrovi iun ĉe la faro)

enpremita la tutan kradetforman brodaĵon de la tapiŝo kaj sur la spino algluita cigaredan papertubeton. 'Pardonu, sinjoro Zemek,' mi diras, 'mi estas privata detektivo Stendler, de Chodounský, kaj mi havas ofican devon trovi vin in flagranti surbaze de la anonco fare de via sinjorino edzino. Tiu ĉi damo, kun kiu vi havas ĉi tie nepermesitan interrilaton, estas sinjorino Grot.' Neniam en la vivo mi vidis tiel trankvilan civitanon. 'Permesu, mi min vestos,' li diris, kvazaŭ tio estus memkomprenebla. 'Kulpas sole mia edzino, kiu per senkaŭza ĵaluzo instigas min al nepermesita interrilato kaj kiu, pelata per nura suspekto, ofendas sian edzon per riproĉoj kaj mizera malkonfido. Sed se ne ekzistas dubo, ke la malhonoron ne eblas plu kaŝi... Kie mi havas la kalsonon?' li demandis ĉe tio trankvile. 'Sur la lito.' Surmetante la kalsonon, li klarigis al mi plu: 'Se la malhonoron ne eblas kaŝi, oni diras: eksedziĝo. Sed per tio la makulo de malhonoro ne foriĝos. La eksedziĝo estas ĉiuflanke riska afero,' li parolis plu, vestante sin, 'plej bone estas, se edzino armos sin per pacienco kaj ne donas motivon al publika skandalo. Cetere faru, kion vi volas, mi lasos vin ĉi tie kun la moŝta sinjorino solaj.' Sinjorino Grot intertempe enrampis en la liton, sinjoro Zemek metis al mi la manon kaj foriris.' — Mi jam bone ne memoras, kion ĉion poste sinjoro Stendler laŭ sia rakontado diris, ĉar li interparolis kun tiu sinjorino en la lito tre inteligente, ke edziĝstato ne estas destinita al tio, ke ĝi konduku ĉiun rekte al la feliĉo kaj ke ĉiu havas devon superi voluptemon kaj sian korpan parton nobligi kaj animi. 'Kaj ĉe tio,' rakontis sinjoro Stendler, 'mi komencis malrapide senvestiĝi, kaj kiam mi estis jam nuda kaj tute amkonfuzita kaj pasia kiel cervo en la pariĝa tempo, enpaŝis la ĉambron mia bona konato Stach, an-

kaŭ privata detektivo, el konkurenca instituto de sinjoro Stern, kien turnis sin sinjoro Grot por helpo koncerne lian edzinon, kiu laŭdire havas amanton. Kaj sinjoro Stach diris nenion pli ol: 'Aha, sinjoro Stendler estas in flagranti kun sinjorino Grot, mi gratulas!' Li senbrue denove fermis la pordon kaj foriris. 'Nun estas ĉio jam egala,' diris sinjorino Grot, 'vi ne devas tiel rapide vestiĝi, vi povas okupi la lokon ĉe mi.' 'Pri tiu okupo ĝuste temas, via sinjorina moŝto,' mi proklamis kaj jam eĉ ne sciis, kion mi diras, mi memoras nur, ke mi parolis ion pri tio, ke se ekzistas malakordoj inter geedzoj, suferas per tio ankaŭ eduko de infanoj.' Poste li al ni ankoraŭ rakontis, kiel li rapide vestiĝis, jam estis malantaŭ stratangulo kaj decidis diri tion tuj al sia ĉefo sinjoro Chodounský, sed ke li iris kuraĝigi sin por tio kaj kiam li venis, estis tio kiel veni kun krucifikso post la entombigo. Ke intertempe estis tie jam tiu Stach laŭ la ordono de sia ĉefo sinjoro Stern por doni moralan baton al sinjoro Chodounský, kiajn dungitojn havas tiu en sia privata detektiva instituto, kaj sinjoro Chodounský sciis fari nenion pli bonan ol rapide sendi por la edzino de sinjoro Stendler, ke ŝi mem ordigu la kapon al sia edzo, se tiun oni ien sendas por plenumi ofican devon kaj dungitoj de la konkurenca instituto trovas lin in flagranti. 'De tiu tempo,' diris ĉiam sinjoro Stendler, kiam la parolo venis al tiu ĉi punkto, 'mi havas la cerbujon ankoraŭ pli elipsoida.'

"Do, ĉu ni ludu por kvin — dek?" Ili ludis.

La trajno haltis en la stacio Moson. Estis jam vespero kaj oni permesis al neniuj eliri el vagono.

Kiam la trajno moviĝis, el iu vagono eksonis forta voĉo, kvazaŭ ĝi volus superkrii la brue ruliĝantan trajnon. En pia humoro de la vespero soldato de Kašperské Hory per terura

kriego prikantis la silentan nokton, proksimiĝantan al hungaraj ebenajoj:

*"Bonan nokton! Bonan nokton!*

*Ĝin al lacaj ni deziras.*

*Tag' ŝtelkaŝe jam foriras,*

*ripozos man' diligenta*

*ĝis mateno tre silenta.*

*Bonan nokton! Bonan nokton!"*

"Fermu la faŭkon, kanajlo," interrompis iu la sentimentalan kantanton, kiu silentiĝis.

Oni detiris lin de fenestro.

Sed diligentaj manoj ne ripozis ĝis la mateno. Same kiel ĉie en la trajno sub lumo de kandeloj, ankaŭ ĉi tie en la lumo de petrola lampeto pendigita sur vando oni plu ludis cvikon kaj Ŝvejk ĉiam, kiam iu alprenis atutan karton kaj malgajnis, proklamis, ke tio estas la plej justa ludo, ĉar ĉiu povas ŝanĝi tiom da kartoĵoj, kiom li volas.

"Ĉe cviko," asertis Ŝvejk, "oni devas alpreni nur atutan ason kaj sepon, sed poste oni povas rezigni. Ceterajn atutojn oni ne devas alpreni. Tion ĉiu faras jam je sia propra risko."

"Ni ludu 'sanon'<sup>10</sup>," proponis ĉe ĝenerala konsento Vaněk.

"Kera sepo," anoncis Ŝvejk, demetante kartoĵojn. "Ĉiu po kvin heleroj kaj oni disdonas po kvar kartoĵoj. Rapidu, ke ni finludu kelke da partioj."

Kaj sur la vizaĝo de ĉiuj vidiĝis tia kontento, kvazaŭ la milito ne ekzistus kaj ili ne estus en trajno, kiu veturigas ilin al pozicio, al grandaj sangoplenaj bataloj kaj masakroj, sed kvazaŭ ili sidus en iu praga kafejo malantaŭ ludtabletoj.

10 nomo por ankoraŭ pli hazarda speco de kartludo "cviko", kiam oni povas malgajni multe pli altan sumon

”Tion mi ne atendis,” diris Ŝvejk post unu partio, ”ke mi ricevos ’virkaton’ (ason), se mi ludis havante nenion kaj ŝanĝis ĉiujn kvar. Kien vi vin puŝas kun reĝo? Mi superos la reĝon sen palpebrumo.”

Kaj dum ĉi tie oni superis reĝon per ’virkato’, malproksime en la fronto la reĝoj superis unu la alian per siaj subuloj.

\*

Komence de la vojo en stabvagono, kie sidis oficiroj de la infanteria bataliono, regis stranga silento. Plejparto da oficiroj enprofundiĝis en legadon de tole bindita libreto kun titolo: ”Pekoj de la patroj. Novelo de Ludoviko Ganghofer<sup>11</sup>” kaj ĉiuj samtempe legis la paĝon 161. La kapitano Ságner, komandanto de la bataliono, staris ĉe fenestro, mantenis la saman titolon, havante ĝin malfermita ankaŭ sur la paĝo 161.

Li rigardis la regionon kaj meditis, kiel propre plej kompreneble al ĉiuj klarigi, kion ili faru per la libro. Estis tio fakte plej severe konfidenca.

Intertempe la oficiroj meditis pri tio, ke la kolonelo Schröder definitive freneziĝis. Kvankam jam longe li estis frenezeta, tamen ne eblis atendi, ke tiel subite lin tio kaptos. Antaŭ forveturo de la trajno li igis alvoki ilin al la lasta konsiliĝo, ĉe kiu li al ili anoncis, ke al ĉiu apartenas libro ”Pekoj de la patroj” de Ludoviko Ganghofer kaj ke la librojn li igis alporti en la regimentan kancelarion.

”Sinjoroj,” li diris kun terure mistera mieno, ”neniam forgesu la paĝon 161!” Enprofundiĝintaj en la legadon de tiu ĉi

11 germana-aŭstra verkisto de multaj plaĉaj romanoj kaj rakontoj. Vivis en la jaroj 1855-1920

paĝo, ili ne povis ion tie trovi. Sur tiu paĝo ia Marta alpaŝis al skribtablo, eltiris de tie scenaron kaj laŭte meditis, ke la publiko devas senti kompaton al heroo de la rolo. Poste sur la paĝo aperis Alberto, senĉese klopodanta ŝercparoli, kio, elŝirita el la antaŭiranta nekonata enhavo, ŝajnis esti tia idiotaĵo, ke la ĉefleŭtenanto Lukáš furioze mordrompis sian cigaredingon.

”Li freneziĝis, maljunulaĉo,” pensis ĉiuj, ”jam venis lia fino. Nun oni translokos lin en la ministerion de milito.”

La kapitano Ságner turnis sin de la fenestro, kiam li ĉion tion bone kombinis en la kapo. Li ne havis troan pedagogian talenton, tial tiel longe daŭris, ol li kreis al si en la kapo la planon de prelego pri signifo de la paĝo 161.

Antaŭ ol li komencis ekspliki, li alparolis ilin: ”Miaj sinjoroj”, kiel faris tion la maljunulaĉo-kolonelo, kvankam pli frue, antaŭ ol ili envagoniĝis, li alparolis ilin ĉiam ”Kamaradoj”.

”Do, miaj sinjoroj...” Kaj li komencis prelegi, ke hieraŭ vespere li ricevis de la kolonelo instrukciojn, koncernantajn la paĝon 161 en ”Pekoj de la patroj” de Ludoviko Ganghofer.

”Do, miaj sinjoroj,” li solene daŭrigis, ”tute konfidencaj informoj, koncernantaj novan sistemon, kiel ĉifri depeŝojn en la fronto.” La kadeto Biegler eltiris notlibron kaj krajonon kaj diris per neordinare fervora voĉo: ”Mi estas preparita, sinjoro kapitano.”

Ĉiuj ekrigardis tiun stultulon, kies fervoro en la lernejo por unujaraj volontuloj limis idiotecon. Li memvole soldatiĝis kaj jam ĉe la unua okazo, koniĝante kun hejmaj kondiĉoj de la lernantoj, rakontis al la komandanto de la lernejo por unujaraj volontuloj, ke liaj prauloj origine portis la nomon Bügle-



roj el Leuthold kaj ke en sia blazonŝildo ili havis cikonian flugilon kun fiŝvosto.

De tiu tempo oni alinomis lin laŭ lia blazonŝildo kaj la "Cikoniaflugilo kun fiŝvosto" estis krude persekutata kaj tuj iĝis nesimpatia, ĉar tio neniel akordiĝis kun honesta komercado de lia patro per leporaj kaj kuniklaj feloj, kvankam tiu romantika entuziasmulo honeste klopodis engluti la tutan militan sciencan, elstaris per fervoro kaj sciigo ne nur de ĉio, kion oni prezentis al li por lerni, sed eĉ li mem idiotigis sian kapon ju pli longe des pli multe per studado de verkoj pri militarto kaj historio de militado, pri kio li ĉiam ligis interparolon, dum oni lin ne silentigis kaj ne ruinigis. En oficiraj rondoj li rigardis sin mem kiel samvaloran kompare kun altrangaj suboficiroj.

"Vi, kadeto," diris la kapitano Ságner, "dum mi ne permesos al vi paroli, silentu, ĉar neniuj vin pri io demandis. Cetero, vi estas damninde 'saĝa' soldato. Nun mi prezentas al vi tute konfidencajn informojn, kaj vi skribas ilin en vian notlibron. Ĉe perdo de la notlibro atendas vin feldtribunalo."

La kadeto Biegler havis al ĉio ankoraŭ tiun malbonan kutimon, ke ĉiam kaj ĉiun li klopodis konvinki per ekskuzo, ke li pensas tion bone.

"Obee mi raportas, sinjoro kapitano," li respondis, "ke ankaŭ ĉe eventuala perdo de la notlibro neniuj deĉifros, kion mi skribis, ĉar mi tion stenografas kaj miajn mallongigojn neniuj kapablos legi. Mi uzas anglan sistemon de stenografado."

Ĉiuj malestime lin ekrigardis, la kapitano Ságner eksvingis la manojn kaj daŭrigis sian prelegon.

"Mi jam menciis la novan sistemon, kiel ĉifri depeŝojn en la fronto, kaj se eble estis al vi nekompreneble, kial el la nove-

loj de Ludoviko Ganghofer oni rekomendis al vi ĝuste la 'Pekoj de la patroj' paĝo 161, estas tio, sinjoroj, ŝlosilo al nova metodo de cifrado, valida surbaze de nova ordono, kiun eldonis la stabo de la armea korpuso, al kiu ni estas alkomanditaj. Kiel vi scias, ekzistas multe da metodoj, kiel cifri gravajn sciigojn en la fronto. La plej nova, kiun ni uzas, estas numera kompletiga metodo. Per tio ankaŭ senvalidiĝas cifroj kaj instrukcio kiel ilin deĉifri, senditaj al vi lastsemajne de la regimenta stabo."

"Sistemo de la arکیدuko Albreĥto," murmuris por si la fervora kadeto Biegler, "8922 = R, transprenita el la metodo de Gronfeld."

"La nova sistemo estas tre simpla," sonis tra la vagono la voĉo de la kapitano, "mi ricevis duan parton de la libro kaj instrukciojn persone de sinjoro kolonelo.

Se ekzemple oni donas al ni ordonon: 'Sur la pinto 228 alceli la pafadon de aŭtomataj fusiloj maldekstren,' ni ricevas, sinjoroj, tiun ĉi depeŝon: 'Afero - kun - ni - tion - ni - rekoni - en - tiu - promesis - tiu - Marta - vin - tion - zorgeme - poste - ni - Marta - ni - tion - ni - dankon - feliĉege - publika kolegio - fino - ni - promesis - ni - plibonigis - vere - mi opinias - ideoj - tute - regas - voĉo - lastan.' Do, tute simpla sen ĉiuj superflujaj kombinoj. — De la stabo telefone al la bataliono, de la bataliono telefone al la kompanioj. Komandanto, ricevinte tiun ĉi ĉifritan depeŝon, deĉifros ĝin per jena maniero. Li prenos la libron 'Pekoj de la patroj', malfermos sur la paĝo 161 kaj sur la kontraŭa paĝo 160 komencos de supre serĉi la vorton 'Afero'. Mi petas, sinjoroj. La unuan fojon aperas 'Afero' sur la paĝo 160 kiel kvindekdua vorto en frazordo, do sur la kontraŭa paĝo 161 li elserĉos kvindekduan literon de supre.

Rimarku, ke tio estas 'S'. Sekvanta vorto de la depeŝo estas 'kun'. Ĝi troviĝas sur la paĝo 160 kiel sepa vorto en frazordo, respondanta al sepa litero sur la paĝo 161, al litero 'u'. Poste venas 'ni', tio estas, sekvu min atenteme, mi petas, okdekoka vorto, respondanta al okdekoka litero sur la kontraŭa 161a paĝo, kio estas 'r', kaj ni havas solvita 'Sur'. Kaj tiel ni daŭrigas ĝis ni ekscias la ordonon: 'Sur la pinto 228 direkti la pafadon de aŭtomataj fusiloj maldekstren.' Tre sprita, sinjoroj, simpla kaj nebla deĉifri sen ŝlosilo: paĝo 161, Ludoviko Ganghofer, 'Pekoj de la patroj'."

Ĉiuj senvorte trarigardis la malfeliĉajn paĝojn kaj iel konsiderinde super tio enpenŝiĝis. Momenton regis silento, ĝis subite zorgeme ekkriis la kadeto Biegler: "Sinjoro kapitano, obee mi raportas: Jesuo Maria! Tio ne kongruas!"

Kaj estis tio vere tre mistera.

Eĉ se ili klopodis, kiel ili povis, krom la kapitano Ságner neniu trovis tiujn vortojn sur la paĝo 160 kaj al tio respondantajn literojn sur la kontraŭa paĝo 161, per kiu komenciĝis la ŝlosilo.

"Miaj sinjoroj," ekbalbutis la kapitano Ságner, konvinkiĝinte, ke la senespera ekkrio de la kadeto Biegler respondas al vero, "kio probable okazis? En mia Ganghofer 'Pekoj de la patroj' tio estas, kaj en viaj ekzempleroj ne?"

"Permesu, sinjoro kapitano," ekparolis denove la kadeto Biegler. "Mi permesas al mi atentigi, ke la romano de Ludoviko Ganghofer havas du partojn. Bonvolu, mi petas, konvinkiĝi sur la titolpaĝo: 'Romano en du partoj'. Ni havas la unuan parton kaj vi havas la duan," daŭrigis la ekzakta kadeto Biegler, "estas do klara kiel tago, ke niaj paĝoj 160 kaj 161 ne akordiĝas kun la viaj. Ni havas tie ion tute alian. La unua

vorto de la deĉifrita depeŝo estas ĉe vi 'Sur' kaj ni ricevis 'Hej!'"

Al ĉiuj estis nun tute klare, ke Biegler eble tamen nur ne estas tiel granda stultulo.

"Mi havas la duan parton de la brigada stabo," diris la kapitano Ságner, "ĉi tie ŝajne temas pri eraro. Sinjoro kolonelo mendis por vi la unuan parton. Laŭ ĉio," li daŭrigis tiel, kva-zaŭ tio estus preciza kaj klara kaj li sciis tion jam longe antaŭ tio, ol li havis sian prelegon pri tre simpla maniero de ĉifrado, "oni intermiksas tion ĉe la stabo de la brigado. Oni ne sciigis al la regimento, ke temas pri la dua parto, kaj tiel tio okazis."

Intertempe la kadeto Biegler venke ĉirkaŭrigardis al ĉiuj kaj leŭtenanto Dub flustris al la ĉefleŭtenanto Lukáš, ke tiu 'Cikonia flugilo kun fiŝvosto' humiligis la kapitanon Ságner, kiel decas kaj konvenas.

"Stranga afero, sinjoroj," ekparolis la kapitano Ságner, kva-zaŭ li volus ligi la interparolon, ĉar tiu silento estis tre hontiga. "En la kancelario de la brigado estas sensprituloj."

"Mi permesas al mi rimarki," diris denove la nelacigebla kadeto Biegler, kiu denove volis fieriĝi per siaj scioj, "ne konvenas, ke similaj aferoj de konfidenca, severe konfidenca karaktero migru de la divizio tra la kancelario de la brigado. La sciigo koncernanta la plej konfidencan aferon de la armea korpuso povus esti anoncita per severe konfidenca cirkulero nur al komandantoj de diviziaj kaj brigadaj partoj, al komandantoj de regimentoj. Mi konas sistemojn de ĉifroj, kiujn oni uzis en la militoj pro Sardinio kaj Savojo<sup>12a</sup>, en la milito de

12a en la jaroj 1848-1849 kaj 1859-1861

angloj kaj francoj ĉe Sevastopol<sup>12b</sup>, ĉe ribeliĝo de la 'boksistoj' en Ĉinio<sup>12c</sup> kaj en la lasta rusa-japana milito<sup>12ĉ</sup>. Tiujn ĉi sistemojn oni transdonadis...”

”Tio estas por ni grava kiel maljuna virkapro, kadeto Biegler,” diris la kapitano Ságner kun esprimo de malestimo kaj malplaĉo; ”certas, ke la sistemo, pri kiu ni parolis kaj kiun mi al vi klarigis, estas ne nur unu el la plej bonaj, sed ni povas diri el nesupereblaj. Ĉiuj kontraŭspionaj sekcioj de niaj malmamikaj staboj povas fermi sian 'butikon'. Eĉ se ili cerbumus ĝisfreneze, ili ne solvos niajn ĉifrojn. Tio estas io tute nova. Tiujn ĉi ĉifrojn antaŭas nenio simila.”

La fervora kadeto Biegler signifoplene ektusis.

”Mi permesas al mi, sinjoro kapitano,” li diris, ”atentigi pri la libro de Kerickhoff pri ĉifrado en la armeo. Tiun libron ĉiu povas mendi al si en la eldonejo de la 'Soldata enciklopedio'. Tie estas detale priskribita la metodo, sinjoro kapitano, pri kiu vi al ni rakontis. Ĝia eltrovinto estas kolonelo Kircher, servanta en la tempo de Napoleono I. en la saksa armeo. Ĉifrado per vortoj laŭ la maniero de Kircher, sinjoro kapitano. Ĉiu vorto de depeŝo klariĝas sur kontraŭa paĝo de la ŝlosilo. Tiu metodo perfektigita fare de ĉefleŭtenanto Fleissner en la libro: 'Kompendio de la soldata kriptografio', kiun ĉiu povas aĉeti al si en la eldonejo de milita akademio en Viena Nova Urbo. Mi petas, sinjoro kapitano.” La kadeto Biegler ekpalpis

12b milito de Turkio, Francio, Anglio kaj Sardinio kontraŭ Ruslando (1853-1856), nomata Krimea milito

12c ribeliĝo de libervola ĉina unuiĝo ”La pugno de justeco kaj paco” (1899-1901, de tie devenas la popola nomo ”boksistoj”), kiu volis perforte elpeli ĉiujn eŭropanojn el Ĉinio. La ribeliĝon subpremis ĉiuj potencaj eŭropaj ŝtatoj

12ĉ en la jaroj 1904-1905

en mankofreton kaj eltiris libron, pri kiu li parolis, kaj daŭrigis: "Fleissner prezentas la saman ekzemplon, mi petas, ĉiu bonvolu konvinkiĝi. La saman ekzemplon, kiun ni aŭdis.

Depeŝo: Sur la pinto 228 alceli la pafadon de aŭtomataj fusiloj maldekstren.

Ŝlosilo: Ludoviko Ganghofer, 'Pekoj de la patroj'. Dua parto.

Kaj rigardu, mi petas, plu. La ĉifro: 'Afero kun ni tion ni rekoni en tiu promesis tiu Marta...' kaj tiel plu. Ĝuste tiel, kiel ni aŭdis antaŭ momento."

Kontraŭ tio eblis neniel oponi. Tiu flavbekula "Cikonia flugilo kun fiŝvosto" pravis.

Iu el generaloj en la armea stabo plifaciligis al si la laboron. Li aperigis la libron de Fleissner pri ĉifrado en la armeo, kaj jam tio estis preta.

Dum tiu tuta tempo vidiĝis, ke la ĉefleŭtenanto Lukáš subpremas ian strangan mensan ekscitiĝon. Li mordetis la lipojn, volis ion diri, sed fine li komencis paroli pri io alia, ol estis lia antaŭa intenco.

"Oni ne prenu tion tiel tragike," li ekparolis kun strangaj embarasoj, "dum nia restado en la tendaro en Bruck an der Leitha ŝanĝiĝis jam kelke da sistemoj por ĉifrado de depeŝoj. Antaŭ ol ni alveturos al la fronto, estos denove aliaj sistemoj, sed mi opinias, ke sur la bataalkampo mankas tempo por solvi tiajn kriptogramojn. Antaŭ ol iu el ni finsolvus tian ĉifritan ekzemplon, nia kompanio, bataliono eĉ brigado estus jam longe detruita. Praktikan signifon tio ne havas!"

La kapitano Ságner tre nevolonte kapjesis. "En praktiko," li diris, "almenaŭ kio koncernas miajn spertojn el la serba bataalkampo, neniu havis tempon por solvi ĉifritajn skribojn.

Mi ne diras, ke ĉifroj ne havas sian signifon ĉe longeta restado en tranĉeoj, kiam ni enfosiĝis kaj atendas. Ke ĉifroj ŝanĝiĝas, tio estas ankaŭ vero.”

La kapitano Ságner cedis de ĉiuj flankoj: ”Grandan parton da kulpo, ke ekde staboj ĝis pozicioj oni nun senĉese mapli kaj malpli uzas ĉifrojn, havas tio, ke niaj feldtelefonoj estas neprecizaj kaj ĉefe ĉe pafado de artilerio nereproduktas klare unuopajn silabojn. Oni aŭdas absolute nenion kaj tio kaŭzas superfluan ĥaoson.” Li eksilentis.

”Ĥaoso estas tio la plej malbona, kio povas esti sur batal-kampo, sinjoroj,” li ankoraŭ aldonis profete kaj silentiĝis.

”Post momento,” li diris, rigardante tra fenestro, ”ni estos en Győr. Miaj sinjoroj! La viraro ricevos tie po dek kvin deka-gramoj da hungara salamo. Duonhora ripozo.”

Li ekrigardis skriban marŝordonon: ”Je 4:12 oni forveturas. Je 3:58 ĉio en vagonoj. Oni elvagoniĝas po kompanioj. La dekunua kaj tiel plu. Po plotonoj direkte al magazeno nro 6. Kontrolo ĉe disdonado: la kadeto Biegler.”

Ĉiuj ekrigardis la kadeton Biegler kun penso: ”Vi spertos, flavbekulo, kio estas soldatservo.”

Sed la fervora kadeto Biegler eltiris jam el sia kofreto paperfolion, liniilon, la folion liniigis, dividis laŭ marŝkompanioj kaj demandis komandantojn de unuopaj kompanioj pri nombro de la viraro, el kiuj neniu sciis tion parkere kaj kapablis sciigi al Biegler la petatajn nombrojn nur laŭ neklaraj rimarkoj en siaj notlibroj.

Intertempe la kapitano Ságner en senespero komencis legi la malfeliĉan libron ”Pekoj de la patroj”, kaj kiam la trajno haltis en la stacio Győr, li klakfermis la tralegitajn paĝojn kaj rimarkis: ”Tiu ĉi Ludoviko Ganghofer ne verkas malbone.”

La ĉefleŭtenanto Lukáš kiel unua ekimpetis el la stabvagono kaj iris al la vagono, kie estis Ŝvejk.

Ŝvejk kaj la ceteraj jam antaŭlonge ĉesis ludi kartojn kaj Baloun, la servosoldato de la ĉefleŭtenanto Lukáš, havis jam tian malsaton, ke li komencis ribeli kontraŭ la soldata superularo kaj proklamis, ke li scias tre bone, kiel sinjoroj oficiroj ŝtopas siajn stomakojn. Estas tio pli malbona ol en la tempo de servuteco. Ke pli frue tio en soldatservo ne ekzistis. Ke tiam ankoraŭ, kiel diras lia avĉjo-eksbienmastro hejme, oficiroj dum la sesdekseka milito<sup>13</sup> dividis kun la soldatoj kokinojn kaj panon. Lia lamentado ne havis finon, ĝis fine Ŝvejk bontrovis laŭdi la situacion en la armeo dum la nuna milito.

"Vi havas iel junan avĉjon," li diris afable, kiam ili alveturis al Győr, "kiu kapablas memori nur la militon en la sesdekseka jaro. Mi konas certan Ronovský kaj tiu havis avĉjon, kiu estis en Italio ankoraŭ dum la servuteco, servis tie dek du jarojn kaj revenis hejmen kiel kaporalo. Kaj li ne havis laboron, tial lin, tiun avĉjon, alprenis al si por la servo lia patro. Kaj tiam ili foje iris servuti, kunveturigi arbostumpojn, kaj kiel rakontis al ni tiu avĉjo, kiu servis ĉe sia patro, unu tia arbostumpo estis vera giganto kaj tiel ili ne kapablis ĝin eĉ nur movi. Kaj li diris: 'Ni lasu ĝin ĉi tie, friponon, kiu per ĝi penus?' Kaj forstisto, kiu tion aŭdis, komencis krei kaj levis bastonon, ke ili devas tiun arbostumpon meti sur veturilon. Kaj la avĉjo de tiu nia Ronovský diris nenion alian ol: 'Vi, bastonŝatulo, mi estas maljuna hardita soldato.' Sed post unu semajno li ricevis skriban ordonon kaj devis soldatiĝi, denove en Italio, tie li estis novajn dek jarojn kaj skribis hejmen,

13 la milito de Aŭstrio kontraŭ Prusio (14.6.1866)



ke post la reveno li ekbatos tiun forstiston per hakilo en la kapon. Estis nur feliĉo, ke tiu forstisto mortis.”

En tiu momento ĉe pordo de la vagono aperis la ĉefleŭtenanto Lukáš.

”Ŝvejk, iru ĉi tien,” li diris, ”lasu al vi viajn idiotajn parolojn kaj preferu iru ion al mi klarigi.”

”Kompreneble, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto.”

La ĉefleŭtenanto Lukáš forkondukis Ŝvejkon kaj la rigardo, per kiu li lin sekvis, estis tre suspektema.

Dum la tuta prelego de la kapitano Ságner, kiu finiĝis per granda fiasko, la ĉefleŭtenanto Lukáš atingis certan detektivan kapablon, al kio ne necesis multe da neordinaraj kombinaĵoj, ĉar unu tagon antaŭ la forveturo Ŝvejk anoncis al la ĉefleŭtenanto Lukáš: ”Sinjoro ĉefleŭtenanto, ĉe la bataliono estas libroj por sinjoroj leŭtenantoj. Mi forportis ilin el la regimenta kancelario.”

Tial, kiam ili transpaŝis duajn relojn kaj eniris malantaŭ senfajran lokomotivon, kiu jam semajnon atendis trajnon kun municio, la ĉefleŭtenanto Lukáš demandis rekte: ”Ŝvejk, kiel tiam tio estis pri tiuj libroj?”

”Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke tio estas tro longa historio, kaj vi ĉiam bonvolas ekscitiĝi, se mi rakontas al vi ĉion detale. Kiel tiam, kiam vi disŝiris tiun skribon koncernantan la militan prunton kaj volis doni al mi kapobaton kaj mi al vi rakontis, ke mi foje legis en libro, ke iam, kiam estis milito, la homoj devis pagi impostojn pro fenestroj, pro ĉiu fenestro dudek helerojn, pro anseroj same tiel...”

”Tiel ĉi ni ne finus, Ŝvejk,” diris la ĉefleŭtenanto Lukáš, daŭrigante la enketon, ĉe kio li ekintencis, ke tio la plej severe konfidenca devas esti nature tute prisilentita, por ke tiu ka-

najlo Ŝvejk ne faru el tio denove ian priparolataĵon. "Ĉu vi konas Ganghoferon?"

"Kio li estas?" demandis Ŝvejk kun intereso.

"Idiota ulo, li estas germana verkisto," respondis la ĉefleŭtenanto Lukáš.

"Mi ĵuras per mia animo, sinjoro ĉefleŭtenanto," diris Ŝvejk kun mieno de martiro, "mi konas persone neniun germanan verkiston. Persone mi konis nur unu ĉeĥan verkiston, Ladislaon Hájek el Domažlice. Li estis redaktoro de 'La mondo de la bestoj' kaj foje mi vendis al li strathundon, ŝajnigante ĝin pursanga ŝpico. Li estis tre gaja kaj bonanima sinjoro. Li iradis en certan gastejon kaj tie li ĉiam legis siajn rakontojn, tiel malgajajn, ke ĉiuj ridis, kaj li poste ploris, en la gastejo pagis por ĉiuj kaj ni devis al li kanti: 'Domažlice, turo via, belkolora kaj gracia, kiu turon ĉi ornamis, tiu belulinojn amis... Tiu teron jam ne tuŝas, en silenta tombo kuŝas...' "

"Vi ja ne estas en teatro, vi kriegas kiel opera kantisto, Ŝvejk," timigite ekparolis la ĉefleŭtenanto Lukáš, kiam Ŝvejk finkantis la lastan frazon: "Tiu teron jam ne tuŝas, en silenta tombo kuŝas." "Pri tio mi vin ne demandis. Mi volis scii nur, ĉu vi rimarkis, ke tiuj libroj, pri kiuj vi mem al mi menciis, estis de Ganghofer. Kiel do statas la afero pri tiuj libroj?" li kolere eksplodis.

"Ĉu pri tiuj, kiujn mi forportis el la regimenta kancelario al la bataliono?" demandis Ŝvejk. "Tiu vere estis verkitaj de tiu, pri kiu vi min demandis, ĉu mi lin ne konas, sinjoro ĉefleŭtenanto. Mi ricevis telefonogramon rekte el la regimenta kancelario. Nome, oni volis sendi tiujn librojn en la batalionan kancelarion, sed ĉiuj de tie estis for eĉ kun la ĉefserĝentokancelariestro, ĉar ili devis esti en kantino, se oni veturas al

la fronto kaj ĉar neniuj scias, ĉu li ankoraŭ iam sidos en kantino. Ili do estis tie, sinjoro ĉefleŭtenanto, estis kaj trinkis, oni povis neniun telefone atingi, eĉ ne de ĉiuj aliaj marŝkoj, sed ĉar vi al mi ordonis, ke mi kiel kuriero estu provizore ĉe telefono antaŭ ol oni alkomandos al ni la telefoniston Choudounský, mi sidis, atendis, ĝis venis la vico ankaŭ al mi. Tiuj el la regimenta kancelario sakris, ke ili povas neniun atingi, ke venis telefonogramo, ke marŝbataliona kancelario transprenu en la regimenta kancelario iajn librojn por sinjoroj oficiroj de la tuta marŝbatlo. Ĉar mi scias, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke en la soldatservo oni devas agi rapide, mi telefonis al la regimenta kancelario, ke tiujn librojn transprenos mi mem kaj forportos ilin en la batalionan kancelarion. Tie mi ricevis tian amason, ke nur penplene mi fortrenis tion al ni en la kompanian kancelarion kaj la librojn mi trarigardis. Sed mi pensis ion mian. Scie, la regimenta ĉefserĝento-kontisto en la regimenta kancelario al mi diris, ke laŭ la telefonogramo al la regimento oni ĉe la bataliono jam scias, kion el tiuj libroj elekti, kiun parton. Nome, tiuj libroj havis du partojn. La unua parto aparte, la dua parto aparte. Neniam en la vivo mi tiom ridis, ĉar en la vivo mi tralegis jam multe da libroj, sed neniam mi komencis legi ion de la dua parto. Kaj li tie diras al mi ankoraŭfoje: 'Jen vi havas la unuajn partojn kaj jen la duajn. Sinjoroj oficiroj jam scias, kiun parton legi.' Mi do ekpensis, ke ĉiuj estas ebriegaj, ĉar se oni volas legi libron de komenco, tian romanon kiun mi alportis pri tiuj 'Pekoj de la patroj', ĉar ankaŭ mi regas la germanan lingvon, oni devas komenci per la unua parto, ĉar ni ne estas judoj kaj ne legas tion en renversa ordo. Ankaŭ tial mi demandis vin telefone, sinjoro ĉefleŭtenanto, kiam vi revenis el la kazino kaj mi

anoncis al vi tion pri tiuj libroj, ĉu eble nun en la soldatser-vo ne estas tio inversita kaj ĉu la libroj ne legiĝas en renver-  
sa ordo, unue la dua kaj poste la unua parto. Kaj vi al mi di-  
ris, ke mi estas ebriega bruto, se mi ne scias eĉ tion, ke en la  
Patronia estas unue 'Patro nia' kaj nur poste 'amen'.

Ĉu estas al vi malbone, sinjoro ĉefleŭtenanto?" demandis  
Ŝvejk kun intereso, kiam pala ĉefleŭtenanto Lukáš altenis sin  
je akvorezervuja ŝtupeto de la senfajra lokomotivo.

Sur lia pala vizaĝo ne vidiĝis kolera mieno. Estis tio io se-  
nespere senespera.

"Daŭrigu, Ŝvejk, daŭrigu, jam tio indiferentas, jam estas  
bone..."

"Kiel mi diras," sonis la mola voĉo de Ŝvejk sur forlasitaj  
reloj, "ankaŭ mi samopiniis. Foje mi aĉetis sangoplenan ro-  
manon pri Rosza Szavan el la Bakona-arbaro<sup>14</sup> kaj mankis tie  
la unua parto, mi do devis konjekti pri tiu komenco, kaj eĉ ĉe  
tia rabmurda historio oni ne povas malhavi la unuan parton.  
Tiel estis al mi tute klare, ke estas propre superflue, se sinjoroj  
oficiroj legus unue la duan parton kaj poste la unuan, kaj kiel  
stulte aspektus, se mi sciigus ĉe la bataliono tion, kion oni  
diris en la regimenta kancelario, ke sinjoroj oficiroj jam sci-  
as, kiun parton legi. Tio pri tiuj libroj ĉiuflanke ŝajnis al mi  
terure okulfrapa kaj mistera, sinjoro ĉefleŭtenanto. Mi sciis,  
ke sinjoroj oficiroj ĝenerale malmulte legas, kaj se estas ba-  
talbruego..."

"Ŝvejk, lasu al vi tiujn idiotaĵojn," ekĝemis la ĉefleŭtenan-  
to Lukáš.

"Mi ja demandis vin ankaŭ tuj telefone, sinjoro ĉefleŭte-  
nanto, ĉu vi deziras tuj ambaŭ partojn samtempe, kaj vi di-

14 montetaro en okcidenta Hungario, etendiĝanta ĝis Balatono

ris al mi ĝuste kiel nun, ke mi lasu al mi tiujn idiotaĵojn, laŭdire ke vi ne kuntrenos iajn librojn. Kaj tiam mi ekpensis, ke se tio estas via opinio, ke ankaŭ la ceteraj sinjoroj rigardos tion same. Mi demandis pri tio ankaŭ nian Vanĉk, tiu ja havas jam frontajn spertojn. Li diris, ke komence ĉiu el sinjoroj oficiroj konsideris la tutan militon kiel ŝercaferon kaj kunveturigis al la fronto la tutan bibliotekon kiel en somerumejon. Ili ricevadis donace de arkidukinoj eĉ la tutan kolektitan verkaron de diversaj poetoj por la fronto, tiel ke servosoldatoj kurbigis sub tio kaj malbenis la tagon de sia naskiĝo. Vanĉk diris, ke tiuj libroj estis tute neuzeblaj, koncerne fumadon, ĉar ili estis sur tre bela, dika papero kaj ke sur latrino la homo skrapvundis al si per tiaj poemoj, pardonu, sinjoro ĉefleŭtenanto, la tutan postaĵon. Ne restis tempo por legi, ĉar oni devis senĉese fuĝi, oni tion do forĵetadis kaj poste estis jam tia kutimo, ke tuj kiam oni ekaŭdis unuan kanonadon, servosoldato senprokraste elĵetis ĉiujn amuzajn librojn. Post tio, kion mi eksciis, mi volis ankoraŭfoje aŭdi vian opinion, sinjoro ĉefleŭtenanto, kaj kiam mi telefone vin demandis, kiel tiujn librojn trakti, vi diris, ke kiam io enrampos mian idiotan kapon, ke mi ne cedos, dum mi ne ricevos sur la faŭkon. Tial mi do forportis en la batalionan kancelarion nur tiujn unuajn partojn de la romano, sinjoro ĉefleŭtenanto, kaj la duan parton mi provizore lasis en nia kompania kancelario. Mi havis tiun bonan intencon, ke post kiam sinjoroj oficiroj tralegos la unuan parton, ke poste oni disdonos al ili la duan parton, kiel el biblioteko, sed subite venis tio, ke oni veturos, kaj telefonogramo por la tuta bataliono, ke ĉion superfluan oni metu en la regimentan magazenon. Mi do demandis ankoraŭ sinjoron Vanĉk, ĉu li konsideras la duan parton de tiu romano

kiel ion superfluan, kaj li al mi diris, ke ekde la tempo de malgajaj spertoj en Serbio, Galicio kaj Hungario oni veturigas al la fronto neniam amuzajn librojn, kaj ke tiuj kestoj en urboj por kolekti en ili formetitajn ĵurnalojn por soldatoj, ke nur tiuj estas bonaj, ĉar en ĵurnalojn eblas bone volvi tabakon aŭ fojon, kion soldatoj fumas en tranĉeoj. Ĉe la bataliono oni jam disdonis la unuajn partojn de tiu romano kaj tiujn duajn partojn ni forportis en la magazeno.”

Ŝvejk silentiĝis kaj tuj aldonis: ”Kiom da diversaj objektoj tie estas, en tiu magazeno, sinjoro ĉefleŭtenanto, eĉ cilindra ĉapelo de ĥorestro el Budějovice, en kiu li soldatiĝis ĉe la regimento...”

”Ion mi al vi diros, Ŝvejk,” ekparolis la ĉefleŭtenanto Lukáš kun peza ĝemo, ”vi absolute ne konscias la sekvojn de via agado. Al mi mem jam abomenas nomi vin idioto. Por via idioteco ne ekzistas konvena vorto. Se mi diras al vi ’idioto’, mi alparolas vin per ankoraŭ afabla nomo. Vi faris ion tiel teruran, ke viaj la plej grandaj krimoj, per kiuj vi kulpiĝis dum la tempo, kiam mi vin konas, estas kompare kun tio vera anĝela muziko. Se vi, Ŝvejk, scius, kion vi faris... Sed tion vi neniam ekscios. Kaj se iam la parolo eble venus al tiuj libroj, ne aŭdacu parolaĉi, ke mi diris al vi ion telefone, ke tiun duan parton... Se iam oni parolus pri tio, kiel tio estis pri tiu unua kaj dua parto, ne atentu tion. Vi scias nenion, konas nenion, nenion memoras. Ne aŭdacu impliki min en ion, vi...”

La ĉefleŭtenanto Lukáš parolis per tia voĉo, kvazaŭ provus lin ataki febro, kaj tiun momenton, kiam li silentiĝis, eluzis Ŝvejk por senkulpa demando: ”Obee mi petas vian pardonon, sinjoro ĉefleŭtenanto, kial mi neniam ekscios, kion teruran mi faris? Mi, sinjoro ĉefleŭtenanto, aŭdacis pri tio demandi

nur por povi venontfoje tian aferon eviti, se ĝenerale oni diras, ke la homo lernas sin de eraro, kiel tiu fandisto Adamec el la fabriko de Kolben-Daněk, kiu pro eraro eltrinkis kloridan acidon...”

Li ne finis, ĉar la ĉefleŭtenanto Lukáš interrompis lian ekzemplon el la vivo per vortoj: ”Stultulo! Mi klarigos al vi nenion. Enrampu denove en vian vagonon kaj diru al Baloun, ke en Budapesto li alportu al mi en la stabvagonon kelke da bulkoj kaj ankaŭ tiun hepatan pasteĉon, kiun mi havas sube en la kofreto en staniolo. Poste diru al Vaněk, ke li estas mulo. Mi petis lin trifoje, ke li sciigu al mi precizan nombron de la viraro. Kaj kiam hodiaŭ mi tion bezonis, mi havis nur malnovan etaton de la pasinta semajno.”

”Laŭ via ordono, sinjoro ĉefleŭtenanto,” ekbojis Ŝvejk, malrapide malproksimiĝante al sia vagono.

La ĉefleŭtenanto Lukáš promenis sur la fervoja linio, ĉe kio li pensis: ”Konvenis tamen nur doni al li kelke da vangobatoj, kaj anstataŭ tio mi interparolas kun li kiel kun amiko.”

Ŝvejk serioze enrampis en sian vagonon. Li sentis estimon antaŭ si mem. Tio ne okazas ĉiutage, ke li faru ion tiel teruran, ke li neniam ekscios, kio tio estis.

\*

”Sinjoro ĉefserĝento-kontisto,” diris Ŝvejk, kiam li sidis sur sia loko, ”sinjoro ĉefleŭtenanto Lukáš ŝajnas al mi esti hodiaŭ en tre bona humoro. Li sciigas al vi pere de mi, ke vi estas mulo pro tio, ke jam trifoje li petis vin anonci al li veran etaton de la viraro.”

”Herrgott,” koleriĝis Vaněk, ”mi lavos al tiuj plotonestroj la

kapon. Ĉu mi kulpas, ke ĉiu tia plotonestra sentaŭgulo faras, kion li volas, kaj ne sendas al mi la etaton de sia plotono? Ĉu mi eble elsuĉu la etaton el la fingro? Belaj cirkonstancoj regas ĉe nia kompo! Tio povas okazi nur ĉe la dekunua marŝkompo. Sed mi tion antaŭvidis, mi tion sciis. Mi eĉ minuton ne dubis pri tio, ke ĉe ni estas malordo. Unu tagon mankas al la kuirejo kvar porcioj, la alian tagon tri porcioj plias. Tiuj kanajloj povus al mi anonci almenaŭ tion, se iu ne kuŝas en hospitalo. Ankoraŭ pasintmonate mi havis registrita ian Nikodém kaj nur ĉe elpago de soldo mi eksciis, ke tiu Nikodém mortis en hospitalo de Budějovice kaŭze de rapida ftizo. Kaj senĉese oni transprenis por li soldatbezonaĵojn. Ni akceptis por li soldatveston, sed dio scias, kien tio malaperis. Poste ankoraŭ sinjoro ĉefleŭtenanto nomas min mulo, se li mem ne scias kontroli la ordon ĉe sia kompanio.”

La ĉefserĝento-kontisto Vaněk ekscitite paŝis tra la vagono: ”Ho, mi esti komandanto de la kompanio! Ĉio devus iri kiel sur reloj. Mi havus trarigardon pri ĉiu ulo. La suboficiroj devus anonci al mi la etaton dufoje tage. Sed se tiuj suboficiroj estas sentaŭguloj... Kaj la plej malkapabla ĉe ni estas tiu plotonestro Zyka. Li superabundas je ŝercoj, je anekdotoj, sed kiam mi al li sciigas, ke Kolařík estas de lia plotono forkomandita al la trajnotrupo, li anoncas al mi la sekvantan tagon la saman etaton, kvazaŭ Kolařík plu maldiligentaĉus ĉe la kompanio kaj ĉe lia plotono. Kaj se tio ripetigaĉas ĉiutage kaj se poste ankoraŭ oni pri mi diras, ke mi estas mulo... Tiel ĉi sinjoro ĉefleŭtenanto ne akiros amikojn. Kompania ĉefserĝento-kontisto ne estas ia apuntato, per kiu ĉiu povas viŝi al si...”

Baloun, aŭskultanta kun malfermita buŝo, aldonis nun



mem tiun belan vorton anstataŭ Vaněk, kiun tiu ĉi ne eldiris, per kio eble ankaŭ li volis sin enmiksi en la interparolon.

”Vi tie, fermu la faŭkon,” diris la ekscitiĝinta ĉefserĝento-kontisto.

”Aŭdu, Baloun,” ekparolis Ŝvejk, ”mi havas taskon anonci al vi, ke vi, kiam ni alveturos Budapeston, alportu al sinjoro ĉefleŭtenanto en la vagonon kelke da bulkoj kaj tiun heptan pasteĉon, kiun sinjoro ĉefleŭtenanto havas sube en la kofreto en staniolo.”

La giganto Baloun senespere mallevis siajn longajn ĉimpanzajn manojn, kurbigis la dorson kaj restis en tiu pozicio sufiĉe longan tempon.

”Mi ne havas,” li diris per mallaŭta senespera voĉo, rigardante malpuran plankon de la vagono.

”Mi ne havas,” li ripetis post paŭzetoj, ”mi opiniis... Mi elpakis ĝin antaŭ la forveturo... Mi ĝin priflaris... Ĉu ĝi ne malkonsistiĝas...”

”Mi ĝin gustumis,” li ekvokis per tiel sincera senespero, ke la afero estis al ĉiuj tute klara.

”Vi forvoris ĝin eĉ kun staniolo,” haltis la ĉefserĝento-kontisto Vaněk antaŭ Baloun, dankante al tio, ke li ne plu devas defendi sian opinion, ke li mem ne estas mulo, kiel igis sciigi al li la ĉefleŭtenanto, sed ke la kaŭzo de la nekonata diferencanta etatoĝ havas pli profundajn bazojn en aliaj muloj, kaj ke la interparolo nun transiris kaj turnas sin ĉirkaŭ la nesatigebla Baloun, ĉirkaŭ nova tragika okazaĵo. Vaněk ricevis egan guston diri al Baloun ion malagrabla moralan, kiam subite parole antaŭiris lin la kuiristo-okultisto Jurajda, kiu formetis sian ŝatatan libron, tradukon de malnovhindaj sutroj Pragn,-Paramit, kaj turnis sin al la konsternita Baloun, an-

koraŭ pli kurbiĝintan sub pezo de la sorto: "Vi, Baloun, devas gardi vin mem, por ke vi ne perdu la konfidon al vi mem kaj konfidon al la sorto. Vi ne povas alskribi al via konto tion, kio estas la merito de aliaj. Kiam ajn vi troviĝos antaŭ simila problemo, kiun vi forvoris, ĉiam demandu vin mem: 'En kia interrilato estas al mi la hepata pasteĉo?' "

Ŝvejk trovis konvena kompletigi tiun ĉi konsideron per praktika ekzemplo: "Vi mem, Baloun, antaŭlaste al mi rakontis, ke ĉe vi hejme oni buĉos kaj fumaĵos, kaj ke tuj, kiam ni estos surloke kaj vi scios la numeron de la feldpoŝto, oni sendos al vi pecon da ŝinko. Nun imagu, ke tiun ŝinkon la feldpoŝto sendus al ni en la kompon, kaj ni kun sinjoro ĉefserĝento-kontisto detranĉus peceton, ĝi al ni bongustus, do ankoraŭ peceton, ĝis tiu ŝinko finiĝus kiel mia konata leterportisto, certa Kozel. Li havis karion, oni do fortranĉis al li la piedon unue sub la maleolo, poste sub la genuo, poste la femuron, kaj se li ĝustatempe ne mortus, oni pritrancus lin tuta kiel senpintan krajonon. Imagu do, Baloun, ke ni forvorus tiun vian ŝinkon same, kiel vi englutis la hepatan pasteĉon de sinjoro ĉefleŭtenanto."

La giganto Baloun ĉiujn malgaje ekrigardis.

"Nur dank' al miaj klopodoj kaj miamerite," diris la ĉefserĝento-kontisto al Baloun, "vi restis servosoldato de sinjoro ĉefleŭtenanto. Oni volis vin transloki al sanitara servo por forportadi vunditojn el batalkampo. Ĉe Dukla niaj sanitaristoj iris trifoje sinsekve por vundita subleŭtenanto, kiun oni pafis en la ventron antaŭ pikdrataj bariloj, kaj ĉiuj tie restis kun trapafitaj kapoj. Nur la kvara paro lin alportis, sed antaŭ ol oni forportis lin al bandaĝejo, la subleŭtenanto mortis."

Baloun jam ne plu eltenis kaj laŭte plorsingultis.

”Hontu,” diris Ŝvejk malŝate, ”ĉu tiel kondutas la soldato...”

”Sed mi ne estas kreita por la soldatservo,” ĝemis Baloun, ”estas vero, mi estas vorulo, nesatigeblulo, ĉar mi estas elŝirita el normala vivo. Ni havas tion en nia genero. La mortinto paĉjo, tiu vetis en gastejo en Protivín, ke li formanĝos je unu fojo kvindek kolbasetojn kaj du panbulojn, kaj gajnis tion. Mi foje vete formanĝis kvar anserojn kaj du pladojn da knedlikoj kun saŭkraŭto. Hejme post tagmanĝo mi ricevas ideon, ke mi volus ankoraŭ ion gustumi. Mi iras en kameron, detranĉas pecon da viando, sendas por kruĉo da biero kaj englutas du kilogramojn da fumaĵita viando. Mi havis hejme maljunan stalserviston Vomel kaj tiu ĉiam min admonis, ke mi tiel ne fieriĝu, ne ŝtopiĝu, ke li memoras, kiel lia avĉjo antaŭlonge rakontis al li pri tia nesatigeblulo. Kaj kiam poste estis milito, ke dum la tutaj ok jaroj produktiĝis nenio kaj la homoj bakis panon el pajlo kaj el tio, kio restis el linaj semoj; kaj tio estis vera festo, kiam oni povis diserigi iom da kazeo en lakton, se oni ne havis panon. Kaj tuj kiam venis tiu mize-ro, la bienmastro post unu semajno mortis, ĉar lia stomako ne alkutimiĝis al tia kampista malbonstato...”

Baloun levis sian afliktitan vizaĝon: ”Sed mi opinias, ke sinjoro dio la homojn punos, kaj tamen ne forlasos.”

”Sinjoro dio enkondukis nesatigeblulojn en la mondon kaj sinjoro dio pri ili zorgos,” rimarkis Ŝvejk, ”jam foje vi estis alligita kaj nun vi meritis sendi vin en la unuan linion; kiam mi estis servosoldato ĉe sinjoro ĉefleŭtenanto, li povis fidi al mi en ĉio kaj neniam li eĉ ekpensis, ke mi ion al li forvorus. Kiam oni disdonis ion specialan, li ĉiam al mi diris: ’Lasu al vi tion, Ŝvejk,’ aŭ: ’Nu, mi tion ne tre avidas, donu al mi pe-

ceton kaj per la cetera faru, kion vi volas.' Kaj kiam ni estis en Prago kaj li sendis min iam por tagmanĝo en restoracion, do por ke li eble ne opiniu, ke mi portas al li malgrandan porcion ĉar duonon da ĝi mi dumvoje forvoris, mi mem por mia lasta mono aĉetis ankoraŭ unu porcion, se tiu ŝajnis al mi esti malgranda, por ke sinjoro ĉefleŭtenanto satmanĝu kaj ne pensu pri mi ion malbonan. Kaj foje li tion malkaŝis. Mi devis ĉiam porti al li el restoracio manĝokarton kaj li al si elektis. Tiutage li elektis al si tiel farĉitan kolombidon. Kiam oni donis al mi duonon da kolombido, mi ekpensis, ke sinjoro ĉefleŭtenanto povus eble opinii, ke la alian duonon mi forvoris, mi do aĉetis ankoraŭ unu porcion el la propra poŝo kaj alportis tiel belegan porcion, ke satmanĝis ankaŭ sinjoro ĉefleŭtenanto Ŝeba, kiu tiutage serĉis, kie li tagmanĝu, kaj venis vizite al mia ĉefleŭtenanto ĝuste antaŭ la tagmezo. Sed satiĝinte, li proklamis: 'Tion al mi ne diru, ke tio ĉi estas unu porcio. En la tuta mondo vi ne ricevos laŭ menuo la tutan farĉitan kolombidon. Se hodiaŭ mi havigos al mi monon, mi sendos en tiun vian restoracion por tagmanĝo. Diru tion sincere, ke tio estis duobla porcio.' Sinjoro ĉefleŭtenanto demandis min antaŭ li, ke mi atestu, ke li donis al mi monon nur por simpla porcio, ĉar li ne sciis, ke venos sinjoro ĉefleŭtenanto Ŝeba. Mi respondis, ke li donis al mi monon por simpla tagmanĝo. 'Vidu do', diris mia ĉefleŭtenanto, 'tio ĉi estas ankoraŭ nenio. Lastfoje Ŝvejk alportis al mi tagmanĝe du anserajn femurojn. Imagu do: Supon kun nudeloj, bovaĵon kun sardela saŭco, du anserajn femurojn, knedlikojn kaj saŭrkraŭton en kvanto atinganta ĝisplafone kaj krespojn!' "

"C-c ta-ta, sakra!" ekŝmacis Baloun.

Ŝvejk daŭrigis: "Tio estis la ŝtono de falpuŝiĝo. La sekvan-

tan tagon sinjoro ĉefleŭtenanto Ŝeba vere sendis sian servosoldaton por tagmanĝo en tiun nian restoracion, kaj tiu alportis al li almanĝaĵe etan amaseton da kokina pilafo, proksimume en kvanto de du kuleretoj, kiel se sessemajna bebo kakis en kuseneton. Kaj sinjoro ĉefleŭtenanto Ŝeba al sia servosoldato, ke tiu duonon forvoris. Kaj tiu, ke li estas senkulpa. Sinjoro ĉefleŭtenanto Ŝeba donis al li sur la faŭkon kaj prezentis min kiel ekzemplon. Ke mi portas porciojn al sinjoro ĉefleŭtenanto Lukáš. Kaj tiel la sekvantan tagon tiu senkulpa vangobatita soldato, kiam li iris por tagmanĝo en la restoracion, pri ĉio eldemandis, diris tion al sia sinjoro, tiu al mia ĉefleŭtenanto. Vespere mi sidas ĉe gazeto kaj legas sciigojn de malamikaj staboj el la batakampoj, kiam mia sinjoro ĉefleŭtenanto eniris, tute pala, kaj tuj rekte al mi, ke mi al li diru, kiom da tiuj duoblaj porcioj mi pagis en la restoracio, ke li scias ĉion, ke malkonfesado al mi absolute ne helpas, ke li scias jam pri tio, ke mi estas idioto, sed ke mi estas frenezulo, tion li tute ne ekpensis. Laŭdire mi faris al li tian malhonoron, ke li havas egan guston mortpafi unue min kaj poste sin. 'Sinjoro ĉefleŭtenanto,' mi diris al li, 'kiam vi min akceptis, la unuan tagon vi parolis pri tio, ke ĉiu servosoldato estas ŝtelisto kaj fiulo. Kaj kiam en tiu restoracio oni donis vere tiel malgrandajn porciojn da almanĝaĵo, vi povus opinii, ke ankaŭ mi estas vere unu el tiaj fiuloj, ke mi tion al vi forvoris...'

"Dio mia ĉiela," ekflustris Baloun, malleviĝis por kofreto de la ĉefleŭtenanto Lukáš kaj foriris kun ĝi malantaŭen.

"Poste la ĉefleŭtenanto Lukáš komencis palpserĉi en ĉiuj poŝoj," daŭrigis Ŝvejk, "kaj kiam tio estis vana, li ekpulpis en sian veŝton kaj donis al mi sian arĝentan poŝhorloĝon. Li sen-

tis veran emocijon. 'Kiam mi ricevos soldon, Ŝvejk,' li diris, 'skribu al mi, kiom mi al vi ŝuldas... Tiun ĉi poŝhorloĝon lasu al vi krom tio. Kaj venontfoje ne faru tiajn frenezaĵojn.' Poste foje trafis nin ambaŭ tia mizero, ke tiun poŝhorloĝon mi devis forporti en lombardejon...''

"Kion vi faras tie malantaŭe, Baloun?" demandis subite la ĉefserĝento-kontisto Vaněk.

Anstataŭ respondo la malfeliĉa Baloun komencis sufokiĝe tusi. Scie, li malfermis la kofreton de la ĉefleŭtenanto Lukáš kaj ŝtopiĝis per lia lasta bulko...

\*

La stacion senhalte traveturis alia milita trajno de supre okupita fare de vienaj infanterianoj, kiujn oni sendis al la serba fronto. Ili ankoraŭ ne perdis sian entuziasmon ĉe adiaŭado kun Vieno kaj senspire kriegis de Vieno ĝis ĉi tien:

*"Fama princ' Eŭgeno, nobla kavaliro*

*volis rekonkeri laŭ la onidiro*

*por monarko nia urbon Beogradon.*

*'Tuj konstrui ponton!' sonis la ordonoj,*

*por l' urbon enmarŝi povu batalionoj*

*eĉ arme' la tuta. Fari la invadon!"*

Kaporalo kun agresive torditaj lipharoj, klinante sin eksteren, apogita per la kubutoj sur la viraro, kiu balancetis la piedojn elŝovitajn eksteren el la vagono, donis takton kaj plengorĝe kriegis:

*"Porto konstruita tronas sur kolonoj,*

*trans riveron Danub' ĉaroj kaj kanonoj*

*povas enveturi urbon Beogradon.*

*'Ripozi!' Ĉe Zemlín venis la komando.*

*Peli ĉiujn serbojn el ilia lando..."*

Sed subite li perdis la ekvilibron, elflugis el vagono kaj enfluge plenforte frapiĝis per la ventro je relkomutila stango, sur kiu trapikita li restis pendi, dum la trajno veturis plu kaj en malantaŭaj vagonoj oni kantis denove ion alian:

*"Graf' Radecký ĵuris, sian vorton donis*

*ke li malamikon de la aŭstra trono*

*for el Lombardio pelos sen pardono.*

*En Verona resti la hero' ordonis.*

*Kiam pliaj trupoj venis discipline,*

*li kuraĝon prenis kaj ekmarŝis fine..."*

Surpikita sur la stulta komutilo, la batalema kaporalo estis jam morta kaj ne daŭris longe, kun bajoneto jam gardostaris ĉe li juneta soldato el la viraro de stacia soldatkomandantaro, kiu prenis sian taskon tre serioze. Li staris en atentopozo ĉe la komutilo kaj mienis tiel venke, kvazaŭ tio estus lia verko, ekpuŝego de la kaporalo sur la komutilon.

Ĉar li estis hungaro, li kriegis al ĉiuj reloj hungare, kiam el batalionaj vagonoj de la naŭdekunua regimento oni venis ĉi tien por rigardi: "Ne estas permesite, ne estas permesite! Soldata komisiono, ne estas permesite!"

"Li havas tion jam malantaŭ si," diris la brava soldato Ŝvejk, kiu ankaŭ estis inter la scivoluloj, "kaj tio havas tiun avantaĝon, ke ĉiuj almenaŭ scias, kie li estis entombigita, se li havas pecon da fero en la ventro. Estas tio rekte sur reloj kaj oni ne devas serĉi lian tombon sur ĉiuj batalkampoj.

Li surpikiĝis precize," aldonis Ŝvejk erudicie, ĉirkaŭirante la kaporalon de la alia flanko, "li havas la intestojn en la pantalono."

"Ne estas permesite, ne estas permesite!" kriis la juneta

hungara soldato, "komisiono de stacia soldatkomandejo, ne estas permesite!"

Malantaŭ Ŝvejk eksonis severa voĉo: "Kion vi ĉi tie faras?" Antaŭ li staris la kadeto Biegler. Ŝvejk soldatsalutis.

"Obee mi raportas, ni trarigardas la mortinton, sinjoro kadeto."

"Kaj kian agitadon vi ĉi tie faris? Kian kaŭzon vi havas por ĉi tie esti?"

"Obee mi raportas, sinjoro kadeto," respondis Ŝvejk kun digna trankvilo, "ke mi neniam faris kianagitadon."

Kelke da soldatoj malantaŭ la kadeto komencis ridi kaj antaŭen ekpaŝis la ĉefserĝento-kontisto Vaněk.

"Sinjoro kadeto," li diris, "sinjoro ĉefleŭtenanto sendis ĉi tien la kurieron Ŝvejk, por ke tiu al li diru, kio okazis. Nun mi estis ĉe la stabvagono kaj bataliona kuriero Matuŝič serĉas vin laŭ la ordono de sinjoro bataliona komandanto. Vi devas tuj iri al sinjoro kapitano Ságner."

Kiam post momento eksonis signalo por envagoniĝi, ĉiuj disiris al siaj vagonoj.

Vaněk, irante kun Ŝvejk, diris: "Se ie estas pli da homoj, lasu al vi, Ŝvejk, viajn parolojn. Tio povus vin ĉagreni. Ĉar tiu kaporalo estis de viena regimento, povus okazi, ke oni klariĝus al si tion tiel, ke vi pro tio ĝojas. Tiu Biegler estas terura ĉefĥovorulo."

"Mi ja diris nenion," respondis Ŝvejk per tono, kiu ekskluzivis kian ajn dubon, "nur tion, ke tiu kaporalo surpikiĝis precize, li havis la intestojn en la pantalono... Li povis..."

"Ni ĉesu jam pri tio paroli, Ŝvejk." Kaj la ĉefserĝento-kontisto Vaněk forkraĉis.

"Tio estas egala," ankoraŭ rimarkis Ŝvejk, "ĉu la intestoj



eliĝas el lia ventro por sinjoro imperiestro ĉi tie aŭ tie. Ĉiukaze li plenumis sian devon... Li povis...”

”Rigardu, Ŝvejk,” interrompis lin Vaněk, ”kiel la bataliona kuriero Matusič denove paŝas al la stabvagono. Mi miras, ke li ankoraŭ ne falis trans relojn.”

Mallonge antaŭ tio estis tre akra interparolo inter la kapitano Ságner kaj la fervora kadeto Biegler.

”Mi miras, kadeto Biegler,” parolis la kapitano Ságner, ”kial vi tuj ne venis al mi anonci, ke oni ne disdonas tiujn dek kvin dekagramojn da hungara salamo. Mi devas iri eksteren kaj mem konvinkiĝi, kial la viraro revenas de la magazeno. Kaj same tiel sinjoroj oficiroj, kvazaŭ ordono ne estus ordono. Mi ja diris: ’En la magazenojn po plotonoj laŭ la kompanioj.’ Tio signifis, ke se oni ricevis en la magazeno nenion, ke oni devas iri ankaŭ po plotonoj laŭ la kompanioj en vagonojn. Al vi, kadeto Biegler, mi ordonis, ke vi zorgu konservi la ordon, sed vi lasis ĉion kuri. Vi ĝojis, ke vi ne devas zorgi pri kalkulado de porcioj da salamo, kaj iris trankvile rigardi, kiel mi vidis tra la fenestro, la surpikiĝintan kaporalon de vienaj infanterianoj. Kaj kiam mi poste igis vin alvoki, vi havas nenian alian laboron ol el sia kadeta fantazio parolaĉi pri tio, ke vi iris konvinkiĝi, ĉu tie ĉe la surpikiĝinta kaporalo oni ne faras ian agitado...”

”Obee mi raportas, ke la kuriero de la dekunua kompanio Ŝvejk...”

”Donu al mi trankvilon pri Ŝvejk,” ekkriis la kapitano Ságner, ”ne imagu, kadeto Biegler, ke vi faros iajn intrigojn kontraŭ la ĉefleŭtenanto Lukáš. Ŝvejkon ni tien sendis... Vi rigar-

\* Ĉiuj interparoloj inter oficiroj nature okazas en la germana lingvo.

das min tiel, kvazaŭ vi opinius, ke mi emas vin persekuti... Jes, mi emas vin persekuti, kadeto Biegler... Se vi ne scias respekti vian superulon, klopodas lin mistifiki, mi maldolĉigos al vi la soldatservon tiel, ke vi, kadeto Biegler, rememoros la fervojan stacion Györ... Fanfaroni per siaj teoriaj scioj... Atendu, kiam ni estos en la fronto... Kiam mi ordonos al vi iri kiel oficira patrolo trans pikdratajn barilojn... Via raporto? Ankaŭ tiun raporton vi ne donis al mi, kiam vi venis... Eĉ teorie ne, kadeto Biegler..."

"Obee mi raportas, sinjoro kapitano\* ke anstataŭ dek kvin dekagramoj da hungara salamo la viraro ricevis po du bildkartoj. Mi petas, sinjoro kapitano..."

La kadeto Biegler enmanigis al la komandanto de la bataliono du el tiuj bildkartoj, kiujn eldonis direkcio de la milita arkivo en Vieno, kies estro estis infanteria generalo Wojnowich. Sur unu flanko estis karikaturado de rusa soldato, rusa terkulturisto kun harkovrita mentono, kiun ĉirkaŭpremas skeletulo. Sub la karikaturado estis teksto:

"La tago, kiam la perfida Rusio mortaĉos, estos la tago de liberigo por la tuta nia monarkio."

La alia bildkarto devenis de Germanio. Estis tio germana donaceto al aŭstri-hungaraj soldatoj. Supre estis: 'Viribus unitis', sub tio bildeto de pendumita siro Eduardo Grey<sup>15</sup> kaj sube sub li gaje soldatsalutas aŭstra kaj germana soldato.

15 Eduardo Grey (1862-1933), komence de la unua mondmilito angla ministro de eksterlandaj aferoj. Germanaj imperialistoj al li riproĉis, ke Anglio en aŭgusto 1914 deklaris la militon al Germanio, kvankam li kelkfoje anoncis, ke Anglio ne militos. Se Anglio jam en julio 1914 klare proklamus sian intencon eniri la militon en la okazo, ke la germanoj invados Francion kaj Belgion, Germanio laŭdire ne enmiksus sin en la militon

La poemeton oni transprenis el la libro de Greinz "Fera pugno". Ŝercetoj je la konto de niaj amikoj, pri kiuj germanaj ĵurnaloj skribis, ke la versoj de Greinz estas kiel skurgobatoj, ĉe kio ili enhavas veran senbridan humuron kaj nesupereblan spriton.

Teksto sub la pendumilo, en traduko:

*"G r e y*

*Sur pendumil' alte troni*

*ja meritis ruza Grey.*

*Temp' jam urĝas por mortpuno —*

*sed la lignon por pendumo*

*de ĉi tiu — fi! — Judaso*

*kverk' neniu volis doni.*

*Li do pendas sur tremolo*

*el Francio. Dia volo!"*

La kapitano Ságner ankoraŭ ne finlegis tiujn ĉi versojn de "senbrida humuro kaj nesuperebla sprito", kiam la stabvagonon enfalis la bataliona kuriero Matuŝič.

La kapitano Ságner sendis lin al telegrafa centralo de la stacia soldatkomandejo, ĉu eble ne venis aliaj dispozicioj, kaj Matuŝič alportis telegramon de la brigado. Sed ne necesis preni ŝlosilon por deĉifrado. La telegramo estis simpla, neĉifrita: "Rapide kuirpretigi manĝon kaj poste marŝi al Sokal'." La kapitano Ságner nekredeme ekskuis la kapon.

"Obee mi raportas," diris Matuŝič, "komandanto de la stacio petas vin veni al li por interparolo. Estas tie ankoraŭ unu telegramo."

Poste estis tre konfidenca interparolo inter la komandanto de la stacio kaj la kapitano Ságner.

La unua telegramo devis esti transdonita, eĉ se ĝi havis tre

suprizigan enhavon, se la bataliono troviĝas en la stacio Györ: "Rapide kuirpretigi manĝon kaj poste marŝi al Sokal'." Ĝi estis adresita neĉifrite al marŝbataliono de la naŭdekunua regimento kun kopio por marŝbatalino de la sepdekkvina regimento, kiu estis ankoraŭ malantaŭe. La subskribo estis ĝusta: komandanto de la brigado Ritter von Herbert.

"Tre konfidenca afero, sinjoro kapitano," diris la soldata komandanto de la stacio mistere. "Sekreta telegramo de via divizio. La komandanto de via brigado freneziĝis. Oni forveturigis lin en Vienon, post kiam li dissendis de la brigado ĉi-flanken kelkajn dekduojn da similaj telegramoj. En Budapeŝto vi certe vidos novan telegramon. Ĉiujn liajn telegramojn nature necesas nuligi, sed koncerne tion ni ankoraŭ ne ricevis ian ordonon. Kiel mi diras, mi havas nur ordonon de la divizio, ke neĉifritajn telegramojn oni malatentu. Transdoni ilin mi devas, ĉar rilate tion mi ne ricevis respondon de miaj instancoj. Pere de miaj instancoj mi informiĝis ĉe la komandejo de la armea korpuso kaj oni min enketas...

Mi estas aktiva oficiro de malnova pioniraro," li aldonis, "mi partoprenis la konstruon de nia strategia fervoja linio en Galicio...

Sinjoro kapitano," li diris post momento, "nin oni sendu al la fronto, la maljunajn harditajn ulojn! En la ministerio de milito estas nun da tiuj civiluloj-inĝenieroj de fervojo kun ekzameno de unujara volontulo kiel da hundoj... Cetere, post kvaronhoro vi denove pluveturas... Mi memoras nur tion, ke foje en praga oficirlernejo, kiel unu el la pli alta klaso, mi helpis levi vin al reko. Tiam ni ambaŭ havis malpermeson iri

\* En germana interparolo, kiun tiuj du kondukis inter si: "Tiam vi ankaŭ interbatiĝis kun germanaj kunlernantoj."

eksteren. Vi interbatiĝis kun germanoj en la klaso\* Kun vi estis tie ankaŭ Lukáš. Vi estis la plej bonaj amikoj. Kiam ni ricevis ĉi tien telegramon kun listo de oficiroj de la marŝbataliono, kiu traveturas la stacion, mi klare rememoris... Estas tio jam sufiĉe da jaroj... La kadeto Lukáš estis al mi tiam tre simpatia...”

La tuta parolo impresis la kapitanon Ságner tre malagrabla. Li tre bone ekkonis tiun, kiu kun li parolis kaj kiu en ofircirlernejo kondukis opozicion kontraŭ aŭstrismo, kion pli poste elbatis el iliaj kapoj la klopodo fari karieron. La plej malagrabla estis al li la mencio pri la ĉefleŭtenanto Lukáš, kiu kompare kun li estis ĉie pro kia ajn kaŭzo forpuŝata.

”La ĉefleŭtenanto Lukáš,” li diris emfaze, ”estas tre bona oficiro. Kiam la trajno veturas?”

La komandanto de la stacio ekrigardis la poŝhorloĝon. ”Post ses minutoj.”

”Mi iras”, diris Ságner.

”Mi opiniis, ke vi ion al mi diros, Ságner.”

”Do saluton!” respondis Ságner\* kaj eliris antaŭ la konstruaĵon de la stacia komandejo.

Kiam la kapitano Ságner antaŭ la forveturo de la trajno revenis en la stabvagonon, li trovis ĉiujn oficirojn sur sia loko. En grupetoj ili ludis cvikon (frische viere<sup>16</sup>), nur la kadeto Biegler ne ludis.

Tiu foliumis en amaso da komencitaj manuskriptoj pri militaj scenoj, ĉar li volis eminentiĝi ne nur sur la milita kampo, sed ankaŭ kiel literatura fenomenulo, priskribanta militajn okazaĵojn. La viro de strangaj flugiloj kun ’fiŝvosto’ volis esti

\* En la interparolo: ”Do: Saluton!”

16 germana popolnomo por la kartludo ”cviko”

elstara milita verkisto. Liaj literaturaj provoj komenciĝis per multpromesaj titoloj, en kiuj respeguliĝis tiutempa militarismo, sed kiuj ankoraŭ ne estis prilaboritaj, tiel ke sur paperfolioj restis nur titoloj de estontaj verkoj.

”Karakteroj de soldatoj el la granda milito. — Kiu komencis la militon? — La politiko de Aŭstri-Hungario kaj estiĝo de la mondmilito. — Militaj notoj. — Aŭstri-Hungario kaj la mondmilito. — La instruo el la milito. — Populara prelego pri eksplodo de la milito. — Milite-politikaj meditoj. — Glora tago de Aŭstri-Hungario. — Slava imperialismo kaj la mondmilito. — Dokumentoj el la milito. — Dokumentoj al la historio de la mondmilito. — Taglibro de la mondmilito. — Ĉiutaga trarigardo pri la mondmilito. — La unua mondmilito. — Nia dinastio en la mondmilito. — La nacioj de aŭstri-hungara monarkio kun armiloj en la mano. — Monda lukto pri potenco. — Miaj spertoj en la mondmilito. — Kroniko de mia militiro. — Kiel batalas la malamikoj de Aŭstri-Hungario. — Kies estas la venko? — Niaj oficiroj kaj niaj soldatoj. — Memorindaj faroj de miaj soldatoj. — El la tempo de la granda milito. — Pri batalbruego. — La libro pri aŭstri-hungaraj herooj. — La fera brigado. — Kolekto de miaj leteroj el la fronto. — La herooj de nia marŝbataliono. — Kompendio por soldatoj en la fronto. — Tagoj de bataloj kaj tagoj de la venko. — Kion mi vidis kaj spertis sur batalkampo. — En tranĉeoj. — La oficiro rakontas... — Kun filoj de Aŭstri-Hungario antaŭen! — Malamikaj aeroplanoj kaj nia infanterio. — Post la batalo. — Niaj artilerianoj, fidelaj filoj de sia patrujo. — Eĉ se irus kontraŭ ni ĉiuj diabloj... — Defensiva kaj ofensiva milito. — Sangon kaj feron. — Venkon aŭ morton. — Niaj herooj en kaptiteco.”

Kiam la kapitano Ságner alpaŝis al la kadeto Biegler kaj

ĉion trarigardis, li demandis, kial Biegler tion faris kaj kion li volas per tio diri.

La kadeto Biegler respondis kun vera entuziasmo, ke ĉiu tiu titolo prezentas libron, kiun li verkos. Kiom da titoloj, tiom da libroj.

”Mi deziras, se mi falos en batalo, ke restu post mi memoraĵo, sinjoro kapitano. Mia ekzemplo estas germana profesoro Udo Kraft. Li naskiĝis en la jaro 1870, nun en la mondmilito li libervole soldatiĝis kaj falis la 22an de aŭgusto 1914 en Anloy. Antaŭ sia morto li eldonis libron: ’Memeduko al morto por la imperiestro.’ ”\*

La kapitano Ságner forkondukis la kadeton Biegler al fenestro.

”Montru, kion vi ankoraŭ havas, kadeto Biegler; min ege interesas via agado,” diris la kapitano Ságner kun ironio, ”kian kajereton vi ŝovis sub la jakon?”

”Tio estas sensignifaĵo, sinjoro kapitano,” respondis la kadeto Biegler, ruĝetiĝinte kiel infano, ”bonvolu konvinkiĝi, mi petas.”

La kajereto havis titolon:

Skemoj de elstaraj kaj gloraj bataloj  
de la aŭstri-hungara armeo,  
kompilitaj laŭ historiaj studoj  
de i.r. oficiro Adolfo Biegler.  
Per rimarkoj kaj klarigoj ekipis  
i.r. oficiro Adolfo Biegler.

La skemoj estis terure simplaj.

\* Udo Kraft: ”Memeduko al morto por la imperiestro.” Eldonejo de C. F. Amelang

De la batalo ĉe Nördlingen la 6an de septembro 1634 al la batalo ĉe Zenta la 11an de septembro 1697, ĉe Caldiero la 31an de oktobro 1805, al la batalo ĉe Aspern la 22an de majo 1809 kaj la batalo de nacioj ĉe Lepsiko en la jaro 1813, al la batalo ĉe Santa Lucia en majo 1848 kaj ĉe Trutnov la 27an de junio 1866 ĝis la konkero de Sarajevo la 19an de aŭgusto 1878. Skemoj kaj plandesegnaĵoj de tiuj bataloj estis sen kia ajn ŝanĝo. La kadeto Biegler desegnis ĉie ortanguletojn sur unu flanko malplenajn, dum la malamikon prezentis ortanguletoj haĉitaj. Ambaŭflanke estis maldekstra alo, centro kaj dekstra alo. Poste malantaŭe rezervaj trupoj kaj saĝetoj tien kaj reen. La batalo ĉe Nördlingen same kiel la batalo ĉe Sarajevo aspektis kiel dislokiĝo de ludantoj ĉe kia ajn futbalmaĉo dum malfermo de la ludo kaj la saĝetoj montris, kien tiu aŭ la alia partio elpiedbatu la pilkon.

Tio ankaŭ tuj venis en la menson de la kapitano Ságner, kiu demandis: "Kadeto Biegler, ĉu vi ludas futbalon?"

Biegler ruĝetiĝis ankoraŭ pli kaj nervoze ekpalpebrumis, tiel ke li faris impreson, kvazaŭ li preparus sin plori.

La kapitano Ságner kun rideto plu foliumis en la kajereto kaj haltis ĉe noto, akompananta la skemon de la batalo ĉe Trutnov dum la prusa-aŭstra milito.

La kadeto Biegler skribis: "La batalo ĉe Trutnov estis eraro, ĉar la montoriĉa regiono malebligis disvolvi la divizion de generalo Mazzucheli, al kiu minacis fortaj prusaj taĉmentoj, troviĝantaj sur altaĵoj ĉirkaŭantaj la maldekstran alon de nia divizio."

"Laŭ vi," diris la kapitano Ságner kun rideto, redonante la kajereton al la kadeto Biegler, "oni povis konduki la batalon



ĉe Trutnov nur en tiu okazo, se Trutnov estus en ebena regiono, vi Benedek<sup>17</sup> el Budějovice.

Kadeto Biegler, estas tre bele de vi, ke dum tiel mallonga tempo de via restado en la vicoj de la armeo vi klopodis penetri en strategion, sed finiĝis tio ĉe vi tiel, kiel se buboj ludas soldatojn kaj disdonas al si titolojn de generaloj. Vi avancis vin mem tiel rapide, ĝojo tion legi. I.r. oficiro Adolfo Biegler! Antaŭ ol ni alveturos Budapeston, vi estos feldmarŝalo. Ankoraŭ antaŭhieraŭ vi pezis ie hejme ĉe la paĉjo bovinajn felojn. I.k.r. leŭtenanto Adolfo Biegler! ... Homo, vi ja ankoraŭ ne estas oficiro. Vi estas kadeto. Vi pendas en la aero inter subleŭtenanto kaj suboficiroj. Vi estas malproksime de tio, ke vi povu nomi vin oficiro, same kiel apuntato, kiu ie en gastejo lasas sin titoli 'sinjoro staba ĉefserĝento'.

Aŭdu, Lukáš," li turnis sin al la ĉefleŭtenanto, "vi havas la kadeton Biegler en via kompanio, dresu lin do, knabon. Li subskribas sin kiel oficiro, li elmeritu tion en batalo. Kiam tondros kanonpafado kaj ni atakos, li tondu kun sia plotono pikdratajn barilojn, tiu bona junulo. Á propos, sendas al vi saluton Zykán, li estas komandanto de la stacio en Győr."

La kadeto Biegler vidis, ke la interparolo kun li finiĝis, soldatsalutis kaj tute ruĝa en la vizaĝo trairis la vagonon, ĝis li troviĝis ĉe la fino en transversa koridoro.

Kiel somnambulo li malfermis pordon de klozeto kaj rigar-

17 Ludoviko Aŭgusteno el Benedek (1804-1881), aŭstra generalo, kiu subpremis ribeliĝon en Galicio (1846) kaj revoluciojn en Italio (1848) kaj Hungario (1849). Kontraŭ lia volo oni nomumis lin ĉefa komandanto de la aŭstra armeo en la aŭstra-prusa milito 1866. Post malvenko oni lin kun malhonoro pensiigis, sed ĉar li donis la vorton al Francisko Jozefo la unua, ke li ne parolos pri kaŭzoj kaj cirkonstancoj de la malvenko, li ne protestis

dante germanan-hungaran surskribon: 'Uzi klozeton estas permesite nur dum la veturo' li ekgrumblis, eksingultis kaj komencis mallaŭte plori. Poste li demetis sian pantalonon... Li premis, viŝante al si la larmojn. Poste li uzis la kajereton kun titolo: "Skemoj de elstaraj kaj gloraj bataloj de la aŭstri-hungara armeo, kompilitaj de i.r. oficiro Adolfo Biegler," kiu malhonorigita malaperis en truo, kaj falinte sur relojn, flugetis inter ili sub forveturanta soldata trajno.

La kadeto Biegler lavis al si la ruĝiĝintajn okulojn en lavujo de la necesejo kaj eliris en koridoron, decidiĝante, ke li devas esti forta, diable forta. Jam ekde la mateno doloris lin la kapo kaj ventro.

Li laŭiris malantaŭan kupeon, kie la bataliona kuriero Matuŝič kartludis kun Batzer, servosoldato de la bataliona komandanto, vianan ludon 'sesdek ses'.

Rigardante tra malfermita pordo de la kupeo, li ektusis. Ili sin turnis kaj ludis plu.

"Ĉu vi ne scias, kio konvenas?" demandis la kadeto Biegler.

"Mi ne povis," respondis Batzer, la servosoldato de la kapitano Ságner, per sia terura germana lingvaĵo de Kaŝperské Hory, "mi elĉerp' ĉjujn atut'n.

Estis pli bone ludi per karooj, sinjoro kadeto," li daŭrigis, "per altrangaj karooj kaj tuj poste elmeti la pikreĝon... Tion necesis fari..."

La kadeto Biegler ne diris jam eĉ unu vorton kaj enŝoviĝis en sian angulon. Kiam pli poste venis al li la subleŭtenanto Pleschner por doni al li gluton el botelo da konjako, kiun li gajnis en kartludo, li ekmiris, kiel la kadeto Biegler fervore

legas en libro de profesoro Udo Kraft: "Memeduko al morto por la imperiestro".

Antaŭ ol ili alveturis Budapeston, la kadeto Biegler estis jam tiel ebria, ke kliniĝante el fenestro de la vagono, li kriis seninterrompe al la senhoma regiono: "Ek al tio! En la nomo de Dio, ek al tio!"

Poste laŭ la ordono de la kapitano Ságner la bataliona kuriero Matuŝič fortrenis lin en kupeon, kie kun Batzer, la servosoldato de la kapitano, li kuŝigis lin sur benkon, kaj la kadeto Biegler havis jenan sonĝon:

La sonĝo de la kadeto Biegler antaŭ Budapeŝto.

Li havis signum laudis, feran krucon<sup>18</sup>, estis majoro kaj veturis por kontroli batalejon de la brigado al li submetita. Sed li ne sciis al si klarigi, kial li estas senĉese nur majoro, se li komandas la tutan brigadon. Li havis suspekton, ke oni rangaltigis lin al generalmajoro kaj ke tiu 'general' perdiĝis ie en amaso da sendaĵoj en feldpoŝto.

Li devis enmense ridi al tio, kiel la kapitano Ságner minacis al li en trajno, kiam ili veturis al la fronto, ke li devos tondi pikdratajn barilojn. Cetere, laŭ lia propono al la divizio la kapitano Ságner eĉ kun la ĉefleŭtenanto Lukáš jam longe estis translokita al alia regimento. Al alia divizio, al alia armea korpuso.

Iu al li ankaŭ rakontis, ke ili ambaŭ mizere pereis ie en marĉo dum forkuro.

Kiam li veturis aŭtomobile al pozicio por kontroli batalejon de sia brigado, ĉio estis al li klara. Fakte lin sendis la generala stabo de la armeo.

18 prusa ordeno, kiun en la jaro 1813 fondis la prusa reĝo Frederiko Vilhelmo la tria

Ĉirkaŭe staris soldatoj kaj kantis tion, kion li legis en la kolekto de aŭstraj soldataj kantoj:

*"Tio validas.*

*Tenu vin bone, vi, kuraĝaj fratoj,*

*ekflirtu ĝoje aŭstra flag',*

*kaj teren falu malamik' sub batoj..."*

La regiono havis la saman karakteron kiel sur bildetoj en la "Viena Ilustrita Gazeto".

Ĉe garbejo sur la dekstra flanko vidiĝis artilerio, kiel ĝi pafas kontraŭ malamikaj tranĉeoj apud la ŝoseo, sur kiu li veturas en aŭtomobilo. Maldekstre staris domo, el kiu oni pafis, dum la malamiko klopodis elrompi la pordon per kolboj de fusiloj. Apud la ŝoseo brulis malamika aeroplano. Ĉe la horizonto vidiĝis kavalerio kaj brulanta vilaĝo. Poste tranĉeoj de la marŝbataliono kun malalta monteto, kie aŭtomataj fusiloj pafis kontraŭ la malamikoj. Laŭlonge de la ŝoseo plu etendiĝis malamikaj tranĉeoj. Kaj la ŝoforo veturas kun li pluen sur la ŝoseo al la malamiko.

Li kriegas per aŭdilo al la ŝoforo: "Ĉu vi ne scias, kien ni veturas? Tie estas la malamiko."

Sed la ŝoforo trankvile respondas:

"Sinjoro generalo, tio estas la sola konvena vojo. La ŝoseo estas en bona stato. Sur tiuj apudaj vojoj pneŭmatikoj tion ne eltenus."

Ju pli ili proksimiĝas al pozicioj de la malamiko, des pli forta iĝas la fajro. Grenadoj ĉie ĉirkaŭe suprenĵetas aleon de prunarboj super ambaŭflankajn fosaĵojn.

Sed la ŝoforo trankvile respondas en la aŭdilon:

"Tio ĉi estas bonega ŝoseo, sinjoro generalo, sur tiu oni

veturas kiel sur butero. Se ni deflankiĝus al kampoj, pneŭmatiko detruigus.”

”Rigardu, sinjoro generalo,” krias la ŝoforo en la aŭdilon, ”tiu ĉi ŝoseo estas konstruita tiel bone, ke eĉ kanonoj je kalibro de 30,5 centimetroj faros al ni nenion. La ŝoseo estas kiel draŝejo, sed sur tiuj ŝtonkovritaj vojoj en kampoj niaj pneŭmatikoj irus al la diablo. Cetere ni ne povas reveni, sinjoro generalo!”

”Zzz — krak!” aŭdas Biegler kaj la aŭtomobilo faris gigantan salton.

”Ĉu mi ne diris al vi, sinjoro generalo,” kriegas la ŝoforo en la aŭdilon, ”ke tiu ĉi ŝoseo estas diable bone konstruita? Ĝuste nun tuŝapude antaŭ ni eksplodis ’tridekokcentimetraĵo’<sup>19</sup>. Sed nenia truo, la ŝoseo estas kiel draŝejo. Sed enveturi sur kampojn, pneŭmatikoj estus for. Nun oni pafas kontraŭ ni el la distanco de kvar kilometroj.”

”Sed kien ni veturas?”

”Tion ni vidos,” respondis la ŝoforo, ”dum la ŝoseo estos senĉese tia, mi garantias ĉion.”

Flugo, terura flugo kaj la aŭtomobilo haltas.

”Sinjoro generalo,” krias la ŝoforo, ”ĉu vi ne havas staban mapon?”

La generalo Biegler eklumigas elektran lampeton. Li vidas, ke li havas staban mapon sur la genuoj. Sed estas tio marista mapo de Helgolanda marbordo el la jaro 1864, el la aŭstraprusa milito kontraŭ Danio pro Ŝlesvigo.

”Ĉi tie estas vojkruciĝo,” diras la ŝoforo, ”ambaŭ vojoj kondukas al malamikaj pozicioj. Min interesas kvalita ŝoseo, por

19 obuso por kanono je kalibro de tridek ok centimetroj, fabrikita en ŝtalfabrika Krupp en Germanio

ke la pneŭmatikoj ne suferu, sinjoro generalo... Mi respondas por la staba aŭtomobilo..."

Poste bruego, surdiga bruego kaj astroj grandaj kiel radoj. La Lakta Vojo estas densa kiel kremo.

Li ŝvebas en la universo sur sidloko apud la ŝoforo. La tuta aŭtomobilo estas tuŝapude antaŭ la sidloko fortondita kvazaŭ per tondilo. Restas el ĝi nur ofensiva, atakema antaŭa parto.

"Estis feliĉo," diras la ŝoforo, "ke vi montris al mi la mapon trans mia dorso. Vi transflugis al mi kaj tion ceteran prenis la diablo. Tio estis 'kvardekducentimetraĵo'<sup>20</sup>.... Tion mi tuj supozis, ke se estas vojkruciĝo, la ŝoseo valoras rubon. Post la 'tridekokcentimetraĵo' povis tio esti nur la 'kvardekducentimetraĵo'. Ion alian oni ĝis nun ne fabrikas, sinjoro generalo."

"Kien vi tion direktas?"

"Ni flugas en la ĉielon, sinjoro generalo, kaj ni devas eviti kometojn. Tiuj estas pli danĝeraj ol la 'kvardekducentimetraĵo'.

Nun estas sub ni Marso," diris la ŝoforo post longa paŭzo. Biegler sentis sin jam denove trankvila.

"Ĉu vi scias la historion pri la batalo de nacioj ĉe Lepsiko?" li demandis, "kiam la 14an de oktobro 1813 la feldmarŝalo arkiduko Schwarzenberg militiris al Liebertkowitz kaj kiam la 16an de oktobro estis batalo pri Lindenau, la batalojn de la generalo Merweldt, kaj kiam la aŭstraj armeoj estis en Wachau kaj la 19an de oktobro estis konkerita Lepsiko?"

"Sinjoro generalo," diris en tiu momento la ŝoforo serioze, "ni troviĝas ĝuste ĉe la ĉiela pordego, elgrimpu eksteren, sin-

20 obuso por kanono je kalibro de kvardek du centimetroj, fabrikita en Ŝkoda-fabriko en Plzeň (Ĉeĥa respubliko). La plej forta kanono de la aŭstri-hungara armeo

joro generalo! Ni ne povas veturi tra la ĉiela pordego, estas ĉi tie hompuŝiĝo. Ĉie nur soldatoj.”

”Trankvile iun el ili surveturu,” li krias al la ŝoforo, ”ili ja flankenpaŝos.”

Kaj klinante sin el la aŭtomobilo, li krias: ”Atenton, bando de porkoj! Tio estas ja brutaro, ili vidas generalon kaj ne povas fari ’Rigardi dekstren!’ ”

La ŝoforo lin trankviligas: ”Malfacila afero, sinjoro generalo, plejparto da ili havas la kapon forbatita.”

La generalo Biegler nur nun rimarkis, ke tiuj, kiuj puŝas sin ĉe la ĉiela pordego, estas diversaj invalidoj, kiuj perdis en la milito iujn partojn de sia korpo, sed tiujn ili havis ĉe si en dorsosakoj. La kapon, manojn, piedojn. Justa artileriano, puŝanta sin ĉe la ĉiela pordego en dispafita mantelo, havis en la dorsosako formetita la tutan sian ventron eĉ kun la malsupraj membroj. El alia dorsosako de justa miliciano rigardis la generalon Biegler duono de la postaĵo, kiun la miliciano perdis ĉe Lvov.

”Tio estas cele de ordo,” ekparolis denove la ŝoforo, veturante tra la densa homamaso, ”tio estas ŝajne cele de la ĉiela supera revizio.”

Ĉe la ĉiela pordego oni enlasadis nur post pasvorto, kiu al la generalo Biegler tuj venis en la menson: ”Por Dio kaj la imperiestro.” La aŭtomobilo enveturis la paradizon.

”Sinjoro generalo,” diris flugilhava oficiro-anĝelo, kiam ili laŭveturis kazernon kun rekrutoj-anĝeloj,” vi devas anonci vin en la ĉefkomandejo.”

Ili veturis plu laŭlonge de ekzercejo, kie svarmis rekrutoj-anĝeloj, kiujn oni instruis krei: ”Haleluja!”

Ili laŭveturis grupon, kie ruĝhara kaporalo-anĝelo ĝuste

havis en siaj manoj mallertan rekruton-anĝelon, pugnobatis lin ĉe la ventro kaj alkriegis lin: "Malfermu pli bone vian faŭkon, Bet-Leĥema porko. Ĉu tiel oni vokas 'Haleluja'? Kvazaŭ vi havus knedlikon en la faŭko. Mi ŝatus scii, kiu idioto enlasis vin, bruto, ĉi tien en la paradizon. Provu tion ankoraŭfoje... Hlahlelhujha? Bestio, ĉi tie en la paradizo vi ankoraŭ al ni nazparolas... Provu tion ankoraŭfoje, lebanona cedro."

Ili veturis plu kaj ankoraŭ longe malantaŭ ili oni aŭdis tiemaman kriegon de nazparolanta rekruto-anĝelo: "Hla-hle-hlu-hja" kaj krion de la kaporalo-anĝelo: "Ha-le-lu-ja, ha-le-lu-ja, jordana bovino!"

Poste grandega brilo super konstruaĵo, granda kiel Maria-kazerno en České Budějovice kaj super ĝi du aeroplanoj, unu ĉe la maldekstra, la alia ĉe la dekstra flanko, kaj meze inter ili streĉita giganta strio da tolo kun grandega surskribo:

I.k.R. DIA ĈV EFĶOMANDEJO

La generalon Biegler elsidigis el la aŭtomobilo du anĝeloj en uniformoj de frontaj policistoj, kaptis lin je la kolumo kaj forkondukis en la konstruaĵon supren en la unuan etaĝon.

"Kondu tu dece antaŭ sinjoro dio," ili diris al li ankoraŭ supre antaŭ pordo kaj puŝis lin internen.

Meze de la ĉambro, en kiu sur vandoj pendis portretoj de Francisko Jozefo kaj Vilhelmo, Karolo — la tronsekvanto de Francisko Jozefo, la generalo Viktoro Dankl, la arkiduko Frederiko<sup>21</sup> kaj estro de la generala stabo Konrado von Hötzen-dorf, staris sinjoro dio.

21 — Vilhelmo: germana imperiestro, laŭ kies instigo Aŭstrio komencis la militon

— Karolo: arkiduko, kiu post morto de Francisko Jozefo la unua iĝis imperiestro sub la nomo Karolo la unua

— la generalo Viktoro Dankl: kavaleria generalo en Galicio, kiu tie mortkondamnis multe da civiluloj



”Kadeto Biegler,” diris sinjoro dio emfaze, ”ĉu vi min ne ekkonas? Mi estas via ekskapitano Ságner de la dekunua marŝkompanio.”

Biegler ŝtoniĝis.

”Kadeto Biegler,” ekparolis denove sinjoro dio, ”kiarajte vi alproprigis al vi la titolon de generalmajoro? Kiarajte, kadeto Biegler, vi promenveturis en staba aŭtomobilo sur la ŝoseo inter malamikaj pozicioj?”

”Obee mi raportas...”

”Fermu la faŭkon, kadeto Biegler, se parolas kun vi sinjoro dio.”

”Obee mi raportas,” blekis Biegler ankoraŭfoje.

”Ĉu vi do ne fermos la faŭkon?” alkriis lin sinjoro dio, malfermis la pordon kaj ekkriis: ”Du anĝeloj ĉi tien!”

Eniris du anĝeloj kun fusiloj, pendigitaj sur la maldekstra flugilo. Biegler ekkonis en ili Matuŝičon kaj Batzeron.

Kaj el la buŝo de sinjoro dio sonis voĉo: ”Ĵetu lin en latri-non!”

La kadeto Biegler falis ien en teruran fetoron.

\*

Kontraŭ la dormanta kadeto Biegler sidis Matuŝič kun Batzer, la servosoldato de la kapitano Ságner, kaj senĉese ludis ’sesdek ses’.

”Tiu ulo ja malodoras kiel sekigita gado,” diris Batzer, kiu rigardis kun intereso, kiel la dormanta kadeto Biegler suspek- te skuiĝas, ”li devas havi la pantalonon plena.”

— la arkiduko Frederiko: ĉefkomandanto de la aŭstri-hungara armeo, kondukanta tre krude precipe kontraŭ slavo

”Tio povas okazi al kiu ajn,” diris Matuŝiĉ filozofie, ”lasu lin, eĉ tiel vi lin ne transvestos. Prefere disdonu kartojn.”

Super Budapeŝto vidiĝis jam brilantaj lumoj kaj super Danubo saltetis lumo de reflektoro.

La kadeto Biegler sonĝis jam denove pri io alia, ĉar li parolis el dormo: ”Diru al mia bravega armeo, ke en mia koro ĝi konstruis al si daŭran monumenton de amo kaj dankemo.”

Ĉar ĉe tiuj vortoj li denove komencis sin turni, malodoris tio intensive ĉe la nazo de Batzer, tiel ke tiu rimarkis, forkraĉante: ”Li malodoras kiel purigisto de klozetoj, kiel surfekita purigisto de klozetoj.”

Kaj la kadeto Biegler skuiĝis ĉiam pli maltrankvile kaj lia nova sonĝo estis tre fantazia. Li defendis Linzon en la milito pri heredo de la aŭstra trono<sup>22</sup>.

Li vidis redutojn, ĉirkaŭbaritajn tranĉeojn kaj palisarojn ĉirkaŭ la urbo. Lia ĉefkomandejo estis ŝanĝita al granda hospitalo. Ĉie ĉirkaŭe kuŝaĉis malsanuloj kaj tenis sin je la ventro. Antaŭ palisaroj de la urbo Linz rajdveturis francaj dragoj de Napoleono la unua.

Kaj li, komandanto de la urbo, staris super tiu teruraĵo, ankaŭ tenis sin je la ventro kaj kriis al franca parlamentario: ”Sciigu al via imperiestro, ke mi ne kapitulacos...”

Poste kvazaŭ la ventrodoloro subite malaperus, li impetas kun bataliono trans palisarojn eksteren el la urbo al vojo de gloro kaj venko kaj vidas, kiel la ĉefleŭtenanto Lukáš per sia

22 Linz: urbo en norda Aŭstrio. — ...la milito pri heredo de la aŭstra trono: post morto de Karolo la sesa regis lia filino Maria Tereza, sed la tronon pretendis ankaŭ bavara arkiduko Karolo Alberto. Eksplo-dis ”militoj pri heredo de la aŭstra trono” (1740-1748), en kiu militis Prusio, Bavario kaj Francio unuflanke kaj Aŭstrio kun Anglio aliflanke

brusto ekkaptas sabrobaton fare de franca dragono, baton, kiu estis destinita al li, Biegler, la komandanto de la sieĝata Linz.

La ĉefleŭtenanto Lukáš mortas ĉe liaj piedoj kun ekkrio:

”Viro kia vi, sinjoro kolonelo, estas pli grava ol ia sensignifa ĉefleŭtenanto!”

La defendanto de Linz deturnas sin kun emocio de la mortanto, kiam subite alflugas kartoĉo kaj ekbatas Biegleron sur la sidvangajn muskolojn.

Biegler aŭtomate ekpalpas malantaŭen sur sian pantalonon kaj sentas ion malsekan, io algluiĝa ŝmiriĝas sur lia mano. Li krias: ”Sanitara servo! Sanitara servo!” kaj falas de sur la ĉevalo...

Batzer kun Matuŝič levis la kadeton Biegler de la planko, kien li rulfalis de sur la benko, kaj kuŝigis lin reen sur lian lokon.

Poste Matuŝič iris al la kapitano Ságner kaj anoncis, ke pri la kadeto Biegler okazas strangaj aferoj.

”Tio ŝajne ne estas sekve de tiu konjako,” li diris, ”pli probable povus temi pri ĥolero. La kadeto Biegler ĉie en stacioj trinkis akvon. Mi vidis lin en Moson, ke...”

”Ĥolero ne progresas tiel rapide, Matuŝič, diru al sinjoro doktoro en la apuda kupeo, ke li iru lin trarigardi.”

Al la bataliono estis alkomandita ”milita doktoro”, hardita studento de medicino, germano Welfer. Li sciis drinki, interbatiĝi, kaj ĉe tio li havis medicinon en la kapo. Li trapasis medicinajn fakultatojn en diversaj universitataj urboj de Aŭstri-Hungario kaj praktikon en la plej diversaj hospitaloj, sed al la doktora ekzameno li ne submetiĝis pro tiu simpla fakto, ke en la testamento, kiun lia onklo postlasis al siaj heredan-

toj, estis tio, ke al la studento de medicino Frederiko Welfer estu elpagata ĉiujare stipendio ĝis tiu tempo, kiam Frederiko Welfer ricevos kuracistan diplomon.

Tiu ĉi stipendio estis proksimume kvaroble pli alta ol salajro de malsanuleja asistanto, kaj MUC<sup>23</sup> Frederiko Welfer zorge klopodis prokrasti sian nomumon al doktoro pri ĉia kuracado por la tempo kiom eble plej malproksima.

La heredantoj preskaŭ krevis pro furiozo. Ili proklamis lin idioto, faris provojn altrudi al li riĉajn fianĉinojn, por senigi sin de li. Por kolerigi ilin ankoraŭ pli, MUC Frederiko Welfer, ano de proksimume dek du studentaj germanaj societoj, eldonis kelke da kolektoj de tre bonaj poemoj en Vieno, Lepsiko, Berlino. Li skribis artikolojn por "Simplicissimus"<sup>24</sup> kaj studis plu, kvazaŭ okazus nenio.

Sed venis la milito, kiu perfide enfalis en la dorson de MUC Frederiko Welfer.

La poeton de libroj: "Ridiĝintaj kantoj", "Kruĉo kaj la scienco", "Fabeloj kaj alegorioj" oni tute malhoneste rekrutis kaj unu heredanto en la ministerio de milito aranĝis, ke la senartifika Frederiko Welfer faris "militan doktoran ekzamenon". Li faris ĝin skribe. Li ricevis vicon da demandoj, kiujn ĉiujn li respondis stereotipe: "Leku al mi la anuson!" Post tri tagoj anoncis al li kolonelo, ke Welfer ricevis diplomon de doktoro pri ĉia kuracado, ke jam longe li estis matura por esti doktoro, ke la ĉefa stabkuracisto alkomandas lin al rezerva hospitalo kaj de lia konduto dependas rapida avanco, ke kvankam en diversaj universitataj urboj li havis interbatiĝojn kun oficiroj,

23 mallongigo el komencaj literoj de la latina "Medicinae Universae Candidatus" — titolo, kiun uzis (uzas) studentoj de medicino

24 iama germana humura kaj satira revuo, eldonata ekde la jaro 1896

tion ĉion oni pri li scias, nun en la milito oni ĉion tion forgesas.

La aŭtoro de poemplibro "Kruĉo kaj la scienco" ekmordetis la lipojn kaj iris servi.

Post kiam malkaŝiĝis kelke da okazoj, ke li kondukis al soldatoj-pacientoj neordinare afable, plilongigante ilian restadon en la hospitalo kiom eblis, kiam estis devizo: "Kuŝaĉu tio en hospitalo aŭ prefere mortaĉu en tranĉeoj — mortaĉu tio en hospitalo aŭ en disvolvita soldatlinio", oni sendis doktoron Welfer kun la dekunua marŝbataliono al la fronto.

Aktivaj oficiroj de la bataliono vidis en li ion malplivaloran. Ankaŭ rezervaj oficiroj lin ne atentis kaj ne ligis kun li amikecon, por ke ankoraŭ neplivastiĝu la abismo inter ili kaj la aktivaj oficiroj.

La kapitano Ságner nature sentis sin esti multe pli nobla ol tiu iama MUC, kiu dum siaj longjaraj studoj batregalis tiom multe da oficiroj. Kiam doktoro Welfer, la "milita doktoro", lin laŭiris, Ságner lin eĉ ne ekrigardis kaj plu parolis kun la ĉefleŭtenanto Lukáš pri io tute sensignifa, ekzemple ke ĉe Budapeŝto oni kulturas kukurbojn, al kio la ĉefleŭtenanto Lukáš respondis, ke kiam li estis en tria klaso de oficirlernejo, kun kelkaj kamaradoj en civila vesto ili vizitis Slovakion kaj venis al slovaka evangelia parokestro. Ke tiu donis al ili rostitan porkaĵon kun kukurbo preparita kiel saŭkraŭto, verŝis al ili vinon kaj diris:

*"Porko, ankaŭ kukurbeto,  
vinon volas ĉi-kompleto,"*  
kaj ke Lukáš terure ofendiĝis.\*

\* La interparolo de la kapitano Ságner kun la ĉefleŭtenanto Lukáš estis kondukita en la ĉeĥa ligvo.

”El Budapesto ni ne vidos multon,” diris la kapitano Ságner, ”oni veturigas nin preter la urbo. Laŭ la marŝordono ni staros ĉi tie du horojn.”

”Mi opinias, ke oni retroŝovas vagonojn,” respondis la ĉefleŭtenanto Lukáš, ”ni alveturos en transŝarĝan stacion. La transporta soldata stacio.”

Laŭiris ilin la ”milita doktoro” Welfer.

”Temas pri nenio,” li diris kun rideto, ”sinjorojn, kiuj aspiras post tempo iĝi oficiroj de la armeo kaj kiuj ankoraŭ en Bruck fanfaronis pri siaj strategie-historiaj scioj en la kazino, necesus atentigi, ke estas danĝere formanĝi je unu fojo la tutan sendaĵon da dolĉaĵoj, kiun la panjo sendas al tia sinjoro en la fronton. De la tempo, kiam ni ekveturis el Bruck, la kadeto Biegler formanĝis tridek kremrulaĵojn, kiel li al mi konfesis, kaj ĉie en la stacidomoj trinkis nur reboligitan akvon, sinjoro kapitano, tio memorigas min pri la verso de Schiller<sup>25</sup>: ’...Kiu diras pri...’ ”

”Aŭdu, doktoro,” interrompis lin la kapitano Ságner, ”ne temas pri Schiller. Kio propre estas al la kadeto Biegler?”

La milita doktoro Welfer ekridetis. ”La aspiranto por la rango de oficiro, v i a kadeto Biegler, surfekiĝis... Ne temas pri ĥolero, ne temas pri disenterio, temas pri natura kaj simpla surfekiĝo. Li eltrinkis iom pli da konjako, via sinjoro a s - p i r a n t o p o r l a r a n g o d e o f i c i r o, kaj surfekiĝis... Li surfekus sin ŝajne eĉ sen via konjako. Li forvoris tiom da kremrulaĵoj, kiujn oni sendis al li el la hejmo... Tio estas infano.. En la kazino, kiel mi scias, li trinkis ĉiam unu pokalon. Abstinulo.”

25 Johano Kristofa Frederiko Schiller (1759-1805), fama germana poeto kaj dramisto

Doktoro Welfer forkraĉis. "Li aĉetis al si Linzajn tortetojn."

"Ĉu do ne temas pri io serioza?" ekparolis la kapitano Ságner, "sed tamen, tia afero... se tio disvastiĝus..."

La ĉefleŭtenanto Lukáš leviĝis kaj diris al Ságner. "Mi dankas pro tia plotonestro..."

"Mi iom helpis al li sur la piedojn," diris Welfer, kiun ne forlasis rideto, "sinjoro bataliona komandanto aranĝos tion pluan... Tio estas, mi transdonos la kadeton Biegler ĉi tie en hospitalon... Mi pretigos ateston, ke temas pri disenterio. Peza kazo de disenterio. Izolejo... La kadeto Biegler estos lokita en desinfekta barako..."

Tio estas nepre pli bona," daŭrigis Welfer kun la sama naŭza rideto, "aŭ surfekita kadeto, aŭ per disenterio trafita kadeto..."

La kapitano Ságner turnis sin al sia Lukáš per pure ofica tono: "Sinjoro ĉefleŭtenanto, la kadeto Biegler de via kompanio malsaniĝis je disenterio kaj restos en Budapesto kaŭze de flegado..."

Al la kapitano Ságner ŝajnis, ke Welfer ridas terure arogante, sed kiam li ekrigardis la "militan doktoron", li vidis, ke tiu mienas ege indiferece.

"Ĉio do estas en ordo, sinjoro kapitano," respondis Welfer trankvile, "la aspiranto por la oficira..."

Li eksvingis la manon: "Ĉe disenterio ĉiu surfekas sian pantalonon."

Tiel okazis, ke la brava kadeto Biegler estis forveturigita en soldatan izolan hospitalon en Új Buda.

Lia surfekita pantalone perdiĝis en kirlo de la mondmilito.

La revoj de la kadeto Biegler pri grandiozaj venkoj estis fermitaj en hospitalan ĉambron de izolaj barakoj.

Eksciinte, ke li havas disenterion, la kadeto Biegler pro tio vere entuziasmiĝis.

Ĉu esti vundita, aŭ malsaniĝi por sinjoro imperiestro, ple-numante sian devon?

Poste okazis al li eta malagrablaĵo. Ĉar ĉiuj lokoj por malsanuloj je disenterio estis troŝtopitaj, oni transportis la kadeton Biegler en ĥoleran barakon.

Kiam la kadeton Biegler oni banlavis kaj metis al li termometron sub la brakon, hungara stabkuracisto ekskuis la kapon: "37°!" La plej malbona simptomo de ĥolero estas konsiderinda malaltiĝo de temperaturo. La malsanulo iĝas apatia.

La kadeto Biegler vere ne montris ian ekscitiĝon. Li estis neordinare trankvila, ripetante al si enmense, ke eĉ tiel li suferas por sinjoro imperiestro.

La stabkuracisto ordonis ŝovi la termometron al la kadeto Biegler en la rektumon.

"La lasta stadio de ĥolero," ekpensis la stabkuracisto, "la simptomo de la fino, la plej ekstrema malforto, kiam malsanulo perdas la sencon por la cirkaŭaĵo kaj lia konscio estas vualita. Li ridetas en antaŭmortaj spasmoj."

La kadeto Biegler dum tiu ĉi manipulado vere martire ridetis, ŝajnigante heroon, kiam oni ŝovis termometron al li en la rektumon. Sed li ne moviĝis.

"Simptomoj," ekpensis la stabkuracisto, "kiuj ĉe ĥolero malrapide kondukas al la morto, pasiva sinteno..."

Li demandis ankoraŭ hungaran sanitaran suboficiron, ĉu la kadeto Biegler vomis kaj havis lakson en bankuvo.



Ricevinte negativan respondon, li ekrigardis Biegleron. Kiam ĉe ĥolero pasis lakso kaj vomado, estas tio denove, kiel la antaŭaj simptomoj, signo de tio, kio okazas ĉe ĥolero en lastaj horoj antaŭ la morto.

La kadeto Biegler, tute nuda, forportita el varma bankuvo sur liton, eksentis malvarmon kaj detklakis. Li ankaŭ ekhavis anserhaŭton sur la tuta korpo.

”Jen vidu,” diris la stabkuracisto hungare, ”granda dentklakado, la membroj estas malvarmaj. Tio estas la fino.”

Klinante sin al la kadeto Biegler, li demandis lin germane: ”Do, kiel vi fartas?”

”T-t-tre b-b-bo-bone,” dentklakis la kadeto Biegler, ”...k-k-ko-kov-kovrilon.”

”La konscio parte vualita, parte konservita,” diris la hungara stabkuracisto, ”la korpo tre magra, la lipoj kaj la ungoj devas esti nigraj... Tio estas jam la tria kazo, kiam iu ĉe mi mortis kaŭze de ĥolero, ne havante nigrajn ungojn kaj lipojn...”

Li denove klinis sin super la kadeton Biegler kaj daŭrigis hungare: ”La dua eĥo super la koro ĉesis...”

”K-k-ko-ko-kov-kovri-kovrilon,” dentklakis la kadeto Biegler.

”Tio, kion li diras, estas liaj lastaj vortoj,” diris la stabkuracisto al la sanitara suboficiro hungare, ”morgaŭ ni entombigos lin kun majoro Koch. Nun li falos en senkonscion. Ĉu la dokumentoj pri li estas en la kancelario?”

”Ili tie estos,” respondis trankvile la sanitara suboficiro.

”K-k-ko-ko-kov-kovri-kovrilon,” dentklakis malantaŭ la forirantaj la kadeto Biegler.

En la tuta ĉambro kun dek ses litoj estis kvin homoj. Unu

el ili estis mortinto. Li mortis antaŭ du horoj, estis kovrita per litotuko kaj havis la nomon kiel la malkovrinto de ĥoleraj baciloj. Estis tio kapitano Koch<sup>26</sup>, pri kiu la stabkuracisto menciis, ke li havos morgaŭ entombigon kun la kadeto Biegler.

La kadeto Biegler leviĝis sur la lito kaj la unuan fojon vidis, kiel oni mortas por sinjoro imperiestro sekve de ĥolero, ĉar du el la kvar restantaj, mortante, sufokiĝis kaj bluiĝis, ĉe kio ili ion kriis, sed ne eblis ekkoni, kion kaj per kia lingvo ili parolas, pli tio similis al stertorado de sufokita voĉo.

La aliaj du kun okulfrape ŝtorma reago al resaniĝo memorigis homojn trafitajn per tifa delirio. Ili nekompreneble kriis kaj elĵetis siajn maldikajn piedojn el sub la kovrilo. Super ili staris barba sanitaristo, parolanta per lingvaĵo el la Stiria regiono (kiel la kadeto Biegler ekkonis) kaj trankviligis ilin: "Ankaŭ mi havis jam ĥoleron, miaj oraj moŝtoj, sed mi ne piedbatis la kovrilon. Nun estas via stato jam bona. Vi ricevos forpermeson, kiam..."

Ne svingiĝu tiom," li alkriegis ulon, kiu piedbatis la kovrilon tiel, ke ĝi transflugis sur lian kapon, "tion oni ĉe ni ne faras. Ĝoju, ke vi havas febron, almenaŭ oni ne veturigos vin de ĉi tie kun muziko. Vi ambaŭ jam el tio eliris."

Li ĉirkaŭrigardis.

"Tie jam denove du uloj mortis. Tion ni atendis," li diris bonule, "ĝoju, ke vi du jam el tio eliris. Mi devas iri por litotukoj."

Li revenis post momento. Li kovris la mortintojn kun tute nigraj lipoj per litotukoj, eltiris iliajn manojn kun nigraj un-

26 nekonsekvenceco de la aŭtoro, kelkajn liniojn pli supre li parolas pri majoro Koch

goj, per kiuj en la lasta agonio de sufokiĝo ili tenis sian rigidiĝintan seksorganon, klopodis reŝovi al ili la langon en la buŝon, poste li genuiĝis ĉe la litoj kaj komencis: "Sankta Maria, Dipatrino..." Kaj la hardita sanitaristo el Stirio rigardis ĉe tio siajn resaniĝantajn pacientojn, kies delirio signifis reagon al la nova vivo.

"Sankta Maria, Dipatrino," li ripetis, kiam nuda viro subite ekfrapetis lian ŝultron.

Estis tio la kadeto Biegler.


"Aŭdu," li diris, "mi... banis min... Propre, oni min banis... Mi bezonas kovrilon... Mi sentas malvarmon."

"Tio estas stranga kazo," diris duonhoron pli poste la stabkuracisto al la kadeto Biegler, kiu ripozis sub kovrilo, "vi estas, sinjoro kadeto, resaniĝanto; morgaŭ ni sendos vin en rezervan hospitalon en Tarnów. Vi estas transportanto de ĥoleraj baciloj... Ni progresis jam tiom, ke ĉion tion ni scias. Vi estas de la naŭdekunua regimento..."

"La dektria marŝbataliono, la dekunua kompanio," respondis la sanitara suboficiro anstataŭ la kadeto Biegler.

"Skribu," diris la stabkuracisto: "La kadeto Biegler, la dektria marŝbataliono, la dekunua marŝkompanio, la naŭdekunua regimento, cele de observado en ĥolerajn barakojn en Tarnów. Transportanto de ĥoleraj baciloj..."

Kaj tiel el la kadeto Biegler, entuziasma batalanto, iĝis transportanto de ĥoleraj baciloj.



## 2. EN BUDAPESTO

**D**e la stacia soldatkomandejo en Budapesto Matušiĉ alportis al la kapitano Ságner telegramon, kiun sendis la kompatinda komandanto de la brigado, transveturigita en sanatorion. Ĝi havis la saman neĉifritan enhavon kiel en la lasta stacio: "Rapide kuirpretigi manĝon kaj marŝi al Sokal'." Al tio estis aldonite: "La trajnotrupon alvicigi al la orienta soldatunu. La gvatistan servon oni disigas. La dektria marŝbataliono konstruu ponton trans la riveron Bug. Detaloj en la gazetaro."

La kapitano Ságner tuj foriris al la stacia komandejo. Bonvenigis lin etkreska dika oficiro kun amika rideto.

"Li ekscesis, tiu via brigada generalo," li diris, plengorĝe ridegante, "sed transdoni al vi tiun idiotaĵon ni devis, ĉar de la divizio ankoraŭ ne venis ordono, ke oni ne transdonu liajn telegramojn al la adresatoj. Hieraŭ traveturis la dekkvara

marŝbataliono de la sepdekkvina regimento, kaj la komandanto de la bataliono havis ĉi tie telegramon, ke al ĉiuj viroj oni donu po ses kronoj kiel eksterordinaran rekompencan por la bataloj ĉe Przemysł, kaj samtempe ordonon, ke el tiuj ses kronoj ĉiu viro lasu ĉi tie en la kancelario du kronojn por la milita prunto... Laŭ garantiitaj sciigoj via brigada generalo havas paralizon.”

”Sinjoro majoro,” demandis la kapitano Ságner la komandanton de la soldata stacio, ”laŭ ordonoj de la regimento kaj laŭ la marŝordono ni veturas al Gödölö. La viraro devas ĉi tie ricevi dek kvin dekagramojn da ementala fromaĝo. En la lasta stacio ĝi havis rajton je dek kvin dekagramoj da hungara salamo. Sed ĝi ricevis nenion.”

”Probable ankaŭ ĉi tie tio ne efektiviĝos,” respondis la majoro, senĉese agrable ridetante, ”mi ne scias pri simila ordono koncerne la ĉ e ĥ a j n regimentojn. Cetere tio ne estas mia afero, turnu vin al la proviza komandantaro.”

”Kiam ni forveturos, sinjoro majoro?”

”Antaŭ vi staras trajno kun peza artilerio en Galicion. Tiun ni ellasos post unu horo, sinjoro kapitano. Sur la tria trako estas sanitara trajno. Ĝi forveturos dudek kvin minutojn post la artilerio. Sur la dekdua trako ni havas munician trajnon. Tiu forveturos dek minutojn post la sanitara trajno kaj post pluaj dudek minutoj forveturos via trajno.

Kompreneble, se ne estos iaj ŝanĝoj,” li aldonis denove kun rideto, tiel ke al la kapitano Ságner li iĝis tute antipatia.

”Permesu, sinjoro majoro,” demandis Ságner, ”ĉu vi povas doni al mi klarigon pri tio, ke vi ne scias pri simila ordono koncerne eldonadon de dek kvin dekagramoj da ementala fromaĝo por ĉ e ĥ a j regimentoj?”

”Tio estas sekreta sciigo,” respondis la komandanto de soldata stacio en Bupesto al la kapitano Ságner, senĉese ridante.

”Mi kuiris al mi belan kaĉon,” ekpensis la kapitano Ságner, elirante el la konstruaĵo de la komandejo, ”kial mi, ĉe ĉiuj dibloj, diris al la ĉefleŭtenanto Lukáš, ke li kunprenu ĉiujn komandantojn kaj iru kun ili kaj la viraro al la proviza trupo por dek kvin dekagramoj da ementala fromaĝo por persono.”

Antaŭ ol la komandanto de la dekunua kompanio ĉefleŭtenanto Lukáš eldonis dispoziciojn laŭ la ordono de la kapitano Ságner, ke la viraro de la bataliono marŝu al la magazeno por dek kvin dekagramoj da ementala fromaĝo por ĉiu viro, aperis antaŭ li Ŝvejk kun malfeliĉa Baloun.

Baloun tremis per la tuta korpo.

”Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto,” diris Ŝvejk kun kutima fleksebleco, ”la afero, pri kiu temas, estas treege grava. Mi petas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke ni povu pritrakti tiun tutan aferon ie pretere, kiel diris mia kamarado Ŝpatina el Zhoř, kiam li estis atestanto ĉe geedziga ceremonio kaj subite en preĝejo li sentis bezonon...”

”Pri kio do temas, Ŝvejk?” interrompis lin la ĉefleŭtenanto Lukáš, kiu jam eksopiris je Ŝvejk same kiel Ŝvejk je la ĉefleŭtenanto Lukáš, ”ni iru do iom malproksimen.”

Baloun sekvis ilin malantaŭe, ne ĉesante tremi. Tiu ĉi giganto tute perdis sian mensan ekvilibron kaj balancis la manojn en terura, senkonsila malespero.

”Pri kio do temas, Ŝvejk?” demandis la ĉefleŭtenanto Lukáš, kiam ili venis iom pli malproksimen.

”Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto,” diris Ŝvejk, ”ke estas ĉiam pli bone konfesi pli frue, antaŭ ol tio malkaŝiĝos.

Vi donis certan ordonon, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke Baloun, kiam ni alveturos Budapeston, alportu al vi tiun vian hepatan pasteĉon kaj bulkojn.”

”Ĉu vi ricevis tiun ordonon, aŭ ne?” turnis sin Ŝvejk al Baloun.

Baloun komencis ankoraŭ pli balanci la manojn, kvazaŭ li volus defendi sin kontraŭ atakanta malamiko.

”Tiu ĉi ordono,” diris Ŝvejk, ”bedaŭrinde ne povis esti plenumita, sinjoro ĉefleŭtenanto. Mi forvoris tiun vian hepatan pasteĉon...”

Mi ĝin forvoris,” ripetis Ŝvejk, fingropuŝetante la konsternitan Baloun, ”ĉar mi opiniis, ke hepata pasteĉo povas aĉiĝi. Mi legis kelkfoje en gazeto, ke per hepata pasteĉo veneniĝis la tuta familio. Foje en Zderaz, foje en Beroun, foje en Tábor, foje en Mladá Boleslav, foje en Příbram. Ĉiuj sekve de tiu veneniĝo mortis. Hepata pasteĉo, tio estas la plej malbona aĉaĵo...”

Baloun, tremante per la tuta korpo, stariĝis flanken, ŝovis al si fingron en la gorĝon kaj post malongaj paŭzoj vomis.

”Kio estas al vi, Baloun?”

”Mi vo-vo-mas, e-e, sinjoro ĉef... e-e, ĉef-leŭ-te-nan-to e-e,” vokis la malfeliĉa Baloun, uzante paŭzojn, ”mi-mi ĝin forforvoris e-e, forvo-ee-ris, e-e, mi-ee, sola, e-e, e-e.”

El la buŝo de la malfeliĉa Baloun iris eksteren ankaŭ pece-toj da staniola kovraĵo de la pasteĉo.

”Kiel vi vidas, sinjoro ĉefleŭtenanto,” diris Ŝvejk, perdante nenion el sia spirita ekvilibro, ”ĉiu tia forvorita pasteĉo eliras eksteren kiel oleo super akvon. Mi volis preni la kulpon sur min, kaj tiu idioto tiel ĉi sin malkaŝis. Li estas tute bonanima homo, sed li forvoros ĉion, kion oni al li konfidis. Mi

konis ankaŭ tian homon. Li estis servisto en banko. Al tiu eblis konfidi milojn da kronoj; foje li maldeponis monon en alia banko, oni donis al li je mil kronoj pli kaj li redonis tion tuj surloke, sed sendi lin por kolviando je dek kvin krejceroj, li forvoris duonon da ĝi dumvoje. Li estis tiel avida je vorajaĵo, ke kiam oficistoj sendis lin por tripkolbasoj, li distranĉis ilin dumvoje per poŝotranĉilo kaj la truojn glufermis per angla plastro, kiu ĉe kvin tripkolbasoj kostis al li pli ol la tuta kolbaso.”

La ĉefleŭtenanto Lukáš ekĝemis kaj foriris.

”Ĉu vi bonvolas havi iajn ordonojn, sinjoro ĉefleŭtenanto?” vokis malantaŭ li Ŝvejk, dum la malfeliĉa Baloun senĉese ŝovis al si fingron en la gorgon.

La ĉefleŭtenanto Lukáš eksvingis la manon kaj iris al la proviza magazeno, ĉe kio venis al li en la menson stranga ideo, ke se soldatoj voras hepatajn pasteĉojn de siaj oficiroj, ke Aŭstrio ne povas venki.

Intertempe Ŝvejk forkondukis Balounon al la alia flanko de la soldata trako. Ĉe tio li lin ĝojigis, ke ili iros kune en la urbon kaj alportos de tie al sinjoro ĉefleŭtenanto Debrecenajn kolbasetojn, ĉar nomo de tiu ĉi fumajista specialaĵo kunfandiĝis ĉe Ŝvejk nature kun imago pri la ĉefurbo de la hungara regno.

”La trajno povus al ni forveturi,” lamentis Baloun, al kies nesatigebleco ligiĝis ankaŭ grandega avareco.

”Kiam oni veturas al la fronto,” proklamis Ŝvejk, ”oni neniam malfruiĝos, ĉar ĉiu trajno, kiu veturas al la fronto, tre bone pripensos, ĉu al la finstacio alveturigi nur duonon de la trupunuoj. Cetere, mi komprenas vin bone, Baloun. Vi ne povas trovi la poŝon.”



Sed ili iris nenien, ĉar eksonis signalo por envagoniĝi. La viraro de unuopaj kompanioj revenis de la proviza magazeno al siaj vagonoj denove kun maplenaj manoj. Anstataŭ dek kvin dekagramoj da ementala fromaĝo, kies disdonon oni ĉi tie anoncis, ĉiu ricevis skatoleton da alumetoj kaj bildkarton, kiun eldonis komitato por militaj tomboj en Aŭstrio (Vieno XX/4, Canisius-strato). Anstataŭ dek kvin dekagramoj da ementala fromaĝo ĉiu havis en la mano bildeton de okcidentgalicia tombejo de soldatoj en Sedlisko kun monumento de kompatindaj milicianoj, pretigita de frontevitulo-skulptisto, unujara volontulo ĉefserĝento Scholc.

Ankaŭ ĉe la stabvagono regis neordinara emocio. La oficiroj de la marŝbataliono amasiĝis ĉirkaŭ la kapitano Săgner, kiu ekscitite ion al ili rakontis. Li ĵus revenis de la stacia komandejo kaj havis enmane tre konfidencan, veran telegramon de la brigada stabo, enhavoriĉan, kun instrukcioj kaj ordonoj, kiel kondukti en tiu ĉi nova situacio, en kiu Aŭstrio troviĝis la 23an de majo 1915.

La brigado telefonis, ke Italio deklaris militon al Aŭstri-Hungario<sup>27</sup>.

Ankoraŭ en Bruck an der Leitha ĉe tagmanĝoj kaj vespermanĝoj en la oficira kazino oni parolis kun plena buŝo pri stranga agado kaj konduto de Italio, sed entute neniu atendis, ke plenumiĝos profetaj vortoj de tiu idiota kadeto Biegler, kiu foje ĉe vespermanĝo forpuŝis teleron kun makaronioj kaj proklamis: "Tiujn mi satmanĝos nur antaŭ pordegoj de Verona."

27 ekde la jaro 1882 Italio formis t.n. Trialiancon kun Aŭstri-Hungario kaj Germanio. La 23an de majo Italio deklaris militon al Aŭstri-Hungario, pro kio Anglio, Francio kaj Rusio promesis al ĝi egan pli-grandigon de itala teritorio

La kapitano Ságner, trastudinte instrukciojn, ĵus ricevitaĵajn de la brigado, igis trumpeti alarmsignalon.

Kiam amasiĝis la tuta viraro de la marŝbataliono, oni starigis ĝin en kvadraton kaj la kapitano Ságner legis al la viraro per neordinare nobla voĉo ordonon, senditan al li telegrafe de la brigado.

”Pro senekzempla perfido kaj avideco la itala reĝo forĝis siajn fratecajn devojn, per kiuj li estis ligita kiel aliancano de nia monarkio. Ekde eksplodo de la milito, en kiu estis lia devo starigi sin ĉe flanko de niaj bravaj soldataroj, la perfida itala reĝo ludis la rolon de maskita insidulo, kondukante kiel duvizaĝulo, konservante ĉe tio sekretan traktadon kun niaj malamikoj, kaj tiu ĉi perfido kulminis nokte de la 22a al la 23a de majo per militdeklaro al nia monarkio. Nia la plej supera komandanto estas konvinkita, ke niaj ĉiam kuraĝaj kaj gloraj soldataroj respondos al mizera perfido de la malfidela malamiko per tia bato, ke la perfidulo venos al la konvinko, kiel, komencinte malhoneste kaj perfide la militon, li mem sin pereigis. Ni firme fidas tion, ke kun la helpo de dio baldaŭ venos la tago, kiam italaj ebenaĵoj denove vidos venkinton de Santa Lucia, Vicenza, Novara, Custoza. Ni volas venki, devas venki kaj certe venkos!”

Poste estis la kutima ”trifoje gloron!” kaj la soldataro, iom embarasita, denove eksidis en la trajno. Anstataŭ dek kvin dekagramoj da ementala fromaĝo ili havas sur la kolo la militon kontraŭ Italio.

\*

En la vagono, kie sidis Ŝvejk kun la ĉefserĝento-kontisto Vaneĥ, la telefonisto Chodounský, Baloun kaj la kuiristo Juraj-

da, ekis interesa interparolo pri interveno de Italio en la militon.

”En Táborská-strato en Prago estis ankaŭ tia afero,” komencis Ŝvejk; ”tie estis komercisto Hořejší, iom pli malproksime sur kontraŭa flanko de la strato havis sian butikon komercisto Pošmourný kaj inter ili ambaŭ estis legomvendisto Havlasa. Do, tiu komercisto Hořejší ricevis foje ideon kuniĝi kun la legomvendisto Havlasa kontraŭ la komercisto Pošmourný kaj komencis kun li trakti, ke ili povus kunigi tiujn du butikojn sub unu firmao: ’Hořejší kaj Havlasa’. Sed tiu legomvendisto Havlasa iris al la komercisto Pošmourný kaj diras al li, ke Hořejší donas al li mil ducent kronojn por tiu lia legomvendista butiko kaj volas, ke li, Havlasa, faru kun li kompanion. Sed se Pošmourný donos al li mil okcent kronojn, ke li prefere faros kompanion kun li kontraŭ Hořejší. Ili tion interkonsentis kaj tiu Havlasa certan tempon senĉese gapis ĉe Hořejší, kiun li perfidis, kaj ŝajnis, kvazaŭ li estus lia la plej bona amiko, kaj se la parolo venis al tio, kiam ili tion kunigos, li diris: ’Jes, tio estos jam baldaŭ. Mi atendas nur tion, kiam domloĝantoj revenos el somerumejoj.’ Kaj kiam tiuj domloĝantoj alveturis, estis tio vere jam preta, kiel li senĉese promesis al tiu Hořejší, ke ili tion kunigos. Kiam foje matene Hořejší iris malfermi la butikon, li vidis grandan surskribon super la butiko de sia konkurenco, egan ŝildon: ’Pošmourný kaj Havlasa’.”

”Ĉe ni,” rimarkis la stulta Baloun, ”okazis foje ankaŭ tia afero: en la apuda vilaĝo mi volis aĉeti bovidinon, mi havis tion interkonsentita kaj viandisto el Votice aĉetis ĝin sub mia nazo.”

”Se ni do havas novan militon,” daŭrigis Ŝvejk, ”se ni ha-

vas je unu malamiko pli, se ni havas novan fronton, oni devos ŝpari municion. 'Ju pli da infanoj estas en la familio, des pli da vergoj oni foruzas,' diris ĉiam maljunuleto Chovanec en Motol, kiu por gepatroj en la ĉirkaŭaĵo batpunis infanojn por konstanta rekompenco."

"Mi timas nur tion," diris Baloun, tremante per la tuta korpo, "ke kulpe de tiu Italio estos pli malgrandaj porcioj."

La ĉefserĝento-kontisto Vaněk ekmeditis kaj serioze diris: "Tio ĉio povas okazi, ĉar nun tiu nia venko iom prokrastiĝos."

"Nun ni bezonus novan Radecký," intervenis Ŝvejk, "tiu jam konis tiean regionon, tiu jam sciis, kie estas la malforta flanko de italoj, kion kaj de kiu flanko sturmi. Ien invadi, tio ne estas tiel facila. Tion scias ĉiu, sed eliri de tie, tio estas vera soldata arto. Se la homo jam ien sin enpuŝis, li devas scii pri ĉio, kio ĉirkaŭ li okazas, por ke li subite ne troviĝu antaŭ malfacilaĵo, kiun oni nomas katastrofo. Foje en nia domo, ankoraŭ en la malnova loĝejo, homoj kaptis en la subtegmento ŝteliston kaj tiu ulo rimarkis, kiam li tien enpuŝiĝis, ke masonistoj ĝuste riparas lumŝakton, li do al ili elŝiriĝis, falegis domzorgistinon kaj tra skafaldo malsuprengrimpis en lumŝakton kaj de tie li tute ne povis eliri. Sed nia paĉjo Radecký sciis pri ĉiu vojo, oni povis lin nenie kapti. En ia libro pri tiu generalo oni ĉion tion priskribis, kiel li fuĝis de Santa Lucia, la italoj ankaŭ forkuris kaj kiel li nur la sekvantan tagon malkovris, ke li propre venkis, se li ne trovis tie italojn kaj ne vidis ilin per teleskopo, li do revenis kaj okupis la forlasitan Santa Lucia. En tiu tempo oni nomumis lin marŝalo."

"Nu, Italio, tio estas bela lando," diris la kuiristo Jurajda, "foje mi estis en Venecio kaj scias, ke la italo ĉiun nomas porko. Se li ekscitiĝos, ĉiu estas laŭ li 'malbenita porko'. Ankaŭ

papo estas ĉe li porko, 'Madono estas porko', 'papo estas porko'."

Kontraŭe la ĉefserĝento-kontisto Vaněk esprimis sin pri Italio tre simpatie. En sia drogejo en Kralupy li produktas citronan sukon, kiun li preparas el putraj citronoj, kaj la plej malmultekostajn kaj la plej putrajn citronojn li aĉetis ĉiam el Italio. Nun finiĝos veturigado de citronoj el Italio al Kralupy. Ne ekzistas dubo, ke la milito kontraŭ Italio alportos diversajn surprizojn, ĉar Aŭstrio volos sin venĝi.

"Facile oni diras venĝi sin," ekridetis Ŝvejk. "Iu opinias, ke li sin venĝos, kaj fine por tio pagas tiu, kiun tia homo elektis al si kiel instrumenton de sia venĝo. Kiam antaŭ jaroj mi loĝis en Vinohrady, en teretaĝo vivis tie domzorgisto, ĉe tiu loĝis signifa oficisteto de banko kaj tiu iradis en bierkranejon en Kramerius-strato kaj tie li foje ekkverelis kun sinjoro, kiu havis instituton por analizo de urino en Vinohrady. Tiu sinjoro pensis pri nenio alia kaj parolis pri nenio alia, portis ĉe si boteletojn kun urino, al ĉiu puŝis tion sub la nazon, ke ankaŭ tiu urinu kaj lasu sian urinon kontroli, ĉar de tia kontrolo dependas la feliĉo de la homo, de lia familio, kaj estas tio ankaŭ malmultekosta, kostas tio ses kronojn. Ĉiuj, kiuj iradis en tiun bierkranejon kaj ankaŭ la gastejestro kaj la gastejstrino lasis al si sian urinon analizi, nur tiu oficisteto ankoraŭ obstinis, kvankam tiu sinjoro senĉese lin sekvis en pisejon kaj kiam tiu oficisteto eliris, li ĉiam diris al li zorgeme: 'Mi ne scias, sinjoro Skorkovský, tiu via urino iel al mi ne plaĉas, urinu en boteleton pli frue, ol estos malfrue!' Fine li lin persvadis. La oficisteton kostis tio ses kronojn kaj tiu sinjoro maldolĉigis al li la analizon kiel decas, kiel li faris tion jam al tiuj ĉiuj en la bierkranejo, ne esceptante eĉ la gastejstron, al kiu li detru-

is la negocon, ĉar tian analizon li ĉiam akompanis per paroloj, ke tio estas tre serioza kazo, ke oni trinku nenion krom akvo, ne fumu, ne edziĝu kaj manĝu nur legomon. Tiu oficisteto same kiel ĉiuj sentis kontraŭ li teruran koleron kaj elektis al si la domzorgiston kiel instrumenton de sia venĝo, ĉar li konis la domzorgiston kiel krudulon. Foje li do diras al tiu sinjoro, kiu faris analizon de urino, ke la domzorgisto jam certan tempon ne sentas sin esti sana kaj ke li petas, ke tiu sinjoro venu al li morgaŭ matene je la sepa horo por urino, ke li lasos ĝin al si analizi. Kaj li tien iris. La domzorgisto ankoraŭ dormis, kiam tiu sinjoro lin vekis kaj amike al li diris: 'Mian komplimenton, sinjoro Málek, mi deziras bonan matenon. Ĉi tie, mi petas, boteleto, bonvolu urini kaj mi ricevos ses kronojn'. Sed poste tio estis vera dia plago, kiel tiu domzorgisto en kalsono elsaltis el la lito, kiel kaptis tiun sinjoron ĉe la kolo kaj kiel ĵetegis lin kontraŭ ŝranko, ĝis li lin tien enpremegis! Kiam li eltiris lin el la ŝranko, li kaptis skurĝon kaj en kalsono jam pelis lin suben tra Čelakovský-strato kaj tiu sinjoro jelpis, kvazaŭ oni surtretus la voston al hundo, en Havlíček-avenuo saltis en tramon kaj la domzorgiston kaptis policisto, batiĝis kun li, kaj ĉar la domzorgisto estis en kalsono kaj ĉio elŝoviĝis al li eksteren, oni ĵetis lin pro tia indignigo en korbĉaron kaj forveturigis al policejo, kaj li ankoraŭ el la korbĉaro kriegis kiel uro: 'Kanajloj, mi montros al vi, analizi mian urinon.' Li sidis ses monatojn pro publika perforto kaj ofendo al la gardistaro kaj poste post proklamo de la verdikto li kulpiĝis per ofendo al la imperiestra domo, li do sidas eble ĝis nun, kaj tial mi diras, ke se oni volas al iu venĝi, pagas por tio senkulpa homo."

Baloun intertempe pene pri io meditis, ĝis fine li deman-

dis la ĉefserĝenton-kontiston Vanĉk kun timo: "Mi petas, sinjoro ĉefserĝento-kontisto, ĉu vi do opinias, ke sekve de tiu milito kontraŭ Italio ni ricevos pli malgrandajn porciojn?"

"Tio estas klara kiel tago," respondis Vanĉk.

"Jesuo Maria," ekkriis Baloun, klinis la kapon inter manplatojn kaj senbrue sidis en angulo.

Per tio en tiu ĉi vagono definitive finiĝis la interparolo pri Italio.

\*

La interparolo pri la nova milita situacio estiĝinta per interveno de Italio en la militon estus en la stabvagono certe tre enuiga, kiam ĉi tie jam ne estis fama soldata teoriulo, la kadeto Biegler, se iel ne anstataŭs lin leŭtenanto Dub de la tria kompanio.

La leŭtenanto Dub estis civile profesoro de la ĉeĥa lingvo kaj jam en tiu tempo li montris neordinaran inklinon al tio, ke ĉie, kie tio nur eblis, li povu esprimi sian lojalecon. En skribekzamenoj li prezentis al siaj lernantoj temojn el la historio de la Habsburga genero. En pli malaltaj klasoj teruris lernantojn la imperiestro Maksmiliano, kiu surgrimpis rokon<sup>28</sup> kaj ne povis descendi malsupren, Jozefo la dua kiel pluganto<sup>29</sup> kaj Ferdinando la Bonfaranto<sup>30</sup>. En pli altaj klasoj estis tiuj temoj kompreneble pli komplikaj, kiel ekzemple la tasko por lernantoj de la sepa klaso: "La imperiestro Francisko Jozefo la unua, la subtenanto de sciencoj kaj arto"; tiu ĉi tasko alpor-

28 la imperiestron (1493-1519) oni prezentis kiel pasian ĉasiston de ĉamoj en Alpoj

29 Jozefo la dua estis en lernolibroj prezentata kiel amiko de la popolo, substrekanta la signifon de manlaboroj, precipe agrikulturaj

30 mensmalsana aŭstra imperiestro, kiu regis en la jaroj 1835-1848

tis al ia lernanto de la sepa klaso eksigon el ĉiuj mezlernejoj de la aŭstri-hungara regno, ĉar li skribis, ke la plej bela faro de tiu ĉi monarko estis tio, ke li fondis ponton de imperiestro Francisko Jozefo la unua en Prago.

Li ĉiam tre zorgis, ke ĉe la imperiestra naskiĝtago kaj aliaj similaj imperiestraj solenaĵoj ĉiuj liaj lernantoj entuziasme kantu la aŭstran himnon. Inter homoj li estis neŝatata, ĉar certis pri li, ke li ankaŭ denuncas siajn kolegojn. En la urbo, kie li instruis, li estis unu el triumviraro de la plej grandaj idiotoj kaj sensprituloj, kiun formis li, distriktestro kaj direktoro de gimnazio. En tiu ĉi nemultnombra rondeto li ellernis politikajn en la kadro de la aŭstri-hungara monarkio. Ankaŭ nun li komencis saĝumi per voĉo kaj akcento de mense rigidiĝinta profesoro:

”Ĝenerale dirite, min tute ne surprizas la faro de Italio. Mi atendis tion jam antaŭ tri monatoj. Certas, ke en la lasta tempo Italio tre fieriĝis sekve de la venka milito kontraŭ Turkio pro Tripolo<sup>31</sup>. Krom tio ĝi tro fidus sian ŝiparon kaj humoron de la loĝantaro en niaj ĉemaraj landoj kaj en suda Tirolo. Ankoraŭ antaŭ la milito mi parolis pri tio kun nia distriktestro, ke nia registaro ne subtaksu la iredentan movadon en la sudo. Ankaŭ li plene kun mi konsentis, ĉar ĉiu antaŭvida homo, por kiu gravas konservi tiun ĉi monarkion, devis jam antaŭlonge supozi, kien ni venus ĉe troa kompato al tiaj elementoj. Mi memoras bone, ke proksimume antaŭ du jaroj mi proklamis en interparolo kun sinjoro distriktestro, estis tio en la tempo de la balkana milito<sup>32</sup> ĉe la afero de nia konsulo Procházka,

31 en la jaroj 1911 kaj 1912

32 en la jaro 1912 balkanaj ŝtatoj batalis kune kontraŭ Turkio kaj en la jaro 1913 ili denove kune, ĉi-foje ankaŭ kun Turkio, atakis Bulgarion



ke Italio atendas la plej proksimam okazon por perfide nin ataki.

Kaj nun ni tion havas!” li ekkriis per tia voĉo, kvazaŭ ĉiuj kun li disputus, kvankam ĉiuj ĉeestantaj aktivaj oficiroj ĉe lia parolo pensis, ke tiu civilulo-babilulo surgrimpu al ili la dorson.

”Estas vero,” li daŭrigis jam per pli milda tono, ”ke en plejparto da okazoj eĉ en lernejoj oni forgesis nian iaman rilaton al Italio, tiujn grandajn tagojn de gloroj, venkaj armeoj en la jaroj 1848 kaj 1866, pri kiuj oni parolas en la hodiaŭaj ordonoj de la brigado. Sed mi ĉiam plenumis mian devon kaj ankoraŭ antaŭ fino de la lerneja jaro, preskaŭ ĉe komenco de la milito, mi donis al miaj lernantoj skriban taskon: ’Niaj herooj en Italio de Vicenza ĝis Custozza, aŭ...’ ”

Kaj la idiota leŭtenanto Dub solene aldonis: ”...Sangon kaj vivon por Habsburgoj! Por la tuta, unueca, granda Aŭstrio!”...

Li silentiĝis kaj ŝajne atendis, ke ankaŭ la ceteraj en la stabvagono parolos pri la nove estiĝinta situacio kaj li ankoraŭfoje al ili pruvos, ke li sciis tion jam antaŭ kvin jaroj, kiel Italio foje kondutos al sia aliancano. Sed li tute seniluziiĝis, ĉar la kapitano Sagner, al kiu la bataliona kuriero Matuŝič alportis el la stacidomo vesperan eldonon de ’Pester Lloyd’, diris, rigardante en la ĵurnalon: ”Jen vidu, tiu aktorino Weiner, kiun ni vidis gaste ludi en Bruck, ludis ĉi tie hieraŭ sur sceno de la Malgranda teatro.”

Per tio en la stabvagono finiĝis la interparolo pri Italio...

\*

Krom tiuj, kiuj sidis malantaŭe, la bataliona kuriero Matuŝič kaj la servosoldato de la kapitano Sagner Batzer rigardis la

militon kontraŭ Italio el pure praktika vidpunkto, ĉar iam antaŭ longaj jaroj, ankoraŭ dum la aktiva soldatservo, ambaŭ partoprenis manovrojn en suda Tirolo.

”Tio estos peno grimpi sur tiujn montetojn,” diris Batzer, ”la kapitano Ságner havas kvanton da kofroj. Mi devenas de montaro, sed tio estas io tute alia, se la homo prenas fusilon sub mantelon kaj iras elserĉi ian leporon en la bienaro de la princo Schwarzenberg.”

”Scie, se oni ĵetos nin suben en Italion. Al mi tio ankaŭ ne plaĉus, kuregi trans montetojn kaj glaciblokojn kun ordonoj. Krom tio tiu voraĵo tie sube, nur polento kaj oleo,” diris Matuŝič malgaje.

”Kaj kial oni ne puŝus nin ĝuste en tiun montaron,” eksci-tiĝis Batzer, ”nia regimento estis jam en Serbio, Karpatoj, mi jam trenis kofrojn de sinjoro kapitano trans montojn, jam dufoje mi ilin perdis; foje en Serbio, la alian fojon en Karpatoj, en tia ĥaoso, kaj povas esti, ke la trian fojon atendas min tio ĉe la itala limo, kaj koncerne la voraĵon tie sube...” Li forkraĉis. Li alsidiĝis intime pli proksimen al Matuŝič: ”Ĉu vi scias, ke ĉe ni en Kašperské Hory ni preparas tiajn etajn kned-buletojn el dispremitaj nekuiritaj terpomoj, tiujn oni kuiras, trempas en diskirlita ovo, surŝutas per raspita bulko kaj poste rostas sur lardo.” La lastan vorton li diris per mistere solena voĉo.

”Kaj la plej bongustaj ili estas kun saŭkraŭto,” li aldonis melankolie, ”makaronioj kompare kun ili konvenas por latri-no.”

Per tio ankaŭ ĉi tie finiĝis la interparolo pri Italio...

\*

Ĉar la trajno staris en la fervoja stacio jam pli ol du horojn, en la ceteraj vagonoj oni diris unuvoĉe, ke la trajnon oni ŝajne turnos kaj sendos al Italio.

Tion atestis ankaŭ la fakto, ke intertempe okazis strangaj aferoj koncerne la trajnon. Oni denove elpelis la viraron el vagonoj, venis sanitara inspektantaro kun desinfekta korpuso kaj ĉiujn vagoninternaĵojn surŝprucigis per krezolo, kio estis akceptita, ĉefe en vagonoj kie oni veturigis provizojn da soldatpano, kun granda malplaĉo.

Sed ordono estas ordono, sanitara komisiono eldonis ordonon desinfecti ĉiujn vagonojn de la trajno 728, tial oni tute trankvile surŝprucigis amasojn da soldatpano kaj sakojn kun rizo per krezolo. Laŭ tio ja eblis jam ekkoni, ke okazas io neordinara.

Poste oni enpelis tion ĉion reen en vagonojn kaj post duonhoron elpelis ĉion denove eksteren, ĉar la trajnon venis trigardi ege maljuna generalo, tiel ke al Ŝvejk tuj venis en la menson tute natura nomo por la maljuna sinjoro. Starante malantaŭe post la fronta vico, li rimarkis al la ĉefserĝentokontisto Vanĉk: "Tio estas ŝrumpuleto."

Kaj la maljuna generalo plu promenis antaŭ la fronta vico, akompanata de la kapitano Ságner, haltis antaŭ juna soldato por iel entuziasmigi la tutan viraron, kaj demandis lin, de kie li estas, kiom da jaroj li aĝas kaj ĉu li havas poŝhorloĝon. La soldato unu poŝhorloĝon havis, sed opiniante, ke de la maljuna sinjoro li ricevos ankoraŭ unu, li respondis, ke li havas neniun, al kio la grandaĝa ŝrumpuleto-generalo diris kun la sama idiota rideto, kiel tion faris la imperiestro Francisko Jozefo, kiam tiu ie en urboj alparolis urbestrojn: "Tiel estas bone, tiel estas bone," post kio li honorigis per alparolo apude

starantan kaporalon, kiun li demandis, ĉu lia edzino estas sana.

”Obee mi raportas,” kriegis la kaporalo, ”ke mi ne estas edziĝinta,” al kio la generalo kun sia korfavora rideto denove diris la sian: ”Tiel estas bone, tiel estas bone.”

Poste la generalo en sia maljunula reinfaniĝo petis la kapitanon Ságner, ke tiu al li montru, kiel la soldatoj mem kalkuldividas sin en parvicon, kaj jam post momento sonis: ”Unua - dua, unua - dua, unua - dua.”

Tion la generalo-ŝrumpuleto ege ŝatis. Li havis hejme eĉ du servosoldatojn, kiujn li starigis antaŭ sin kaj tiuj mem devis kalkuli: Unua - dua, unua - dua...”

Aŭstrio havis amason da tiaj generaloj.

Kiam do la parado feliĉe finiĝis, ĉe kio la generalo ne ŝparis laŭdojn antaŭ la kapitano Ságner, oni permesis al la viraro moviĝi en la limoj de la stacio, ĉar venis sciigo, ke oni veturos nur ankoraŭ post tri horoj.

La viraro do promenis ĉirkaŭe kaj gapis, ĉar en fervojaj stacioj ordinare estas sufiĉe da rigardantaro, kaj iu soldato tie aŭ alie tamen nur elalmozis al si cigaredon.

Vidiĝis, ke iama entuziasmo, respeguliĝanta en glora bonvenigado de soldatunuoj en fervojaj stacioj, jam ege malgrandiĝis kaj sinkis ĝis almozado.

Al la kapitano Ságner venis delegitaro de la ’Societo por bonvenigado de herooj’, konsistanta el du terure kadukaj damoj, kiuj transdonis donaceton apartenantan al la bataliono, nome dudek skatoletojn da bonodoraj buŝpasteloj, reklamon de budapesta sukeraĵfabriko. La skatoletoj da bonodoraj buŝpasteloj estis bele faritaj el lado, sur la kovrileto estis desegnita hungara honvedo, kiu premas la manon al aŭstra milici-

ano, kaj super ili brilas la krono de sankta Stefano. Ĉirkaŭe vidiĝis germana kaj hungara surskribo: "Por la imperiestro, Dio kaj la patrujo."

La sukeraĵfabriko estis tiel lojala, ke ĝi preferis la imperiestron antaŭ sinjoro dio.

Ĉiu skatoletio enhavis okdek pastelojn, tiel ke al ĉiuj tri viroj apartenis entute proksimume kvin pasteloj. Krom tio la zorgoelĉerpitaj, kadukaj damoj alportis grandan paketon da du presitaj preĝoj, verkitaj de budapesta ĉefepiskopo Géza de Szatmár-Budafal. Ili estis germanaj-hungaraj kaj enhavis la plej teruran malbenon al ĉiuj malamikoj. Tiuj ĉi preĝetoj estis verkitaj tiel pasie, ke ĉe la fino mankis tie nur la energia hungara: "Baszom a Kristus Marját!"

Laŭ la respektinda ĉefepiskopo la korfavora dio dishaku rusojn, anglojn, serbojn, francojn, japanojn je nudeloj kaj en paprikitan gulaŝon. La korfavora dio banu sin en la sango de la malamikoj kaj buĉu tion ĉion, kiel tion faris la krudulo Herodo al Bet-Leĥemaj infanoj.

La reverinda budapesta ĉefepiskopo uzis en siaj preĝetoj ekzemple tiujn ĉi belajn frazojn: "Dio benu viajn bajonetojn, ke ili profunde penetru en la ventron de viaj malamikoj. La plej justa Disinjoro direktu la artilerian fajron super la kapojn de malamikaj staboj. La kompatema Dio aranĝu, ke ĉiuj malamikoj sufokiĝu per sia propra sango el vundoj, kiujn vi al ili faros!"

Tial necesas ankoraŭfoje ripeti, ke al tiuj ĉi preĝetoj mankis fine nenio alia ol tiu: "Baszom a Kristus Marját!"

Kiam ambaŭ damoj ĉion tion transdonis, ili esprimis al la kapitano Ságner senesperan deziron, ĉu ili ne povus ĉeesti la disdonadon de donacetoj. Unu el ili aŭdacis eĉ menci, ke ĉe

tiu okazo ŝi povus ekparoli al la soldatoj, kiujn ŝi ne nomis alie ol "niaj bravaj feldgrizuloj"<sup>33</sup>.

Ambaŭ mienis terure ofendite, kiam la kapitano Ságner rifuzis ilian peton. La donacoj iris provizore en vagonon, en kiu estis la magazeno. La honorindaj damoj laŭiris vicon da soldatoj kaj unu el ili ne forgesis ĉe tiu okazo manfrapeti barban soldaton sur la vango. Estis tio Ŝimek el Budějovice, kiu, sciante nenion pri la nobla tasko de tiuj damoj, diris post ilia foriro al siaj kolegoj: "Tiuj publikulinoj estas ĉi tie ja arogantaj! Se tia simio aspektus almenaŭ kiel el tiu ĉi mondo, sed estas tio kiel cikonio, la homo vidas nenion krom tiuj piedaĉoj kaj mienas tio kiel ĉe martirigo de Kristo, kaj tia maljuna harpio ankoraŭ volas komenci al si ion kun soldatoj."

En la fervoja stacio estis tre vigle. La okazaĵo kun italoj kaŭzis ĉi tie certan panikon, ĉar estis retenitaj du trajnoj kun artilerio kaj senditaj en Stirion. Staris ĉi tie ankaŭ trajno kun bosnianoj, kiu pro iaj nekonataj kaŭzoj atendis ĉi tie jam du tagojn, estis tute forgesita kaj perdita. La bosnianoj jam du tagojn ne ricevis manĝon kaj iradis almozpeti panon en la budapesta Nova Urbo. Oni aŭdis ankaŭ nenion alian ol eks-cititan parolon de forgesitaj, vivece gestantaj bosnianoj, kiuj senĉese kriis: "Fikiviandion — fikivianpsikon, fikivianpanjon."

Poste la naŭdekunua infanteria regimento estis denove kunkelita kaj okupis la lokon en siaj vagonoj. Sed post momento la bataliona kuriero Matuŝič revenis de la stacia komandejo kun sciigo, ke oni veturos nur post tri horoj. Tial la denove kunvokita viraro estis ellasita el vagonoj. Tuŝapude

33 "feld": el la germana Feld = kampo, batalkampo (kp. ekz. feldmarŝalo). "Felde griza" estis ofica indiko por koloro de fronta uniformo, kiun portis aŭstraj infanterianoj (koloro de kampa grizo)

antaŭ la forveturo de la trajno eniris la stabvagonon tre eks-citita leŭtenanto Dub kaj petis la kapitanon Ságner, ke tiu senprokraste igu malliberigi Ŝvejkon. La leŭtenanto Dub, malnova konata denuncanto en sia agadejo kiel gimnazia profesoro, tre ŝatis komenci interparolojn kun soldatoj, ĉe kio li esploris ilian konvinkon kaj samtempe serĉis la okazon por instrui ilin kaj klarigi al ili, kial ili batalas, pro kio ili batalas.

Dum sia rondiro li vidis malantaŭ la stacidomo ĉe strat-lampo stari Ŝvejkon, kiu kun intereso rigardis afiŝon de bonfara milita loterio. Tiu afiŝo bildigis, kiel aŭstra soldato alpi-kas embarasitan barban kozakon al muro.

La leŭtenanto Dub ekfrapetis la ŝultron de Ŝvejk kaj demandis lin, kiel tio al li plaĉas.

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto,” respondis Ŝvejk, ”ke tio estas idiotaĵo. Mi vidis jam sufiĉe da idiotaj afiŝoj, sed tian bovaĵon mi ankoraŭ ne vidis.”

”Kio al vi en tio ne plaĉas?” demandis la leŭtenanto Dub.

”Al mi, sinjoro leŭtenanto, en tiu afiŝo ne plaĉas tio, kiel tiu soldato manipulas konfiditajn armilojn, li ja povas rompi tiun bajoneton je la muro, kaj krom tio estas tio tute superflua, oni lin pro tio punus, ĉar tiu ruso havas la manojn levitaj kaj kapitulacas. Li estas militkaptita kaj kaptitojn oni devas trakti dece, ĉar, kion fari, ankaŭ ili estas homoj.”

La leŭtenanto Dub plu esploris la pensojn de Ŝvejk kaj demandis lin: ”Vi do bedaŭras tiun rusion, ĉu?”

”Mi bedaŭras, sinjoro leŭtenanto, ambaŭ virojn, kaj tiun rusion, ĉar li estas trapikita, kaj tiun soldaton, ĉar li estus pro tio malliberigita. Li ja devis, sinjoro leŭtenanto, tiun bajoneton ĉe tio rompi, tio certas, tio ja aspektas kiel ŝtonmuro, kien li tion puŝegas, kaj ŝtalo estas facile rompebla. Foje, sinjoro

leŭtenanto, ankoraŭ antaŭ la milito, dum aktiva soldatservo ni havis ĉe la kompanio certan sinjoron leŭtenanton. Eĉ hardita soldulo ne sciis esprimi sin tiel, kiel tiu sinjoro leŭtenanto. Sur ekzercejo li ĉiam al ni diris: 'Se estas 'Atenton!', vi devas malfermegi la okulojn, kiel se virkato fekas en furaĝhakaĵon.' Sed alie li estas tre bonkora homo. Foje ĉe la Kristnasko li ricevis frenezan ideon, aĉetis por la kompanio la tutan veturilon da kokosoj, kaj de tiu tempo mi scias, kiel rompiĝemaj estas bajonetoj. Duono da kompanio rompis siajn bajonetojn je tiuj kokosoj kaj nia subkolonelo igis la tutan kompanion malliberigi, tri monatojn ni havis malpermeson forlasi la kazernon, sinjoro leŭtenanto devis restadi en sia loĝejo..."

Koleriĝinta leŭtenanto Dub ekrigardis la senzorgan vizaĝon de la brava soldato Ŝvejk kaj ekscitite lin demandis: "Ĉu vi min konas?"

"Mi konas vin, sinjoro leŭtenanto."

La leŭtenanto Dub ekrulis la okulojn kaj piedfrapis: "Mi diras al vi, ke vi min ankoraŭ ne konas."

Ŝvejk respondis denove kun tiu senzorga trankvilo, kvazaŭ li anoncus raporton: "Mi konas vin, sinjoro leŭtenanto, vi apartenas, obee mi raportas, al nia marŝbataliono."

"Vi min ankoraŭ ne konas," kriis la leŭtenanto Dub denove, "vi konas min eble de tiu bona flanko, sed kiam vi min ekkonos de tiu malbona flanko! Mi estas malbonkora, ne opiniu, mi aldevigos ĉiun ĝis ploro. Do, ĉu vi min konas, aŭ vi min ne konas?"

"Mi konas vin, sinjoro leŭtenanto."

"Mi diras al vi la lastan fojon, ke vi min ne konas, azeno. Ĉu vi havas fratojn?"



”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke mi havas unu fraton.”

Rigardante la trankvilan, senzorgan vizaĝon de Ŝvejk, la leŭtenanto Dub furioziĝis, kaj ne regante sin plu, ekvokis: ”Tiu via frato estas ŝajne ankaŭ tia bruto kiel vi. Kio li estis?”

”Profesoro, sinjoro leŭtenanto. Li ankaŭ soldatservis kaj plenumis la oficiran ekzamenon.”

La leŭtenanto Dub ekrigardis Ŝvejkon, kvazaŭ li volus lin trapiki. Ŝvejk kun digna pripenso eltenis la malbonkoran rigardon de la leŭtenanto Dub, tiel ke la tuta interparolo inter li kaj la leŭtenanto provizore finiĝis per la vorto: ”Formarŝi!”

Ĉiu iris sian vojon kaj ĉiu pensis la sian.

La leŭtenanto Dub pensis pri Ŝvejk, ke li diros al sinjoro kapitano, ke tiu igu lin malliberigi, kaj Ŝvejk pensis, ke li vidis jam multe da idiotaj oficiroj, sed tia, kia estas la leŭtenanto Dub, estas ĉe la regimento tamen nur raraĵo.

La leŭtenanto Dub, kiu precipe hodiaŭ ekintencis, ke li devas eduki soldatojn, trovis malantaŭ la stacidono novan viktimon. Estis tio du soldatoj de la regimento, sed de alia kompanio, kiuj tie en mallumo marĉandis per kripligita germanlingvo kun du ĉiesulinoj, vagantaj po tutaj dekduoj ĉirkaŭ la stacidomo.

La malproksimiĝanta Ŝvejk aŭdis ankoraŭ tute klaran, akran voĉon de la leŭtenanto Dub: ”Ĉu vi min konas?!...

Sed mi diras al vi, ke vi min ne konas!...

Sed kiam vi min ekkonos!...

Vi konas min eble de tiu bona flanko!...

Mi diras al vi, kiam vi min ekkonos de tiu malbona flanko!...

Mi aldevigos vin ĝis ploro, azenoj!...

Ĉu vi havas fratojn?...

Tiuj estas ŝajne ankaŭ tiaj brutoj kiel vi!... Kio ili estis?... Ke ĉe la trajnotrupo?... Nu bone... Memoru, ke vi estas soldatoj... Ĉu vi estas ĉeĥoj?... Ĉu vi scias, ke Palacký diris, ke se ne ekzistus Aŭstrio, ni devus ĝin krei<sup>34</sup>... Formarŝi...!”

Sed entute la rondiro de la leŭtenanto Dub ne havis pozitivan rezulton. Li haltigis ankoraŭ proksimume tri grupojn da soldatoj kaj lia eduka klopodo ”aldevigi ĝis ploro” tute fiaskis. Estis tio tia homa materialo, forveturigata sur batalkampon, ke en la okuloj de ĉiu unuopulo la leŭtenanto Dub vidis, ke ĉiuj pensas pri li ion certe tre malagrablan. Lia fiereco estis ofendita kaj la rezulto de tio estis, ke antaŭ forveturo de la trajno li petis la kapitanon Ságner en la stabvagono, ke Ŝvejk estu malliberigita. Li parolis ĉe tio, motivante la neceson izoli la bravan soldaton Ŝvejk, pri tre stranga, aroganta konduto, ĉe kio sincerajn respondojn de Ŝvejk al sia lasta demando li nomis melicaj rimarkoj. Se tio tiel ĉi daŭrigus, la oficiraro perdus en la okuloj de la viraro ĉian estimon, pri kio dubas certe neniu el sinjoroj oficiroj. Li mem ankoraŭ antaŭ la milito parolis pri tio kun sinjoro distriktestro, ke ĉiu superulo devas zorgi konservi super siaj subuloj certan aŭtoritaton.

Sinjoro distriktestro havis la saman opinion. Precipe nun en la milito, ju pli la homo proksimiĝas al la malamiko, des

34 la historiisto kaj politikisto Francisko Palacký pledis por tio, ke Aŭstri-Hungario ŝanĝiĝu al federacia ŝtato. Laŭ lia konvinko unuopaj nacioj (ĉeĥoj, aŭstroj, hungaroj, poloj ktp.) povas ekzisti nur en la kadro de la potenca Aŭstri-Hungario, kaj de tie devenas lia eldiro: ”Se ne ekzistus Aŭstrio (=Aŭstri-Hungario), ni (=ĉeĥoj) devus ĝin krei.” Sed pli poste li konvinkiĝis, ke tiu ideo estas erara, kaj diris: ”Ni (=ĉeĥoj) estis tie antaŭ Aŭstrio (=ni ekzistis antaŭ Aŭstri-Hungario), ni estos ankaŭ post ĝi” (=se ĝi ne ekzistos)

pli necesas teni la soldatojn en certa teruro. Tial li do petas, ke Ŝvejk estu punita laŭ la disciplina ordo.

La kapitano Ságner, kiu kiel aktiva oficiro malamis ĉiujn rezervajn oficirojn de diversaj civilaj okupoj, atentigis la leŭtenanton Dub, ke similajn anoncojn oni povas fari sole en formo de raporto, kaj ne per tia stranga legomvendista maniero, kiel se oni marĉandas pri la prezo de terpomoj. Kio koncernas Ŝvejkon mem, la unua instanco, al kies povo estas Ŝvejk submetita, estas sinjoro ĉefleŭtenanto Lukáš. Pri tia afero oni decidas sole pere de raporto. De kompanio iras tia afero al bataliono, kaj tion sinjoro leŭtenanto eble scias. Se Ŝvejk per io kulpiĝis, li venos al kompania raporto, kaj se li apelacios, al bataliona raporto. Sed se sinjoro ĉefleŭtenanto Lukáš deziras kaj konsideras la rakontadon de sinjoro leŭtenanto Dub kiel oficialan anoncon por puni Ŝvejkon, li, la kapitano Ságner, havas nenion kontraŭ tio, ke Ŝvejk estu alkondukita kaj ekzamenita.

La ĉefleŭtenanto Lukáš havis kontraŭ tio nenion, li rimarkis nur, ke laŭ la rakontado de Ŝvejk li mem scias tre bone, ke la frato de Ŝvejk vere estis profesoro kaj rezerva oficiro.

La leŭtenanto Dub ekhezitis kaj diris, ke li petis puni Ŝvejkon nur en larĝa senco de la vorto kaj povas esti, ke la preparolata Ŝvejk ne kapablas ĝuste sin esprimi kaj tiel liaj respondoj vekas impreson de aroganteco, malico kaj malestimo al la superuloj. Krom tio, laŭ la tuta mieno de la preparolata Ŝvejk vidiĝas, ke li estas mense malforta.

Per tio la ŝtormo propre transflugis la kapon de Ŝvejk sen tio, ke la tondro ekbatus.

En vagono, kie estis bataliona kancelario kaj magazeno, ĉefserĝento-kontisto de la infanteria bataliono Bautanzel tre

korfavore dividis al du batalionaj skribistoj po plenmano da buŝpasteloj el skatoletoj, kiuj estis disdonendaj al la soldatoj de la bataliono. Tio estis kutima afero, ke ĉio, kio estis destinita por la viraro, devis submetiĝi al manipulado en bataliona kancelario same kiel la malfeliĉaj pasteloj.

Tio estis en la milito ĉie tiel kutima, ke se inspektantoj ie trovis, ke oni ne ŝtelas, ĉiu el tiuj ĉefserĝentoj-kontistoj en ĉiuj eblaj kancelarioj estis tamen nur en suspekto, ke li transpaŝas la budĝeteton kaj faras iajn aliajn friponaĵojn, por ke ĉio estu en ŝajna akordo.

Tial ĉi tie, kiam ĉiuj ŝtopis sin per la pasteloj por uzi almenaŭ tiun ĉi aĉaĵon, se oni havis nenion alian, je kio eblus la viraron priŝteli, Bautanzel ekparolis pri malgajiga situacio sur tiu ĉi vojo: "Mi spertis jam du marŝojn kun batalionoj, sed tiel mizeran vojaĝon kiel nun ni ne faris. Ho, antaŭ ol ni tiam alveturis al Prešov, ni havis amasojn da ĉio, kio povas al la homo veni en la menson. Mi havis kaŝita dek mil cigaredojn Memphis, du bulpecojn da ementala fromaĝo, tricent konservaĵojn, kaj poste, kiam oni jam marŝis al Bardejov en tranĉeojn kaj la rusoj de Muszyna interrompis la kontakton al Prešov, tio estis negocado! Mi transdonis el ĉi tio afekte dekan parton por la bataliono, ŝajnigante ke mi tion ŝparkolektis, kaj ĉion tion ceteran mi disvendis ĉe la trajnotrupo. Ni havis ĉe ni majoron Sojka, kaj tiu estis vera bestio. Li ne estis heroo kaj pleje li preferis vagi ĉe ni ĉe la trajnotrupo, ĉar tie supre fajfis kugletoj kaj krevis ŝrapneloj. Kaj tiel li ĉiam venis al ni sub preteksto, ke li devas konvinkiĝi, ĉu oni kuiras por la viraro de la bataliono, kiel necesas. Kutime li venis al ni suben, kiam venis sciigo, ke rusoj denove ion preparas; li tremis per la tuta korpo, en la kuirejo li devis eltrinki rumon

kaj nur poste li faris kontrolon en ĉiuj militkuirejoj, kiuj staris ĉirkaŭ la trajnotrupo, ĉar supren al pozicioj ne eblis iri kaj la manĝon oni portis supren nokte. Ni estis tiam en tiaj cirkonstancoj, ke pri oficira kuirejo ne eblis eĉ paroli. Unu vojjon, kiu estis ankoraŭ libera al la ariero, okupis germanoj, kiuj retenis ĉion, kion pli kvalitan oni sendis al ni el la ariero kaj forvoris tion mem, tiel ke por ni restis nenio; ni ĉiuj ĉe la trajnotrupo restis sen oficira manĝo. Dum tiu tuta tempo mi ne sukcesis ŝpari por ni en la kancelario ion pli ol unu porketon, kiun ni igis fumaĵi, kaj por ke la majoro Sojka tion ne malkovru, ni havis ĝin kaŝita ĉe artilerio, unu horon de ni, kie mi havis konatan kanonieron. Do, tiu majoro, kiam li venis al ni, ĉiam komencis gustumi supon en la kuirejo. Estas vero, oni ne povis kuiri multe da viando, nur tiom, kiom da porkoj aŭ malgrasaj bovinoj oni havigis en la ĉirkaŭaĵo. Ĉe tio ankoraŭ Prusoj faris al ni grandan konkurencon kaj ĉe rekvizicio pagis por la brutaro duoble tiom kiom ni. Dum la tuta tempo, kiam ni staris ĉe Bardejov, mi ŝparis ĉe aĉeto de brutaro nur iom pli ol mil ducent kronojn, kaj ĉe tio ni ankoraŭ anstataŭ mono plejparte donis biletojn kun stampilo de la bataliono, precipe en la lasta tempo, kiam ni sciis, ke rusoj oriente de ni estas en Radvaň kaj okcidente en Podolíneĉ. La plej malfacile oni kunlaboras kun tia nacio, kia estas tie, kiu ne scias legi kaj skribi kaj subskribas sin nur per tri krucetoj; pri tio nia intendanto tre bone sciis, tiel ke kiam ni sendis al la intendanto por mono, mi ne povis aldone almeti falsitajn kvitancojn, ke mi elpagis al ili monon, tion oni povas fari nur tie, kie la nacio estas pli klera kaj scias sin subskribi. Kaj krom tio, kiel mi jam diras, Prusoj nin superpagis kaj pagis kontante, kaj kiam ni ien venis, oni rigardis nin kiel rabistojn, kaj al tio la

intendantaro ankoraŭ eldonis ordonon, ke kvitancojn subskribitajn per krucetoj oni transdonas al fronta kontista kontrolo. Kaj tiuj kontrolistaj uloj svarmis ĉie. Venis tia ulo, satvoris ĉe ni kaj sattrinkis, kaj la sekvantan tagon iris nin denunci. Tiu majoro Sojka senĉese ĉirkaŭiris kuirejojn, kaj foje, mi ĵuras je mia animo, kredu min, li eltiris el kaldrono viandon por la tuta kvara kompo. Li komencis per porka kapo, pri tiu li diris, ke ĝi ne estas finkuirita, li lasis ĝin do ankoraŭ momenton kuiri; estas vero, tiam oni ne kuiris multe da viando, por la tuta kompanio estis tio proksimume dek du porcioj de iama grandeco, sed li ĉion tion formanĝis, poste gustumis supon kaj komencis krii, ke tio estas kiel akvo, kia ordo tio estas, vianda supo sen viando, li igis doni en ĝin farunrostaĵon kaj ĵetis en ĝin miajn lastajn makaroniojn, kiujn mi ŝparkolektis dum tiu tuta tempo. Sed tio min ne ĉagrenis tiom kiom tio, ke por tiu farunrostaĵo forkonsumiĝis du kilogramoj da fajna butero, kiujn mi ŝparkolektis ankoraŭ en la tempo, kiam ekzistis oficira kuirejo. Mi havis ĝin sur breto super la lito, li min alkriegis, laŭdire al kiu tio apartenas. Tiam mi al li diris, ke en akordo kun la budĝeteto por nutrado de soldatoj laŭ la lasta ordono de la divizio apartenas al unuopa soldato kiel plibonigo dek kvin gramoj da butero aŭ dudek unu gramoj da graso, ĉar tio ne sufiĉas, restas la provizoj da butero kuŝi tiel longe, dum oni ne povos plibonigi al la viraro per butero en la destinita kvanto. La majoro Sojka ege ekscitiĝis, komencis krii, ke mi ŝajne atendas, kiam venos rusoj kaj forprenos al ni la lastajn du kilogramojn da butero, ke tio devas tuj veni en la supon, se tiu estas sen viando. Tiel mi malgajnis la tutan provizon kaj kredu min, ke tiu majoro, kiel li aperis, alportis al mi nur malbonŝancon. Li havis la flarsen-

ton evoluiginta preskaŭ tiel, ke li tuj sciis pri ĉiuj miaj provizoj. Foje mi ŝparis je la viraro bovinan hepaton kaj ni volis ĝin al ni stufi, kiam li subite ĵetis sin sub la liton kaj elteris ĝin. Al lia kriego mi al li diris, ke tiu hepato estas destinita por enterigo, ke antaŭtagmeze konstatis tion certa hufumisto de artilerio, kiu havas veterinaran kurson. La majoro prenis soldaton de la trajnotrupo kaj poste kun tiu viro ili kuiris al si tiun hepaton supre sub rokoj en kaldronetoj, kaj tio estis ankaŭ lia sorto, ke rusoj vidis tiun fajron, pafis la majoron, la kaldrone-ton per dekokcentimetra kanonkalibro. Poste ni iris tien rigardi kaj la homo ne distingis, ĉu sur tiuj rokoj kuŝaĉas bovina hepato aŭ hepato de sinjoro majoro.”

\*

Poste venis sciigo, ke oni veturos ankoraŭ nur post kvar horoj. Ke la trakon supre ĉe Hatvan blokas trajnoj kun vunditoj. Tra la stacio ankaŭ disvastiĝis, ke ĉe Eger interpuŝiĝis sanitara trajno kun malsanuloj kaj vunditoj kaj trajno veturiganta artilerion. Ke veturas tien helptrajnoj el Budapeŝto.

Post momento laboris jam fantazio de la tuta bataliono. Oni parolis pri ducent mortintoj kaj vunditoj, pri tio, ke la interpuŝiĝo okazis intence, por ke ne malkaŝiĝu trompoj ĉe provizado de malsanuloj.

Tio donis impulson por akre kritiki nesufiĉan provizadon de la bataliono kaj ŝtelistojn en la kancelario kaj en la magazeno.

Plejparto estis konvinkita, ke la bataliona ĉefserĝento-kon-tisto Bautanzel dividas sin je ĉio duone kun oficiroj.

En la stabvagono la kapitano Ságner anoncis, ke laŭ la marŝordono ili estus jam propre ĉe la limo de Galicio. Ke jam

en Eger ili rajtis ricevi tritagan provizon da pano kaj konservaĵoj por la viraro. Al Eger estas tio ankoraŭ dek horojn trajne. Ke en Eger estas vere tiom da trajnoj kun vunditoj el la ofensivo malantaŭ Lvov, ke laŭ la telegramo ne estas en Eger eĉ unu soldatpano kaj konservaĵo. Li ricevis ordonon elpigi al ĉiu viro ses kronojn kaj sepdek du helerojn anstataŭ pano kaj konservaĵoj, kio estos plenumita ĉe elpago de soldo post naŭ tagoj, sed nur, se li ĝis tiu tempo ricevos monon de la brigado. En la kaso estas nur iom pli ol dekdu mil kronoj.

”Tio estas ja kanajlaĵo de la regimento,” diris la ĉefleŭtenanto Lukáš, ”tiel mizere ellasi nin en la mondon.”

Subleŭtenanto Wolf kaj ĉefleŭtenanto Kolář reciproke al si flustris, ke la kolonelo Schröder dum la lastaj tri semajnoj sendis al sia konto en Viena banko dek ses mil kronojn.

La ĉefleŭtenanto Kolář poste rakontis, kiel oni ŝparas. Oni ŝtelas ĉe la regimento ses mil kronojn, ŝovas en sian propran poŝon kaj kun konsekvenca logiko donas ordonon al ĉiuj militkuirejoj ŝpari por unu tago kaj viro tri gramojn da pizo.

Monate estas tio naŭdek gramoj por viro kaj en kuirejo de ĉiu kompanio devas esti ŝparita provizo de minime dek ses kilogramoj da pizo kaj tiun devas la kuiristo prezenti.

La ĉefleŭtenanto Kolář parolis kun Wolf nur ĝenerale pri certaj okazoj, kiujn li rimarkis.

Sed certis, ke tiaj okazoj superabundis en la tuta armea administrantaro. Komenciĝis tio per ĉefserĝento-kontisto ĉe ia kompatinda kompanio kaj finiĝis per hamstro kun generalaj epoletoj, kiu faris al si provizojn por la postmilita vintro.

La milito postulis bravecon ankaŭ ĉe ŝteloj.

Intendantoj amplene rigardis unu la alian, kvazaŭ ili volus diri: ”Ni estas unu korpo kaj unu animo, ni ŝtelas, kamarado,



trompas, frato, sed ni ne povas nin helpi, malfacile naĝi kontraŭ la fluo. Se ne prenos vi, prenos iu alia kaj ankoraŭ pri vi diros, ke vi jam ne ŝtelas tial, ĉar vi hamstris al vi da tio jam sufiĉe.”

La vagonon enpaŝis sinjoro kun ruĝaj kaj oraj galonoj. Estis tio denove unu el generaloj, veturantaj tra ĉiuj trakoj cele de inspekto.

”Sidiĝu, sinjoroj,” li afable mansignis, havante ĝojon, ke li denove surprizis trupunuon, pri kiu li ne sciis, ke ĝi tie staras.

Kiam la kapitano Ságner volis doni al li raporton, li nur eksvingis la manon: ”Via trupunuo ne estas en ordo. Via trupunuo ne dormas. Via trupunuo devas jam dormi. Trupunuoj devas dormi, kiam ili staras en stacioj, kiel en la kazerno — je la naŭa horo.”

Li parolis, hakante la vortojn: ”Antaŭ la naŭa horo oni elkonduku la viraron al latrinoj malantaŭ la stacidomo — kaj poste oni iras dormi. Alie la viraro nokte malpurigos la trakon. Ĉu vi komprenas, sinjoro kapitano? Ripetu al mi tion. Aŭ ne ripetu al mi tion kaj faru tion, kiel mi deziras. Trumpeti alarmon, peli tion al latrinoj, trumpeti dormosignalon kaj dormi, kontroli, kiu ne dormas. Puni! Jes! Ĉu tio estas ĉio? La vespermanĝon disdoni je la sesa horo.”

Li parolis nun pri io en la pasinto, pri tio, kio ne okazis, kio estis iel malantaŭ ia alia angulo. Li staris ĉi tie kiel fantomo el la regno de la kvara dimensio.

”La vespermanĝon disdoni je la sesa horo,” li daŭrigis, rigardante la poŝhorloĝon, kiu montris dek minutojn post la dekunua horo nokte. ”Duonhoron post la oka alarmo, feki en latrinoj, poste iri dormi. Al vespermanĝo ĉi tie je la sesa horo

gulaŝo kun terpomoj anstataŭ dekkvin dekagramoj de ementala fromaĝo.”

Poste sekvis ordono montri batalpretecon. La kapitano Ságner denove do igis trumpeti alarmon kaj la inspekta generalo, rigardante, kiel la bataliono sin vicigas, promenis kun oficiroj kaj senĉese al ili parolis, kvazaŭ ili estus iaj idiotoj kaj ne povus tuj tion ekkompreni, ĉe kio li fingrumis montriletojn de la poŝhorloĝo: ”Do, rigardu. Duonhoron post la oka feki, duonhoron pli poste dormi. Tio tute sufiĉas. En tiu ĉi provizora tempo la viraro eĉ tiel havas lakson. Mi emfazas ĉefe la dormon. Tio refortigas por pluaj marŝoj. Dum la viraro estas en trajno, ĝi devas ripozi. Se en vagonoj ne estas sufiĉe da loko, la viraro dormas po grupetoj. Unu triono da viraro komforte ekkuaŝas en vagonoj kaj dormas de la naŭa horo ĝis noktomezo kaj la ceteraj staras kaj rigardas ĝin. Poste la unuaj satdormintoj faros la lokon por la dua triono, kiu dormas de noktomezo ĝis la tria horo matene. La tria grupo dormas de la tria ĝis la sesa horo, post sekvas veksignalo kaj la viraro sin lavas. Dum la veturo ne-mal-sup-ren-sal-ti el vagonoj! Antaŭ la trupunuon starigi patrolojn, por ke la viraro dum la veturo ne-mal-sup-ren-sal.-tu! Se al soldato rompos la piedon la malamiko...”

La generalo ekfrapetis ĉe tio sian piedon: ”...estas tio io laŭdinda, sed kripligi sin per superflua malsuprensaltado el vagonoj meze de la veturo estas puninda.

Ĉu tio do estas via bataliono?” li demandis la kapitanon Ságner, rimarkante dormemajn staturojn de soldatoj, el kiuj multaj ne povis sin reteni, kaj elŝiritaj el dormo, oscedis en la freŝa nokta aero; ”tio estas, sinjoro kapitano, oscedanta bataliono. La viraro devas iri dormi je la naŭa horo.”

La generalo stariĝis antaŭ la dekunuan kompanion, kie sur la maldekstra alo estis Ŝvejk, kiu plengorĝe oscedis kaj ĉe tio dece tenis al si la manon antaŭ la buŝo, sed el sub la mano sonis tia muĝado, ke la ĉefleŭtenanto Lukáš tremis, ke la generalo ne dediĉu al tio pli detalan atenton. Li ekpensis, ke Ŝvejk oscedas intence.

Kaj la generalo, kvazaŭ li tion sciis, turnis sin al Ŝvejk kaj alpaŝis al li: "Ĉu ĉeĥo, aŭ germano?"

"Ĉeĥo, obee mi raportas, sinjoro generalmajoro."

"Bonje," diris la generalo, kiu estis polo kaj scipovis iom ĉeĥe, "vi krziegas plengorĝe kiel bovina. Tenu la lipon, fermu la faŭkon, ne muĝju! Ĉu vi jam esti en latrina?"

"Mi ne estis, obee mi raportas, sinjoro generalmajoro."

"Kijal vi nje iri fekaĉi kun la ceteraj virjoj?"

"Obee mi raportas, sinjoro generalmajoro, dum manovroj ĉe Písek diris al ni sinjoro kolonelo Wachtl, kiam la soldatoj en la tempo de ripozo disiĝis en sekalajn kampojn, ke la soldato ne povas senĉese pensi nur pri fekado, la soldato devas mediti, kiel batali. Cetere, obee mi raportas, kion ni en latrino farus? Estas nenio, kion elpremi. Laŭ la marŝordono ni rajtis jam en kelke da stacioj ricevi vespermanĝon kaj ni ricevis nenion. Kun malplena stomako oni ne puŝu sin en latrino!"

Ŝvejk, klariginte al sinjoro generalo per simplaj vortoj la ĝeneralan situacion, ekrigardis lin tiel intime, ke la generalo eksentis peton al ĉiuj helpi. Se ekzistas jam ordono organizite marŝi al latrino, do tiu ordono devas esti per io ankaŭ interne subtenita.

"Sendu tion ĉion reen en vagonojn," diris la generalo al la kapitano Ságner; "kiel eblas, ke oni ne ricevis vespermanĝon?"

Ĉiuj trupunuoj traveturantaj tiun ĉi stacion devas ricevi vespermanĝon. Ĉi tie estas proviza stacio. Alie tio ne eblas. Ekzistas certa plano.”

La generalo diris tion kun certeco, kiu signifis, ke estas jam proksimume la dekunua horo nokte, la vespermanĝon oni rajtis ricevi je la sesa horo, kiel li jam pli frue rimarkis, tiel ke restas nenio alia ol reteni la trajnon dum nokto kaj tago ĝis la sesa horo vespere, por ke oni ricevu gulaŝon kun terpomoj.

”Ekzistas nenio pli malbona,” li diris ege serioze, ”ol ĉe transveturigado de soldataroj en la milito forgesi ilin provizi. Mia devo estas ekscii la veron, kia situacio propre regas en la kancelario de la stacia komandantaro. Ĉar, sinjoroj, en kelkaj okazoj kulpas la komandantoj de trupunuoj mem. Ĉe inspekto en la stacio Subotica sur la sudbosnia fervojlinio mi konstatis, ke ses trupunuoj ne ricevis vespermanĝon, ĉar la komandantoj de tiuj unuoj forgesis ĝin peti. Sesfoje oni kuiris en la stacio gulaŝon kun terpomoj kaj neniu ĝin petis. Oni tion elverŝis sur amasojn. Estis tio, sinjoroj, vera kontraŭfros-ta ŝirmkavo por terpomoj kun gulaŝo, kaj je tri stacioj pli malproksime soldatoj el trupunuoj, kiuj traveturis laŭlonge de tiuj amasoj da gulaŝo en Subotica, almozpetis en la stacidomo pecon da pano. Ĉi tie, kiel vi vidas, ne kulpis la armea administrantaro.”

Li plenforte eksvingis la manon: ”La komandantoj de trupunuoj ne plenumis siajn devojn. Ni iru en la kancelarion.”

Ili lin sekvis, meditante pri tio, kial ĉiuj generaloj freneziĝis.

En la stacia komandejo malkaŝiĝis, ke pri gulaŝo oni scias vere nenion. Estas vero, ekzistis decido kuir ĝin ĉi tie hodiaŭ por ĉiuj trupunuoj, kiuj traveturas, sed poste venis ordono dekalkuli en interna kalkulado pri provizado de la solda-

taroj po sepdek du heleroj pro ĉiu soldato, tiel ke ĉiu traveturanta trupunuo havas al sia bono sepdek du helerojn pro ĉiu viro, kiujn ĝi ricevos de sia intendantaro cele de elpago ĉe la plej proksima disdonado de soldo. Koncerne panon, la viraro ricevos en la stacio Watiana po duono de panbulo por ĉiu.

La komandanto de proviza trupo ne timis. Li diris al la generalo rekte en la okulojn, ke ordonoj ŝanĝas sin ĉiuhore. Iam li havas preparita manĝon por trupunuoj. Sed alveturas sanitara trajno, montras pli superan ordonon kaj estas fino, la trupunuo staras antaŭ problemo de malplenaj kaldronoj.

La generalo konsente kapjesis kaj rimarkis, ke la situacio nepre pliboniĝas, komence de la milito estis multe pli malbone. Ĉio ne funkcias tuj, al tio nepre necesas spertoj, praktiko. Teorio fakte bremsas praktikon. Ju pli longe daŭros la milito, des pli granda ordo estos en ĉio.

”Mi povas doni al vi praktikan ekzemplon,” li diris kun ega ĝuo, ke li malkaŝis ion eminentan; ”trupunuoj traveturantaj antaŭ du tagoj la stacion Hatvan ne ricevis panon, kaj vi ĝin tie morgaŭ ricevos. Ni iru nun en la stacian restoracion.”

En la stacia restoracio sinjoro generalo denove komencis paroli pri latrino kaj kiel nebele tio aspektas, se ĉie sur reloj estas kaktiformaj ekskrementoĵoj. Li manĝis ĉe tio bifstekon kaj al ĉiuj ŝajnis, ke ’kakto’ renversiĝas al li en la faŭko.

Al latrinoj li donis tian emfazon, kvazaŭ de ili dependus la venko de la monarkio.

Rilate al nove estiĝinta situacio koncerne Italion li proklamis, ke ĝuste en latrinoj de nia soldataro kuŝas nia nedubebla avantaĝo en la itala kampanjo.

La venko de Aŭstrio rampis el latrino.

Por sinjoro generalo ĉio estis ege simpla. La vojo al la milita gloro kondukis laŭ la recepto: je la sesa horo vespere la soldataro ricevos gulaŝon kun terpomoj, duonhoron post la oka ĝi kakas en latrino kaj je la naŭa iras dormi. Antaŭ tia soldataro la malamiko fuĝas kun teruro.

La generalmajoro ekpensis, ekbruligis al si fajnan cigaron kaj longe, longege rigardis la plafonon. Li rememoris, kion ankoraŭ diri, se li jam estas ĉi tie, kaj pri kio instrui la oficirojn de la trupunuoj.

”La kerno de via bataliono estas sana,” li diris subite, kiam ĉiuj atendis, ke li plu rigardos la plafonon kaj silentos, ”via etato estas en plena ordo. Tiu viro, kun kiu mi parolis, donas per sia rekteco kaj soldata konduto la plej bonajn esperojn por la tuta bataliono, ke ĝi batiĝos ĝis la lasta guto de la sango.”

Li silentiĝis kaj denove rigardis la plafonon, alpremita al seĝoapogilo, kaj poste daŭrigis en tiu ĉi pozicio, ĉe kio sole la leŭtenanto Dub sub instinkto de sia sklaveca animo rigardis kun li la plafonon: ”Sed via bataliono bezonas tion, ke ĝiaj faroj ne estu forgesitaj. Batalionoj de via brigado havas jam sian historion, en kiu via bataliono devas daŭrigi. Kaj ĝuste al vi mankas viro, kiu farus precizajn registrojn kaj verkus la historion de la bataliono. Al li devas konduki ĉiuj fadenoj, kion kiu kompanio de la bataliono faris. Tio devas esti inteligenta homo, ne bruto, ne bovino. Sinjoro kapitano, ĉe la bataliono vi devas nomumi batalionan kronikiston.”

Poste li ekrigardis survandan horloĝon, kies montriletoj memorigis al la tuta dormema kompanio, ke estas jam tempo por disiri.

La generalo havis sur la trako sian inspektan trajnon kaj petis sinjorojn, ke ili iru lin akompani al lia dormovagono.

La komandanto de la stacio ekĝemis. La generalo ne rememoris, ke li pagu por bifesteko kaj botelo da vino. Li devas pagi tion denove mem. Ĉiutage estas kelke da tiaj vizitoj. Jam tio kostis du vagonojn da fojno, kiujn li igis fortreni sur senelirejan trakon kaj kiujn li vendis al la firmao Löwenstein, la armea liveranto de fojno, kiel oni vendas sekalon sur kampo. La armeo reaĉetis de la firmao tiujn du vagonojn, sed li lasis ilin tie por ĉiu okazo plu stari. Eble li iam devos denove ilin vendi al la firmao Löwenstein.

Sed kompanse ĉiuj armeaj inspektantoj, traveturantaj tiun ĉi ĉefan stacion en Budapesto, proklamis, ke tie ĉe la komandanto de la stacio oni bone trinkas kaj manĝas.

\*

Matene la trajno ankoraŭ staris en la stacio, estis veksignalo, la soldatoj lavis sin ĉe pumpiloj el gameloj, la generalo kun sia trajno ankoraŭ ne forveturis kaj iris persone kontroli latrinojn, kien oni paŝis laŭ bataliona tagordono de la kapitano Ságner: "Po taĉmentoj sub komando de la taĉmentestroj," por ke sinjoro generalo havu ĝojon. Por ke la ĝojon havu ankaŭ la leŭtenanto Dub, la kapitano Ságner al li sciigis, ke la leŭtenanto havas hodiaŭ kontrolon.

La leŭtenanto Dub kontrolis do latrinojn.

Longa etendiĝanta latrinaro je du vicoj enprenis du taĉmentojn de unu kompanio.

Kaj nun la soldatoj bele unu apud la alia kalkansidis super fosaĵoj sen argilo, kiel hirundoj sur telegrafaj dratoj, kiam ili aŭtune sin preparas por la vojaĝo al Afriko.

Ĉe ĉiu gapis la genuoj el sub la mallevita pantalono, ĉiu havis la soldatzonon ĉirkaŭ la kolo, kvazaŭ li volus ĉiumomente sin pendumi kaj atendus ian komandon.

Sed en tio kompreneble vidiĝis fera soldata disciplino, organiziteco.

Sur la maldekstra alo sidis Ŝvejk, kiu ĉi tien almiksiĝis kaj kun intereso legis paĝopecton, elŝiritan el dio scias kia romano de Roza Jesenská<sup>35</sup>:

...i-tiea pensionato bedaŭrinde damoj  
te necertaj, veraj eble pli  
uj plejparte enfermiĝintaj en sin de perdoj  
j menuon en siajn ĉambrojn, aŭ ili  
stranga amuzo. Kaj se ili perdis t  
vis homo nur kaj sole sopiron sur es  
pliboniĝis, ĉar ŝi ne volis tiel sukcese  
ori, kiel ili mem dezirus.

estis nenio por la juna Kříčka.

Kiam li deturnis la okulojn de la paperpeceto, li senvole ekrigardis al elirejo de latrinoj kaj ekmiris. Tie en plena parado staris sinjoro generalmajoro de la hieraŭa nokto kun sia adjutanto kaj apud ili la leŭtenanto Dub, fervore ion al ili rakontante.

Ŝvejk ĉirkaŭrigardis. Ĉio plu trankvile sidis super latrina fosaĵo kaj nur suboficiroj iel rigidiĝis kaj ne moviĝis.

Ŝvejk eksentis la seriozecon de la situacio.

Li eksaltis tiel, kiel li estis, kun malsuprenlevita pantalono, kun soldatzono ĉirkaŭ la kolo, uzinte ankoraŭ en la lasta momento la paperpeceton, kaj ekkriegis: "Ĉesi! Leviĝi! Atenton! Rigardi dekstren!" Kaj li soldatsalutis. Du taĉmentoj kun mal-

35 (1863-1940), konata ĉeĥa poetino kaj verkistino



suprenlevita pantalono kaj soldatzono ĉirkaŭ la kolo leviĝis super latrina truo.

La generalmajoro afable ekridetis kaj diris: "Ripoz', daŭrigi!" Kaporalo Málek kiel unua donis ekzemplon al sia taĉmento, ke ĝi devas denove en antaŭan pozicion. Nur Ŝvejk staris kaj plu soldatsalutis, ĉar de unu flanko proksimiĝis al li minace la leŭtenanto Dub kaj de la alia flanko la generalmajoro kun rideto.

"Vin mi vidjis nokte," diris la generalmajoro al stranga pozicio de Ŝvejk, post kio la ekscitita leŭtenanto Dub turnis sin al la generalmajoro: "Obee mi raportas, sinjoro generalmajoro, tiu ulo estas mense malforta kaj oni konas lin kiel idioton, nesupereblan stultulon."

"Kion vi diras, sinjoro leŭtenanto?" ekkriegis subite la generalo al la leŭtenanto Dub kaj tondris al li, ke ĝuste male. Viro, kiu vidas sian superulon kaj scias, kio decas, kaj ranguloj, kiuj lin ne vidas kaj ignoras lin. Tio estas kiel sur batalkampoj. En la tempo de danĝero transprenas komandadon simpla soldato. Kaj ĝuste sinjoro leŭtenanto Dub mem havis devon doni komandon, kiun eldonis tiu ĉi soldato: "ĈV esi! — Leviĝi! — Atenton! Rigardi dekstren!"

"Ĉu vi purzigis vija anusa?" demandis la generalmajoro Ŝvejkon.

"Obee mi raportas, sinjoro generalmajoro, ke ĉio estas en ordo."

"Ĉu vi nje fekaĉi ankorzaŭ?"

"Obee mi raportas, sinjoro generalmajoro, ke mi finis."

"Doni do la pantaljona supren kaj starigi kaj poszte denove atenton!" Ĉar tiun 'atenton' la generalo diris iom pli laŭte, tiuj la plej proksime komencis leviĝi super latrina truo.

Sed la generalmajoro amike al ili mansignis kaj per delikata patreca tono diris: "Sed ne, ripoz', ripoz', trankvile daŭrigi."

Ŝvejk staris antaŭ la generalmajoro jam en plena parado kaj tiu ekparolis al li mallonge germane: "Estimo al la superuloj, scipovo de soldatserva reglamento kaj spiritĉeesto signifas en la soldatservo ĉion. Kaj se al tio ligiĝas ankoraŭ kuraĝo, ne ekzistas malamiko, kiun ni devis timi."

Turnante sin al la leŭtenanto Dub, li diris, fingropuŝante Ŝvejkon ĉe la ventro: "Notu: tiun ĉi viron post alveno al la fronto senprokraste rangaltigi kaj ĉe la plej proksima okazo proponi al honorigo per bronza medalo pro preciza plenumo de soldatservaj devoj kaj scipovo... Vi ja scias, kion mi jam per tio pensas... Formarŝi!"

La generalmajoro malproksimiĝis de latrinoj, kie intertempe la leŭtenanto Dub, por ke la generalmajoro tion aŭdu, donis laŭtajn ordonojn: "Unua taĉmento leviĝi! Formi kvarvicojn... Dua taĉmento..."

Ŝvejk intertempe eliris eksteren, kaj kiam li laŭiris la leŭtenanton Dub, li donis al li honoron kiel decas, sed malgraŭ tio la leŭtenanto Dub diris: "Malbone, ree kaj pli bone", kaj Ŝvejk devis soldatsaluti denove, ĉe kio li denove aŭdis: "Ĉu vi min konas? Vi min ne konas! Vi konas min de tiu bona flanko, sed kiam vi min ekkonos de tiu malbona flanko, mi aldevigos vin ĝis ploro!"

Ŝvejk fine iris al sia vagono kaj ĉe tio li pensis: Foje, kiam ni estis ankoraŭ en la kazerno en Karlín, estis tie leŭtenanto Churavý kaj tiu diris tion alie, kiam li ekscitiĝis: "Knaboj, kiam vi min vidos, memoru, ke mi estas bestio kaj ke tiu bestio mi restos, dum vi estos ĉe la kompanio."

Kiam Ŝvejk iris laŭlonge de la stabvagono, vokis al li la ĉef-

leŭtenanto Lukáš, ke li sciigu al Baloun, ke tiu rapidu kun tiu kafo kaj la laktokonservaĵon denove bone fermu, por ke ĝi ne aĉiĝu. Nome, Baloun kuiris kafon por la ĉefleŭtenanto Lukáš sur malgranda alkohola bolaparato en la vagono ĉe la ĉefserĝento-kontisto Vaněk. Kiam Ŝvejk venis por tion sciigi, li vidis, ke intertempe dum lia foresto la tuta vagono trinkas kafon.

La kafo- kaj laktokonservaĵo de la ĉefleŭtenanto Lukáš estis jam duone malplenaj kaj Baloun, sorbante kafon el sia taso, rastis per kulereto en la laktokonservaĵo, por ke li ankoraŭ plibonigu al si la kafon.

La kuiristo-okultisto Jurajda kun la ĉefserĝento-kontisto Vaněk reciproke promesis, ke kiam venos kafo- kaj laktokonservaĵoj, ke al sinjoro ĉefleŭtenanto ili tion kompensos.

Oni prezentis kafon ankaŭ al Ŝvejk, sed tiu rifuzis kaj diris al Baloun:

”Ĝuste venis ordono de la arma stabo, ke ĉiu servosoldato, kiu defraŭdis al sia oficiro lakto- kaj kafokonservaĵon, estu senprokraste dum dudek kvar horoj pendumita. Tion mi sciigas al vi de sinjoro ĉefleŭtenanto, kiu deziras tuj vidi vin kun kafo.”

La timigita Baloun elŝiris al la telegrafisto Chodounský<sup>36</sup> porcion, kiun li verŝis al li ĝuste antaŭ momento, starigis tion por ke tio ankoraŭ varmiĝu, aldonis konservitan lakton kaj impetis kun tio al la stabvagono.

Kun larĝe malfermitaj okuloj li enmanigis la kafon al la ĉefleŭtenanto Lukáš, ĉe kio lian kapon traflugis penso, ke la

36 nekonsekvenceco de la aŭtoro, ĝis nun li parolis pri telefonisto, nun pri telegrafisto Chodounský, kaj pli poste denove pri telefonisto

ĉefleŭtenanto Lukáš devas vidi en liaj okuloj, kiel li mastrumis per liaj konservaĵoj.

”Mi malfruiĝis,” li balbutis, ”ĉar mi ne povis ilin malfermi.”

”La laktokonservaĵon vi ŝajne disverŝis, ĉu?” demandis la ĉefleŭtenanto Lukáš, trinkante la kafon, ”aŭ vi voris ĝin po kuleroj kiel supon. Ĉu vi scias, kio vin atendas?”

Baloun ekĝemis kaj eklamentis: ”Mi havas tri infanojn, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto.”

”Atentu, Baloun, mi avertas vin ankoraŭfoje antaŭ via gluteemo. Ĉu Ŝvejk diris al vi nenion?”

”Dum dudek kvar horoj mi povus esti pendumita,” respondis Baloun malgaje, balancante la tutan korpon.

”Ne balanciĝu ĉi tie, stultulo,” diris la ĉefleŭtenanto Lukáš kun rideto, ”kaj bonmoriĝu. Ellasu jam el la kapo tiun voremon kaj diru al Ŝvejk, ke li ie en la stacidomo aŭ en la ĉirkaŭjo elserĉu ion bonan al manĝo. Donu al li ĉi tiun dekfloronon. Vin mi ne sendos. Vi iros nur tiam, kiam vi estos ŝtopita, ke vi preskaŭ krevos. Ĉu vi ne forvoris al mi tiun skatoleton da sardinoj? Vi diras, ke vi ne forvoris. Alportu ĝin por montri ĝin al mi!”

Baloun sciigis al Ŝvejk, ke sinjoro ĉefleŭtenanto sendas al li dekfloronon por ie en la stacio elserĉi al li ion bonan al manĝo, kun ĝemo eltiris skatoleton da sardinoj el kofreto de la ĉefleŭtenanto kaj kun sento de deprimado portis ĝin al kontrolo fare de la ĉefleŭtenanto Lukáš.

Mizerulo, li tiom ĝojis, ke la ĉefleŭtenanto Lukáš tiujn sardinojn eble jam forgesis, kaj nun estas fino al ĉio. La ĉefleŭtenanto ŝajne lasos ilin al si en la vagono kaj senigos lin je ili. Li sentis sin priŝtelita.

”Ĉi tie estas viaj sardinoj, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭ-

tenanto,” li diris amare, transdonante ilin al la posedanto. ”Ĉu mi ilin malfermu?”

”Bone, Baloun, malfermu nenion kaj forportu ilin reen sur la lokon. Mi volis nur konvinkiĝi, ĉu vi ne enrigardis internen. Kiam vi alportis kafon, ŝajnis al mi, ke vi havas la faŭkon iel grasmakula kvazaŭ de oleo. Ĉu Ŝvejk jam iris?”

”Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke li jam foriris,” diris sereniĝinta Baloun. ”Li diris, ke sinjoro ĉefleŭtenanto estos kontenta kaj ke ĉiuj al sinjoro ĉefleŭtenanto envios. Li foriris ien el la stacidomo kaj proklamis, ke li konas tion ĉi tie ĝis malantaŭ Rákospalota. Se la trajno forveturus eble sen li, ke li aliĝos al aŭtokolono kaj veturatingos nin en la plej proksima stacio aŭtomobile. Ke ni ne havu pri li zorgojn, li scias, kio estas lia devo, eĉ se li devus lui al si fiakron je siaj elspezoj kaj veturi per ĝi malantaŭ la trajno ĝis Galicio. Poste li lasos tion dekalkuli de sia soldo. Laŭdire vi nepre ne devas fari al vi pri li zorgojn, sinjoro ĉefleŭtenanto.”

”Iru for,” diris la ĉefleŭtenanto Lukáš malgaje.

El la kancelario de la komandejo oni alportis sciigon, ke oni veturos nur je la dua horo posttagmeze al Gödölö-Aszód kaj ke oficiroj en stacioj ricevos po du boteloj da ruĝa vino kaj botelon da konjako. Oni diris, ke temas pri perdita sendaĵo por la Ruĝa Kruco. Estu tiel aŭ alie, falis tio rekte el la ĉielo kaj en la stabvagono estis gaje. La konjako havis kvaliton de tri steletoj kaj la vino havis markon de Gumpoldskirchen.

Nur la ĉefleŭtenanto Lukáš estis senĉese iel embarasita. Pasis jam unu horo kaj Ŝvejk ĝis nun ne revenis. Poste ankoraŭ duonhoro kaj al la stabvagono proksimiĝis stranga procesio, kiu eliris el la kancelario de la stacia komandejo.

Antaŭe iris Ŝvejk, serioze kaj digne kiel unuaj kristanoj-martiroj, kiam oni trenis ilin en arenon.

Ambaŭflanke hungaraj honvedoj kun surmetitaj bajonetoj. Sur la maldekstra alo serĝento de la stacia komandejo kaj malantau ili virino en ruĝa krispa jupo kaj viro en botoj, kun ronda ĉapeleto kaj kontuzita okulo, kiu portis vivan, kriantan, timigitan kokinon.

Ĉio puŝiĝis en la stabvagonon, sed la serĝento hungare al-kriegis la viron kun la kokino kaj la virino, ke ili restu sube.

Ekvidinte la ĉefleŭtenanton Lukáš, Ŝvejk komencis tre signifoplene palpebrumi.

La serĝento deziris paroli kun la komandanto de la deknua marŝkompanio. La ĉefleŭtenanto Lukáš transprenis de li skribon de la stacia komandantaro, kie li legis, paliĝinte:

”Al la komandanto de la deknua marŝkompanio, marŝbataliono nro N, naŭdeknua infanteria regimento, al plua procedo.

Oni antaŭvenigas infanterianon Ŝvejk Jozefo, laŭ lia proklamo kurieron de la menciita marŝkompanio, marŝbataliono nro N, naŭdeknua infanteria regimento, pro krimo de rabo, farita kontraŭ la geedzoj István en Iszatarcza en agadsfero de la stacia komandantaro.

Kaŭzoj: La infanteriano Ŝvejk Jozefo, predinte kokinon, kurantan malantaŭ domo de la geedzoj István en Iszatarcza en agadsfero de la stacia komandantaro kaj apartenantan al la geedzoj István (en originalo eminenta kreita nova germana vorto: 'Istvan-geedzoj'), kaj estante retenita fare de la posedanto, kiu la kokinon depreni de li intencis, malhelpis tion, ekbatinte per kokino la posedanton István ĉe la dekstra oku-

lo, kaj retenita per la alvokita patrolo, li estis alkondukita al sia trupunuo, ĉe kio la kokino redonita al la posedanto.

Subskribo de la deĵoranta oficiro.”

Kiam la ĉefleŭtenanto Lukáš subskribis ateston pri akcepto de Ŝvejk, liaj genuoj ekstremis.

Ŝvejk staris tiel proksime, ke li vidis, kiel la ĉefleŭtenanto Lukáš forgesis alskribi daton.

”Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto,” ekparolis Ŝvejk, ”ke hodiaŭ estas la dudek kvaran de majo. Hieraŭ estis la dudek trian de majo, kiam Italio deklaris al ni militon. Kiel mi estis nun ekstere, oni parolas pri nenio alia.”

La honvedoj kun la serĝento foriris kaj sube restis nur la geedzoj István, kiuj senĉese volis grimpi en la vagonon.

”Se vi, sinjoro ĉefleŭtenanto, havus ĉe vi ankoraŭ kvinflorenon, ni povus tiun kokinon aĉeti. Tiu kanajlo postulas pro ĝi dek kvin florenojn, sed en tion li enkalkulas dekflorenon pro tiu sia kontuzita okulo,” diris Ŝvejk per tono de rakontanto, ”sed mi opinias, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke dek florenojn pro tia stulta okulo estas tro. Al tornisto Matějó oni forbatis en ’Ĉe la maljuna sinjorino’ la tutan makzelon kun ses dentoj pro dudek florenoj, kaj tiame la mono havis pli altan valoron ol nun. Ja eĉ Wohlschläger pendumas pro kvar florenoj<sup>37</sup>.

Iru ĉi tien,” kapsignis Ŝvejk al la viro kun kontuzita okulo kaj la kokino, ”kaj vi, aĉulino, tie restu!”

La viro eniris la vagonon. ”Li scipovas iom germane,” rimarkis Ŝvejk, ”komprenas ĉiujn insultojn kaj ankaŭ li mem scias sufiĉe bone germane insulti.”

”Do, dek florenojn,” li turnis sin al la viro, ”kvin florenojn

37 Leopoldo Wohlschläger, praga ekzekutisto en la jaroj 1888-1920

la kokino, kvin la okulo. Kvin florena kokeriki, kvin florena okulumi, ĉu interkonsentite? Ĉi tie estas stabvagono, ŝtelisto. Donu al mi la kokinon!”

Li ŝovis en manplaton de la surprizita viro dekfloronon, forprenis de li la kokinon, tordorompis al ĝi la kolon kaj poste elpuŝis lin el la vagono, metinte al li amike la manon, kiun li forte ekskuis: ”Bonan tagon, kamarado, adiaŭ, rampu al via maljunulinaĉo. Aŭ mi deĵetegos vin suben.

Vidu do, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke ĉion eblas reakordigi,” diris Ŝvejk al la ĉefleŭtenanto Lukáš, ”plej bone estas, se ĉio finiĝas sen skandalo, sen longaj ceremonioj. Nun ni kun Baloun kuiras al vi tian kokinan supon, ke oni sentos ĝin ĝis Transilvanio.”

La ĉefleŭtetanto Lukáš jam ne eltenis, elpuŝegis la kompatindan kokinon el la mano de Ŝvejk kaj poste ekkriis: ”Ĉu vi scias, Ŝvejk, kion meritas la soldato, kiu en la milita tempo prirabas pacaman loĝantaron?”

”Honoran pafekzekuton per pulvo kaj plombo,” respondis Ŝvejk solene.

”Vi, Ŝvejk, kompreneble meritas pendumilan ŝnuregon, ĉar vi komencis rabi kiel unua. Vi, ulo, mi vere ne scias, kiel vin nomi, forgesis vian ĵuron. Al mi krevos pro tio la kapo.”

Ŝvejk demande ekrigardis la ĉefleŭtenanton Lukáš kaj rapide refutis: ”Obee mi raportas, ke mi ne forgesis la ĵuron, kiun nia popolo devas plenumi en la milito. Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke mi solene ĵuris al mia la plej moŝta arkiduko kaj estro Francisko Jozefo la unua esti fidela kaj obei ankaŭ generalojn de Lia Moŝto kaj ĝenerale ĉiujn miajn superulojn kaj altrangulojn, estimi ilin kaj ŝirmi, plenumi iliajn decidojn kaj ordonojn en ĉiuj servoj, kontraŭ ĉiu malamiko,



estu tio kiu ajn, kaj kie ajn petos tion la volo de Lia Imperiestra kaj Reĝa Moŝto, sur akvo, sub akvo, sur la tero, en aero, tage eĉ nokte, en bataloj, atakoj, luktoj kaj en diversaj aliaj situacioj, ĝenerale sur ĉiu loko...”

Ŝvejk levis la kokinon de sur la tero kaj daŭrigis, starante rekte kaj rigardante en la okulojn de la ĉefleŭtenanto Lukáš, ”en ĉiu tempo kaj ĉe ĉiu okazo kuraĝe kaj brave batali, ke mi neniam forlasos miajn soldatarojn, flagojn, standardojn kaj kanonojn, neniam eĉ iomete interkompreniĝos kun la malamiko, ĉiam mi kondutos tiel, kiel tion postulas la soldatserva reglamento kaj kiel decas al obeemaj soldatoj, ke ĉi-maniere mi volas kun honoro vivi kaj morti, al kio helpu min dio. Amen. Kaj tiun kokinon, obee mi raportas, mi ne ŝtelis, mi ne rabis kaj kondutis dece, konsciante mian ĵuron.”

”Lasu tiun kokinon, bruto,” alkriegis lin la ĉefleŭtenanto Lukáš, ekbatinte Ŝvejkon per skriboj en la manon, en kiu Ŝvejk tenis la mortintinon, ”rigardu tiujn ĉi aktojn. Jen, tie ĉi vi havas tion nigro sur blanko: ’Oni antaŭvenigas infanterianon Ŝvejk Jozefo, laŭ lia proklamo kurieron de la menciita marŝkompanio... pro krimo de rabo...’ Kaj nun al mi diru, marodisto, hieno — ne, foje mi vin tamen nur mortigos, mortigos, ĉu vi komprenas — diru al mi, rabista idioto, kiel vi tiel malbonmoriĝis.”

”Obee mi raportas,” diris Ŝvejk afable, ”ke nepre povas temi pri nenio alia ol pri eraro. Kiam mi ricevis tiun vian ordonon prizorgi kaj aĉeti al vi ie ion bonan al manĝo, mi komencis mediti, kio eble estus la plej bona. Malantaŭ la stacidomo estis tute nenio, nur ĉevala salamo kaj sekigita azena viando. Mi ĉion bone pripensis, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto. Sur la batalkampo necesas havi ion nutran, por

pli bone toleri la militajn turmentojn. Kaj tial mi volis fari al vi teruran ĝojon. Mi volis kuiri al vi kokinan supon, sinjoro ĉefleŭtenanto.”

”Kokinan supon,” ripetis post li la ĉefleŭtenanto, kaptante sin je la kapo.

”Jes, kokinan supon, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, mi aĉetis cepon kaj kvin dekagramojn da vermiĉeloj. Ĉi tie, mi petas, tio ĉio estas. En tiu ĉi poŝo estas cepe kaj en la alia vermiĉeloj. Salon ni havas en la kancelario kaj pipron ankaŭ. Restis jam nenio alia ol aĉeti kokinon. Malantaŭ la stacidomo mi iris do en Iszatarczan. Estas tio propre vilaĝo, kvazaŭ eĉ ne temus pri urbo, kvankam en la unua strato estas tie skribite ’La urbo Iszatarcza’. Mi trairis unu straton kun ĝardenejoj, duan, trian, kvaran, kvinan, sesan, sepan, okan, naŭan, dekan, dekunan, ĝis ĉe la fino de dektria strato, kie malantaŭ dometo estis jam herbejoj, paŝtis sin kaj promenis aro da kokinoj. Mi iris al ili kaj elektis la plej grandan, la plej pezan, bonvolu ĝin rigardi, sinjoro ĉefleŭtenanto, ĝi estas preskaŭ nur graso, oni eĉ ne devas ĝin pripalpi kaj tuj ekkonas ĉe la unua vido, ke oni ŝutis al ĝi multe da grajno. Mi prenis ĝin do tute publike en ĉeesto de la loĝantaro, kiu hungare ion al mi kriis, tenis ĝin je la kruroj kaj demandis kelkajn homojn ĉeĥe kaj germane, al kiu tiu kokino apartenas, por ke mi povu ĝin de li aĉeti, kiam subite el tiu dometo ĉe la rando elkuras viro kun virino kaj komencas min insulti unue hungare kaj poste germane, ke en plena taglumo mi ŝtelis al li kokinon. Mi diris al li, ke li min ne alkriu, ke mi estas sendita por aĉeti ĝin al vi, kaj mi rakontis al li, kiel statas la aferoj. Kaj tiu kokino, kiel mi tenis ĝin je la kruroj, subite komencis svingi la flugilojn kaj volis elflugi, kaj kiel mi tenis ĝin nur tiel malforte en

la mano, ĝi levis al mi la manon kaj volis sidiĝi sur la nazo de sia sinjoro. Kaj li tuj komencis krii, ke mi laŭdire ekbatis lin per tiu kokino sur la faŭkon. Kaj tiu ulino jelpis kaj senĉese kriis al la kokino: 'kok, kok, kok, kok'. Sed en tiu momento iaj idiotoj, kiuj tion ne komprenis, alkondukis kontraŭ mi patrolon, honvedojn, kaj mi mem admonis ilin iri kun mi al la stacia komandantaro, por ke mia senkulpeco evidentiĝu kiel oleo super akvo. Sed kun tiu sinjoro leŭtenanto, kiu havis tie deĵoron, estis malfacila parolo, eĉ kiam mi lin petis, ke li vin demandu, ĉu estas vero, ke vi sendis min por aĉeti al vi ion bonan. Li min ankoraŭ alkriis, ke mi fermu la faŭkon, ke eĉ tiel laŭdire rigardas el miaj okuloj forta branĉo kun kvalita pendumila ŝnurego. Li estis ŝajne en tre malbona humoro, kiam li al mi diris, ke tiel graso povas esti nur soldato, kiu rabas kaj ŝtelas. En la stacio oni havas laŭdire pli da plendoj, antaŭhieraŭ ie apude perdiĝis al iu meleagro, kaj kiam mi al li diris, ke tiutempe ni estis ankoraŭ en Győr, li respondis, ke tia elturniĝo ĉe li ne valoras. Oni do sendis min al vi kaj alkriis min tie ankoraŭ apuntato, kiam mi lin ne vidis, laŭdire ĉu mi ne scias, kiun mi havas antaŭ mi. Mi diris al li, ke li estas apuntato, se li soldatus ĉe ĉasistoj, ke li estus ĉefpatrolanto kaj ĉe artilerio ĉefkanoniero."

"Ŝvejk," diris post momento la ĉefleŭtenanto Lukáš, "vi havis jam tiom da strangaj hazardoj kaj malfacilaĵoj, tiom da, kiel vi diras, 'miskomprenoj' kaj 'eraroj', ke de tiuj viaj akcidentoj helpas al vi foje eble tamen nur dika ŝnurego ĉirkaŭ la kolo en soldatkvadrato kun ĉiuj soldataj honorigoj. Ĉu vi komprenas?"

"Jes, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, kvadrato el tiel nomata 'bataliono fermita en kvadrato' konsistas el kvar,

escepte ankaŭ el tri aŭ kvin kompanioj. Ĉu vi ordonas, sinjoro ĉefleŭtenanto, meti en la supon el tiu ĉi kokino pli da vermiĉeloj, por ke ĝi estu pli densa?"

"Ŝvejk, mi ordonas al vi malaperi eĉ kun la kokino, aŭ mi ĉirkaŭbato ĝin je via kapo, idioto..."

"Laŭ la ordono, sinjoro ĉefleŭtenanto, sed celerion, obe mi raportas, mi ne trovis, karoton ankaŭ ne. Mi aldonos ter..."

Ŝvejk jam ne elparolis "pomojn" kaj elflugis eĉ kun la kokino antaŭ la stabvagonon. La ĉefleŭtenanto Lukáš eltrinkis je unu gluto vinan glason da konjako.

Ŝvejk soldatsalutis antaŭ fenestroj de la vagono kaj foriris.

\*

Baloun post feliĉe finiĝinta psika lukto ĝuste sin preparis por tamen nur malfermi la skatoleton da sardinoj de sia ĉefleŭtenanto, kiam aperis Ŝvejk kun kokino, kio vekis naturan emociion ĉe ĉiuj ĉeestantoj en la vagono, kaj ĉiuj ekrigardis lin tiel, kvazaŭ ili volus kun certeco diri: "Kie vi tion ŝtelis?"

"Mi aĉetis ĝin por sinjoro ĉefleŭtenanto," diris Ŝvejk, eltirante el poŝoj cepon kaj vermiĉelojn. "Mi volis kuiri al li el ĝi supon, sed li tiun kokinon jam ne volas, li donacis ĝin do al mi."

"Ĉu ĝi ne estis mortaĉa?" demandis suspekteme la ĉefserĝento-kontisto Vaněk.

"Mi mem tordorompis al ĝi la kolon," respondis Ŝvejk, eltirante tranĉileton el poŝo.

Baloun dankeme kaj samtempe kun sento de estimo ekrigardis Ŝvejkon kaj komencis senvorte prepari alkoholan bo-

laparaton de la ĉefleŭtenanto. Poste li prenis tasojn kaj kuris kun ili por akvo.

Al Ŝvejk proksimiĝis la telegrafisto Chodounský kaj proponis, ke li helpos ĝin al li senplumigi, ĉe kio li ekflustris al li en la orelon intiman demandon: "Ĉu estas tio malproksime de ĉi tie? Ĉu oni devas transgrimpi sur korton, aŭ estas tio en libera spaco?"

"Mi ĝin aĉetis."

"Sed silentu, ĉu tiel kondutas kamarado, ni vidis, kiel oni vin kondukis."

Sed li fervore partoprenis la senplumigadon de la kokino. Al grandaj, gloraj preparoj aliĝis ankaŭ la kuiristo-okultisto Jurajda, kiu distranĉis terpomojn kaj cepon por la supo.

La plumaro, elĵetita el la vagono, vekis la atenton de la leŭtenanto Dub, kiu ĉirkaŭiris vagonojn.

Li ekvokis internen, ke montriĝu tiu, kiu senplumigas kokinon, kaj inter la pordo aperis kontenta vizaĝo de Ŝvejk.

"Kio tio estas?" ekkriis la leŭtenanto Dub, levante de la tero fortranĉitan kokinan kapon.

"Tio estas, obee mi raportas," respondis Ŝvejk, "kapo de kokino, speco de nigraplumaj italaj kokinoj. Tiuj estas, sinjoro leŭtenanto, tre bonaj ovoportulinoj. Ili ovumas ĝis 260 ovojn jare. Bonvolu, mi petas, rigardi, kiel riĉan ovarion ĝi havis." Ŝvejk tenis intestojn kaj ceterajn internaĵojn de la kokino antaŭ la nazo de la leŭtenanto Dub.

Dub forkraĉis, foriris kaj post momento revenis:

"Por kiu estas tiu kokino?"

"Por ni, obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto. Rigardu, kiom da graso ĝi havas."

La leŭtenanto Dub foriris, murmurante: "Ni renkontiĝos ĉe Filipino<sup>38</sup>."

"Kion li diris?" turnis sin Jurajda al Ŝvejk.

"Ni interkonsentis renkontiĝon ie ĉe Filipino. Tiuj noblaj sinjoroj ordinare estas sodomianoj."

La kuiristo okultisto proklamis, ke sole estetikistoj estas samseksemaj, kio rezultas jam el la nura esenco de estetiko.

La ĉefserĝento-kontisto Vaněk poste rakontis, kiel pedagogoj en hispanaj klostroj malvirgigas infanojn.

Kaj dum akvo en kaldroneto sur la alkohola bolaparato komencis boli, Ŝvejk menciis pri tio, kiel oni konfidis kolonion da forlasitaj vienaj infanoj al edukisto kaj tiu la tutan kolonion malvirgigis.

"Nu ja, tio estas pasio, sed la plej malbona estas, kiam tio kaptas ulinojn. En Prago II. estis antaŭ jaroj du forlasitaj moŝtulinoj, eksedziniĝintaj, ĉar ili estis publikulinoj, laŭnome Mourek kaj Ŝousek, kaj tiuj foje, kiam floris ĉerizarboj en aleo ĉe Roztoky, kaptis tie vespere maljunan, centjaran, impotentan gurdiston, fortrenis lin en arbareton ĉe Roztoky kaj tie lin perfortis. Kaj kion ĉion ili al li faris! En Žižkov vivas sinjoro profesoro Aksamit kaj tiu tie fosis, serĉis tombojn de kaŭraj prahomoj<sup>39</sup> kaj kelke da ili elprenis, kaj tiuj ulinoj fortrenis lin, tiun gurdiston, en tian elfositan tombon kaj tie lin frotegis kaj misuzis. Kaj la profesoro Aksamit venis tien la sekvan-

38 Filipino (Philippi) — makedona urbo, kie en la jaro 42 a.K. Antonio kaj Oktavio venkis en la batalo kontraŭ Bruto kaj Kasio; la vortojn "Ni renkontiĝos ĉe Filipino" diris al Bruto lia malbona fantomo kelke da tagoj antaŭ la batalo. La eldiro signifas "venos la tempo de rekompenco"

39 tomboj el la epoko de la tajlita ŝtono, ĉirkaŭ la jaro 4000 a.K., kiam oni entombigadis mortintojn en kaŭra pozicio, kun la genuoj sub la mentono

tan tagon kaj vidas, ke en la tombo io kuŝas. Li eksentis ĝojon, sed estis tio la gurdisto, turmentita kaj martirigita fare de tiuj eksedziniĝintaj moŝtulinoj. Ĉie ĉirkaŭ li estis iaj lignopecetoj. Post kvin tagoj tiu gurdisto mortis kaj tiuj kanajlaj ulinoj estis ankoraŭ tiel arogantaj, ke ili partoprenis lian entombigon. Tio estas jam perverseco.”

”Ĉu vi tion salis?” turnis sin Ŝvejk al Baloun, kiu eluzis ĝeneralan intereson pri la rakontado de Ŝvejk kaj kaŝis ion en sian dorsosakon, ”montru, kion vi tie faras?”

Baloun,” diris Ŝvejk serioze, ”kion vi volas fari per tiu kokina femuro? Rigardu do. Li ŝtelis al ni la kokinan femuron por poste sekrete ĝin al si kuiri. Ĉu vi scias, Baloun, kion vi faris? Ĉu vi scias, kiel en la soldatservo oni punas tiun, kiu priŝtelis sian kamaradon sur la batalkampo? Oni alligas lin al kanontubo kaj la ulon elpafas kun obuso. Nun estas jam malfrue ĝemi. Kiam ie en la fronto ni renkontos artilerion, vi aliĝos ĉe la plej proksima ĉefkanoniero. Sed intertempe vi ekzercos pro puno. Rampu el la vagono.”

La malfeliĉa Baloun degrimpis kaj Ŝvejk, sidante inter la pordo de la vagono, komandis: ”Atenton! Ripoz’! Atenton! Rigardi dekstren! Atenton! Rigardu denove antaŭen! Ripoz’!

Nun vi faros korpomovojn surloke. Turni dekstren! Homo! Vi estas bovino. Viaj kornoj devas troviĝi tie, kie antaŭe vi havis la dekstran ŝultron. Returni! Turni dekstren! Turni maldekstren! Transverse dekstren! Ne tiel, idioto! Returni! Transverse dekstren! Nu vidu, mulo, ke tio funkcias! Transverse maldekstren! Turni maldekstren! Maldekstren! Front’! Front’, idioto! Ĉu vi ne scias, kio estas Front’? Rekte antaŭen! Turnu vin! Genuiĝi! Al la tero! Sidiĝi! Leviĝi! Sidiĝi! Al la tero! Leviĝi! Al la tero! Leviĝi! Sidiĝi! Leviĝi! Ripoz’!

Vidu do, Baloun, tio estas saniga, vi almenaŭ malsatiĝos!”  
Ĉirkaŭe komencis grupiĝi amasoj kaj ĝoje krie.

”Faru afable lokon,” kriis Ŝvejk, ”li marŝos. Atentu do, Baloun, ke mi ne devu vin revenigi. Mi ne ŝatas superflue turmenti la viraron. Do:

”Direkte al la stacidomo! Rigardu, kien mi montras. Marŝ! Taĉmento, halt! Haltu, diable, aŭ mi vin malliberigos. Taĉmento, halt! Fine, ke vi haltis, idioto. Mallongigi la paŝon! Ĉu vi ne scias, kion signifas ’mallongigi la paŝon’? Mi montros al vi tion, ke vi havos post tio bluaĵojn! Plenpaŝe! Ŝanĝi la paŝon! Surloke! Bubalo! Se mi diras ’Surloke’, vi devas levi la piedaĉojn sur la loko.”

Ĉirkaŭe estis jam almenaŭ du kompanioj.

Baloun ŝvitis, konsciis nenion kaj Ŝvejk plu komandis:

”Egalpaŝe! Taĉmento, marŝi reen!”

”Taĉmento, halt!”

”Trote!”

”Taĉmento, marŝ!”

”Paŝe!”

”Taĉmento, halt!”

”Ripoz!”

”Atenton! Direkte al la stacidomo. Trote! Halt! Turnu vin! Direkte al la vagono! Trote! Mallongigi la paŝon! Taĉmento, halt! Ripoz! Nun vi momenton ripozos. Kaj poste ni komencos denove. Ĉe bona volo ĉio iras glate.”

”Kio ĉi tie okazas?” eksonis la voĉo de la leŭtenanto Dub, kiu maltrankviliĝinte alkuris.

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto,” diris Ŝvejk, ”ke ni iom trejnas, por ke ni ne forgesu soldatekzercaĵojn kaj superflue ne maldiligentaĉu dum la altvalora tempo.”



”Degrimpu el la vagono,” ordonis la leŭtenanto Dub, ”mi havas da tio jam vere sufiĉe. Mi forkondukos vin al sinjoro bataliona komandanto.”

Kiam Ŝvejk troviĝis en la stabvagono, la ĉefleŭtetanto Lukáš foriris tra la alia elirejo el la vagono kaj paŝis al kajo.

La kapitano Ságner, kiam la leŭtenanto Dub raportis al li pri strangaj ekscesoj de la brava soldato Ŝvejk, kiel li sin esprimis, estis ĝuste en tre bona humoro, ĉar Gumpoldskirchen estis vere eminenta.

”Vi do ne volas superflue maldiligentaĉi dum la altvalora tempo,” li ekridetis signifoplene, ”Matuŝič, venu ĉi tien!”

La bataliona kuriero ricevis ordonon alvoki ĉefserĝenton Nasáklo de la dekdua kompanio, kiu estis konata kiel la plej granda tirano, kaj senprokraste havigi al Ŝvejk fusilon.

”Tiu ĉi viro,” diris la kapitano Ságner al la ĉefserĝento Nasáklo, ”ne volas superflue maldiligentaĉi dum la altvalora tempo. Kunprenu lin malantaŭ la vagonon kaj unu horon faru kun li ekzercaĵojn per fusilo. Sed sen ĉia kompatemo, senrespire. Ĉefe bele komandon post komando, pafilon teren, alceli, teren!”

”Vi vidis, Ŝvejk, ke vi ne enuos,” li diris al li ĉe foriro. Kaj jam post momento sonis malantaŭ la vagono kruda komando, kiu solene eĥis super reloj. La ĉefserĝento Nasáklo, kiu ĝuste ludis ’dudek unu’ kaj tenis la bankon, kriegis en la dian spacon: ”Pafilon teren! — Pafilon surŝultren! Pafilon teren! — Pafilon surŝultren!”

Poste tio por momento silentiĝis kaj oni aŭdis kontentan kaj pripenseman voĉon de Ŝvejk: ”Tion ĉion mi lernis antaŭ jaroj dum la aktiva soldatservo. Kiam oni komandas ’Pafilon teren!’, la fusilo staras apogita ĉe la dekstra kokso. La kol-

bopinto formas rektan linion kun la piedpintoj. La dekstra mano estas nature streĉita kaj tenas la fusilon tiel, ke la dik-fingro ĉirkaŭpremas la fusiltubon, la ceteraj fingroj devas kunpremi antaŭan parton de la kolbo, kaj se oni komandas 'Pafilon surŝultren!', la fusilo estas libere sur rimeno sur la dekstra ŝultro, per la tuba aperturo supren kaj per la fusiltubo malantaŭen..."

"Jam sufiĉe da tiu babilado," eksonis denove komando de la ĉefserĝento Nasáklo. "Atenton! Rigardi dekstren! Herrgott, kiel vi tion faras..."

"Mi estas en la pozicio 'Pafilon surŝultren' kaj ĉe 'Rigardi dekstren!' mia dekstra mano deglitas tra la rimeno suben, mi ĉirkaŭpremas la kolon de la kolbo kaj ĵetas per la kapo dekstren, al tiu 'Atenton!' mi reprenas la rimenon per la dekstra mano kaj mia kapo rigardas antaŭen al vi."

Kaj denove sonis la voĉo de la ĉefserĝento: "Pafilon porti! Pafilon teren! Pafilon porti! Pafilon surŝultren! Surmeti bajoneton! Demeti bajoneton! Bajoneton kaŝi! Al la preĝo! Fini la preĝon! Surgenuiĝi al la preĝo! Ŝargi! Pafi! Pafi transverse dekstren! La celo: stabvagono! Distanco ducent paŝojn... Prepari sin! Alceli! Pafi! Demeti pafilon! Alceli! Pafi! Alceli! Pafi! Pafilon teren! Surmetaĵo normala! Kartoĉojn kaŝi! Ripoz'!" La ĉefserĝento volvis al si cigaredon.

Ŝvejk intertempe pririgardis numeron sur la fusilo kaj ekvokis: "4268! Tian numeron havis lokomotivo en Pečky sur la dekseca trako. Oni decidis fortreni ĝin al riparejo en Lysá nad Labem, sed tio ne iris tiel glate, ĉar, sinjoro ĉefserĝento, tiu lokomotivestro, kiu havis la taskon tien ĝin fortreni, havis tre malbonan memoron por numeroj. Fervoja liniestro alvokis lin do en sian kancelarion kaj diras al li: 'Sur la dekseca trako

estas lokomotivo numero 4268. Mi scias, ke vi havas malbonan memoron por ciferoj, kaj se oni skribos al vi ian numeron sur paperon, ke vi tiun paperon perdos. Sed donu bonan atenton, se vi estas tiel memore malforta por ciferoj, kaj mi montros al vi, ke tio estas tre facila memorteni kian ajn numeron. Rigardu: la lokomotivo, kiun necesas fortreni al la riparejo en Lysá nad Labem, havas la numeron 4268. Atentudo. La unua cifero estas kvar, la dua du. Memoru do jam kvardek du, tio estas duoble du, laŭvice de la komenco kvar, dividite per du estas du kaj vi havas denove kvar kaj du, unu apud la alia. Nun ne ektimu. Kiom estas duoble kvar, ok, ĉu ne vere? Enskribu do en la memoron, ke la oko estas la lastvica cifero en la numero 4268. Restas ankoraŭ, kiam vi jam memoras, ke la unua cifero estas kvar, la dua du, la kvara ok, iel saĝe memori tiun seson, kiu iras antaŭ la oko. Kaj tio estas terure simpla. La unua cifero estas kvar, la dua du, kvar kaj du faras ses. Vi do estas jam certa, ke la dua cifero de la fino estas seso, kaj tiu vico da ciferoj jam neniam malaperos al ni el la memoro. Vi havas en la kapo fiksita la numeron 4268. Aŭ vi povas veni al la sama rezulto ankaŭ ankoraŭ pli simple...’

”

La ĉefserĝento ĉesis fumi, fiksitis larĝe malfermegitajn okulojn al Ŝvejk kaj nur ekbabilis: ”Demeti la ĉapon!”

Ŝvejk serioze daŭrigis: ”Li do komencis klarigi al li tiun pli simplan manieron, kiel memori la numeron de la lokomotivo 4268. Ok minus du estas ses. Li konas do jam sesdek ok. Ses minus du estas kvar, li konas do jam 4-68 kaj en tion tiun duon 4-2-6-8. Ne estas ankaŭ tro malfacile fari tion ankoraŭ alie, helpe de multipliko kaj divido. Oni venas ankaŭ al tia rezulto. ’Memoru’, diris tiu fervoja liniestro, ’ke duoble kvar-

dek du estas okdek kvar. La jaro havas dekdu monatojn. Oni do subtrahas okdek kvar minus dek du kaj restas sepdek du, de tio ankoraŭ dek du monatojn, tio faras sesdek, ni havas jam certa seson kaj nulon ni strekos. Ni do scias 42, 68, 4. Se ni strekis nulon, ni strekos ankaŭ tiun kvaron malantaŭe kaj tre trankvile ni havas denove 4268, la numeron de la lokomotivo, kiu apartenas en riparejon en Lysá nad Labem. Kiel mi diras, ankaŭ helpe de divido estas tio facila. Ni elkalkulas koeficienton laŭ la dogana tarifo.' Ĉu eble ne estas al vi malbone, sinjoro ĉefserĝento? Se vi deziras, mi komencos ekzemple per 'Prepari sin al salvo! Ŝargi! Alceli! Pafi!' Diable! Kial sinjoro kapitano sendis nin en sunbrilon! Mi devas iri por bran-kardo."

Kiam venis kuracisto, li konstatis, ke temas aŭ pri sunfra-po aŭ pri aktuala meningito.

Kiam la ĉefserĝento rekonsciiĝis, staris apud li Ŝvejk kaj diris: "Do, mi tion al vi finrakontos: ĉu vi opinias, sinjoro ĉef-serĝento, ke la lokomotivestro tion memoris? Li tion intermiksas kaj multiplikis tion ĉion per tri, ĉar li rememoris la Dian Triunuon, kaj la lokomotivon li ne trovis, tiu ankoraŭ staras tie sur la fervojlinio numero dek ses."

La ĉefserĝento denove fermis la okulojn.

Kaj kiam Ŝvejk revenis en sian vagonon, al la demando, kie li estis tiel longe, li respondis: "Kiu iun instruas 'Trote!', tiu faras centfoje 'Pafilon surŝultren!' " Malantaŭe en la vagono tremis Baloun. Dum la foresto de Ŝvejk, kiam parto da kokino jam kuirigis, li forvoris duonon de lia porcio.

\*

Antaŭ forveturo de la trajno atingis la batalionon soldata trajno kun diversaj intermiksitaj trupunuoj. Estis tio malfruiĝintoj aŭ soldatoj el hospitaloj, veturantaj post siaj trupoj, kaj ankaŭ aliaj suspektaj individuoj, revenantaj el oficaĵoj vojaĝoj aŭ malliberejoj.

El tiu ĉi trajno eliris ankaŭ la unujara volontulo Marek, kiu estis antaŭ tempo akuzita pro ribelo, ke li ne volis purigi latrinojn, sed la divizia tribunalo lin liberigis, la enketado kontraŭ li estis ĉesigita, kaj tial la unujara volontulo Marek aperis nun en la stabvagono por anonci sin al komandanto de la bataliono. Scie, la unujara volontulo apartenis ĝis nun nenien, ĉar oni kondukis lin de unu malliberejo en la alian.

Ekvidinte la unujaran volontulon kaj akceptinte de li aktojn koncernantajn lian alvenon kun tre sekreta noto: "Politike suspekta! Atenton!", la kapitano Ságner ne estis tro ĝojigita kaj feliĉe li rememoris la "latrinan generalon", kiu tiel interese rekomendis kompletigi la batalionon per "bataliona kronikisto".

"Vi, unujara volotulo, estas tre neglektema," li diris al li, "en la lernejo por unujaraj volontuloj vi estis vera plago, anstataŭ tio, ke vi klopodu eminentiĝi kaj gajni la rangon, kiu al vi ĉe via inteligenteco apartenas, vi vagis de unu malliberejo en la alian. La regimento devas pro vi honti, unujara volontulo. Sed vi povas nuligi vian eraron, se per laŭorda plenumado de viaj devoj vi denove troviĝos en vicoj de bravaj soldatoj. Dediĉu viajn fortojn al la bataliono kun amo. Mi provos tion kun vi. Vi estas inteligenta juna viro kaj havas certe ankaŭ la kapablon verki, stiligi. Ion mi al vi diros. Ĉiu bataliono bezonas en la fronto viron, kiu registrus kronologian traigardon de ĉiuj militaj okazaĵoj, rekte koncernantaj al la fa-

roj de la bataliono sur la milita kampo. Necesas priskribi ĉiujn venkajn militirojn, ĉiujn gravajn glorajn momentojn, kiujn la bataliono partoprenas, en kiuj ĝi ludas ĉefan kaj eminentan rolon, iom post iom verki kontribuajn al la historio de la armeo. Ĉu vi min komprenas?”

”Obee mi raportas, jes, sinjoro kapitano, temas pri epizodoj el la vivo de ĉiuj trupoj. La bataliono havas sian historion. La regimento surbaze de la historio de siaj batalionoj kreas historion de la regimento. La regimentoj formas historion de la brigado, historioj de la brigadoj la historion de la divizio ktp. Mi klopodos per ĉiuj miaj fortoj, sinjoro kapitano.”

La unujara volontulo Marek metis al si manon al la koro.

”Kun vera amo mi registros glorajn tagojn de nia bataliono, ĉefe en la nuna tempo, kiam la ofensivo plenkpaŝe progresas kaj kiam tio pliakriĝos, kiam nia bataliono kovros la batalejon per siaj heroaj filoj. Mi notos al vi konsciencie la kuron de ĉiuj okazaĵoj, kiuj devas veni, por ke la paĝoj pri historio de nia bataliono estu plenaj de laŭroj.”

”Vi estos ĉe la stabo de la bataliono, unujara volontulo, vi atentosekvos, kiu estis proponita al honorigo, notos — kompreneble laŭ niaj instrukcioj — marŝojn, kiuj antaŭ ĉio atentigus pri eminenta batalavideco kaj fera disciplino de la bataliono. Tio ne estas tre facila, unujara volontulo, sed mi esperas, ke vi havas sufiĉe da rimarka talento, por ke vi, ricevante de mi certajn direktivojn, levu nian batalionon super la ceterajn trupunuojn. Mi sendas telegramon al la regimento, ke mi nomumis vin bataliona kronikisto. Anoncu vin ĉe la ĉefserĝento-kontisto Vaněk de la dekunua kompanio, ke li loku vin tie en la vagono. Tie estas ankoraŭ plej multe da loko, kaj diru al li, ke li venu ĉi tien al mi. Sed registrita vi es-

tos kompreneble ĉe la stabo de la bataliono. Tion oni faros per bataliona skribordono.”

\*

La kuiristo-okultisto dormis. Baloun senĉese tremis, ĉar li jam malfermis ankaŭ la skatoleton da sardinoj de la ĉefleŭtenanto, la ĉefserĝento-kontisto Vaněk iris al la kapitano Ságner kaj la telegrafisto Chodounský ie en la stacidomo havigis al si submane boteleton da junipera distilaĵo, eltrinkis ĝin, estis nun en sentimentala humoro kaj kantis:

*”Tagoj kvazaŭ el fabelo  
ŝajnis al mi, kaj atestis:  
ĉie regas nur fidelo.  
Am’ kaj fido en mi nestis.  
Sed vidante, ke perfido  
de l’ ŝakalo ĉie floras,  
amo velkis, velkis fido,  
je unua foj’ mi ploras.”*

Poste li leviĝis, iris al tablo de la ĉefserĝento-kontisto Vaněk kaj skribis sur paperpecon per grandaj literoj:

”Mi petas per tio ĉi ĝentile, ke mi estu nomumita kaj promociita al bataliona trumpetisto.

Chodounský, la telegrafisto.”

\*

La kapitano Ságner ne havis tro longan interparolon kun la ĉefserĝento-kontisto Vaněk. Li atentigis lin nur pri tio, ke la bataliona kronikisto, unujara volontulo Marek, provizore troviĝos en la vagono kun Ŝvejk.

”Mi povas diri al vi nur tion, ke tiu viro Marek estas, por

tiel diri, suspekta. Politike suspekta. Dio mia! Tio estas en la nuna tempo nenio tro stranga. Pri kiu oni tion ne diras! Ekzistas diversaj tiaj supozoj. Vi ja min komprenas. Mi atentigas vin do nur, ke vi lin tuj haltigu, se li eble parolus pri io, kio... nu, vi komprenas, por ke eble ankaŭ mi ne havu malagrablaĵojn. Diru al li simple, ke li lasu ĉiujn parolojn, kaj per tio estos tio jam en ordo. Sed mi ne imagas, ke vi eble tuj kuru al mi. Aranĝu tion kun li amike, tia admono estas ĉiam pli bona ol stulta denunco. Mallonge, mi deziras nenion aŭdi, ĉar... Komprenu. Tia afero falas ĉi tie ĉiam ankaŭ sur la tutan batalionon.”

Kiam Vaněk do revenis, li forkondukis la unujaran volontulon Marek flanken kaj diris al li: ”Homo, vi estas suspekta, sed tio tute ne gravas. Nur ne diru ĉi tie multon superfluan antaŭ tiu Chodounský, la telegrafisto.”

Tuj kiam li tion findiris, Chodounský ŝanceliris kaj falis en la ĉirkaŭbrakon de la ĉefserĝento-kontisto, plorsingultante per ebrula voĉo, kio ŝajne prezentis kantadon:

*’Ĉio jam finiĝis, min forlasis...  
Kap’ al mamoj viaj ekmanovris.  
Via arda koro min kirasis,  
plor’ amara vidon mian kovris.  
En okuloj viaj ekflagretis  
du steletoj, kiuj min konsolas,  
kaj koralaj lipoj tuj dekretis:  
’Vin forlasi mi neniam volas’.*

Ni neniam forlasos unu la alian,” kriegis Chodounský, ”kion mi elaŭskultos en telefono, tion mi tuj diros al vi. Mi fekas sur mian ĵuron.”

Baloun en angulo terurigite sin krucumis kaj komencis laŭ-



te preĝi: "Di-Naskintino, ne rifuzu mian petvoĉon, sed kor-favore ĝin elaŭskultu, afable min ĝojjigu, helpu al mi, mizerulo, kiu vokas al vi kun vera kredo, firma espero kaj arda amo en tiu ĉi larmoplena valo. Ho, Reĝino Ĉiela, faru vian prope-ton, ke mi restu ankaŭ en dia graco kaj sub via protekto ĝis la fino de mia vivo."

La beata Maria la Virgulino vere pro li propetis, ĉar post momento la unujara volontulo eltiris el sia enhave malriĉa dorsosako kelke da sardinskatoletojn kaj disdonis al ĉiu po unu.

Baloun sentime malfermis la kofreton de la ĉefleŭtenanto Lukáš kaj redonis tien el la ĉielo falintajn sardinojn.

Kiam poste ĉiuj malfermis siajn sardinskatoletojn kaj de-lektiĝis je ili, Baloun eksentis tenton, malfermis la kofreton kaj la sardinojn kaj avide ilin englutis.

Kaj tiam la plej beata kaj la plej dolĉa Maria la Virgulino deturnis sin de li, ĉar ĝuste kiam li fintrinkis oleon el la lad-skatoleto, aperis antaŭ la vagono la bataliona kuriero Ma-tuŝič, vokante supren: "Baloun, alportu al via ĉefleŭtenanto tiujn sardinojn."

"Tiom da vangobatoj, hu," diris la ĉefserĝento Vaněk.

"Kun malplenaj manoj tien prefere ne iru," konsilis Ŝvejk, "kunprenu almenaŭ kvin malplenajn skatoletojn."

"Kion vi propre faris, ke dio vin tiel punas," rimarkis la unujara volontulo, "en via pasinto devas esti ia granda peko. Ĉu vi eble ne kulpiĝis per sakrilegio kaj ne formanĝis al via parokestro ŝinkon en kamentubo? Ĉu vi ne eltrinkis lian mes-vinon en kelo? Ĉu vi kiel bubo ne grimpis eble sur pirarbojn en la parokestra ĝardeno?"

Baloun forbalanciĝis kun trista, plene senespera mieno en

la vizaĝo. Nun lia senkonsila mieno korŝire parolis: "Kiam jam finiĝos tiu turmento?"

"Tio estas tio," diris la unujara volontulo, kiu ekaŭdis la vortojn de la malfeliĉa Baloun, "ke vi, amiko, perdis ligitecon kun sinjoro dio. Vi ne scias bone preĝi, ke sinjoro dio kiom eble plej baldaŭ forigu vin de sur la mondo."

Al tio Ŝvejk aldonis: "Baloun senĉece ne povas trovi la kuraĝon por fordoni sian soldatan vivon, sian soldatan pensmanieron, vortojn, farojn kaj sian soldatan morton al boneco de patrineca koro de la plej supera sinjoro dio, kiel tion diradis mia feldkurato Katz, kiam li jam komencis trotrinki kaj pro eraro kunpuŝiĝis surstrate kun soldato."

Baloun ekĝemis, ke li jam perdis konfidon al sinjoro dio, ĉar li jam plurfoje preĝis, ke dio donu al li sufiĉe da forto kaj iamaniere ŝrumpigu tiun lian stomakon.

"Tio ne datiĝas de tiu ĉi milito," li eklamentis, "tio estas jam malnova malsano, tiu mia manĝavideco. Mia edzino kun infanoj faris pro tio pilgrimojn al Klokoty."

"Tion mi konas," rimarkis Ŝvejk, "tio estas ĉe Tábor kaj oni havas tie riĉe ornamitan statueton de Maria la Virgulino kun falsaj brilantoj kaj tiun volis priŝteli sakristiano de ie el Slovakio. Tre pia homo. Li alveturis do tien kaj opiniis, ke li eble sukcesos pli bone, se li unue estos senigita je ĉiuj malnovaj pekoj, kaj konfesis ankaŭ tion, ke morgaŭ li intencas priŝteli Marian la Virgulino. Li eĉ ne ekpalpebrumis, kaj antaŭ ol li finpreĝis tiujn tricent 'Patronia'jn, kiujn donis al li sinjoro pastro por ke li intertempe ne forkuru, jam elkondukis lin sakristianoj rekte al ĝendarma stacio."

La kuiristo-okultisto komencis kun la telegrafisto Chodunský kvereli, ĉu tio estas ĝisĉiele krianta malkaŝo de la kon-

fesa sekreto, aŭ ĉu valoras pri tio paroli, se temis pri falsaj brilantoj. Sed fine li al Choudounský pruvis, ke tio estis karmo, do antaŭdestinita sorto el malproksima nekonata pasinto, kiam tiu kompatinda sakristiano el Slovakio estis eble ankoraŭ cefalopodo sur alia fremda planedo, kaj same, ke la sorto jam antaŭlonge destinis, kiam la pastro el Klokoty estis ankoraŭ eble ekzemple ekidno, ia marsupiulo, nun jam formortinta mamulo, ke li devas rompi la konfesan sekreton, kvankam el jurista vidpunkto laŭ la eklezia rajto oni donas absolvon, eĉ se temas pri klostra posedaĵo.

Al tio Ŝvejek aldonis tiun ĉi simplan rimarkon: "Jes, neniuj homoj scias, kiel li ekscesos post milionoj da jaroj, kaj povas do nenion forrifuzi. Kiam ni soldatis ankoraŭ ĉe la rezerva komandejo en Karlín, ĉefleŭtenanto Kvasnička ĉiam diris, kiam li al ni oratoris: 'Ne imagu, skaraboj, maldiligentaj bovinoj kaj grasaj porkoj, ke la soldatservo finiĝos por vi jam sur tiu ĉi mondo. Ni revidos nin ankoraŭ post la morto kaj mi preparos por vi tian purgatorion, ke vi gapos je tio kiel cervoj, kanajla bando.' "

Intertempe Baloun, kiu, estante en plena senespero, senĉese opiniis, ke nun oni parolas nur pri li, ke ĉio koncernas lin, daŭrigis sian publikan konfeson: "Eĉ Klokoty ne helpis kontraŭ mia avideco je voraĵo. La edzino kun infanoj revenas el la pilgrima festo kaj jam komencas kalkuli kokinojn. Mankas unu aŭ du. Sed mi ne povis min helpi, mi sciis, ke oni bezonas ilin hejme cele de ovoj, sed mi iras eksteren, rigardas ilin, subite mi sentas abismon en la stomako, kaj post unu horo estas al mi jam bone, la kokino estas jam ĉirkaŭronĝita. Foje, kiam ili estis en Klokoty por preĝi pro mi, por ke paĉjo hejme intertempe ion ne forvoru kaj ne faru ree novan dama-

ĝon, mi paŝas tra la korto, kaj subite falis al mi en la okulojn meleagro. Tiame mi preskaŭ pagis por tio per mia vivo. En mia gorgo transversigis ĝia femura ostoj, kaj se ne estus tie mia muellernanto, tia eta knabo, kiu tiun ostojn eltiris, mi jam ne sidus ĉi tie hodiaŭ kun vi kaj eĉ tiun mondmiliton mi ne ĝisvivus. — Jes, jes. Tiu mia lernanto, tio estis vigla knabo. Tia malgranda, plenforma, dika, grasa — ...”

Ŝvejk alpaŝis al Baloun: ”Montru la langon!”

Baloun elŝovis sian langon kontraŭ Ŝvejk, post kio Ŝvejk turnis sin al ĉiuj, kiuj estis en la vagono: ”Tion mi sciis, li forvoris ankaŭ tiun sian muellernanton. — Konfesu, kiam vi lin forvoris? Kiam tiuj viaj estis denove en Klokoty, ĉu?”

Baloun senespere kunmetis la manojn kaj ekvokis: ”Lasu min, kamaradoj! Al ĉio ankoraŭ ĉi tio de miaj kamaradoj!”

”Ni vin pro tio ne kondamnas,” diris la unujara volontulo, ”male, vidiĝas, ke el vi estos bona soldato. Kiam la francoj dum napoleonaj militoj sieĝis Madridon<sup>40</sup>, hispana komandanto de la fortikaĵo Madrido preferis formangi sian adjutanton sen salo ol cedi la fortikaĵon al la malamiko pro malsato.”

”Tio estas jam vera ofero, ĉar salita adjutanto nepre estus pli manĝebla. — Sinjoro ĉefserĝento-kontisto, kian nomon havas tiu adjutanto de nia bataliono? — Ĉu Ziegler? Tio estas tia ŝrumpuleto, el tiu oni ne farus porciojn eĉ por unu marŝkompo.”

”Ni rigardu,” diris la ĉefserĝento-kontisto Vaněk, ”Baloun havas en la mano rozarion.”

Kaj vere, Baloun en sia la plej granda ĉagreno serĉis savon

40 la 2an de oktobro 1808 Madrido ekribelis kontraŭ la reĝo Jozefo, frato de Napoleono la unua, kiu lin surtronigis kontraŭ la volo de hispanoj. La ribeliĝo estus tuj subpremita, sen kia ajn sieĝado

en etaj pistakoglobetoj de la firmao Moritz Löwenstein en Vieno.

”Tiu estas ankaŭ el Klokoty,” diris Baloun malgaje. ”Antaŭ ol tiuj niaj ĝin al mi alportis, malaperis du anseridoj, sed tio ne estas vera viando, tio estas molaĵo.”

Momenton post tio venis ordono tra la tuta trajno, ke oni veturos post kvaronhoro. Ĉar neniu volis tion kredi, okazis tio, ke malgraŭ ĉia atentemo kelkaj ien forvadis. Kiam la trajno moviĝis, mankis dek ok viroj, inter ili la ĉefserĝento Nasá-klo de la dekdua marŝkompanio, kiu ankoraŭ, kiam la trajno jam antaŭlonge malaperis malantaŭ Iszatarsza, kverelis en neprofunda valo de robinia arbareto malantaŭ la stacidomo kun publikulino, kiu volis de li kvin kronojn, dum li proponis rekompenci jam faritan servon per unu krono aŭ per kelke da vangobatoj, kaj tiu ĉi laste nomita egaligo fine ankaŭ efektiviĝis tiel energie, ke post ŝia kriego komencis kunkuri tien homoj el la stacidomo.



### 3. EL HATVAN ĜIS LA LIMO DE GALICIO

**E**n la vagono, kie estis la unujara volontulo kaj Ŝvejk, oni denove kondukis strangajn parolojn de pli mapli ŝtatperfida enhavo dum la tuta tempo de trajna transveturigado de la bataliono, rikoltonta militan gloron post kiam ĝi piedmarŝos de Laborec tra la orienta Galicio al la fronto; en pli malgranda amplekso, sed ni povas diri, ke ĝenerale, okazis tiel ankaŭ en aliaj vagonoj, eĉ en la stabvagono regis certa malkontenteco, ĉar pere de la regimento venis en Füzésabony arma ordono, laŭ kiu porcio da vino por oficiroj malaltiĝas je unu okono de litro. Kompreneble ke ĉe tio oni ne forgesis la viraron, al kiu oni malaltigis porcion da saguo je unu dekagramo por la viro, kio estis tiom pli mistera, ke en la armeo neniu kaj neniam vidi saguon.

Malgraŭ tio necesis tion anonci al la ĉefserĝento-kontisto Bautanzel, kiu sentis sin per tio terure ofendita kaj priŝtelita,

kion li esprimis ankaŭ per tio, ke saguo estas en la nuna tempo rara aĵo kaj ke por unu kilogramo li ricevus almenaŭ ok kronojn.

En Füzésabony oni malkovris ankaŭ tion, ke unu kompanio perdis sian militkuirejon, ĉar en tiu ĉi stacio oni fine kuiris gulaŝon kun terpomoj, kion ege emfazis la "latrina generalo". Post esploro malkaŝiĝis, ke la kompatinda militkuirejo ne kunveturis kun ili el Bruck kaj ke ŝajne ĝis nun staras tie ie malantaŭ la barako 186, forlasita kaj malvarmiĝinta.

Scie, kuirista personaro apartenanta al tiu militkuirejo estis unu tagon antaŭ la forveturo malliberigita en la ĉefgardistejo pro senbrida konduto en la urbo, kaj la kuiristoj sciis aranĝi tion tiel, ke ili sidis ankoraŭ tiam, kiam ilia marŝkompo veturis jam trans Hungarion.

La kompanion sen kuirejo oni do alvicigis al alia militkuirejo, kio kompreneble ne okazis sen kverelo, ĉar inter viraro de ambaŭ kompanioj destinita por senŝeligadi terpomojn ekis disputoj, ke tiuj unuaj asertis al la aliaj, ke ili ne estas tiaj brutoj por penegi profite al iu alia. Fine montriĝis, ke tio pri gulaŝo kaj terpomoj estas propre manovro por ke la soldatoj alkitimiĝu al tio, ke kiam oni kuiras gulaŝon en la fronto antaŭ la malamiko, subite venos ordono "Ĉiuj cedi!", gulaŝon el kaldronoj oni elverŝos kaj neniu ricevos ĝin eĉ nur leki.

Tio ĉi estis do ia preparo, ne tiel konsekvence tragika, sed tamen nur instrua. Nome, kiam estis la tempo por disdoni gulaŝon, venis ordono "Envagoniĝi!" kaj oni jam veturis al Miskolc. Ankaŭ tie oni ĝin ne disdonis, ĉar sur la trako staris trajno kun rusaj vagonoj, tial oni ne ellasis la viraron el vagonoj kaj lasis al ĝi liberan kampon por fantazii, ke oni disdonos

gulaŝon, kiam oni elvagoniĝos en Galicio, kie oni rekonos la gulaŝon aĉiĝinta, nemanĝebla kaj ke poste oni ĝin elverŝos.

Poste oni veturigis gulaŝon plu al Tiszaöök, Zombor, kaj kiam jam neniu atendis, ke oni ĝin disdonos, la trajno haltis en Sátoraljaújhely, kie oni denove ekhejtis sub kaldronoj, la gulaŝon varmigis kaj fine disdonis.

La fervoja stacio estis troŝtopita, estis decidite unue forsendi du trajnojn kun municio, poste du trajnojn kun artilerio kaj trajnon kun pioniraj taĉmentoj. Ĝenerale eblis diri, ke ĉi tie amasiĝis trajnoj kun trupunuoj de ĉiuj eblaj partoj de la armeo.

Malantaŭ la stacidomo honvedoj-husaroj amuzis sin per du polaj judoj, al kiuj ili elrabis dorskorbon kun brando kaj nun en bona humoro anstataŭ pago batis ilin sur la buŝon, kion ŝajne ili havis permesite, ĉar tute proksime staris ilia kapitano kaj al la tuta sceno li agrable ridetis, dum malantaŭ magazeno kelke da aliaj honvedoj-husaroj palpis sub jupojn de nigrookulaj filinetoj de la batataj judoj.

Estis tie ankaŭ trajno kun aeroplanoj. Sur aliaj reloj staris sur vagonoj la samaj objektoj, kiel aeroplanoj kaj kanonoj, sed en detruita stato. Estis tio forpafitaj flugmaŝinoj, frakasitaj haŭbirtuboj. Dum ĉio freŝa kaj nova veturis tien supren, tiuj ĉi restoj de gloro veturis enlanden cele de riparoj kaj konstruoj.

Al soldatoj, kiuj amasiĝis ĉirkaŭ la detruitaj aeroplanoj kaj kanonoj, la leŭtenanto Dub kompreneble klarigis, ke tio estas milita predo, kaj li ankaŭ rimarkis, ke iom pli malproksime denove staras Ŝvejk en grupo da soldatoj kaj ion rakontas. Li proksimiĝis do al tiu loko kaj aŭdis la vivospertan voĉon de Ŝvejk: "Oni prenu tion tiel aŭ alie, estas tio tamen nur



milita predo. Estas vero, unuavide estas tio stranga, kiam iu legas ĉi tie sur afusto i.k.r. artileria divizio. Sed tio ŝajne estas tiel, ke tiu kanono falis en rusajn manojn kaj ni devis denove ĝin reakiri, kaj tia predo estas multe pli valora, ĉar ...

Ĉar,” li diris solene, kiam li rimarkis la leŭtenanton Dub, ”oni lasu nenion en la manoj de la malamiko. Tio estas la samo kiel pri Przemysł<sup>41</sup> aŭ pri tiu soldato, al kiu la malamiko dum batalo elŝiris ladbotelon. Tio okazis ankoraŭ dum la napoleonaj militoj, kaj tiu soldato nokte foriris en la malamikan tendaron kaj alportis al si la ladbotelon reen, kaj ĉe tio li ankoraŭ gajnis, ĉar la malamiko ricevis por nokto brandon.”

La leŭtenanto Dub diris nur: ”Zorgu malaperi, Ŝvejk, ke mi jam ne vidu vin ĉi tie la duan fojon!”

”Laŭ via ordono, sinjoro leŭtenanto.” Kaj Ŝvejk foriris al alia grupo da vagonoj, kaj se la leŭtenanto Dub lin aŭdus, kion li ankoraŭ aldonis, li certe elsaltus pro kolero el la uniformo, kvankam tio estis tute senkulpa biblia frazo: ”Mal-longe, vi vidos min kaj denove mallonge, kaj vi ne vidos min.”

Post foriro de Ŝvejk la leŭtenanto Dub estis al ĉio ankoraŭ tiel idiota, ke li atentigis soldatojn pri forpafita aŭstra aeroplano, sur kies metala lameno estis klare gravurite ”Viena Nova Urbo.”

”Tiun ni forpafis al la rusoj ĉe Lvov,” diris la leŭtenanto Dub. Tiujn ĉi vortojn ekaŭdis la ĉefleŭtenanto Lukáš, kiu

41 urbo kaj fortikaĵo en Galicio. En duono de septembro 1914 okupis la fortikaĵon rusoj, en oktobro la aŭstri-hungara kaj germana armeoj rusojn elpelis; sed tiuj tuj, la 9an de novembro, denove reakiris la fortikaĵon. La 22an de marto 1915 Przemysł kapitulacis, sed baldaŭ post tio, la 3an de junio 1915, la aŭstri-hungara kaj germana armeoj denove enmarŝis la fortikaĵon

proksimiĝis kaj laŭte aldonis: "Ĉe kio ambaŭ rusaj pilotoj brulmortis."

Poste li senvorte iris pluen, ekpensinte, ke la leŭtenanto Dub estas bruto.

Malantaŭ aliaj vagonoj li renkontiĝis kun Ŝvejk kaj klopodis lin eviti, ĉar sur la vizaĝo de Ŝvejk ĉe ekvido de la ĉefleŭtenanto Lukáš vidiĝis, ke tiu viro havas sur la koro multe da tio, kion li volas al li diri.

Ŝvejk iris rekte al li: "Obee mi raportas, kompania kuriero Ŝvejk petas pluajn ordonojn. Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke mi vin jam serĉis en la stabvagono."

"Aŭdu, Ŝvejk," diris la ĉefleŭtenanto Lukáš per tute forpelanta kaj malamika tono. "Ĉu vi scias, kia estas via nomo? Ĉu vi jam forgesis, kiel mi vin nomis?"

"Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke tian aferon mi ne forgesis, ĉar mi ne estas unujara volontulo Fera. Tiam, ankoraŭ antaŭ la milito, ni servis en la kazerno en Karlín kaj tie estis kolonelo laŭnome Fliedler von Bumerang aŭ tiel similje."

La ĉefleŭtenanto Lukáš senintence ekridetis al tiu "similje" kaj Ŝvejk rakontis plu: "Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke tiu nia kolonelo havis duonon de via alto, portis plenbarbon kiel la arkiduko Lobkowitz, tiel ke li aspektis kiel simio, kaj kiam li ekscitiĝis, li saltis duoble pli alten ol li mem mezuris, tiel ke ni nomis lin kaŭĉuka maljunulaĉo. Tiame estis la unuan de majo, ni havis batalpretecon kaj vespere antaŭ tio li kondukis al ni sur la korto longan parolon, ke tial ni ĉiuj devas resti morgaŭ en la kazerno kaj ne moviĝi de tie, por ke ni povu laŭ la plej supera ordono, en okazo de bezono, mortpafi tiun tutan socialistan bandon. Tial ankaŭ soldato,

kiu havas hodiaŭ permeson veni post la dormosignalo, ne revenos en la kazernon kaj plilongigos al si tion ĝis la sekvanta tago, tiu ke faris ŝtatperfidon, ĉar kiam estos salvoj, tia ebriega ulo trafos eĉ ne unu homon, kaj eĉ, li pafos en aeron. Do, la unujarulo Fera revenis en la ĉambron kaj diras, ke la kaŭĉuka maljunulaĉo havis tamen nur bonan ideon. Tio estas ja entute vero, morgaŭ ja oni enlasos neniun en la kazernon, do plej bone estas tute ne veni, kaj, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, li tion ankaŭ tute senhezite realigis. Sed tiu kolonelo Fliedler, tiu estis tia mizera bestio, dio donu al li ĉielon, ke la sekvanta tagon li paŝis tra Prago kaj serĉis iun, kiu de nia regimento aŭdacis eliri el la kazerno, kaj ie ĉe la Polva Turo li feliĉe renkontis tiun Fera kaj tuj al li tondris: 'Mi montri al vi, mi inŝtrui, mi duople al vi dolĉigi!' Li diris al li ankoraŭ pli da tio, kunprenis lin en la kazernon kaj dum la tuta vojo diris al li diverson malbelan, minacan kaj senĉese lin demandis, kia estas lia nomo. 'Fera, Fera, vi pagi pro tio, mi ĵoji, ke kapti, mi montri al vi unua maja. Fera, Fera, vi esti mija, malliberigi, bona malliberigi!' Por Fera estis ĉio tio jam tute egala. Kiel ili iris tiel tra Poříč, laŭlonge de 'Ĉe Rozvařil', Fera saltis en traveturejon, perdiĝis al li en trapasejo kaj malebligis al la kaŭĉuka maljunulaĉo tiun grandan ĝojon, kiam tiu sidigos lin en malliberejon. La kolonelon tiom ekscitis, ke Fera al li fuĝis, ke en furiozo li forgesis, kia estas la nomo de tiu lia deliktulo, li intermiksas tion kaj kiam li venis en la kazernon, li komencis salti ĝisplafone, la plafono estis malalte, kaj tiu, kiu havis deĵoron ĉe la bataliono, miris, kial la maljunulaĉo subite parolas per kripligita ĉeĥa lingvo kaj krias: 'Kupra maliberigi, Kupra nje malliberigi, Plumba maliberigi, Stana maliberigi!' Kaj tiel ĉi la maljunulaĉo turmentis de tago al

tago kaj senĉese demandis, ĉu oni jam kaptis Kupran, Plumban kaj Stanan, kaj li ankaŭ igis vicordigi la tutan regimenton, sed Feran, pri kiu tio ĝenerale sciigis, oni jam lokis al malsanulĉambro, ĉar li estis dentista teknikisto. Foje en la gastejo 'Ĉe Bucek' soldato de nia regimento mortpikis dragonon, kiu entrudiĝis al lia ulino, kaj tiam oni starigis nin en kvadraton, devis eliri ĉiuj, ankaŭ malsanuloj, kiu estis tre malsana, tiun subtenis du viroj. Do ankaŭ tio ne helpis, Fera devis eliri sur korton kaj tie oni legis al ni regimentan ordonon proksimume en tiu senco, ke ankaŭ dragonoj estas soldatoj kaj estas malpermesite ilin trapikadi, ĉar ili estas niaj kamaradoj en la milito. Certa unujarulo tion tradukis kaj nia kolonelo rigardis kiel tigro. Unue li laŭris la frontvicon, poste iris malantaŭen, ĉirkaŭiris la kvadraton kaj subite ekvidis Feran, kiu estis alta kiel monto, tiel ke, sinjoro ĉefleŭtenanto, estis tio terure komika, kiam la kolonelo altrenis lin en mezon de la kvadrato. La unujarulo ĉesis traduki kaj nia kolonelo komencis salti antaŭ Fera kiel hundo atakanta ĉevalon kaj ĉe tio li kriegis: 'Do, vi mi ne malaperi, vi mi iri nenjen fuĝi, nun vi denofe diri ke vi Fera, kaj mi ĉjam diri Kupra, Stana, Plumba, li esti Fera kaj tia bastarto esti Fera, mi inŝtrui vin Plumba, Stana, Kupra, vi bruto, vi porko, vi Fera!' Poste li ŝarĝis lin pro tio per unumonata malliberigo, sed proksimume post dek kvar tagoj kaptis lin dentodoloro kaj li rememoris, ke Fera estas dentista teknikisto, li igis lin do alkonduki el malliberejo en la malsanulĉambron kaj volis lasi elŝiri al si de li denton kaj Fera ŝiris ĝin al li proksimume duonhoron, tiel ke la maljunulaĉon oni eble trifoje rekonsciigis, sed la maljunulaĉo iel malsovaĝigis kaj pardonis al Fera tiujn restantajn dek kvar tagojn. Tiel tio do estas, sinjoro ĉefleŭtenanto, se superulo forgesas no-

mon de sia subulo, sed devo de la subulo estas neniam forgesi nomon de sia superulo, kiel diris al ni ĉiam ĝuste tiu sinjoro kolonelo, ke ni ne forgesos eĉ post jaroj, ke ni iam havis kolonelon Fliedler. — Ĉu ne estis tio eble tro longa, sinjoro ĉefleŭtenanto?”

”Sciu, Ŝvejk,” respondis la ĉefleŭtenanto Lukáš, ”ju pli longe mi vin aŭskultas, des pli mi venas al la konvinko, ke vi absolute ne estimas viajn superulojn. La soldato devas paroli pri siaj iamaj superuloj nur bone ankoraŭ post jaroj.”

Vidiĝis, ke la ĉefleŭtenanto Lukáš komencas sin amuzi.

”Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto,” enfalis en tion Ŝvejk per senkulpiga tono, ”sinjoro kolonelo Fliedler estas ja jam longe morta, sed se vi, sinjoro ĉefleŭtenanto, deziras, mi parolos pri li nur kun laŭdo. Li kondukis al la soldatoj, sinjoro ĉefleŭtenanto, kiel vera anĝelo. Li estis tiel bonanima kiel la sankta Marteno, kiu disdonadis anserojn al malriĉaj kaj malsataj. Li dividis sian tagmanĝon el la oficira kuirejo kun soldato, kiun li renkontis sur la korto kiel unuan, kaj kiam ni ĉiuj jam trosatiĝis per knedbuloj kun marmelado, li igis kuiri al ni stufitajn terpomojn kun rostita cepo kaj porkaĵo, kaj ĉe manovroj, tiam li eĉ pli eminentiĝis per sia boneco. Kiam ni venis al Dolní Kralovice, li donis ordonon eltrinki la tutan stokon de tiea bierfarejo je lia konto, kaj kiam li havis nomtagon aŭ naskiĝtagon, li igis kuiri leporaĵon kun krema saŭco kaj knedlikoj por la tuta regimento. Li tiel bonkondukis al la viraro, ke foje, sinjoro ĉefleŭtenanto...”

La ĉefleŭtenanto Lukáš milde ekfrapetis Ŝvejkon sur la orelo kaj diris per amika tono: ”Iru do jam, fripono, jam lin lasu.”

”Laŭ via ordono, sinjoro ĉefleŭtenanto!” Ŝvejk foriris al sia vagono, dum antaŭ trajno de la bataliono, tie, kie en vagono

estis fermitaj telefonaj aparatoj kaj dratoj, vidiĝis tiu ĉi sceno: staris tie soldato garde, ĉar laŭ ordono de la kapitano Ságner ĉio devis esti 'kiel en la fronto'. Gardantaj soldatoj stariĝis do laŭ la valoreco de vagonoj ĉe ambaŭ flankoj kaj de la bataliona kancelario ricevis alvokan kaj respondan signalvorton.

Tiutage estis la alvoka signalvorto "Kepo" kaj la respondeca "Hatvan". Gardostaranto ĉe telefonaj aparatoj, al kies taskoj apartenis tion memori, estis polo el Kolomyja, kiu per stranga hazardo venis al la naŭdekunua regimento.

Li — kaj scii, kio estas "kepo"? Sed ĉar li havis en si ĝermon de mnemoniko, li tamen nur memoris, ke tio komenciĝas per "k", kaj fiere respondis al la leŭtenanto Dub, kiu havis deĵoron ĉe la bataliono kaj demandis lin, proksimiĝante al li, pri la taga alvoka signalvorto: "Kafo." Estis tio kompreneble tre natura, ĉar la polo el Kolomyja senĉese ankoraŭ rememoris matenan kaj vesperan kafon en la tendaro Bruck.

Kaj kiam li ekkriegis ankoraŭfoje "kafo" kaj la leŭtenanto Dub senĉese al li proksimiĝis, tiam li, ekkonsciinte sian ĵuron kaj tion, ke li staras garde, terurige ekvokis: "Halt!", kaj kiam la leŭtenanto Dub faris al li ankoraŭ du paŝojn kaj senĉese volis scii de li la alvokan signalvorton, li ekcelis kontraŭ li la fusilon, kaj ne sciante perfekte la germanan lingvon, uzis strangan miksaĵon de la pola kaj germana lingvo, kriante: "Benže ŝajsn, benže ŝajsn<sup>42</sup>."

La leŭtenanto Dub ekkomprenis kaj komencis regresi, kri-

42 en fonetika pola-germana transskribo. La soldato volis diri "Mi pafos", sed ne regante bone la germanan lingvon, anstataŭ germana vorto "schiessen" (elparolu "ŝisn", kun longa "i", pafi) li uzis ortografie similan vorton "scheissen" (ŝajsn, elparolu ŝajsn, feki). Li do vokis "Mi fekos"

ante: "Komandanto de la gardistaro, komandanto de la gardistaro!"

Aperis serĝento Jelínek, kiu alkondukis la polon sur la gardolokon kaj mem demandis lin pri la alvoka signalvorto, poste demandis la leŭtenanto Dub, sed al tiuj demandoj la senespera polo el Kolomyja respondis per krio, sonanta tra la fervoja stacio: "Kafo, kafo." El ĉiuj vagonoj, kiuj tie estis, soldatoj komencis salti kun gameloj kaj ekis terura paniko, finiĝinta per tio, ke la senarmigitan honestan soldaton oni forkondukis en vagonon por malliberigitoj.

Sed la leŭtenanto Dub havis certan suspekton kontraŭ Ŝvejk, kiun li vidis kiel unuan degrimpi kun gamelo el vagono, kaj li vetus la kolon, ke li aŭdis lin voki: "Eksteren kun gameloj, eksteren kun gameloj."

Post noktomezo la trajno moviĝis al Ladomovce kaj Trebišov, kie matene en la stacio bonvenigis ĝin societo de veteranoj, ĉar tiun ĉi marŝbatalionon ĝi erare konsideris kiel marŝbatalionon de la dekkvara honveda hungara regimento, kiu traveturis la stacion tuj nokte. Certis, ke veteranoj estis duonebriaj, kaj per sia kriego "Dio gardu la reĝon" vekis el la dormo la tutan trajnon. Kelkaj naciece pli konsciaj soldatoj klinis sin el vagonoj kaj respondis al ili: "Kisu al ni la pugon. Hura!"

Al tio la veteranoj ekkriegis, ke tremis la fenestroj de la stacidomo: "Hura! Hura al la dekkvara regimento!"

Post kvin minutoj la trajno veturis plu al Humenné. Tie ĉi estis jam evidentaj kaj klaraj signoj de bataloj, kiam la rusoj antaŭeniris en la valon de Tisza. Ambaŭflanke etendiĝis primitivaj tranĉeoj, kelkloke vidiĝis forbruligita bieno, ĉirkaŭ kiu

haste konstruita budo signifis, ke la posedantoj denove revenis.

Kiam poste antaŭ tagmezo estis la stacio Humenné, kie la stacidomo ankaŭ vidigis postrestaĵojn de bataloj, oni faris preparojn al tagmanĝo kaj la viraro de la trajno povis intertempe enrigardi en publikan sekreton, kiel post foriro de rusoj la oficejoj traktas la lokan loĝantaron, kiu estis parole kaj religie parenca al la rusaj soldatoj.

Sur la kajo staris aro da arestitaj hungaraj rusoj, ĉirkaŭita de hungaraj ĝendarmoj. Estis tie kelke da popoj, instruistoj kaj kampistoj el la vasta ĉirkaŭaĵo. Ĉiuj havis la manojn malantaŭe, katenitajn per ŝnuro, kaj po duoj estis ligitaj unu al la alia. Grandparte ili havis la nazon frakasita kaj ŝvelaĵojn sur la kapo, kiel ili tuj post aresto ricevis batadon fare de la ĝendarmoj.

Iom pli malproksime hungara ĝendarmo ludis per popo. Ĉirkaŭ lia maldekstra kruro li ligis ŝnuron, kiun li tenis en la mano, kaj per kolbo devigis lin danci ĉardaŝon, skuante ĉe tio la ŝnuron, tiel ke la popo falis nazantaŭe teren, kaj havante la manojn ligitaj malantaŭe, li ne povis leviĝi kaj faris malesperajn provojn turni sin surdorsen por eble tiel povi levi sin de sur la tero. La ĝendarmo ridis al tio tiel sincere, ke el liaj okuloj fluis larmoj, kaj kiam la popo jam preskaŭ sin levis, li skuis la ŝnuron kaj la popo estis denove sur la nazo.

Fine tion ĉesigis ĝendarma oficiro, kiu ordonis, ke la arestitojn oni provizore, antaŭ ol alveturos trajno, forkonduku en senhoman budon malantaŭ la stacidomo kaj tie ilin batu kaj draŝu, ke neniu tion vidu.

Pri tiu ĉi epizodo oni komencis parolon en la stabvagono



kaj ĝenerale eblas diri, ke plejmulto da oficiroj tion malaprobis.

Subleŭtenanto Kraus opiniis, ke se tiuj homoj estas ŝtatperfiduloj, necesas pendumi ilin tuj surloke sen kia ajn torturado, sed la leŭtenanto Dub kontraŭe plene konsentis pri la tuta sceno, tuj rilatigis tion al la Sarajeva atenco kaj klarigis tion tiel, ke tiuj hungaraj ĝendarmoj en la stacio Humenné venĝas la morton de la arkiduko Francisko Ferdinando kaj de lia edzino. Por aldoni gravecon al siaj vortoj, li diris, ke li abonis revuon ('Kvarfolion' de Šimáček<sup>43</sup>) kaj tie en julia numero ankoraŭ antaŭ la milito estis pri tiu atenco skribite, ke la senekzempla Sarajeva krimo postlasas en homaj koroj longe neresanigeblan vundon, tiom pli dolorigan, ke per la krimo estis neniigita ne nur la vivo de reprezentanto de la ŝtata ekzekutivo, sed ankaŭ la vivo de lia fidela kaj amata edzino, kaj ke per neniigo de tiuj du vivoj estis detruita feliĉa, ekzemplodona familia kunestado kaj el infanoj amataj de ĉiuj estis faritaj orfoj.

La ĉefleŭtetanto Lukáš ekmurmuris al si, ke ĝendarmoj ĉi tie en Humenné ŝajne abonis la 'Kvarfolion' de Šimáček kun tiu kortuŝa artikolo. Subite tute ĉio komencis ŝajni al li abomena kaj li sentis nur bezonon ebriiĝi, por ke forlasu lin spleno. Li eliris do el la vagono kaj iris elserĉi Ŝvejkon.

"Aŭdu, Ŝvejk," li diris al li, "ĉu vi ne scias pri ia botelo da konjako? Mi iel ne sentas min bone."

"Tion ĉion kaŭzas veterŝanĝo, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto. Povas esti, ke kiam ni estos sur batalkampo, estos al vi ankoraŭ pli malbone. Ju pli la homo malproksimiĝas de sia devena soldata bazo, des pli grandan emon sveni

43 Bohuslav Šimáček, iama granda eldonisto en Prago

li sentas. Ĝardenisto el Strašnice<sup>44</sup>, certa Jozefo Kalenda, tiu ankaŭ foje malproksimiĝis de sia hejmo, iris el Strašnice al Vinohrady, haltis en la gastejo 'Ĉe la fervojstacio', tiam estis al li ankoraŭ bone, sed tuj kiam li venis en Korunní-avenueon al akvodistribuejo, li paŝis en Korunní-avenueo de unu gastejo al la alia ĝis malantaŭ la preĝejon de sankta Ludmila kaj sentis jam laciĝon. Sed li ne lasis sin per tio fortimigi, ĉar la antaŭan vesperon en la gastejo 'Ĉe remizo' en Strašnice li vetis kun tramkondukisto, ke li entreprenos piediran rondiron ĉirkaŭ la mondo en tri semajnoj. Li komencis do pli kaj pli malproksimiĝi de sia hejmo, ĝis li alrampis en la 'Nigran bierfarejon' sur Karolo-placo kaj de tie li iris al Malá Strana en la bierfarejon de la sankta Tomaso, de tie en la gastejon 'Ĉe Montág' kaj ankoraŭ pli supren en la gastejon 'Ĉe la Brabanta reĝo', poste en 'Belan panoramon', de tie en bierfarejon ĉe la klostro de Strahov<sup>45</sup>. Sed tiam la ŝanĝo de la klimato ĉesis al li jam prosperi. Li venis ĝis la Loretana-placo kaj tie subite kaptis lin tia nostalgio, ke li ĵetegis sin teren, komencis ruliĝi sur trotuaro kaj kriis: 'Hometoj, mi jam ne iros pluen. Pri la rondiro ĉirkaŭ la mondo', pardonu, sinjoro ĉefleŭtenanto, 'mi fajfos'. Sed se vi deziras, sinjoro ĉefleŭtenanto, mi do havigos al vi konjakon, mi timas nur, ke vi pli frue ne forveturu."

La ĉefleŭtenanto Lukáš lin certigis, ke de ĉi tie oni ne veturos pli frue ol post du horoj kaj ke konjakon oni kaŝvendas en boteloj tuj malantaŭ la stacidomo, ke la kapitano Ságner sendis tien jam Matuŝičon kaj tiu por dek kvin kronoj alportis al li botelon da tute tolerebla konjako. Jen li havas dek kvin kronojn, li jam iru kaj ĉefe diru al neniuj, ke tio estas por la ĉef-

44 praga kvartalo

45 parto de Prago

leŭtenanto Lukáš aŭ ke tiu lin sendas, ĉar fakte tio estas malpermesita afero.

”Estu certa, sinjoro ĉefleŭtenanto,” diris Ŝvejk, ”ke ĉio tio estos en ordo, ĉar mi tre ŝatas malpermesitajn aferojn, mi ĉiam troviĝis en io malpermesita sen tio, ke mi pri tio scius. Foje en la kazerno en Karlín oni al ni malpermesis...”

”Turnu vin — marŝ!” interrompis lin la ĉefleŭtenanto Lukáš.

Ŝvejk iris do malantaŭ la stacidomon, ripetante al si dumvoje ĉiujn detalojn de sia ekspedicio. Ke la konjako devas esti bongusta, tial li devas unue ĝin gustumi, ke tio estas malpermesita, tial li devas esti singarda.

Ĝuste kiam li turniĝis malantaŭ la kajon, li denove renkontiĝis kun la leŭtenanto Dub. ”Kial vi ĉi tie vagas?” li demandis Ŝvejkon. ”Ĉu vi min konas?”

”Obee mi raportas,” respondis Ŝvejk, soldatsalutante, ”ke mi ne deziras ekkoni vin de tiu via malbona flanko.”

La leŭtenanto Dub rigidiĝis pro ektimo, sed Ŝvejk staris trankvile, senĉese tenante la manon ĉe la viziero de sia kepo kaj daŭrigis: ”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke mi volas vin ekkoni nur de tiu bona flanko, por ke vi ne aldevigu min ĝis ploro, kiel vi lastfoje diris.”

Al la leŭtenanto Dub turniĝis la kapo pro tia aroganteco kaj li kapablis nur ekscitite ekkrii: ”Malaperu, kanajlo, ni ankoraŭ interparolos!”

Ŝvejk foriris malantaŭ la kajon kaj la leŭtenanto Dub, rekonsciiginte, lin sekvis. Malantaŭ la stacidomo tuj ĉe la ŝoseo estis vico da dorskorboj, starigitaj per la fundo supren, sur kiuj estis plektopladoj kaj sur tiuj tute senkulpe aspektantaj diversaj frandaĵoj, kvazaŭ ĉiuj tiuj bongustaĵoj estus destini-

taj por lerneja junularo ie ĉe ekskurso. Kuŝis tie pecetoj da gumbombonoj, vaflorulaĵoj, amaso da acidaj pasteloj, kelkloke sur plektoplado ankoraŭ tranĉoj da nigra pano kun peceto da salamo, tute certe devenanta el ĉevalo. Sed interne la dorskorboj enhavis diversajn alkoholaĵojn, botelojn da konjako, rumo, sorpa likvoro kaj da aliaj likvoroj kaj brandoj.

Tuj malantaŭ la ŝosefosajo estis budo kaj tie propre oni faris ĉiujn tiujn negocojn pri malpermesitaj trinkaĵoj.

Soldatoj unue pritraktis tion ĉe dorskorboj kaj tempiobukla judo eltiris brandon el sub tiel senkulpe aspektanta dorskorbo kaj sub kaftano alportis ĝin en la lignan budon, kie la soldato jam kaŝis ĝin neokulfrape ien en la pantalonon aŭ sub la jupon.

Ĉi tien do Ŝvejk alcelis siajn paŝojn, dum la leŭtenanto Dub observis lin per sia detektiva talento de la stacidomo.

Ŝvejk haltis tuj ĉe la unua dorskorbo. Unue li elektis bombonojn, kiujn li pagis kaj ŝovis en poŝon, ĉe kio tempiobukla sinjoro al li ekflustris: "Brandon mi ankaŭ havas, via moŝto sinjoro soldato."

La pritrakto estis rapide finita, Ŝvejk foriris en la budon kaj ne donis la monon pli frue, dum la tempiobukla sinjoro ne malfermis la botelon kaj Ŝvejk ne gustumis. Sed pri la konjako li estis kontenta kaj revenis al la stacidomo, ŝovinte la botelon sub la jakon.

"Kie vi estis, kanajlo?" baris al li la vojon al la kajo la leŭtenanto Dub.

"Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke mi iris aĉeti al mi bombonojn." Ŝvejk ekpalpis en la poŝon kaj eltiris plenmanon da malpuraj, polvokovritaj bombonoj: "Se sinjoro leŭtenanto ne abomenus... Mi ilin jam gustumis, ili ne estas malbonaj.

Ili havas agrablan, neordinaran guston, kiel de prunmarmelado, sinjoro leŭtenanto.”

Sub la jako elstaris rondaj konturoj de la botelo.

La leŭtenanto Dub manfrapetis Ŝvejkon sur la jako: ”Kion vi ĉi tie portas, kanajlo? Eltiru tion eksteren!”

Ŝvejk elteris botelon kun flaveta enhavo, kun tute klara kaj legebla etikedo Konjako.

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto,” respondis Ŝvejk kuraĝe, ”ke mi iris pumpi al mi iom da trinkakvo en malplenan botelon de konjako. Mi havas ankoraŭ post tiu gulaŝo, kiun ni havis hieraŭ, teruran soifon. Sed la akvo tie ĉe tiu pumpilo estas iel flava, kiel vi vidas, sinjoro leŭtenanto, tio estas ŝajne ia feroriĉa akvo. Tiaj akvoj estas tre sanigaj kaj utilaj.”

”Se vi havas tian soifon, Ŝvejk,” diris la leŭtenanto Dub, diable ridetante kaj volante kiom eble plej multe plilongigi tiun scenon, en kiu Ŝvejk plene malvenkos, ”trinku, sed ĝisfunde. Eltrinku ĉion tion je unu fojo!”

La leŭtenanto Dub jam antaŭe al si elkombinis, kiel Ŝvejk faros kelke da glutoj, jam ne povos trinki plu kaj kiel li, la leŭtenanto Dub, glorie lin venkos kaj diros: ”Donu la botelon ankaŭ al mi, ke mi iom trinku, ankaŭ mi soifas.” Kiel tiu kanajlo Ŝvejk sendube mienos en tiu por li terura momento, kaj poste raporto kaj tiel plu.

Ŝvejk malŝtopis la botelon, metis al la buŝo kaj gluto post gluto malaperis en lia gorgo. La leŭtenanto Dub ŝtoniĝis. Ŝvejk eltrinkis antaŭ liaj okuloj la plenan botelon, eĉ ne palpebruminte, malplenan botelon ĵetis trans ŝoseon en lagon, forkraĉis kaj diris, kvazaŭ li eltrinkus glaseton da minerala akvo: ”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke tiu akvo vere havis ferori-

ĉan guston. Gastejestro en Kamýk nad Vltavou preparis feroriĉan akvon por siaj somerumantaj gastoj tiumaniere, ke li ĵetadis uzdifektitajn hufumojn en puton.”

”Mi ’dolĉigos’ al vi uzdifektitajn hufumojn! Iru montri al mi la puton, de kie vi havis tiun akvon!”

”Tio estas proksime de ĉi tie, sinjoro leŭtenanto, tuj ĉi tie malantaŭ la ligna budo.”

”Iru antaŭe, kanajlo, por ke mi vidu, kiel vi tenas la paŝon!”

”Tio estas vere stranga,” pensis la leŭtenanto Dub. ”Sur tiu mizera ulo koniĝas absolute nenio!”

Ŝvejk iris do kiel unua, fordonita al la dia volo, sed senĉese io al li diris, ke puto devas tie esti kaj ankaŭ neniel lin surprizis, ke ĝi tie estis. Estis tie eĉ pumpilo, kaj kiam ili al ĝi ĝisiris, Ŝvejk ekpumpis, fluis el ĝi flaveta akvo, tiel ke li povis solene proklami: ”Ĉi tie estas tiu feroriĉa akvo, sinjoro leŭtenanto.”

Konsternita tempiobukla viro proksimiĝis kaj Ŝvejk diris al li germane, ke li alportu glaseton, ke sinjoro leŭtenanto volas trinki.

La leŭtenanto Dub el tio tiel plene idiotiĝis, ke li eltrinkis plenan glason da akvo, post kiu en la buŝo renversiĝis al li gusto de ĉevala urino kaj sterkakvo, kaj tute stultiĝinta per tio, kion li travivis, li donis al la tempiobukla judo pro tiu glaso da akvo kvinkronon, kaj turnante sin al Ŝvejk, diris al li: ”Kial vi ĉi tie gapas, formarŝu hejmen.”

Post kvin minutoj Ŝvejk aperis en la stabvagono ĉe la ĉefleŭtenanto Lukáš, per mistera grimaco ellogis lin el la vagono kaj ekstere al li sciigis: ”Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke post kvin, maksimume post dek minutoj mi estos plene ebriega, sed mi kuŝos en mia vagono, kaj mi petas vin,

sinjoro ĉefleŭtenanto, ke vi min almenaŭ dum tri horoj ne voku kaj ne donu al mi ian ordonon, dum mi el tio dorme nerekonsciiĝos. Ĉio estas en ordo, sed kaptis min sinjoro leŭtenanto Dub, mi diris al li, ke tio estas akvo, mi devis do antaŭ li eltrinki tiun plenan botelon da konjako por pruvi al li, ke temas pri akvo. Ĉio estas en ordo, mi malkaŝis nenion, kiel vi deziris, kaj singarda mi ankaŭ estis, sed nun, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, mi tion jam perceptas, miaj piedoj komencas iel rigidiĝvibri. Kompreneble, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke mi scias drinki, ĉar kun sinjoro feldkurato Katz...”

”Foriru, bestio!” ekvokis la ĉefleŭtenanto Lukáš, sed sen kia ajn kolero, dum la leŭtenanto Dub iĝis por li je kvindek procentoj pli malsimpatia ol antaŭe.

Ŝvejk singarde enrampis en sian vagonon, kaj ekkuŝante sur sia mantelo kaj dorsosako, diris al la ĉefserĝento-kontisto kaj al la ceteraj: ”Foje certa homo ebriegiĝis kaj petis, ke oni lin ne veku...”

Post tiuj ĉi vortoj li renversis sin flanken kaj komencis ronki.

Gasoj, kiujn li eligis, ruktante, baldaŭ plenigis la tutan ĉambron, tiel ke la kuiristo-okultisto Jurajda, enspirante la atmosferon per siaj naztruo, proklamis: ”Sakra, ĉi tie bonodoras konjako.”

Ĉe dismetebla tablo sidis la unujara volontulo Marek, kiu fine post ĉiuj tiuj turmentoj iĝis bataliona kronikisto.

Nun li kunmetis heroajn farojn de la bataliono por provizo kaj vidiĝis, ke tio faras al li grandan ĝojon, tiu rigardo en estonton.

La ĉefserĝento-kontisto Vaněk sekvis kun intereso, kiel la

unuvara volontulo diligente skribas kaj ridas ĉe tio plengorĝe. Tial ankaŭ li leviĝis kaj klinis sin super la unuvara volontulo, kiu komencis al li klarigi: "Tio estas ega amuzo skribi historion de la bataliono por provizo. La ĉefa afero estas, ke oni procedu sisteme. En ĉio devas esti sistemo."

"Sistema sistemo," rimarkis la ĉefserĝento-kontisto Vaněk kun rideto pli malpli malŝata.

"Jes," diris malzorge la unuvara volontulo, "sistemizita, sistema sistemo ĉe verkado de la bataliona historio. Ni ne povas tuj prezentiĝi per granda venko. Tio ĉio devas iri malrapide, laŭ certa plano. Nia bataliono ne povas tuj venki en tiu ĉi mondmilito. Nihil nisi bene<sup>46</sup>. La ĉefa afero por konsekvenca historiisto kia mi, estas unue prepari al si planon de niaj venkoj. Ekzemple ĉi tie mi prezentas, kiel nia bataliono, tio estos proksimume eble post du monatoj, preskaŭ transpaŝos la rusajn limojn, tre multnombre okupitaj fare de, ni diru, malamikaj regimentoj de la rivero Dono, dum kelke da malamikaj divizioj ĉirkaŭiras niajn poziciojn. Unuavide ŝajnas, ke nian batalionon ne eblas savi, ke ili dishakos nin je nudeloj, kiam subite la kapitano Ságner donas al nia bataliono tiun ĉi ordonon: 'Dio ne deziras, ke ni ĉi tie pereu, ni fuĝu!' Nia bataliono komencas do fuĝi, sed malamika divizio, kiu nin jam ĉirkaŭiris, vidas, ke ni propre impetas al ĝi, komencas en teruro forkuri kaj sen unu ekpafo falas en la manojn de niaj armeaj rezervoj. Per tio do propre komenciĝos la tuta historio de nia bataliono. El bagatela okazaĵo, por paroli profete, sinjoro Vaněk, evoluos signifoplenaj aferoj. Nia bataliono paŝas de venko al venko. Estos interese, kiel nia bataliono atakis dormantan malamikon, al kio kompreneble necesas uzi

46 (el la latina): Nenio ol bona



stilon de la 'Ilustrita milita bulteno', kiu aperadis ĉe Vilímek dum la rusa-japana milito. Nia bataliono atakas tendaron de dormantaj malamikoj. Ĉiu nia soldato elserĉas unu malamikon, plenforte puŝegas bajoneton al li en la bruston. Perfekte akriegita bajoneto penetras kiel en buteron kaj nur tie aŭ alie krevas ripo, dormantaj malamikoj skuas la tutan korpon, por momento malfermegas mirigitajn, sed jam nenion vidantajn okulojn, ekstertoras kaj streĉiĝas. Sur la lipoj de dormantaj malamikoj aperas sangaj salivoj, per tio estas la afero finita kaj la venko estas sur la flanko de nia bataliono. Aŭ ankoraŭ pli bona estos tio proksimume post tri monatoj, tiam nia bataliono militkaptos la rusan caron. Sed pri tio ni parolos, sinjoro Vaněk, pli poste, intertempe mi devas provize prepari etajn epizodojn, atestantajn pri senekzempla heroeco. Mi devos elpensi tute novajn militajn terminojn. Unu mi jam trovis, mi skribos pri oferema decidemo de nia viraro, traŝtopita per grenaderoj. Per eksplodo de malamika mino perdos unu el niaj serĝentoj, ni diru de la dekdua aŭ la dektria kompanio, la kapon."

"Á propos," diris la unujara volontulo, ekfrapinte sin ĉe la kapo, "mi preskaŭ forgesis, sinjoro ĉefserĝento-kontisto, aŭ, dirite laŭ la civitana maniero, sinjoro Vaněk, vi devas havigi al mi liston de ĉiuj suboficiroj. — Nomu al mi iujn serĝentojn de la dekdua kompanio. — Ĉu Houska? Bone, Houska do perdos la kapon per tiu mineksplodo, lia kapo forflugos, sed la korpo faros ankoraŭ kelke da paŝoj, alcelos kaj ankoraŭ forpafos malamikan aeroplanon. Tio estas memkomprenbla, ke resonojn de tiuj ĉi venkoj devas en estonto festi familia rondo en Schönbrunn. Aŭstrio havas tre multe da batalionoj, sed unusola bataliono kiu eminentiĝos, tio estas nia, tiel ke nur

pro ĝi oni aranĝos malgrandan intiman familan feston de la imperiestra domo. Mi imagas al mi tion tiel, kiel vi vidas en miaj notoj, ke la arkiduka familio de Maria Valeria<sup>47</sup> transloĝiĝos cele de tio el Wallsee en Schönbrunn. La festo estas pure intima kaj okazas en salonego apud la dormoĉambro de la monarko; la dormoĉambro estas lumigita per blankaj vaksandeloj, ĉar, kiel estas konate, ĉe la imperistra kortego oni ne ŝatas elektrajn ampolojn pro kurtcirkvito, kontraŭ kiu estas la maljuna monarko antaŭjuĝema. La festo honore kaj laŭde al nia bataliono komenciĝas je la sesa horo vespere. En tiu tempo estas enkondukitaj genepoj de Lia Moŝto<sup>48</sup> en la salonegon, kiu propre apartenas al ĉambroj de la karmemora imperiestrino. Nun estas demando, kiu ĉeestos krom la imperistra familio. Devas tie esti kaj estos tie generala adjutanto de la monarko, la grafo Paar<sup>49</sup>. Ĉar ĉe tiaj familiaj kaj intimaj festenoj de tempo al tempo iu sentas sin duonsvene, per kio mi kompreneble ne volas diri, ke la grafo Paar eble survomiĝos, oni postulas ĉeeston de persona kuracisto, kortega konsilisto doktoro Kerzl<sup>50</sup>. Cele de ordo, por ke kortegaj lakeoj eble ne permesu al si iajn intimaĵojn al kortegaj damoj, ĉeestantaj la festenon, aperas la plej supera kortegestro barono Lederer, ĉambelano grafo Bellegarde kaj la plej supera kortega damo, grafino Bombelles, kiu ludas inter la kortegaj damoj la saman rolon kiel la prostituistino en la bordelo 'Ĉe Ŝuha'.

47 filino de la imperiestro Francisko Jozefo la unua kaj la imperiestrino Elizabeta

48 en la jaro 1914 la Habsburga genero havis 32 arkidukojn kaj 43 arkidukinojn, el kiuj proksimume 12 estis genepoj de la imperiestro

49 Eduardo Paar, generalo, adjutanto de Francisko Jozefo la unua

50 Jozefo Kerzl, persona kuracisto de Francisko Jozefo la unua, en la jaro 1915 aĝis jam 74 jarojn

Kiam la nobla gesinjararo amasiĝis, estis pri tio informita la imperiestro, kiu poste aperis en akompano de siaj genepoj, eksidis malantaŭ la tablo kaj tostis honore al nia marŝbataliono. Post li prenis al si la vorton la arkidukino Maria Valeria, kiu laŭdparole mencias precipe vin, sinjoro ĉefserĝento-kontisto. Kompreneble, ke laŭ miaj notoj nia bataliono suferos grandajn kaj senteblajn perdojn, ĉar bataliono sen mortintoj ne estas vera bataliono. Necesos ankoraŭ prepari novan artikolon pri niaj mortintoj. Historion de la bataliono ne povas formi nur koncizaj faktoj pri venkoj, da kiuj proksimume kvardek du mi havas jam anticipe notita. Ekzemple vi, sinjoro Vaněk, falos ĉe rivereto, kaj Baloun, kiu tiel strange al ni gapas, tiu mortos tute alie ol per kuglo, ŝrapnelo aŭ grenado. Li estos strangolmortigita per lazo, ĵetegita el malamika aeroplano ĝuste en tiu momento, kiam li voros tagmanĝon de sia ĉefleŭtenanto Lukáš.”

Baloun regresis, malespere eksvingis la manojn kaj afliktite diris: ”Sed mi ne kulpas pri mia karaktero. Kiam mi soldatis ankoraŭ aktive, mi aperis eĉ trifoje ĉe la kuirejo por manĝo, dum oni min ne malliberigis. Foje mi havis al la tagmanĝo trifoje ripon, pro kiu mi sidis en malliberejo la tutan monaton. Okazu la dia volo.”

”Ne timu, Baloun,” konsolis lin la unujara volontulo, ”en historio de la bataliono ne estos mencio, ke vi pereis ĉe vojaĵo dumvoje de la oficira kuirejo en tranĉeojn. Vi estos nomita kune kun ĉiuj viroj de nia bataliono, kiuj falis por gloro de nia imperio, kiel ekzemple la ĉefserĝento-kontisto Vaněk.”

”Kian morton vi por mi destinas, Marek?”

”Ne rapidu tiom, sinjoro ĉefserĝento-kontisto, tiel rapide tio ne iras.”

La unujara volontulo ekpensis: "Vi devenas de Kralupy, ĉu ne vere; skribu do hejmen, al Kralupy, ke vi malaperos sen postsigno, sed skribu iel singarde. Aŭ vi deziras esti grave vundita, resti kuŝi malantaŭ pikdrataj bariloj? Kun rompita kruro vi tiel bele kuŝas la tutan tagon. Nokte la malamiko lumigas nian pozicion per reflektoro kaj rimarkas vin; li opinias, ke vi gvatas, komencas ĵetegi kontraŭ vi grenadojn kaj ŝrapnelojn. Vi faris grandegan servon por la armeo, ĉar la malamika soldataro elĉerpis por vi tian kvanton da municio kiel por la tuta bataliono, kaj viaj korpopartoj, libere ŝvebantaj en la aero post ĉiuj tiuj eksplodoj, trarompante ĝin per sia rotacio, zumas kanton pri glora venko. Mallonge kaj bone, ĉiu ĝisatendos kaj ĉiu el nia bataliono eminentiĝos, tiel ke gloraj paĝoj de nia historio estos troplenigitaj per venkoj — kvankam tre nevolonte mi tion troŝtopus, sed mi ne povas min helpi, ĉio devas esti farita ĝisfunde, por ke restu post ni memoro, antaŭ ol, ni diru en la monato septembro, restos el nia bataliono tute nenio ol tiuj gloraj paĝoj de la historio, kiuj parolos al la koroj de ĉiuj aŭstroj, ke certas, ke ĉiuj tiuj, kiuj jam ne ekvidos sian hejmon, batalis same brave kaj kuraĝe. Finon de tio mi jam verkis, sciu, sinjoro Vaněk, de tiu nekrologo. Honoron al la memoro de falintoj! Ilia amo al la monarkio estas amo la plej sankta, ĉar ĝi kulminis en morto. Iliajn nomojn oni elparolu kun estimo, kiel ekzemple Vaněk. Tiuj, kiujn la perdo de pandonantoj tuŝis la plej senteble, fiere deviŝu siajn larmojn, ĉar la falintoj estis herooj de nia bataliono."

La telefonisto Chodounský kaj la kuiristo Jurajda kun granda intereso aŭskultis parolon de la unujara volontulo pri la preparata historio de la bataliono.

”Iru pli proksimen, sinjoroj,” diris la unujara volontulo, foliumante en siaj notoj, ”paĝo 15: ’La telefonisto Choudounský falis la trian de septembro samtempe kun la bataliona kuiristo Jurajda.’ Aŭdu plu miajn notojn: ’Senekzempla heroeco. Tiu unua, riskante sian vivon, savas telefonan draton en sia kaŝejo, ne estante jam tri tagojn anstataŭita ĉe telefono. — La alia, vidante minacantan danĝeron, ke la malamiko povus ĉirkaŭiri nin de flanko, ĵetegas sin kontraŭ la malamiko kun kaldrono da varmega supo, disemante ĉe la malamiko teruron kaj brogvundojn. — Bela morto de ili ambaŭ. La unua disŝirita de mino, la alia sufokita per venenaj gasoj, kiujn oni ŝovis al li sub la nazon, kiam li havis jam nenion per kio sin defendi. — Ambaŭ pereas kun ekkrio: ’Vivu nia bataliona komandanto!’ La ĉefkomandantaro ne povas agi alie ol ĉiutage alporti al ni dankesprimojn en formo de tagordono, por ke ankaŭ aliaj trupoj de nia armeo sciu pri kuraĝo de nia bataliono kaj prenu al si de ni ekzemplon. Mi povas legi al vi fragmenton de arma ordono, kiun oni legos al ĉiuj armeaj taĉmentoj kaj kiu tre similas al la ordono de la arkiduko Karolo, kiam tiu en la jaro 1805 staris kun sia soldataro antaŭ Padova kaj la sekvantan tagon post tiu ordono ricevis neenvindan batadon. Aŭskultu do, kion oni legos pri nia bataliono kiel pri heroa korpuso ekzemplodona por ĉiuj armeaj trupunuoj: ’... Mi esperas, ke la tuta armeo prenos al si ekzemplon de la supre menciita bataliono, precipe ke ĝi ekposedos tiun spiriton de memkonfido kaj kuraĝo, de forta nesuperebleco en danĝero, de tiu ekzempla heroeco, amo kaj konfido al siaj superuloj, ĉar tiuj ĉi virtoj, per kiuj la bataliono elstaras, gvidas ĝin al admirindaj faroj, al bonfarto kaj venko de nia imperio. Ĉiuj sekvu ĝian ekzemplon!’ ”

De la loko, kie kuŝis Ŝvejk, oni aŭdis, kiel li ekoscedis kaj parolas el dormo: "En tio vi pravas, sinjorino Müller, ke la homoj estas al si similaj. En Kralupy konstruis pumpilojn certa sinjoro Jaroš, kiu similis al horloĝisto Lejhanz el Pardubice kvazaŭ li elfalus al li el la okulo kaj tiu estis okulfrape simila al Piskor el Jičín, kaj ĉiuj kvar kune similis al nekonata memmortiganto, kiun oni trovis pendumita kaj tute disfalinta en lago ĉe Jindřichův Hradec, ĝuste tuŝapude sub trako, kie li ŝajne ĵetegis sin sub trajnon<sup>51</sup>." Eksonis nova oscedo kaj poste ankoraŭ aldono: "Poste tiujn ĉiujn ceterajn oni kondamnis al alta monpuno kaj morgaŭ kuiru al mi, sinjorino Müller, nudelojn -." Ŝvejk renversis sin sur la alian flankon kaj plu ronkis, dum inter la kuiristo-okultisto Jurajda kaj la unujara volontulo ekis interparolo, koncernanta la aferojn en estonto.

La okultisto Jurajda opiniis, ke kvankam ĉe la unua vido ŝajnas esti sensenca, se la homo pro ŝerco skribas pri io, kio okazos en estonto, tamen certas, ke eĉ tia ŝerco tre ofte enhavas profetajn faktojn, kiam spiritaj okuloj sub influo de misteraj fortoj superas kurtenon de nekonata estonto. De tiu momento la parolo de Jurajda superabundis je 'kurtenoj'. Lia kurteno de estonto aperis en ĉiu dua frazo, ĝis fine li venis eĉ al regenerado, t.e. al reproduktado de la homa korpo, enmiksitis en tion la kapablon de korpa reproduktado ĉe infuzorioj, finis per proklamo, ke al lacerto ĉiu homo povas forŝiri la voston kaj tiu al ĝi denove elkreskos.

51 Jaroslav Hašek verkis haste kaj neniam aŭ preskaŭ neniam kontrolis, kion li skribis; de tie devenas la mencio pri "ĉiuj kvar", kvankam en la sama frazo li parolas pri tri nomoj, kaj ankaŭ stranga aserto de Ŝvejk, ke iu poste aŭ samtempe sin pendumis, saltis en lagon kaj ĵetegis sin sub trajnon.

La telefonisto Chodounský al tio rimarkis, ke la homoj ĝojus, se ĉe ili estus ebla tio, kio ĉe lacerto koncerne ĝian voston. Kiel ekzemple, ni diru, en la milito, al iu forŝiros tio la kapon aŭ aliajn korpopartojn kaj por la arma administrantaro estus tia afero ege bonvena, ĉar ne ekzistus invalidoj. Tia unu aŭstra soldato, al kiu senĉese kreskus piedoj, manoj, kapoj, estus certe pli valora ol la tuta brigado.

La unujara volontulo proklamis, ke en la nuna tempo, dank' al evoluinta milita tekniko, eblas la malamikon sukcese dispartigi ekzemple eĉ je tri transversaj partoj. Ekzistas natura leĝo pri korporeprodukto de ciliuloj el la genro de infuzorioj; ĉiu duonigita parto renoviĝas, ricevas novajn organojn kaj kreskas memstare kiel ciliulo. Analoge post ĉiu batalo la aŭstra soldataro, partopreninta tiun ĉi batalon, triobliĝus, dekobliĝus, al ĉiu piedo evoluigis nova, freŝa infanteriano.

"Se aŭdus vin Ŝvejk," rimarkis la ĉefserĝento-kontisto Vaneĥ, "tiu dirus al ni almenaŭ ian ekzemplon."

Ŝvejk reagis al sia nomo, ekmurmuris: "Ĉi tie," kaj denove plu ronkis, elbuŝiginte tiun ĉi esprimon de soldata disciplino.

Inter duone malfermita pordo de la vagono aperis la kapo de la leŭtenanto Dub.

"Ĉu estas ĉi tie Ŝvejk?" li demandis.

"Li dormas, obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto," respondis la unujara volontulo.

"Se mi pri li demandas, unujara volontulo, vi devas tuj salti kaj alvoki lin."

"Tio ne eblas, sinjoro leŭtenanto, li dormas."

"Veku lin do! Mi miras, ke tio tuj ne venis al vi en la menson, unujara volontulo! Vi devas ja montri pli da komplezo al

viaj superuloj! Ĉu vi min ankoraŭ ne konas? — Sed kiam vi min ekkonos. —”

La unujara volontulo komencis veki Ŝvejkon.

”Ŝvejk, brulas, leviĝu!”

”Kiam tiame brulis la muelejoj de Odkolek,” ekmurmuris Ŝvejk, turnante sin denove al la alia flanko, ”alveturis fajrobri-gadanoj eĉ el Vysočany...”

”Bonvolu vidi,” diris la unujara volontulo afable al la leŭtenanto Dub, ”ke mi lin vekas, sed ke tio ne eblas.”

La leŭtenanto Dub ekkoleris. ”Kia estas via nomo, unujara volontulo? — Ĉu Marek? — Aha, vi estas do tiu unujara volontulo Marek, kiu senĉese sidis en malliberejo, ĉu jes?”

”Jes, sinjoro leŭtenanto. Mi trapasis unujaran kurson, tiel dirite, en malliberejo kaj oni min retrodegradis, tio estas post mia liberlaso de la divizia juĝejo, kie montriĝis mia senkulpeco, mi estis nomumita bataliona kronikisto kun konservita rango de unujara volontulo.”

”Tio vi ne estos longe,” kriegis la leŭtenanto Dub, tute ruĝa en la vizaĝo; tiu transiro de unu koloro en la alian faris impreson, ke la vangoj ŝvelas al li post vangobatoj, ”mi tion aranĝos!” .

”Mi petas, sinjoro leŭtenanto, ke mi estu alkondukita al raporto,” serioze diris la unujara volontulo.

”Ne ludu kun mi,” diris la leŭtenanto Dub. ”Mi montros al vi raporton! Ni ankoraŭ renkontiĝos, sed poste tio terure vin ĉagrenos, ĉar vi min ekkonos, se nun vi min ankoraŭ ne konas!”

La leŭtenanto Dub kolere foriris de la vagono, en ekscitiĝo forgesinte je Ŝvejk, kvankam antaŭ momento li havis la plej bonan intencon alvoki Ŝvejkon kaj diri al li: ”Elspiru sur min!”



kiel la lastan rimedon por konstati neleĝan alkoholismon de Ŝvejk. Sed nun estis jam malfrue, ĉar intertempe oni disdonis al la viraro nigran kafon kun rumo, kaj kiam li post duonhoro revenis al la vagono, Ŝvejk jam maldormis kaj post alvoko de la leŭtenanto Dub elsaltis el la vagono kiel kapreolino.

”Elspiru sur min!” alkriegis lin la leŭtenanto Dub.

Ŝvejk elspiris sur lin la tutan stokon de sia pulmo, kiel se varma vento kunportas al kampoj odoron de alkohola distilejo.

”Kion oni el vi flarsentas, ulo?”

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke el mi oni flarsentas rumon.”

”Vidu do, knabeto!” venke ekvokis la leŭtenanto Dub. ”Fine mi vin kaptis!”

”Jes, sinjoro leŭtenanto,” diris Ŝvejk sen kia ajn signo de maltrankviliĝo. ”Al kafo ni ĝuste ricevis rumon kaj mi unue eltrinkis rumon. Sed se, sinjoro leŭtenanto, ekzistas nova ordono, ke unue oni trinku kafon kaj nur poste rumon, mi petas pardonon, venontfoje tio jam ne okazos.”

”Kaj kial vi dormaĉis, kiam mi estis antaŭ duonhoro ĉe la vagono? Oni ja ne povis vin vekii.”

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, la tutan nokton mi ne dormis, ĉar mi rememoris tiun tempon, kiam ni ankoraŭ faris manovrojn ĉe Veszprém. Tiam supozata unua kaj dua arma korpuso marŝis tra Stirio kaj okcidenta Hungario kaj ĉirkaŭigis nian kvaran korpuson, kiu tendumis en Vieno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, tie ĉie ni havis fortikaĵojn, sed ili nin ĉirkaŭiris kaj venis ĝis ponto, kiun konstruis pioniraro de la dekstra bordo de Danubo. Estis destinite, ke ni faru ofensivon kaj ke

venu al ni helpi soldataroj de norde kaj poste ankaŭ de sude, de Osek. Tion oni legis al ni en tagordono, ke kiel helpo marŝas al ni tria armea korpuso, por ke oni ne disbatu nin inter Balatono kaj Bratislava, kiam ni atakimpetos kontraŭ la dua armea korpuso. Sed tio estis vana; kiam ni jam preskaŭ venkis, oni trumpetis finon kaj venkis tiuj kun blankaj rubandoj<sup>52</sup>.”

La leŭtenanto Dub ne diris eĉ unu vorton kaj en embarasoj foriris skuante la kapon, sed de la stabvagono li tuj revenis kaj diris al Ŝvejk: ”Memoru ĉiuj, ke venos la tempo, kiam vi antaŭ mi plorblekos!” Li ne kapablis elpensi ion pli kaj foriris denove al la stabvagono, kie la kapitano Ságner ĝuste ekzamenis malfeliĉulon de la dekdua kompanio, kiun alkondukis ĉefserĝento Strnad, ĉar la soldato komencis jam nun zorgi pri sia sekureco en tranĉeoj kaj de ie el la stacio altrenis por deton de porkejo, garnitan per lado. Li staris ĉi tie nun embarasita, kun larĝe malfermitaj okuloj, senkulpigante sin, ke li volis kunpreni tion en tranĉeojn kontraŭ ŝrapneloj, ke li volis sin sekurigi.

Tion eluzis la leŭtenanto Dub al longa prediko pri tio, kiel la soldato konduku, kiuj estas liaj devoj al la patrujo kaj la monarko, la plej alta komandanto kaj la plej alta militestro. Sed se ĉe la bataliono ekzistas tiaj elementoj, ke tiujn necesas forigi, puni kaj malliberigi. Tiu babilado estis tiel malbongusta, ke la kapitano Ságner frapetis la ŝultron de la kulpigito kaj diris al li: ”Ĉefe ke vi pensis tion bone, venontfoje

52 aŭstraj soldatoj estis ĉe manovroj dividitaj en du 'malamikajn' partojn. Kiel eksteran distingilon ili havis rubandon ĉirkaŭ la kepo, unua parto ruĝan kaj la alia blankan

tion ne faru, tio estas de vi stultaĵo, tiun pordeton redonu denove reen, kie vi ĝin prenis, kaj iru al ĉiuj diabloj!”

La leŭtenanto Dub ekmordetis la lipojn kaj decidiĝis, ke propre de li dependas la tuta savo de disfalanta disciplino ĉe la bataliono. Tial li ankoraŭfoje ĉirkaŭris la tutan spacon de la fervoja stacio, kaj ĉe magazeno, kie estis granda hungara-germana surskribo, ke tie estas malpermesite fumi, li trovis soldaton, kiu tie sidis kaj legis gazeton, malantaŭ kiu li estis tiel kaŝita, ke oni ne vidis liajn ŝultrosignojn. Li ekkriis al li ”Atenton!”, ĉar temis pri viro de hungara regimento, kiu estis en Humenné kiel rezervo.

La leŭtenanto Dub lin ekskuis, la hungara soldato leviĝis, eĉ ne trovis konvena soldatsaluti, li ŝovis nur gazeton en poŝon kaj iris direkte al ŝoseo. La leŭtenanto Dub sekvis lin kiel en duonkonscio, sed la hungara soldato plirapidigis la paŝon kaj poste, turninte sin, moke levis la manojn supren, por ke la leŭtenanto Dub ne estu eĉ momenton en duboj, ke la soldato tuj ekkonis lian apartenecon al unu el ĉeĥaj regimentoj. Poste la hungaro tuj trote malaperis inter proksimaj kabanoj malantaŭ la ŝoseo.

Por iel montri, ke kun tiu ĉi sceno li havas nenion komunan, la leŭtenanto Dub majeste eniris malgrandan butikon ĉe la ŝoseo, konfuze montris al granda bobeno da nigraj fadenoj, ŝovis ilin en poŝon, pagis kaj revenis en la stabvagonon, kie de la bataliona kuriero li igis alvoki sian servosoldaton Kurnert, al tiu transdonis la fadenojn kaj diris: ”Mi devas pri ĉio zorgi, mi scias, ke fadenojn vi forgesis.”

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke ni havas da ili la tutan dekduon.”

”Montru do ilin al mi tuj, kaj zorgu tuj esti ĉi tie kun ili. Ĉu vi opinias, ke mi al vi kredas?”

Kiam Kunert revenis kun la tuta skatolo da blankaj kaj nigraj fadenoj, la leŭtenanto Dub diris: ”Jen, ulo, rigardu bone tiujn fadenojn, kiujn vi alportis, kaj tiun mian grandan bobenon! Vidu, kiel viaj fadenoj estas maldikaj, kiel ili facile ŝiriĝas, kaj nun rigardu tiujn miajn, kia tio estas peno ilin traŝiri. Sur batalkampo ni ne bezonas fuŝaĵojn, sur batalkampo ĉio devas esti solida. Kunprenu do kun vi denove ĉiujn tiujn fadenojn, atendu miajn ordonojn kaj memoru, venontfoje faru nenion memstare laŭ via kapo kaj venu min demandi, kiam vi ion aĉetas! Ne deziru min ekkoni, vi min ankoraŭ ne konas de tiu malbona flanko.”

Kiam Kunert foriris, la leŭtenanto Dub turnis sin al la ĉefleŭtenanto Lukáš: ”Mia servosoldato estas tre inteligenta homo. De tempo al tempo li faras eraron, sed alie li tre bone komprenas. Lia ĉefa avantaĝo estas lia absoluta honesteco. En Bruck mi ricevis sendaĵon de mia bofrato el kamparo, kelke da rostitaj junaj anseroj, kaj ĉu vi kredus, ke li ilin eĉ ne tuŝis, kaj ĉar mi ne povis rapide ilin formanĝi, li preferis lasi ilin malbonodoriĝi. Tion kompreneble faras disciplino. La oficiro devas la soldatojn eduki.”

La ĉefleŭtenanto Lukáš, por montri, ke li ne aŭskultas babiladon de tiu idioto, turnis sin al fenestro kaj diris: ”Jes, hodiaŭ estas merkredo.”

La leŭtenanto Dub, sentante bezonon almenaŭ pri io paroli, turnis sin do al la kapitano Ságner, al kiu li diris per pure familiara, kamaradeca tono: ”Aŭdu, kapitano Ságner, kion vi opinias...”

”Pardonu, momenton,” diris la kapitano Ságner kaj eliris el la vagono.

\*

Intertempe Ŝvejk rakontis al si kun Kunert pri lia sinjoro.

”Kie vi estis dum la tuta tempo, ke oni vin eĉ ne vidis?” demandis Ŝvejk.

”Vi ja scias,” diris Kunert. ”Tiu mia maljuna frenezulo prezentas por mi senĉese laboron. Tiu ĉiumomente vokas min al si kaj demandas pri aferoj, kiuj min ne tuŝas. Li min ankaŭ demandis, ĉu mi estas via kamarado, kaj mi al li diris, ke ni vidas unu la alian nur malofte.”

”Tio estas tre bela de li, ke li pri mi demandas. Mi amas lin tre, tiun vian sinjoron leŭtenanton. Li estas tia bonkora, bonanima kaj al la soldatoj li kondutas kiel vera patro,” diris Ŝvejk serioze.

”Ej, tio estas nur via opinio,” kontraŭstaris Kunert, ”li estas vera bestio kaj stulta kiel merdo. Mi havas lin kiel oston en la gorĝo, li senĉese min nur ĉikanas.”

”Sed ne diru,” miris Ŝvejk, ”mi ja opiniis, ke li estas vere tia bonanima homo, vi parolas iel strange pri via leŭtenanto, sed tio estas jam natura ĉe ĉiuj servosoldatoj. Kiel tiu servosoldato de la majoro Wenzl, tiu pri sia sinjoro ne parolas alie ol ke tiu estas damninda, idiota stultulo, kaj la servosoldato de la kolonelo Schröder, kiam tiu parolis pri sia sinjoro, li ne nomis lin alie ol urinaĉiĝinta kanajlo kaj fetora fetorulo. Tio devenas de tio, ke ĉiu servosoldato ellernis tion de sia sinjoro. Se la sinjoro mem ne insultus, la servosoldato tion post li ne ripetus. En Budějovice servis aktive leŭtenanto Procházka, tiu ne insultis multe, al sia servosoldato li diris nur: ’Ĉarma bo-

vino'. Alian insulton tiu servosoldato, certa Hibman, de li ne aŭdis. Hibman alkutimiĝis al tio tiel, ke kiam li revenis en civilan vivon, li diris al sia paĉjo, panjo kaj fratinoj: 'Ĉarma bovino', kaj li diris tion ankaŭ al sia fianĉino, tiu kun li disiĝis kaj akuzis lin pro honorofendo, ĉar li diris tion al ŝi, ŝia paĉjo kaj panjo tute publike ĉe dancamuzo. Kaj ŝi ne pardonis al li tion kaj antaŭ juĝisto ankaŭ diris, ke se li nomus ŝin bovino ie flanke, ke ŝi eble konsentus kun repaciĝo, sed tiel ĉi ke tio estas eŭropa malhonoro. Dirite inter ni, Kunert, tion pri via leŭtenanto mi neniam pensus. Li faris sur mi simpatian impreson jam tiam, kiam mi parolis kun li la unuan fojon, kiel kolbasetoj ĵus eltiritaj el fumaĵejo, kaj kiam mi parolis kun li la duan fojon, li ŝajnis al mi esti tre legosperta kaj tia animita. — De kie vi propre devenas? Ĉu rekte de Budějovice? Tio al mi plaĉas, se iu estas rekte de ie. — Kaj kie vi tie loĝas? Ĉu sub la arkadoj? Tio estas bone, somere estas tie almenaŭ malvarmete. Ĉu vi havas familion? — Ĉu edzinon kaj tri infanojn? — Vi estas feliĉulo, kamarado, ekzistas almenaŭ iu, kiu vin priploros, kiel ĉiam dum prediko diris mia feldkurato Katz, kaj tio estas ankaŭ vero, ĉar foje mi aŭdis parolon de iu kolonelo al rezervuloj en Bruck, kiuj veturis de tie en Serbion, ke soldato, kiu postlasas hejme familion kaj falos sur batal-kampo, ke tiu unuflanke ŝiras ĉiujn familiajn rilatojn — li diris tion propre tiel ĉi: 'Kjam morta, de familia morta, famili rilat rompi, li esti heroa, ĉar oferi sja viva por grant familia, por patruja.' — Ĉu vi loĝas en la kvara etaĝo? — Ke en la teretaĝo? — Vi pravas, nun mi rememoris, ke tie, sur la placo en Budějovice, ne estas eĉ unu kvaretaĝa domo. — Ĉu vi do jam foriras? — Aha, via sinjoro staras antaŭ la stabvagono kaj rigardas ĉi tien. Se do li vin demandas, ĉu mi eble ne parolis

ankaŭ pri li, diru al li tute senĝene, ke mi pri li parolis, kaj ne forgesu al li diri, kiel bele mi pri li parolis, ke nur malfote mi renkontis tian oficiron, kiu kondukis tiel amike kaj patre kiel li. Ne forgesu al li diri, ke li ŝajnas al mi esti tre legosperta, kaj sciigu al li ankaŭ, ke li estas tre inteligenta. Diru al li ankaŭ, ke mi vin admonis, ke vi bonkonduku kaj faru al li ĉion, kion vi vidos en liaj okuloj. Ĉu vi tion memoras?”

Ŝvejk eniris la vagonon kaj Kunert kun la fadenoj foriris denove en sian kuŝejon.

Post kvaronhoro oni veturis plu al Vyšné Čabiny tra forbruligitaj vilaĝoj Brestov kaj Radvaň. Vidiĝis, ke ĉi tie tio jam pliakriĝis.

Karpataj herbejoj kaj deklivoj estis disfositaj de tranĉeoj, trenantaj sin de valo al valo laŭlonge de trako kun novaj ŝpaloj, ambaŭflanke grandaj truoj post grenadoj. Ie trans riveretojn enfluantajn Laborec, kies supran fluon sekvis la fervoja linio, vidiĝis novaj montoj kaj duonbruligitaj traboj de iamaj pontaj transirejoj.

La tuta valo direkte al Medzilaborce estis disfosita kaj transversita, kvazaŭ ĉi tie laborus armeoj de grandegaj talpoj. La ŝoseo malantaŭ rivereto estis disfosita, disbatita kaj apude vidiĝis tretdifektitaj areoj, kiel ruliĝis la soldataroj.

Akvofluoj kaj pluvoj malkovris sur rando de postgrenadaj truoj disŝiritajn, ĉifonitajn aŭstrajn uniformojn.

Malantaŭ Vyšné Čabiny inter kunplektitaj branĉoj de maljuna duonbruligita pinarbo pendis boto de aŭstra infanteriano kun peco da tibio.

Oni vidis arbarojn sen foliaro, sen pinglaro, kiel furiozis ĉi tie artileria fajro, arbojn sen pintoj kaj dispaŝitajn solkabanonjn.

La trajno veturis malrapide sur freŝe konstruitaj talusoj, tiel ke la tuta bataliono povis funde percepti kaj gustumi militajn ĝojojn kaj ĉe rigardo al soldataj tombejoj kun krucoj, kiuj blankiĝis sur altaĵetoj eĉ sur detruitaj deklivoj, prepari sin malrapide, sed certe por la kampo de gloro, kiu finiĝas per kotkovrita aŭstra kepo, flirtanta sur blanka kruco.

Germanoj de Kaŝperské Hory, kiuj sidis en malantaŭaj vagonoj kaj ankoraŭ en Milovice ĉe enveturo en la stacion kriegis: "Mi revenos, kiam reen mi revenos...", ekde Humenné tute silentiĝis, ĉar ili ekkonsciis, ke multaj el tiuj, kies kepoj estas sur tomboj, kantis la samon pri tio, kiel tio estos bela, kiam ili denove revenos kaj restos senĉese hejme kun sia amatino.

En Medzilaborce oni haltis malantaŭ dispaŝita, forbruligita stacidomo, el kies fulgokovritaj vandoj elstaris torditaj fertraboj.

Nova longa ligna barako, rapide konstruita anstataŭ la forbruligita stacidomo, estis kovrita per aŝiĝoj en ĉiuj lingvoj: "Subskripciu la aŭstran militan monprunton!"

En alia longa barako estis ankaŭ stacio de la Ruĝa Kruco, de kie eliris du flegistinoj kun dika soldatkuracisto kaj plengorĝe ridis al la kuracisto, kiu imitis diversajn bestajn sonojn por ilin gajigi kaj sensukcese gruntis.

Sub fervoja taluso, en valo de rivereto, kuŝis disbatita militkuirejo. Montrante al ĝi, Ŝvejk diris al Baloun: "Rigardu, Baloun, kio nin atendas en la proksima estonto. Oni ĝuste preparis sin por disdoni manĝon, en tiu momento alflugis grenado kaj tiel ĉi ĝin ruinigis."

"Tio estas terura," ekĝemis Baloun, "mi nenim ekpensis, ke atendas min io simila, sed per tio kulpis tiu mia fiereco, ja



dum la lasta vintro mi, bastardo, aĉetis en Budějovice ledajn gantojn. Jam ne sufiĉis al mi porti sur miaj kampilistaj manaĉoj malnovajn plektitajn gantojn, kiajn portis la mortinto patro, mi senĉese malsanis nur je tiuj ledaj por urbanoj. — La patro voris trempitan pizon, kaj mi pizon eĉ vidi ne volis, nur kortbirdaron. Eĉ ordinara porkaĵo ne bonodoris al mi sub la nazo; la mastrino devis ĝin por mi prepari, dio min ne punu, sur biero.”

Baloun en absoluta senespero komencis ĝeneralan konfesion: ”Mi blasfemis kontraŭ diaj sanktuloj kaj sanktulinoj, en gastejo ĉe Malše kaj en Dolní Záhájí mi batregalis vikarion. Je Dio mi ankoraŭ kredis, tion mi nemalkonfesas, sed pri sankta Jozefo mi dubis. En la domo mi toleris ĉiujn sanktulojn, nur la bildeto de sankta Jozefo, tiu devis esti for, kaj tiel do sinjoro dio punis min nun pro ĉiuj tiuj miaj pekoj kaj pro mia malmoraleco. Kiom da tiaj malmoralajoj mi faris en la muelĉambro, kiel ofte mi insultis mian bopatron, maldolĉigis al li la maljunaĝon kaj ĉikanis mian edzinon!”

Ŝvejk ekpensis: ”Vi estas ja muelisto, ĉu? — Vi do povis scii, ke la muelŝtonoj de Dio muelas malrapide, sed certe, se pro vi eksplodis tiu mondmilito.”

La unujara volontulo enmiksitis sin en la interparolon: ”Per tiu blasfemado, Baloun, kaj nerekonado de ĉiuj sanktuloj kaj sanktulinoj vi faris al vi nepre malbonan servon, ĉar vi devas scii, ke nia aŭstra armeo estas jam longajn jarojn armeo pure katolika, havante la plej brilan ekzemplon en nia la plej supera soldatestro. Kiel vi propre povas aŭdaci kun veneno de malamo al iuj diaj sanktuloj kaj sanktulinoj iri en batalon, kiam de la ministerio de milito estis ĉe garnizonaj komandeejoj enkondukitaj jezuitaj predikoj por sinjoroj oficiroj kaj kiam

ni vidis la solenaĵon de soldata reviviĝo? Ĉu vi komprenas min bone, Baloun? Ĉu vi komprenas, ke vi fakte faras ion kontraŭ la glora spirito de nia glora armeo? Kiel per tiu sankta Jozefo, pri kiu vi menciis, ke vi ne toleris lian bildeton ĉe vi en la ĉambro. Li estas ja, Baloun, propre patrono de ĉiuj tiuj, kiuj volas eskapi el la soldatservo. Li estis ĉarpentisto, kaj vi konas ja la devizon: 'Ni rigardu, kie la ĉarpentisto lasis truon.' Kiom da homoj iris jam kun tiu devizo en kaptitecon — vidante tion necesa, kiam ĉirkaŭigitaj de ĉiuj flankoj ili klopodis savi ne eble sin el egoista vidpunkto, sed sin kiel membron de la armeo, por ke poste, kiam ili revenos el kaptiteco, ili povus diri al sinjoro imperiestro: ni estas ĉi tie kaj atendas pluan ordonon! Ĉu vi do tion komprenas, Baloun?"

"Mi ne komprenas," ekĝemis Baloun, "mi havas la kapon stulta. Al mi oni ripetu ĉion dekfoje."

"Ĉu vi ne dekalkulos iom?" demandis Ŝvejk, "mi do klarigos al vi tion ankoraŭfoje. Ĉi tie vi aŭdis, ke vi devas teni vin laŭ tio, kia spirito regas en la armeo, ke vi kredos je sankta Jozefo, kaj se vi estos ĉirkaŭigita de malamikoj, ke vi rigardos, kie la ĉarpentisto lasis truon, por ke vi savu vin por sinjoro imperiestro, por novaj militoj. Nun vi eble tion komprenas kaj vi faros bone, se vi pekokonfesos al ni iom pli detale, kiajn malmoralajojn vi faris en tiu muelĉambro, sed ne ke vi poste rakontu al ni ion similan kiel en anekdoto pri tiu servoknabino, kiu iris pekokonfesi al sinjoro parokestro kaj poste, kiam ŝi jam diris diversajn pekojn, ŝi komencis honti kaj diris, ke ĉiunokte ŝi faris malmoralajojn. Kompreneble, kiel sinjoro parokestro tion ĉi ekaŭdis, tuj komencis flui al li salivoj el la buŝo kaj li diris: 'Nu, ne hontu, kara filino, mi estas ja sur la loko de dio, kaj rakontu al mi bele detale pri viaj mal-

moralajoj.’ Kaj ŝi komencis tie plori, ke ŝi hontas, ke tio estas terura malmoralajo, kaj li denove ŝin atentigis, ke li estas spirita patro. Fine post longa hezitado ŝi komencis per tio, ke ŝi ĉiam senvestiĝis kaj enrampis en la liton. Kaj li denove ne povis eldeveni el ŝi eĉ unu vorton kaj ŝi nur komencis ploreĝi ankoraŭ pli. Li do denove, ke ŝi ne hontu, ke la homo estas pekanta ujo de sia natureco, sed la dia graco estas senfina. Ŝi do decidiĝis kaj diris kun ploro: ’Kiam mi do senvestita enlitiĝis, mi komencis elprenadi malpuraĵon el inter la piedfingroj kaj mi flaris al tio.’ Tio do estis ŝia tuta malmoralajo. Sed mi esperas, Baloun, ke tion ĉi vi ne faris en la muelĉambro kaj ke vi diros al ni ion pli realan, ian veran malmoralajojn.”

Sciigis, ke Baloun laŭ sia proklamo faris malmoralajojn en la muelĉambro kun kampistinoj, kio kuŝis en tio, ke li miksis al ili farunon, kion li en sia spirita naiveco nomis malmoralajo. Pleje seniluziigita estis la telegrafisto Chodounský kaj demandis lin, ĉu li vere faris nenion kun la kampistinoj sur sakegoj da faruno en la muelĉambro, al kio Baloun respondis, balancante la manojn: ”Por tio mi estis tro stulta.”

Al la viraro estis anoncite, ke la tagmanĝo estos malantaŭ Palota en Ľupkowska-intermonto, kaj en la civiton Medzilaborce ankaŭ foriris la bataliona ĉefseĝento-kontisto kun kompaniaj kuiristoj kaj leŭtenanto Cajthaml, kiu zorgis pri mastromado de la bataliono. Al ili oni destinis kvar virojn kiel patrolon.

Ili revenis eĉ ne post duonhoru kun tri porkoj, alligitaj ĉe malantaŭa kruro, krieganta familio de hungara ruso, al kiu oni rekviziis la porkojn, kaj dika soldatkuracisto el la bara-

ko de la Ruĝa Kruco, kiu favore ion klarigadis al la leŭtenanto Cajthaml, levetanta la ŝultrojn.

Antaŭ la stabvagono la tuta konflikto kulminis, kiam la soldaturacisto vidalvide al la kapitano Ságner komencis aserti, ke tiuj porkoj estas destinitaj por hospitalo de la Ruĝa Kruco, pri kio aliflanke volis nenion scii la kampisto kaj postulis, ke la porkoj estu al li redonitaj, ke tio estas lia lasta posedaĵo kaj ke li nepre ne povas vendi ilin por la prezo, kiun oni al li elpagis.

Ĉe tio li ŝovis la monon, kiun li havis enmane pro la porkoj, al la kapitano Ságner, kiun la kampistino tenis je la alia mano; ŝi kisis ĝin al li kun humileco, per kiu tiu ĉi regiono ĉiam elstaris.

La kapitano Ságner estis el tio tute timigita kaj momenton daŭris, ol li sukcesis forpuŝi la maljunan kampistinon. Sed tio neniel helpis, anstataŭ ŝi venis junaj laborfortoj, kiuj komencis denove suĉi liajn manojn.

Sed la leŭtenanto Cajthaml raportis per pure komerca tono: "Tiu ulo havas ankoraŭ dek du porkojn kaj estis al li elpagite tute ĝuste laŭ la lasta ordono de la divizio numero 12420, ekonomia parto. Laŭ tiu ĉi ordono, ŝ 16, eblas aĉeti porkojn en lokoj netuŝitaj de la milito ne pli multekoste ol je du kronoj kaj dek ses heleroj por unu kilogramo da viva pezo; en lokoj tuŝitaj de la milito aldoni tridek ses helerojn por unu kilogramo da viva pezo, pagi do por unu kilogramo du kronoj kaj kvindek du helerojn. Al tio noto: se oni konstatis okazojn, ke en la lokoj trafitaj de la milito restis netuŝitaj bienaroj kun plena stato de porkoj, kiujn eblas forsendi kun celo provizi trairantajn trupunuojn, elpagi por la forprenita porka viando kiel en la lokoj ne tuŝitaj de la milito, kun speciala

alpago de dek du heleroj por unu kilogramo da viva pezo. Se tiu ĉi situacio ne estas tute klara, formi tuj surloke komisionon el la interesulo, komandanto de trairanta soldata trupunu kaj tiu oficiro aŭ ĉefserĝento-kontisto (se temas pri ne-grandaj formacioj), al kiu estas konfidita la ekonomia parto.”

Ĉion tion tralegis la leŭtenanto Cajthaml el kopio de la divizia ordono, kiun li senĉese kunportis kaj preskaŭ sciis jam parkere, ke sur teritorio de la fronto altiĝas la rekompenco por unu kilogramo da karoto al dek kvin kronoj kaj tridek heleroj, kaj por florbrasiko, destinita sur teritorio de la fronto por oficira kuirejo, al unu krono kaj sepdek kvin heleroj por unu kilogramo.

Tiuj, kiuj en Vieno tion ellaboris, imagis al si la teritorion de la fronto kiel landon, abundantan per karoto kaj florbrasiko.

La leŭtenanto Cajthaml tralegis tion al la ekscitiĝinta kampisto kompreneble germane kaj demandis lin ankaŭ, ĉu li tion komprenas; kiam tiu skuis la kapon, li lin alkriegis: ”Ĉu vi do deziras komisionon?”

Tiu komprenis la vorton ”komisiono”, tial li kapjesis, kaj dum liaj porkoj estis jam antaŭ momento fortrenitaj al militkuirejoj por esti ekzekutitaj, ĉirkaŭigis lin la soldatoj kun bajonetoj, destinitaj al la rekvizicio, kaj la komisiono ekpaŝis al lia bieno por konstati, ĉu li ricevu du kronojn kvindek du helerojn por unu kilogramo aŭ nur du kronojn dudek ok helerojn.

Ili ankoraŭ ne enpaŝis la vojon kondukantan al la civito, kiam de militkuirejoj subite aŭdiĝis triobla mortjelpado de la porkoj.

La kampisto ekkomprenis, ke estas fino de ĉio kaj malespere ekvokis: "Djoni mi por ĉija porkina du florena!"

Kvar soldatoj ĉirkaŭigis lin pli malvaste kaj la tuta familio baris la vojon al la kapitano Ságner kaj la leŭtenanto Cajthaml, genuiĝinte en polvon de la ŝoseo.

La patrino kun du filinoj ĉirkaŭpremis la genuojn de tiuj du, nomante ilin bonfarantoj, ĝis la kampisto ilin alkriis kaj ekvokis per ukraina dialekto de hungaraj rusoj, ke ili leviĝu, la soldatoj forvoru la porkojn kaj mortaĉu sekve de tio.

Tiel la komisiono superfluis, kaj ĉar la kampisto subite ekribelis, minacis per pugno, li ricevis de unu el la soldatoj per kolbo, ĝis tio eksonegis en lia peltmantelo, la tuta lia familio sin krucumis kaj eĉ kun la patro komencis fuĝi.

Dek minutojn pli poste la bataliona ĉefserĝento-kontisto kun la bataliona kuriero Matuŝič jam ĝue manĝis porkocerbaĵon en sia vagono, kaj ŝtopante sin plenbuŝe, de tempo al tempo li diris malice al la skribistoj: "Vi vorus, ĉu? Ho, knaboj, tio estas nur por suboficiroj. Al kuiristoj renon kaj hepaton, cerbaĵon kaj kuirporkaĵon al sinjoroj ĉefserĝentoj-kontistoj kaj al la skribistoj nur duoblajn porciojn da viando por la viraro."

La kapitano Ságner donis jam ordonon koncernantan la oficiran kuirejon: "Porkaĵon sur kumino; elekti la plej kvalitan viandon, ke tio ne estu tro grasa!"

Kaj tiel okazis, ke kiam oni en ĎAupkowska-intermonto disdonis manĝon al la viraro, ĉiu unuopulo trovis en porcio da supo en sia soldata gamelo du malgrandajn pecetojn da viando kaj tiu, kiu naskiĝis sur ankoraŭ pli malbona planedo, trovis nur peceton da haŭto.

Ĉe kuirejoj regis kutima soldata nepotismo, disdonanta al

ĉiuj, kiuj havis proksime al la estranta koterio. Servosoldatoj aperis en Łupkowska-intermonto kun grasmakulaj faŭkoj. Ĉiu kuriero havis la ventron malmola kiel ŝtoneto. Okazis aferoj, kriantaj al la ĉielo.

La unujara volontulo Marek kaŭzis ĉe militkuirejo skandalon, ĉar li volis esti justa, kaj kiam kuiristo metis en lian gamelon kun supo grandan tranĉaĵon da kuirita femuro kun vortoj: "Tio estas por nia kronikisto", li proklamis, ke en la soldatservo ĉiuj el la viraro estas egalrajtaj, kio kaŭzis ĝeneralan konsenton kaj donis impulson por insulti la kuiristojn.

La unujara volontulo ĵetis la viandpecon reen, emfazante, ke li ne volas ian avantaĝon. Sed tiuj ĉe la kuirejo tion ne ekkomprenis kaj opiniis, ke la bataliona kronikisto ne estas kontenta, kaj kuiristo kaŝdiris al li flanke, ke li venu nur poste, kiam oni disdonos manĝon, ke li donos al li pecon da piedo.

Ankaŭ al skribistoj brilis la faŭkoj de graso, sanitaristoj anhelis pro bonfarto kaj ĉirkaŭ tiu dia beno ĉie ĉirkaŭe ankoraŭ ne forigitaj memoraĵoj pri la lastaj bataloj. Ĉie kuŝaĉis kartoĉuoj, ladaj malplenaj konzervujoj, ĉifonoj el rusaj, aŭstraj kaj germanaj uniformoj, partoj de frakasitaj veturiloj, sangokovritaj longaj strioj da gazaj bandaĝoj kaj vato.

En maljunan pinarbon ĉe iama stacidomo, el kiu restis nur amaseto da ruinoj, estis enpuŝita grenado, kiu ne eksplodis. Ĉie eblis vidi grenaderojn kaj ie senpere proksime oni ŝajne entombigis kadavrojn de soldatoj, ĉar ĉi tie estis terura putra fetoro.

Kaj kiel trairis ĉi tie soldataroj kaj tendumis ĉi tie ĉirkaŭe, ĉie vidiĝis amasetoj da homaj ekskremento de internacia deveno, de ĉiuj nacioj de Aŭstrio, Germanio kaj Rusio. Ekskre-

mentoj de soldatoj de ĉiuj nacioj kaj religioj kuŝis unu ĉe la alia aŭ amasiĝis unu sur la alian sen tio, ke ili interbatiĝus.

Duonruinigita akvujo, ligna budeto de fervoja gardisto kaj entute ĉio, kio havis ian vandon, estis traborita de fusilaj kugloj kiel kribrilo.

Por ke la impresoj de soldataj ĝojoj estu pli kompletaj, malantaŭ nemalproksima monteto leviĝis nebuloj da fumo, kvazaŭ brulus tie la tuta vilaĝo kaj estus tie centro de grandaj militaj operacoj. Oni bruligis tie ĥolerajn kaj disenteriajn barakojn ĉe granda ĝojo de tiuj sinjoroj, kiuj zorgis pri ekipado de tiu hospitalo sub protekto de la arkidukino Maria kaj kiuj ŝtelis kaj ŝtopis siajn poŝojn per prezentado de fakturoj pri neekzistantaj ĥolera kaj disenteriaj barakoj.

Nun pagis pro tio unu grupo da barakoj nome de ĉiuj ceteraj kaj en fetoro de brulantaj pajlosakoj ŝvebis al la firmamento la tuta ŝtelisteco de la arkidukina protekto.

Sur roko malantaŭ la stacidomo germanoj jam rapidis konstrui monumenton al falintaj Brandenburganoj kun surskribo: "Al la herooj el Łupkowska-intermonto", kun granda germana aglino fandita el bronzo, ĉe kio sur la soklo estis laŭvorte menciite, ke tiu emblemo estas fabrikita el rusaj kanonoj, militakiritaj ĉe liberigado de Karpatoj fare de germanaj regimentoj.

En tiu ĉi stranga kaj ĝis nun nekutima atmosfero la bataliono ripozis post tagmanĝo en vagonoj, kaj la kapitano Sagner kun la bataliona adjutanto ankoraŭ senĉese ne povis interkompreniĝi per ĉifritaj telegramoj kun la brigada posteno pri plua antaŭenmarŝo de la bataliono. La informoj estis tiel neklaraj, ke tio aspektis proksimume tiel, kvazaŭ ili alveturus al Łupkowska-intermonto erare anstataŭ tio, ke ili veturu de



Sátoraljaújhely en tute alia direkto, ĉar en telegramoj oni parolis pri lokoj:

Csap — Ungvár, Kis — Berezna — Uzsok.

Post dek minutoj montriĝas, ke staboficiro sidanta en la brigada posteno estas stultulo, ĉar venas ĉifrita telegramo, ĉu parolas oka marŝbataliono de la sepdekkvina regimento (soldata ĉifro G3). La stultulo en la brigada posteno estas mirigita per respondo, ke temas pri sepa infanteria bataliono de la naŭdekunua regimento, kaj demandas, kiu donis ordonon veturi al Mukaĉevo tra la soldata trako al Stryj, se la marŝordono estas tra Łupkowska-intermonto direkte al Sanok en Galicion. La stultulo ege miras, ke oni telegrafas el Łupkowska-intermonto, kaj sendas ĉifritan sciigon: La marŝordono neŝanĝita, al Łupkowska-intermonto — Sanok, kie pluaj ordonoj.

En la stabvagono post reveno de la kapitano Ságner disvolviĝas interparolo pri certa senpripensemo kaj oni faras certajn aludojn, ke sen soldatoj de la germana regno la orienta armea korpuso estus tute senkonsila.

La leŭtenanto Dub provas defendi senpripensemon de la aŭstra generala stabo kaj parolaĉas ion pri tio, ke ĉi-tiea regiono estis sufiĉe detruita post antaŭnelongaj bataloj kaj la trako ankoraŭ ne povis esti laŭorde riparita.

Ĉiuj oficiroj rigardas lin kunsente, kvazaŭ ili volus diri: tiu sinjoro ne kulpas pri sia idioteco. Ne trovante subtenon, la leŭtenanto Dub komencis plu babilaĉi pri belega impresoj, per kiu efikas sur lin tiu ĉi disbatita regiono, atestanta pri tio, kiel scias bati la fera pugno de nia soldataro. Denove neniu al li respondas, al kio li ripetas: "Jes, certe, kompreneble, la rusoj cedis ĉi tie en absoluta paniko."

La kapitano Ságner decidiĝas, ke ĉe la plej proksima okazo, kiam la situacio en tranĉeoj estos la plej danĝera, li sendos la leŭtenanton Dub kiel oficiran patrolon malantaŭ pikdratajn barilojn por rekognoski poziciojn de la malamiko, kaj flustras al la ĉefleŭtenanto Lukáš, kun kiu ili estas elklinitaj el fenestro de la vagono: "Tiujn ĉi civilulojn ŝuldis al ni diablo. Ju pli granda inteligentulo, des pli granda bruto."

Ŝajnas, ke la leŭtenanto Dub tute ne ĉesos paroli. Li plu rakontas al ĉiuj oficiroj, kion li legis en la gazetaro pri tiuj karpataj bataloj kaj interbatiĝo pri karpataj intermontoj dum la aŭstra-germana ofensivo ĉe San<sup>53</sup>.

Li rakontas pri tio tiel, kvazaŭ li ne nur partoprenus tiujn batalojn, sed eĉ mem direktus ĉiujn operacojn.

Neordinare naŭzaj estas precipe liaj frazoj de tiu ĉi senco:

"Poste ni iris al Bukowsko, por ke ni havu sekurigita la linion Bukovsko — Dynów, havante kontakton kun la trupunuoj el Bardejov ĉe Vyšná Polianka, kie ni disbatis malamikan divizion el Samara."

La ĉefleŭtenanto Lukáš jam ne eltenis kaj rimarkis al la leŭtenanto Dub: "Pri kio vi ŝajne parolis jam antaŭ la milito kun via sinjoro distriktestro."

La leŭtenanto Dub malamike ekrigardis la ĉefleŭtenanton Lukáš kaj eliris el la vagono.

La soldata trajno staris sur taluso kaj kelke da metroj pli sube sub deklivo kuŝis diversaj objektoj, forĵetitaj de rusaj soldatoj, kiuj ŝajne cedis tra tiu ĉi fosaĵo. Vidiĝis ĉi tie rusti-

53 komence de majo 1915 aŭstri-hungara kaj germana armeoj okupis preskaŭ la tutan Galicion kaj forpulis rusajn taĉmentojn al la rivero San en norda Galicio. Komandanto de aŭstra-germana armea korpuso generalo Mackensen transpaŝis kun sia armeo eĉ la riveron San (16.5.1915)

ĝintaj tekruĉoj, potoj, kartoĉuoj. Krom la plej diversaj objektoj kuŝaĉis ĉi tie ankaŭ volvaĵoj da pikdrato kaj denove sangokovritaj strioj da gazaj bandaĝoj kaj vato. Sur unu loko super tiu fosaĵo staris grupo da soldatoj kaj la leŭtenanto Dub tuj konstatis, ke inter ili staras Ŝvejk kaj ion al ili rakontas.

Li do iris tien.

”Kio ĉi tie okazis?” eksonis severa voĉo de la leŭtenanto Dub, ĉe kio tiu stariĝis rekte antaŭ Ŝvejk.

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke ni rigardas,” respondis Ŝvejk en la nomo de ĉiuj.

”Kaj kion vi rigardas?” ekkriis la leŭtenanto Dub.

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke ni rigardas suben en la fosaĵon.”

”Kaj kiu donis al vi por tio permeson?”

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke tio estas deziro de nia sinjoro kolonelo Schlágr el Bruck. Kiam li nin adiaŭis kaj ni nun veturis sur batalkampon, li diris en sia parolo, ke ni ĉiuj, kiam ni trairos forlasitajn batalejojn, ĉion bone rimarku, kiel oni batalis kaj kio povus esti al ni utila. Kaj nun ni ĉi tie vidas, sinjoro leŭtenanto, sur tiu ĉi terŝvelaĵo, kion ĉion la soldato devas forĵeti ĉe sia forkuro. Ni ĉi tie vidas, obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, kiel tio estas stulta, se la soldato kuntrenas kun si diversajn superfluaĵojn. Li estas per tio superflue ŝargĝita. Per tio li superflue laciĝas, kaj se li kuntrenas tiajn pezaĵojn, li ne povas facile batali.”

Al la leŭtenanto Dub subite eklumis espero, ke fine li venigos Ŝvejkon antaŭ militan feldtribunalon pro kontraŭmilita ŝtatperfida propagando, kaj tial li rapide demandis: ”Ĉu vi do opinias, ke la soldato forĵetu kartoĉojn, kiuj kuŝaĉas ĉi tie sur la terŝvelaĵo, aŭ bajonetojn, kiujn mi vidas tie?”

”Ho ne, ne, obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto,” respondis Ŝvejk, agrable ridetante, ”bonvolu rigardi ĉi tien suben sur tiun forĵetitan ladan noktovazon.”

Kaj vere, sub la taluso inter eroj de potoj arogante kuŝaĉis noktovazo kun parte forbatita emajlo, ĉirkaŭronĝita de rusto; ĉiujn tiujn ĉi objektojn, jam netaŭgajn por mastrumado, metis ĉi tien la staciestro probable kiel materialon por diskutoj de estontaj arkeologoj, kiuj, kiam ili malkovros tiun ĉi restaĵon, el tio idiotiĝos kaj infanoj en lernejoj lernos pri epoko de emajlaj noktovazoj.

La leŭtenanto Dub ekrigardis tiun ĉi objekton, sed li ne povis ol simple konstati, ke tio estas vere unu el tiuj invalidoj, kiuj sian freŝan junaĝon pasigis sub lito.

Sur ĉiuj faris tio grandegan impreson, kaj kiam la leŭtenanto Dub silentis, ekparolis Ŝvejk: ”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke pro tia noktovazo estis foje bela amuzo en la banloko Poděbrady. Oni rakontis pri tio en gastejo ĉe ni en Vinohrady. Scie, tiam en Poděbrady oni komencis eldonadi revuon ’Sendependeco’ kaj ĉefa kapo de tio estis la apotekisto el Poděbrady kaj kiel redaktoron oni nomumis tie certan Ladislao Hájek Domažlický. Kaj tiu sinjoro apotekisto, li estis tia strangulo, ke li kolektis malnovajn potojn kaj aliajn tiajn bagatelaĵojn, li estis viva muzeo. Foje tiu Hájek Domažlický invitis en la banlokon Poděbrady vizite al si amikon<sup>54</sup>,

54 Ladislao Hájek Domažlický, amiko de Hašek rakontas en siaj rememoroj pri Hašek la tutan okazaĵon iom alie ol Ŝvejk: tiu invitita ”amiko” estis Jaroslav Hašek, al kiu Hájek proponis iĝi redaktoro de semajnavuo, eldonata en Poděbrady. Titolo de tiu revuo estis ”Nia rajto”, ne ”Sendependeco”. Hašek vere alveturis al Poděbrady por ĉeesti kunvenon de eldonantaro — sed al la kunveno li venis ebria kaj malbenis la eldonantojn, la revuo laŭdire publikigas sencensajojn pri antikvaĵoj kaj arĥeologiaj elfosaĵoj. Tiujn ĉi artikolojn

kiu ankaŭ skribis por gazetoj, kaj ili kune ebrigiĝis, ĉar ili ne vidis unu la alian jam pli ol unu semajnon, kaj tiu al li promesis, ke pro tiu regalo li skribos al li felietonon por la 'Sendependeco', tiu sendependa revuo, de kiu Hájek Domažlický dependis. Tiu lia amiko skribis al li felietonon pri kolektanto, kiu en sablo sur bordo de Elbo trovis malnovan ladan noktovazon kaj opiniis, ke tio estas kasko de sankta Venceslao<sup>55</sup> kaj faris per tio tian mensleviĝon, ke alveturis tien episkopo Brynych el Hradec kun procesio kaj standardoj por tion rigardi. Tiu apotekisto el Poděbrady opiniis, ke tio rilatas al li, kaj tiel ili ambaŭ, li kaj sinjoro Hájek, interkverelis."

La leŭtenanto Dub havis guston deĵetegi Ŝvejkon tien suben, sed li regis sin kaj alkriis ĉiujn: "Mi diras al vi, ke vi ĉi tie superflue ne gapu! Vi ĉiuj min ankoraŭ ne konas, sed kiam vi min ekkonos...!"

"Vi ĉi tie restos, Ŝvejk," li diris per terura voĉo, kiam Ŝvejk volis foriri kun la ceteraj al vagonoj.

Ili restis solaj stari unu kontraŭ la alia kaj la leŭtenanto Dub meditis, kion teruran diri.

Sed Ŝvejk lin antaŭiris: "Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, almenaŭ tiu ĉi vetero povus persisti. Tage ne estas tro varmege kaj noktoj estas ankaŭ tute agrablaj, tiel ke tio estas la plej konvena tempo por militi."

La leŭtenanto Dub eltiris revolveron kaj demandis: "Ĉu vi konas tion?"

55 skribis apotekisto Hellich, la plej influhava persono de la eldonantaro, kaj Hašek kompreneble la postenon de redaktoro ne ricevis (murdita 929 aŭ 935): klera, pacama, kapabla kaj pia ĉeĥa reĝo, patrono de ĉeĥaj landoj (Bohemio, Moravio, Silezio), murdita de sia frato Boleslav kaj liaj helpantoj. Lian nomon portas interalie la ĉefplaco de Prago, en kies supra parto estas lia statuo surĉevalo

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, mi konas. Sinjoro ĉefleŭtenanto Lukáš havas ĝuste tian.”

”Memoru do tion, kanajlo!” serioze kaj digne diris la leŭtenanto Dub, kaŝante la revolveron reen; ”por ke vi sciu, ke povus okazi al vi io tre malagrabra, se vi daŭrigus tiujn viajn propagandojn.”

La leŭtenanto Dub foriris, ripetante al si: ”Nun mi diris al li tion plej bone: propagandojn, jes, propagandojn!”

Antaŭ ol Ŝvejk denove enpaŝis sian vagonon, li ankoraŭ momenton promenis kaj murmuris al si: ”Kien propre mi lin vicigu?” Kaj ju pli longe, des pli klare venas al li en la menson nomo de tiu ĉi speco: ”duonfurzulo”.

”Furzulo” en soldata terminologio estis delonge uzata kun granda ŝato, kaj tiu ĉi honora alnomo apartenis ĉefe al koloneloj aŭ iom aĝaj kapitanoj kaj majoroj, kaj estis tio certa pli alta grado de uzataj vortoj ”kanajla maljunulaĉo”. La vorto ”maljunulaĉo” sen tiu adjektivo estis afabla pritakso de maljuna kolonelo aŭ majoro, kiu ege kriegis, sed ĉe tio li amis siajn soldatojn kaj protektis ilin kontraŭ aliaj regimentoj, precipe se temis pri aliregimentaj patroloj, kiuj la soldatojn elprenadis el gastejaĉoj, kiam tiuj ne havis permeson resti tie post dormosignalo. ”Maljunulaĉo” zorgis pri siaj soldatoj, manĝo devis esti en ordo, sed li ĉiam havis ian kapricon; en io li estis pedanto — kaj tial li estis ”maljunulaĉo”.

Sed se ”maljunulaĉo” ĉe tio superflue ĉikanis soldatojn kaj suboficiojn, elpensadis noktan ekzercadon kaj similajn aferojn, li estis ”kanajla maljunulaĉo”.

El ”kanajla maljunulaĉo” iĝis ”furzulo” kiel pli alta grado de evoluo al turmentado, ĉikanado kaj idioteco. Tiu vorto sig-

nifis ĉion kaj ekzistas granda diferenco inter furzulo en civila vivo kaj furzulo en soldatservo.

La unua, civila, estas ankaŭ superulo, kaj ankaŭ tiel ĝenerale nomas lin servistoj en oficejoj kaj subordigitaj oficistoj. Li estas filistro-burokrato, kiu riproĉas ekzemple tion, ke malneto ne estas bone sekigita per sorba papero kaj simile. Ĝenerale estas tio idiote bruta fenomeno en la homa socio, ĉar tia spritmankulo ŝajnigas ĉe tio vivspertulon, ĉion volas kompreni, ĉion scias klarigi kaj pro ĉio ofendiĝas.

Sed kiu estis en soldatservo, komprenas la diferencon inter tiu ĉi fenomeno kaj "furzulo" en uniformo. Ĉi tie tiu vorto prezentis "maljunulaĉon", kiu estis "kanajla", vere kanajla, al ĉio alpaŝis akre, sed malgraŭ tio li haltis antaŭ ĉiu obstaklo; soldatojn li ne amis kaj vane kontraŭ ili batalis, ne sciis akiri al si aŭtoritaton, kiun ĝuis "maljunulaĉo" eĉ "kanajla maljunulaĉo".

En kelkaj garnizonoj, kiel ekzemple en Tridentino, anstataŭ "furzulo" oni diradis "nia maljuna kanajlo". En ĉiuj okazoj temis pri persono iom aĝa, kaj se Ŝvejk enmense nomis la leŭtenanton Dub "duonfurzulo", li esprimis absolute logike, ke koncerne kaj la aĝon kaj la rangon kaj entute ĉion mankas al la leŭtenanto Dub ankoraŭ kvindek procentoj por ke li iĝu "furzulo".

Revenante kun tiuj ĉi pensoj al sia vagono, li renkontis la servosoldaton Kunert, kiu havis ŝvelan vizaĝon kaj balbutis ion nekompreneblan, ke li ĵus renkontiĝis kun sia sinjoro leŭtenanto Dub kaj tiu tute neatendite lin vangobatis, ĉar li laŭdire scias pri faktoj, ke Kunert interrilatas kun Ŝvejk.

"En tiu ĉi okazo," diris Ŝvejk trankvile, "ni iros al raporto. Aŭstra soldato devas lasi sin vangobati nur en certaj okazoj.

Sed tiu via sinjoro transpaŝis ĉiujn limojn, kiel tion diradis maljuna Eŭgeno la Savojo: 'Nur de ĉi tie ĝis ĉi tie'. Nun vi mem devas iri al raporto, kaj se vi ne iros, mi vangobatos vin mem, por ke vi sciu, kio estas disciplino en la armeo. En Karĺina kazerno servis leŭtenanto Hausner, tiu havis ankaŭ servosoldaton kaj ankaŭ lin vangobatis kaj piedbatis. Foje estis tiu servosoldato tiel vangobatita, ke li ne sciis, kie li havas la kapon, anoncis sin al raporto kaj tie, ĉar li ĉion tion intermiks- sis, proklamis, ke li estis piedbatita; kaj tiu lia sinjoro ankaŭ vere pruvis, ke la servosoldato mensogas, ke tiutage li lin ne piedbatis, sed nur vangobatis, tiel tiun servosoldaton oni mal- liberigis por tri semajnoj pro falsa akuzo.

Sed tio ŝanĝas nenion en la tuta afero," daŭrigis Ŝvejk, "tio estas ĝuste la sama kiel tio, pri kio ĉiam rakontis studento de medicino Hubiĉka, ke estas egale distranĉi en patologia insti- tuto homon, kiu sin pendumis aŭ venenigis. Kaj mi iras kun vi. Kelke da vangobatoj signifas en la soldatservo multon."

Kunert tute perpleksiĝis kaj lasis sin konduki de Ŝvejk al la stabvagono.

La leŭtenanto Dub ekkriegis, klinante sin el fenestro: "Kion vi ĉi tie volas, kanajloj?"

"Konduku digne," admonis Ŝvejk Kunerton kaj puŝis lin antaŭ si en la vagonon.

En la koridoro aperis la ĉefleŭtenanto Lukáš kaj malantaŭ li la kapitano Ságner.

La ĉefleŭtenanto Lukáš, kiu travivis kun Ŝvejk jam tiom da aferoj, terure miris, ĉar Ŝvejk ne mienis jam tiel bonkore se- rioze, lia vizaĝo ne havis konatan bonaniman mienon, sed signon pri novaj malagrablaj okazaĵoj.



”Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto,” diris Ŝvejk, ”la afero iras al raporto.”

”Ne komencu denove per viaj idiotaĵoj, Ŝvejk, mi havas da tio ankaŭ jam sufiĉe.”

”Bonvolu permesi,” diris Ŝvejk, ”mi estas kuriero de via kompanio, vi, permesu, bonvolas esti komandanto de la de-kunuo. Mi scias, ke tio aspektas terure strange, sed mi scias ankaŭ, ke sinjoro leŭtenanto Dub estas via subulo.”

”Ŝvejk, vi plene frenezigiĝis,” falis en lian parolon la ĉefleŭtenanto Lukáš, ”vi estas ebriega, vi faros plej bone, se vi foriros! Ĉu vi komprenas, idioto, bruto?”

”Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto,” diris Ŝvejk, puŝante antaŭ si Kunerton, ”tio aspektas ĝuste tiel kiel foje en Prago, kiam oni faris provon pri ŝirma kadro kontraŭ surveturigo fare de elektra tramo. Tiu sinjoro inventisto mem sin oferis por tiu provo, kaj poste la urbo devis pagi al lia vidvino kompenson pro tiu damaĝo.”

La kapitano Ságner, ne sciante, kion diri, kapjesis ĉe tio, dum la ĉefleŭtenanto Lukáš mienis senespere.

”Ĉio devas iri per la vojo de raporto, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto,” daŭrigis Ŝvejk senkompatate, ”ankoraŭ en Bruck vi al mi diris, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke se mi estas kuriero de la kompanio, ke mi havas ankoraŭ aliajn devojn ol nur ordonojn. Ke mi devas esti informita pri ĉio, kio okazas ĉe la kompanio. Surbaze de tiu ordono mi permesas al mi anonci al vi, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke sinjoro leŭtenanto Dub pro nenio neatendite vangobatis sian servosoldaton. Mi tion, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, eventuale eĉ ne dirus. Sed se mi scias, ke sinjoro leŭtenanto Dub estas sub via komandopovo, mi decidiĝis, ke tio devas iri al raporto.”

”Tio ĉi estas stranga afero,” diris la kapitano Ságner, ”kial, Ŝvejk, vi puŝas ĉi tien tiun Kunerton?”

”Obee mi raportas, sinjoro bataliona komandanto, ke ĉio devas iri per la vojo de raporto. Li estas stulta, li estis vangobatita fare de sinjoro leŭtenanto Dub kaj li ne povas tion al si permesi por mem iri al raporto. Obee mi raportas, sinjoro kapitano, se vi lin ekrigardus, kiel tremas al li la genuoj, li estas tute neviva, ke li devas iri al tiu raporto. Kaj se ne estus mi, li al tiu raporto eble tute ne venus, kiel tiu Kudela el Bytouchov, kiu dum sia aktiva soldatservo tiel longe ’iradis’ al raporto, ĝis li estis translokita al maristoj, kie li iĝis ĉefserĝento kaj poste sur iu insulo en Pacifiko oni proklamis lin dizertinto. Poste li tie edziĝis kaj parolis ankaŭ kun vojaĝisto Havlasa<sup>56</sup>, kiu tute ne ekkonis, ke tiu homo ne estas indiĝeno. — Ĉiuflanke estas tio tre trista, se iu devas iri al raporto pro kelke da sensencaj vangobatoj. Sed li tute ne volis ĉi tien iri, ĉar li diris, ke li ĉi tien ne iros. Li estas entute tia vangobata servosoldato, ke li eĉ ne scias, pri kiu vangobato ĉi tie temas. Li ĉi tien tute ne irus, li tute ne volis iri al raporto, li multfoje lasas sin bati eĉ pli. Obee mi raportas, sinjoro kapitano, rigardu lin, li estas jam el ĉio tio tute surfekita. Kaj aliflanke, necesis ke li tuj plendu, ke li ricevis tiujn vangobatojn, sed li ne kuraĝis, ĉar li sciis, ke, kiel skribis certa poeto, estas pli bone esti kiel humila violo. Scie, li servas ĉe sinjoro leŭtenanto Dub.”

Puŝante Kunerton antaŭ sin, Ŝvejk al li diris: ”Ne tremu senĉese kiel tremolo!”

56 Jan Havlasa (propranome Jan Klecanda), ĉeĥa vojaĝisto, verkisto kaj diplomato (1920-1924 ĉeĥoslovaka ambasadoro en Brazilo)

La kapitano Ságner demandis Kunerton, kiel tio propre okazis.

Sed Kunerrt proklamis, tremante per la tuta korpo, ke ili povas demandi sinjoron leŭtenanton Dub, ke tiu lin tute ne vangobatis.

La judaso Kunert, senĉese tremante per la tuta korpo, proklamis eĉ, ke Ŝvejk tion tute al si elpensis.

Al tiu ĉi hontiga situacio faris finon la leŭtenanto Dub, kiu subite aperis kaj alkriegis Kunerton: "Ĉu vi volas ricevi ankoraŭ d e n o v e kelke da vangobatoj?"

La afero estis do tute klara kaj la kapitano Ságner simple proklamis al la leŭtenanto Dub: "Ekde la hodiaŭa tago Kunert estas alkomandita al la bataliona kuirejo, kaj koncerne novan servosoldaton, turnu vin al la ĉefserĝento-kontisto Vaněk."

La leŭtenanto Dub soldatsalutis kaj ĉe foriro diris al Ŝvejk nur: "Mi vetas, ke foje vi estos pendumita."

Kiam li foriris, Ŝvejk turnis sin al la ĉefleŭtenanto Lukáš per milda, amika tono: "En Mnichovo Hradiště estis ankaŭ tia sinjoro kaj ankaŭ tiel parolis kun tiu alia kaj tiu al li respondis: "Ĉe ekzekutejo ni renkotiĝos."

"Ŝvejk," diris la ĉefleŭtenanto Lukáš, "vi estas ja idioto, kaj ne aŭdacu al mi diri, kiel vi kutimas: 'Obee mi raportas, ke mi estas idioto'."

"Okulfrapanta," ekparolis la kapitano Ságner, klinante sin el fenestro, kaj li tre ŝate de tiu fenestro cedus, sed li jam ne havis tempon, ĉar aperis tiu malfeliĉo: la leŭtenanto Dub sub la fenestro.

La leŭtenanto Dub komencis per tio, ke li tre bedaŭras tion, kiel la kapitano Ságner foriris, neelaŭskultinte liajn kaŭzojn pri ofensivo en la orienta fronto.

”Por kompreni la grandegan ofensivon,” vokis la leŭtenanto Dub supren al la fenestro, ”ni devas konscii, kiel la ofensivo evoluis fine de aprilo. Ni devis trarompi la rusan fronton kaj kiel la plej konvenan lokon por tiu ĉi trarompo ni trovis fronton inter Karpatoj kaj Vistulo.”

”Mi pri tio kun vi ne kverelas,” respondis la kapitano Ságner seke kaj foriris de la fenestro.

Kiam duonhoron post tio oni daŭrigis la veturon al Sanok, la kapitano Ságner streĉis sin sur benko kaj ŝajnis dormon, por ke la leŭtenanto Dub intertempe forgesu siajn gurditajn konkludojn pri ofensivo.

En la vagono kun Ŝvejk mankis Baloun. Nome, li elpetis al si permeson, ke li povu forviŝi kaldronon post gulaŝo per pano. Nun li estis en vagono kun militkuirejoj en malagrabra situacio, ĉar ĉe tio, kiel la trajno moviĝis, li enflugis kapantaŭe en kaldronon kaj la piedoj pendis al li trans ĝian randon. Sed li al kutimiĝis al tiu situacio kaj el la kaldrono eĥis ŝmacado, kiel se erinaco pelas blatojn, kaj pli poste petvoĉo de Baloun: ”Mi petas vin, kamaradoj, pro dio, ĵetu al mi ĉi tien peceton da pano, ĉi tie estas ankoraŭ multe da saŭco.” Tiu ĉi idilio daŭris ĝis la plej proksima stacio, kien ili alveturis kun kaldrono de la dekunua kompanio jam purigita, ke ĝia stana tavolo vere brilis.

”Dio rekompencu vin pro tio, kamaradoj,” dankis Baloun kore. ”De la tempo, kiam mi estas nun en la soldatservo, la fortuno ekridetis al mi la unuan fojon.”

Kaj estis vere kion diri. En Łupkowska-intermonto Baloun akiris du porciojn da gulaŝo, ankaŭ la ĉefleŭtenanto Lukáš montris sian kontenton, ke Baloun alportis al li el la oficira kuirejo netuŝitan manĝon kaj lasis por li pli grandan duonon.

Baloun estis tute feliĉa, balancis la piedojn, kiujn li elŝovis el la vagono, kaj subite tiu ĉi tuta milito ŝajnis al li esti io varmea, familia.

Kompania kuiristo komencis pri li ŝerci, ke kiam oni alveturos al Sanok, oni kuiras vespermanĝon kaj ankoraŭ unu tagmanĝon, ĉar tiun vespermanĝon kaj tagmanĝon ili havas al sia bono, se oni ne ricevis tion dum la tuta vojo. Baloun nur kapjesis kaj flustris: "Vi vidis, kamaradoj, ke sinjoro dio nin ne forlasos."

Ĉiuj sincere al li ridis kaj la kuiristo, sidante sur militkuirrejo, kantis:

*"Dio nin ja ne forpuŝos,  
flam' infera nin ne tuŝos.  
Se en koton li nin premos,  
elgratos nin, helpi venos...  
Se en vepron li nin ĵetos,  
elhaki nin li tuj pretos.  
Dio nin ja ne forpuŝos,  
flam' infera nin ne tuŝos..."*

En valoj malantaŭ la stacio Szczawne denove komencis aperi novaj soldataj tombejoj. Sub Szczawne eblis el la trajno vidi ŝtonan krucon kun senkapa sinjoro Kristo, kiu perdis la kapon ĉe pafdetruo de la trako.

La trajno altigis sian rapidecon, impetante suben tra valo al Sanok, la horizontoj plivastiĝis kaj tiel ambaŭflanke iĝis ankaŭ pli multnombraj la tutaj grupoj da disbatitaj vilaĝoj en la regiono.

De la fervoja taluso oni vidis sube en rivereto ĉe Kulaszna falegintan, disbatitan trajnon de la Ruĝa Kruco.

Baloun konsterniĝe malfermegis je tio la okulojn kaj miris

precipe al sube diŝjetitaj eroj de la lokomotivo. Ĝia tubo estis enpuŝita en fervojan taluson kaj elstraris el ĝi eksteren kiel kanontubo je dudekokcentimetra kalibro.

Tiu ĉi fenomeno vekis atenton ankaŭ en la vagono, kie estis Ŝvejk. Pleje ekscitiĝis la kuiristo Jurajda: "Ĉu tio estas permesite, pafi kontraŭ vagonoj de la Ruĝa Kruco?"

"Tio ne estas permesite, sed oni povas tion fari," diris Ŝvejk, "tiu bato estis bona kaj poste ĉiu petos pardonon, ke tio estis nokte kaj ke tiun ruĝan krucon oni ne vidis. En la mondo ĝenerale ekzistas multe da aferoj, kiuj estas malpermesitaj, sed fari ilin oni povas. La ĉefa afero estas, ke ĉiu tion provu, ĉu li sukcesos, por ke li povu fari tion, kio estas malpermesita. Dum imperiestraj manovroj en la regiono ĉe Písek venis ordono, ke estas malpermesite kapriole ligi soldatojn dum marŝo. Sed nia kapitano malkovris, ke oni povas tion fari, ĉar tia ordono estis ege komika, tion ĉiu povis facile kompreni, ke kapriole ligita soldato ne povas marŝi. Li fakte tiun ordonon ne evitis, li simple kaj saĝe igis ĵeti kapriole ligitajn soldatojn sur veturilojn de la trajnotrupo kaj oni marŝis kun ili pluen. Aŭ tiu ĉi afero, kiu okazis en nia strato antaŭ kvin aŭ ses jaroj. En unua etaĝo loĝis tie sinjoro Karlík. Je unu etaĝo pli alte tre bonkora homo, studento de konservatorio Mikeš. Li tre amis ulinojn kaj interalie li komencis amindumi ankaŭ filinon de tiu sinjoro Karlík, kiu posedis transloĝigan firmaon, sukeraĵejon kaj ie en Moravio ankaŭ librobindejon sub nomo de tute alia firmao. Kiam sinjoro Karlík eksciis, ke tiu studento de konservatorio amindumas lian filinon, li vizitis lin en lia loĝejo kaj diris al li: 'Vi ne povas kun mia filino edziĝi, ĉifonulo. Mi ŝin al vi ne donos!' 'Bone,' respondis al li sinjoro Mikeš, 'se mi ne povas kun ŝi edziĝi, kion mi

faru, ĉu mi pro tio min disŝiru?’ Post du monatoj venis sinjoro Karlík denove, alkondukis sian edzinon kaj ambaŭ diris al li unisone: ‘Kanjlo, vi senigis nian filinon je honoro.’ ‘Kompreneble,’ li respondis al ili, ‘mi permesis al mi malvirtigaĉi ŝin, via sinjorina moŝto.’ Tiu sinjoro Karlík komencis superflue lin alkriegi, ke li ja al Mikeš diris, ke tiu ne povas kun ŝi edziĝi, ke li ŝin al li ne donos, sed tiu tute ĝuste al li respondis, ke li kun ŝi ankaŭ ne edziĝos kaj ke tiam oni tute ne parolis pri tio, kion li povas kun ŝi fari. Ke pri tio oni ne traktis, li tenas la vorton, ili ne faru al si la zorgojn, li ŝin ne volas, li estas karaktera homo, ne laŭ la devizo ‘kien la vento, tiel la mantelo’, ke li tenas la vorton, se li ion diras, ke tio ankaŭ validas. Kaj se li estos pro tio persekutata, ke ankaŭ pro tio li ne rompas al si la kapon, ĉar li havas la konsciencon pura kaj lia mortintino panjo ankoraŭ sur la mortolito lin ĵurligis, ke li neniam en la vivo mensogu, ke li promesis al ŝi tion mandone kaj tia ĵuro validas. Ke en lia familio absolute neniu mensogis kaj ankaŭ en la lernejo li havis ĉiam la plej altan markon de bona konduto. Ĉi tie vi do vidas, ke estas malpermesitaj diversaj aferoj, sed fari ilin oni povas, kaj ke la vojoj povas esti diversaj, nur volon ni ĉiuj havu la saman.”

”Karaj amikoj,” diris la unujara volontulo, kiu fervore faris al si notojn, ”ĉio malbona havas ankaŭ sian bonan flankon. Tiu ĉi en aeron eksplodigita, duonbruligita kaj de sur la taluso malsupren ĵetegita trajno de la Ruĝa Kruco pliriĉigas gloran historion de nia bataliono per nova heroo faro de la estonto. Mi imagas, ke proksimume la deksekan de septembro, kiel mi jam faris al mi noton, el ĉiu kompanio de nia bataliono aliĝos kelke da simplaj soldatoj sub komando de kaporalo por eksplodigi blenditan trajnon de la malamiko, kiu

kontraŭ ni pafas kaj malhelpas nian transiron trans riveron. Ili honore plenumis sian taskon, alivestitaj kiel kampistoj.

Kion mi vidas,” ekvokis la unujara volontulo, rigardante en siajn notojn. ”Kiel ĉi tie aperis nia sinjoro Vaněk?

Aŭdu, sinjoro ĉefserĝento-kontisto,” li turnis sin al Vaněk, ”kia bela artikolo pri vi estos en la historio de la bataliono. Mi konjektas, ke vi troviĝas tie jam unufoje, sed tio ĉi estos ne pre pli bona kaj pli efika.” La unujara volontulo legis kun emfaza voĉo: ”Heroa morto de la ĉefserĝento-kontisto Vaněk. Al kuraĝa entrepreno, eksplodigo de malamika blendita trajno, anoncis sin ankaŭ la ĉefserĝento-kontisto Vaněk, alivestita kiel la ceteraj en kampistan kostumon. Per kaŭzita eksplodo li perdis la konscion, kaj kiam li ĝin reakiris, li vidis sin ĉirkaŭita de la malamiko, kiu tuj venigis lin al la stabo de la malamika divizio, kie vidalvide al la morto li rifuzis kian ajn klarigon pri posteno kaj multnombro de nia soldataro. Ĉar li estis alivestita, oni kondamnis lin kiel spionon al pendumo, sed konsidere lian altan rangon tiu puno estis ŝanĝita al mortpafo. La ekzekuto estis tuj farita ĉe tombeja muro kaj la kuraĝa ĉefserĝento-kontisto Vaněk petis, ke oni ne vualu al li la okulojn. Al la demando, ĉu li havas ian deziron, li respondis: ’Sciigu pere de parlamentario mian lastan saluton al mia bataliono, kaj ke mi mortas kun konvinko, ke nia bataliono daŭrigos sian venkan vojon. Krom tio sciigu al sinjoro kapitano Ságner, ke laŭ la lasta brigada ordono altiĝas la porcio da konservaĵoj al du kaj duono da konservaĵo por unu viro tage.’ Tiel mortis nia ĉefserĝento-kontisto Vaněk, vekinte per sia lasta frazo panikan timon ĉe la malamiko, kiu opiniis, ke malhelpante nian transiron trans riveron, ĝi apartigas nin de provizaj punktoj, kaŭzas al ni baldaŭan malsatiĝon kaj per tio



ankaŭ demoraligon en niaj vicoj. — Pri lia trankvilo, kun kiu li rigardis renkonten al la morto, atestas la fakto, ke antaŭ sia ekzekuto li ludis kun malamikaj staboficioj cvikon. 'Mian gajnitan sumon transdonu al la rusa Ruĝa Kruco', li diris, starante jam antaŭ fusiltuboj. Tiu ĉi nobla grandanimeco korduŝis ĉeestantajn armeajn anstataŭantojn ĝis larmoj.

Pardonu, sinjoro Vaněk," daŭrigis la unujara volontulo, "ke mi permesis al mi disponi pri via gajnita mono. Mi meditis pri tio, ĉu oni eble transdonu tion al la aŭstra Ruĝa Kruco, sed fine mi supozas, ke el la vidpunkto de homeco estas tio egala, ĉefe ke oni tion transdonos al humana institucio."

"Tiu nia mortinto povis tion transdoni al supra instituto de la urbo Prago," diris Ŝvejk, "sed tiel ĉi estas tio tamen nur pli bona, sinjoro urbestro probable aĉetus al si por tiu sumo tripkolbason al lunĉo."

"Nu jes, oni ŝtelas ĉie," diris la telefonisto Chodounský.

"Ĉefe oni ŝtelas ĉe la Ruĝa Kruco," proklamis la kuiristo Jurajda kun granda kolero. "En Bruck mi havis konatan kuiriston, kiu kuiris por fratulinoj en la barako, kaj tiu al mi diris, kiel la estrino de tiuj fratulinoj kaj ĉefflegistinoj sendas hejmen po tutaj kestoj da Malaga vino kaj ĉokolado. Tion portas kun si mem la okazo, tio estas antaŭdestino de la homo. Ĉiu homo trapasas en sia senfina vivo sennombrajn ŝanĝojn kaj foje en certaj periodoj de sia agado li devas aperi sur tiu ĉi mondo kiel ŝtelisto. Mi mem jam travivis unu tian periodon."

La kuiristo okultisto Jurajda eltiris el sia dorsosako botelon da konjako.

"Ĉi tie vi vidas seneraran pruvon de mia aserto," li diris, malŝtopante la botelon. "Mi prenis ĝin antaŭ la forveturo el

la oficira kuirejo. Ĝi estas konjako de la plej bona marko kaj estis preparita al uzo por sukeraĵ glazuroj sur Linzaj tortoj. Sed ĝi estis antaŭdestinita al tio, ke mi ĝin ŝtelu, same kiel mi estis antaŭdestinita por iĝi ŝtelisto.”

”Kaj ankaŭ ne estus malbone,” ekparolis Ŝvejk, ”se ni estus antaŭdestinitaj esti viaj kunkulpuloj, almenaŭ mi havas tian antaŭsenton.”

Kaj la antaŭdestino vere plenumiĝis. La botelo cirkulis malgraŭ protesto de la ĉefserĝento-kontisto Vaněk, kiu asertis, ke konjakon necesas trinki el gamelo kaj juste dividi, ĉar por la botelo estas da ili ĉiuj kvin, tiel ke ĉe nepara numero povas facile okazi, ke iu certe trinkos el la botelo je unu gluto pli ol tiuj ceteraj, al kio Ŝvejk rimarkis: ”Tio estas vero, se sinjoro Vaněk deziras havi paran numeron, li eksiĝu el la societo, por ke ne estu iaj malagrablajoj kaj kvereloj.”

Vaněk do revokis sian proponon kaj prezentis alian, grandaniman, ke la donacinto Jurajda estu vicigita sur tian lokon, ke li povu trinki dufoje, kio vekis ŝtormon de malkonsento, ĉar Vaněk jam unufoje trinkis, gustumante la konjakon ĉe malŝtopado de la botelo<sup>57</sup>.

Fine estis akceptita propono de la unujara volontulo trinki laŭ la alfabeto, kion li kialigis tiel, ke tio estas jam certa antaŭdestino, kian nomon ĉiu el ili havas.

La botelon fintrinkis Chodounský, unua laŭ la alfabeto ordo, akompanata per minaca rigardo de Vaněk, kiu al si elalkulis, ke kiel lasta li havos je unu gluto pli, kio estis kruda matematika eraro, ĉar estis dudek unu glutoj.

Poste ili ludis simplan cvikon kun tri kartoĵoj; montriĝis, ke

57 Ĉu ne ”...ĉar Jurajda jam unufoje trinkis...”? Kelkajn liniojn pli supre oni parolas pri tio, ke tiun botelon malŝtopis Jurajda

la unujara volontulo ĉiufoje, kiam li alprenas atutan karton, uzas ĉe tio religiajn sentencojn el la Sankta Skribo. Prenante al si atutan fanton, li vokis: "Sinjoro, lasu al mi tiun ĉi fanton ankaŭ ĉi-somere, ke mi ĝin kultivu kaj sterku, ĝi alportu al mi fruktojn."

Kiam oni al li riproĉis, ke li aŭdacis alpreni eĉ atutan okon, li ekvokis per forta voĉo: "Ĉu virino, havanta dek groŝojn, se ŝi unu groŝon perdus, ne eklumigos kandelojn kaj ne serĉas fervore, dum ŝi ne trovos? Kaj kiam ŝi trovis, ŝi kunvokas najbarojn kaj amikinojn dirante: 'Ĝoju kune kun mi, ĉar mi alprenis atutan okon kaj en kartoj venis al mi atuta reĝo kun aso!' — Donu ĉi tien do la kartojn, vi ĉiuj malgajnis."

La unujara volontulo Marek havis vere grandan feliĉon en karludado. Dum la ceteraj reciproke sin superatutis, li batis iliajn superatutitajn kartojn ĉiam per la plej alta atuto, tiel ke unu post la alia malgajnis, li prenis unu vetsumon post la alia kaj vokis al la venkitoj: "Kaj tertremoj grandaj aperos diversloke kaj teruraĵoj de malsato kaj pesto kaj grandaj ĉielaj mirakloj." Fine ĉiuj havis da tio jam sufiĉe kaj ĉesis ludi, kiam la telefonisto Chodounský malgajnis sian duonjaron estontan soldon. Li estis per tio konsternita kaj la unujara volontulo postulis de li atestojn, ke ĉe elpago de soldo la ĉefserĝentokontisto Vaněk elpagu la soldon de Chodounský al li.

"Ne timu, Chodounský," konsolis lin Ŝvejk. "Se vi havos feliĉon, vi falos en la unua batalo kaj koncerne viajn soldojn, Marek foriros kun longa nazo, trankvile tion al li subskribu."

La mencio, ke Chodounský falos, tuŝis lin tre malagrabla, tiel ke li diris kun certeco: "Mi ne povas fali, ĉar mi estas telefonisto, telefonistoj estas ĉiam en fronta kaŝejo kaj dratojn oni streĉas aŭ serĉas erarojn ĉiam nur post batalo."

La unujara volontulo menciis, ke telefonistoj ĝuste male estas elmetitaj al granda danĝero kaj ke ĉefe telefonistojn ĉiam elserĉas la malamika artilerio. Neniu telefonisto estas sekurigita en sia kaŝejo. Eĉ se li estus dek metrojn sub la tero, la malamika artilerio tamen lin tie trovos. Ke telefonistoj pereas kiel hajleroj dum somera pluvo, pri tio atestas la fakto, ke kiam li forlasis Bruckon, oni malfermis tie ĝuste la dudekkan kurson por telefonistoj.

Chodounský afliktite rigardis antaŭ sin, kio instigis Ŝvejkon al amika bona vorto: "Nu, mallonge dirite, vi havas neenvindan eskapejon." Chodounský afable respondis: "Fermu la faŭketon, onklino."

"Mi rigardos la literon 'C' en miaj notoj pri historio de la bataliono... Chodounský... Chodounský, hm, aha, ĉi tie ni tion havas: 'La telefonisto Chodounský superŝutita de mino. Li telefonas el sia tombo al la stabo: 'Mi mortas kaj gratulas al mia bataliono pro la venko!' "

"Tio devas al vi sufiĉi," diris Ŝvejk, "aŭ vi deziras ankoraŭ ion al tio aldoni? Ĉu vi memoras tiun telefoniston el Titanic<sup>58</sup>, kiu, kiam la ŝipo komencis jam droni, senĉese telefonis suben al subakvigita kuirejo, kiam jam estos tagmanĝo?"

"Por mi estas tio egala," diris la unujara volontulo, "la antaŭmortan eldiron de Chodounský eblas eventuale kompletigi per tio, ke li fine vokos per telefono: 'Salutu de mi nian feran brigadon!' "

58 granda, luksa angla vaporŝipo, kiu dum sia unua ŝipveturo el Eŭropo al Usono kunpuŝiĝis kun glacimonto kaj la 15an de aprilo 1912 dronis. La katastrofon ne postvivis 1503 homoj



#### 4. MARŜI! MARŜ'!

**K**iam oni alveturis al Sanok, montriĝis, ke en la vagono kun la militkuirejo de la dekunuoj, kie feliĉege furzis la satiĝinta Baloun, oni propre entute havis veron, ke estos vespermanĝo, kaj ke krom vespermanĝo ke oni disdonos tie eĉ soldatpanon por ĉiuj tiuj tagoj, kiam la bataliono ricevis nion. Kiam ili eliris el vagonoj, montriĝis ankaŭ, ke propre en Sanok troviĝas la stabo de la "fera brigado", al kiu la bataliono de la naŭdekunua regimento<sup>59</sup> apartenis laŭ sia baptatesto. Ĉar la fervoja kontakto de ĉi tie sub Lvov kaj norden al Velikije Mosty estis neinterrompita, prezentis propre enigmon, kial la stabo de la orienta parto faris tiujn ĉi dispoziciojn, ke la "fera brigado" kun sia stabo koncentru marŝbatalionojn cent kvindek kilometrojn en la ariero, se la fronto

59 nekonsekvenceco de la aŭtoro, ĝuste devas esti "por la alveturinta marŝbataliono de la naŭdekunua regimento" (kio estas tute klara el antaŭa eĉ sekvanta teksto)

etendiĝis tiutempe de Brody al Bug kaj laŭlonge de la rivero norden al Sokal'.

Tiu ĉi tre interesa strategia demando estis solvita terure simple, kiam la kapitano Ságner iris en Sanok anonci al la stabo de la brigado alveturon de la marŝbataliono.

Kuriera oficiro estis adjutanto de la brigado, kapitano Tayrle.

"Mi tre miras," diris la kapitano Tayrle, "ke vi ne ricevis certajn sciigojn. La marŝordono estas certa. Nature vi havis devon anticipi al ni anonci la linion de via marŝo. Laŭ dispozicioj de la ĉefa stabo vi alveturis je du tagoj pli frue."

La kapitano Ságner iom ruĝiĝis, sed ne venis al li en la menson ripeti ĉiujn tiujn ĉifritajn telegramojn, kiujn li ricevis dum la tuta vojo.

"Mi miras al vi," diris la adjutanto Tayrle...

"Mi opinias," respondis la kapitano Ságner, "ke ni ĉiuj oficiroj alparolas nin reciproke 'ci'."

"Bone," diris la kapitano Tayrle, "diru al mi, ĉu ci estas aktivulo, aŭ rezervulo? Ke aktivulo? — Tio estas io tute alia... La homo en tio ne orientiĝas. Ĉi tie traveturis jam tiom da idiotoj — rezervaj leŭtenantoj. — Kiam ni cedis de Limanów kaj Krasnik, ĉiuj tiuj 'ankaŭleŭtenantoj' perdis la kapon, kiam ili ekvidis kozakan patrolon. Ni en la stabo ne ŝatas tiajn parazitajn. Stulta ulo kun abiturienta ekzameno lasas sin fine aktiviĝi aŭ en civila vivo plenumas oficiran ekzamenon kaj kiel civilulo plu faras idiotaĵojn, kaj kiam venas milito, estas el li ne leŭtenanto, sed surfekiĝinto!"

La kapitano Tayrle forkraĉis kaj intime ekfrapetis la kapitanon Ságner: "Vi restos ĉi tie proksimume du tagojn. Mi trakondukos vin ĉiujn, ni dancos. Ni havas ĉi tie belajn ĉiesuli-

nojn, 'anĝelajn malĉastulinojn'. Ni havas ĉi tie filinon de generalo, kiu antaŭe praktikis lesbaninan amon. Ni ĉiuj alivestatas nin kiel virinoj kaj ci vidos, kion ŝi scipovas! Ŝi estas tia malgrasa bestio, ke oni eble eĉ ne ekpensus pri io tia. Sed ŝi tion scipovas, kamarado. Ŝi estas pasiulino- cetere, ci tion ekkonos."

"Pardonu!" li embarasiĝis; "mi devas denove vomi, tio estas hodiaŭ jam la trian fojon."

Kiam li poste revenis, li sciigis al la kapitano Ságner, por pruvi, kiel estas ĉi tie gaje, ke tio estas sekvoj de la hieraŭa vespero, kiun partoprenis ankaŭ pionira taĉmento.

Kun komandanto de tiu ĉi taĉmento, kiu ankaŭ estis en la rango de kapitano, konatiĝis la kapitano Ságner tre baldaŭ. Nome, la kancelarion enfalis uniformita longulo kun tri oraj steletoj, kaj en postdiboĉa inerteco, ne rimarkante la ĉeeston de la kapitano Ságner, tute intime ekparolis al Tayrle: "Kion ci faras, porkino? Hierau ci 'bele' malplaĉigis nian grafion!" Li sidiĝis sur seĝon, kaj vipante per maldika kanvergo siajn tibiojn, li ridis plengorĝe: "Se mi rememoros, kiel ci vomis en ŝian sinon..."

"Jes," diris Tayrle, "hieraŭ estis tio vere gaja." Nur poste li interkonatigis la kapitanon Ságner kaj la oficiron kun kanvergo, kaj ĉiuj eliris tra kancelario de administra fako de la brigado eksteren en kafejon, kiu subite elkreskis el antaŭa bie-rejo.

Kiam ili iris tra la kancelario, la kapitano Tayrle prenis al si kanvergon de la komandanto de pionira taĉmento kaj ekbatis sur longan tablon, ĉirkaŭ kiu post komando stariĝis en fronton dek du soldatskribistoj. Estis tio adorantoj de trankvi-

la, sendanĝera laboro en ariero de la armeo kun grandaj, kontente ŝtopitaj ventroj kaj en ekstraj uniformoj.

Kaj al tiuj ĉi dek du dikaj apostoloj de fronteskapo la kapitano Tayrle diris, volante prezentiĝi antaŭ Ságner kaj la alia kapitano: "Ne opiniu, ke mi havas vin ĉi tie kiel en porkograsigejo. Porkoj! Malpli vori kaj drinki, sed pli kuri.

Nun mi montros al vi ankoraŭ alian dresadon," anoncis Tayrle al siaj kunuloj.

Li denove ekbatis per kanvergo sur la tablon kaj demandis tiujn dek du: "Kiam vi krevos, porkoj?"

Ĉiuj dek du respondis unisone: "Laŭ via ordono, sinjoro kapitano."

Ridante al sia propra idioteco kaj stulteco, la kapitano Tayrle eliris el la kancelario.

Kiam ĉiuj tri sidis en la kafejo, Tayrle ordonis alporti botelon da sorpa likvoro kaj venigi fraŭlinojn, kiuj estas liberaj. Montriĝis, ke la kafejo estas propre nenio alia ol bordelo, kaj ĉar neniu el la fraŭlinoj estis libera, la kapitano Tayrle ekscitiĝis ĝis la plej alta grado, en la antaŭĉambro vulgare insultis la prostituistinojn kaj kriis, kiu estas ĉe fraŭlino Ella. Kiam li ricevis respondon, ke tie estas ia leŭtenanto, li tondris ankoraŭ pli.

Ĉe fraŭlino Ella estis sinjoro leŭtenanto Dub, kiu, kiam la marŝbataliono estas jam loĝigita en gimnazio, kunvokis la tutan sian plotonon kaj en longa parolo ĝin atentigis, ke cedantaj rusoj fondis ĉie bordelojn kun venere kontaĝita personaro por kaŭzi al la aŭstra armeo per tiu ĉi sia ruzaĵo gradajn perdojn. Per tio ĉi li do avertas la soldatojn antaŭ elserĉado de similaj ejoj. Li mem persone konvinkiĝos en tiuj domoj, ĉu



oni obeis lian ordonon, ĉar ili estas jam en zono de la fronto; ĉiu, kiun li tie trafos, estos starigita antaŭ feldtribunalon.

La leŭtenanto Dub iris persone konvinkiĝi, ĉu oni ne malobeis lian ordonon, kaj ŝajne tial li elektis kiel elirpunkton de sia kontrolo sofon en ĉambreto de Ella en unua etaĝo de t.n. "urba kafejo", kaj sur tiu ĉi sofo tre bone sin amuzis.

Intertempe la kapitano Ságner foriris jam al sia bataliono. Scie, la kunularo de Tayrle disiĝis. La kapitanon Tayrle oni serĉis el la brigado, kie la komandanto de la brigado jam pli ol unu horon serĉis sian adjutanton.

Venis novaj ordonoj de la divizio kaj necesis definitive decidi pri marŝordono por la alveturinta naŭdekunua regimento, ĉar en origina direkto de tiu ĉi marŝos laŭ la novaj dispozicioj infanteria bataliono de la centdua regimento.

Ĉio tio estis tre konfuza, la rusoj cedis en nordorienta angulo de Galicio tre rapide, tiel ke iuj aŭstraj trupunuoj reciproke tie miksiĝis, en kion kelkloke penetris unuoj de germana armeo kiel kojnoj; tiun ĉi ĥaoson kompletigis alveturo de novaj marŝbatalionoj kaj aliaj armeaj trupunuoj al la fronto. La samo estis ankaŭ en teritorioj de la fronto, kiuj estis ankoraŭ pli profunde en la ariero, kiel ĉi tie en Sanok, kien subite alveturis rezervoj de germana Hanovra divizio sub komando de kolonelo kun tiel malbela rigardo, ke komandanto de la brigado estis per tio tute konfuzita. Scie, la kolonelo de rezerva Hanovra divizio montris dispoziciojn de sia stabo, ke li loĝigu sian viraron en la gimnazio, kie ĝuste nun estis lokitaj la naŭdekunuuloj. Por loki sian stabon li postulis malloĝigi domon de Krakova banko, en kiu ĝuste estis la stabo de la brigado.

La komandanto de la brigado kontaktis rekte la divizion, kie li precize priskribis la situacion, poste parolis kun la divi-

zio la akreokula Hanovrano, sekve de kio venis ordono al la brigado: "La brigado formariĝas el la urbo je la sesa horo vespere direkte al Turowa-Wolska-Liskowiec-Starasol-Sambor, kie pluaj ordonoj. Kun ĝi marŝas infanteria bataliono de la naŭdekunua regimento, formanta ŝirman trupunuon, en divido, kiun ĝi ellaboris ĉe la brigado laŭ skemo: la antaŭgardo formariĝas duonhoron antaŭ la sesa al Turowa, inter la suda kaj norda flankgardo distanco de tri kaj duono de kilometro. La postgardo foriras kvaronhoron post la sesa!"

Tiel do en gimnazio ekis granda tumulto kaj al konsiliĝo de batalionaj oficiroj mankis nur la leŭtenanto Dub, kiun elserĉi oni ordonis al Ŝvejk.

"Mi esperas," diris al li la ĉefleŭtenanto Lukáš, "ke vi trovos lin sen ĉiuj malfacilaĵoj, ĉar vi du senĉese havas ion inter vi."

"Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke mi petas skriban ordonon de la kompanio. Tio estas ĝuste pro tio, ke inter ni estas ĉiam ĝuste tiu 'io'."

Dum la ĉefleŭtenanto Lukáš kopiis sur forŝirebla folio en sia notlibro, ke la leŭtenanto Dub tuj venu en la gimnazion al konsiliĝo, Ŝvejk anoncis plu: "Jes, sinjoro ĉefleŭtenanto, vi povas, kiel ĉiam, esti sen zorgoj. Mi lin trovos, ĉar al la soldatoj estas malpermesite eniri bordelojn kaj li certe estas en unu tia por konvinkiĝi, ĉu neniu de lia plotono deziras veni antaŭ feldtribunalon, per kiu li kutime minacas. Li mem proklamis antaŭ la viraro de sia plotono, ke li trairos ĉiujn bordelojn, kaj poste ke estos ve kaj ili lin ekkonos de tiu malbona flanko. Cetere, mi scias, kie li troviĝas. Li estas ĝuste ĉi tie en la kontraŭa kafejo, ĉar la tuta viraro rigardis, kien li iras unue."

"Kunigitaj amuzejoj kaj urba kafejo", entrepreno, kiun

menciis Ŝvejk, estis dividita ankaŭ en du partojn. Kiu ne volis iri tra la kafejo, iris de malantaŭe, kie en suno varmigis sin iom pli aĝa sinjorino, parolanta germane, pole kaj hungare proksimume en tiu ĉi senco: "Eniru, soldateto, ni havas ĉi tie belajn fraŭlinojn.."

Kiam soldateto eniris, ŝi kondukis lin tra koridoro en ian akceptan kancelarion kaj alvokis unu el fraŭlinoj, kiu tuj alkuris en virina ĉemizo; unue ŝi volis monon, kaj tiun ĉi sumon tuj surloke, dum la soldateto dekroĉadis sian zonon kun bazoneto, enkasigis la prostituistino.

Oficiraro alvenadis tra la kafejo. La vojo de sinjoroj oficiroj estis pli trista, ĉar ĝi kondukis tra septitaj ĉambretoj malantaŭe, kie estis elekto de dua rango, destinita por suboficiroj, kaj kie estis virinaj ĉemizetoj kun punktoj kaj oni trinkis vinon aŭ likvorojn. Ĉi tie la prostituistino toleris nenion, tio ĉio okazis supre en ĉambretoj, kie en unu tia edeno, plena da cimoj, kuŝaciis sur sofo la leŭtenanto Dub en kalsono, dum fraŭlino Ella rakontis al li elpensitan tragedion de sia vivo, kiel tio ĉiam estas en tiuj ĉi okazoj, ke ŝia patro estis fabrikanto kaj ŝi profesorino de liceo en Budapeŝto kaj ke tion ĉi ŝi faris pro malfeliĉa amo.

Je manetendo sur tableto malantaŭ la leŭtenanto Dub estis botelo da sorpa likvoro kaj glasetoj. Ĉar la botelo estis duone malplena kaj Ella eĉ la leŭtenanto parolis jam sensencaĵojn, estis tio ŝarĝoprovo, ke la leŭtenanto Dub ne toleras multe. Laŭ lia parolo vidiĝis, ke li ĉion tion jam intermiksas kaj ke Ellan li konsideras kiel sian servosoldaton Kunert; tiel li ŝin ankaŭ alparolis kaj minacis al la supozata Kunert laŭ sia kutimo: "Kunert, Kunert, bestio, kiam vi min ekkonos de tiu mia malbona flanko..."

Ŝvejkon atendis la sama proceduro kiel ĉiujn ceterajn soldatetojn, kiuj eniradis de malantaŭe, sed li afable elŝiris sin al ulino en ĉemizo, post kies krio alkuris la pola prostituistino kaj tiu antaŭ la okuloj de Ŝvejk arogante malkonfesis, ke ili havus ĉi tie ian sinjoron leŭtenanton kiel gaston.

”Ne alkriegu min tro, moŝtulino,” diris Ŝvejk afable, dolĉe ĉe tio ridetante, ”aŭ mi donos al vi sur la faŭkon. Foje ĉe ni en Platnéřská-strato oni batregalis prostituistinon tiel, ke ŝi perdis la konscion. Tiam filo serĉis tie sian patron, certan Vondráček, komercejo per pneŭmatikoj. Nomo de tiu prostituistino estis Křován, kaj kiam oni ŝin rekonsciigis kaj en savstacio demandis pri ŝia nomo, ŝi diris, ke ĝi komencas per 'C'. Kaj kia estas via estimata nomo?”

La ”honorinda matrono” komencis terure kriegi, kiam post tiuj ĉi vortoj Ŝvejk ŝin forpuŝis kaj serioze paŝis tra ligna ŝtuparo en la unuan etaĝon.

Sube aperis mem posedanto de la bordelo, malriĉiĝinta pola nobelo, kiu elkuris malantaŭ Ŝvejk tra la ŝtuparo kaj komencis tiri lin je la jako, ĉe kio li kriis al li germane, ke tie supre estas tio por soldatoj malpermesita, tie estas tio por sinjoroj oficiroj, por la soldataro estas tio sube.

Ŝvejk lin atentigis, ke li venas ĉi tien en intereso de la tuta armeo kaj ke li serĉas certan sinjoron leŭtenanton, sen kiu la armeo ne povas ekmarŝi sur batalkampon, kaj kiam la posedanto kondutis senĉese pli agresive, Ŝvejk deĵetegis lin de sur la ŝtuparo kaj supre daŭrigis en traserĉado de ĉambroj. Li konvinkiĝis, ke ĉiuj ĉambretoj estas senhomaj, nur kiam ĉe la fino de perono li ekfrapetis, premis la klinkon kaj malfermetis la pordon, eksonis jelpa voĉo de Ella: ”Okupite” kaj senpere

post tio profunda voĉo de la leŭtenanto Dub, kiu ŝajne opiniis, ke li estas ankoraŭ en sia ĉambro en la tendaro: "Eniru!"

Ŝvejk eniris, alpaŝis al la sofo kaj transdonante la kopion de notlibra paperfolio al la leŭtenanto Dub raportis, oblikve rigardante pecojn de uniformo, disĵetitajn en angulo de la sofo: "Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke vi devas vin vesti kaj laŭ tiu ĉi ordono, kiun mi al vi transdonas, tuj iri en nian kazernon en la gimnazio, ni havas tie grandan militan konsiliĝon!"

La leŭtetanto Dub malfermegis je li la okulojn kun etaj pupiloj, sed li rememoris, ke li tamen nur ne estas tiel ebria por ne ekkoni Ŝvejkon. Tuj venis al li ideo, ke oni sendas al li Ŝvejkon al raporto kaj tial li diris: "Mi tuj reguligos kun vi la kontojn, Ŝvejk. Vi vidos, - kiel - vi - finiĝos..."

"Kunert," li vokis al Ella, "verŝu - al mi - ankoraŭ - glaseton!"

Li ektrinkis, kaj ŝirante la skriban ordonon, ridis: "Ĉu tio estas - ekskuzatesto? Ĉe - ni - valoras - neniam ekskuzatestoj. - Ni estas - en - soldatservo - kaj ne - en - lernejo. Ĉu oni - do - kaptis - vin - en bordelo? Iru - al mi - Ŝvejk - pli - proksimen - mi donos - al vi - kelke da - vangobatoj. - En kiu - jaro - Filipino - la Macedona - venkis - romanojn<sup>60</sup>, vi - tion - ne scias - vi - virĉevalo!"

"Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto," daŭrigis Ŝvejk senkomplete, "tio estas la plej supera ordono de la brigado, ke sinjoroj oficiroj sin vestu kaj iru al bataliona konsiliĝo, scie, ni ekmarŝos, kaj ankoraŭ nur nun decidiĝos, kiu kompanio

60 la leŭtenanto Dub formetis kun sia sobreco ankaŭ siajn lerneajn sciojn: Filipino la Macedona militis kontraŭ romanoj trifoje kaj ĉiam malvenkis

formos antaŭgardon, flankgardon aŭ postgardon. Jam nun oni pri tio decidis kaj mi opinias, sinjoro leŭtenanto, ke ankaŭ vi rajtas ion al tio diri.”

Tiu ĉi diplomata parolo iom rekonsciigis la leŭtenanton Dub, tiel ke li nun komencis akiri certecon, ke li ja ne estas en la kazerno, sed pro singardemo li ankoraŭ demandis: ”Kie mi estas?”

”Vi bonvolas esti en bordelo, sinjoro leŭtenanto. Tiuj voj-oj de Sinjoro estas diversaj.”

La leŭtenanto Dub peze ekĝemis, derampis de sur la sofo kaj komencis serĉi sian uniformon, ĉe kio Ŝvejk al li helpis, kaj kiam li fine sin vestis, ambaŭ eliris eksteren, sed Ŝvejk post momento revenis, kaj neglektante Ellan, kiu donis al lia reveno tute alian signifon kaj sekve de la malfeliĉa amo tuj rampis sur la liton, rapide eltrinkis reston de sorpa likvoro en la botelo kaj denove iris malantaŭ la leŭtenanto.

Surstrate tio denove eniris al la leŭtenanto Dub en la kapon, ĉar varmegis. Li rakontis al Ŝvejk la plej diversajn sensencaĵojn sen kia ajn interrilato. Li parolis pri tio, ke li havas hejme poŝtmarkon de Helgoland kaj ke tuj post la abiturienta ekzameno ili iris ludi bilardon kaj ne salutis la klasprofesoron. Al ĉiu frazo li aldonis: ”Mi opinias, ke vi komprenas min bone.”

”Certe, ke mi komprenas vin bone,” respondis Ŝvejk. ”Vi parolas simile kiel lutisto Pokorný en Budějovice. Tiu, kiam homoj lin demandis: ’Ĉu vi jam banis vin ĉijare en Malše?’, respondis: ’Mi ne banis min, sed aliflanke ĉijare estos multe da prunoj.’ Aŭ oni lin demandis: ’Ĉu vi jam manĝis ĉijare boletojn?’ kaj li al tio respondis: ’Mi ne manĝis, sed tiu nova Maroka sultano laŭdire estas tre bonkora homo.’ ”

La leŭtenanto Dub haltis kaj elbuŝigis: "Ke la Maroka sultano? Tio estas malatentata aŭtoritatulo," viŝis al si ŝviton de sur la frunto, kaj rigardante Ŝvejkon per nebulecaj okuloj, ekmurmuris: "Tiel ĉi mi ne ŝvitis eĉ vintre. Ĉu vi konsentas kun tio? Ĉu vi min komprenas?"

"Mi komprenas, sinjoro leŭtenanto. En nian gastejon 'Ĉe la kaliko' iradis maljuna sinjoro, pensiita konsilisto de la landa komitato, kaj tiu asertis ĝuste la samon. Li ĉiam diris, ke li miras, kia diferenco estas inter la temperaturo somere kaj vintre. Ke ŝajnas al li tre stranga, kial homoj tion ankoraŭ ne malkaŝis."

Inter pordego de la gimnazio Ŝvejk forlasis la leŭtenanton Dub, kiu ŝanceliris tra la ŝtuparo supren en konferencejon, kie estis la milita konsiliĝo, kaj tiu ankaŭ tuj raportis al la kapitano Ságner, ke li estas tute ebria. Dum la tuta konsiliĝo li sidis kun la kapo klinita kaj de tempo al tempo li leviĝis ĉe diskuto por ekvoki: "Via opinio estas ĝusta, sinjoroj, sed mi estas tute ebria."

Kiam estis ellaboritaj ĉiuj dispozicioj kaj oni decidis, ke la kompanio de la ĉefleŭtenanto Lukáš iru kiel antaŭgardo, la leŭtenanto Dub subite skuiĝis, leviĝis kaj diris: "Mi memoras, sinjoroj, nian klasprofesoron en la unua klaso. Gloron al li, gloron al li, gloron al li!"

Al la ĉefleŭtenanto Lukáš venis en la menson, ke estos plej bone, se li igos meti la leŭtenanton Dub pere de lia servosoldato Kunert provizore en apudan kabineton de fiziko, kie ĉe porde staris gardistaro, por ke iu eble ne finŝtelu jam duone disŝtelitajn kolektojn da mineraloj en la kabineto. El la brigado oni ankaŭ senĉese atentigis pri tio trairantajn taĉmentojn.

Tiu ĉi organiza afero datiĝis de la tempo, kiam bataliono

de honvedoj, loĝigita en la gimnazio, komencis rabi en la kabineto. Al la honvedoj plaĉis precipe kolekto da mineraloj, buntaj kristaloj kaj piritoj, kiujn ili enŝtopis en siajn dorsosakojn.

Sur malgranda soldata tombejo estas sur unu el blankaj krucoj surskribo: "Laszlo Gargany". Tie dormas sian eternan sonĝon honvedo, kiu ĉe tiu rabado de gimnaziaj kolektoj eltrinkis ĉiun denaturigitan alkoholon el ujo, en kiu estis konservitaj diversaj reptilioj.

La mondmilito pereigis la homan genton ankaŭ per serpenta alkoholaĵo.

Kiam jam ĉiuj disiris, la ĉefleŭtenanto Lukáš alvokigis la servosoldaton de la leŭtenanto Dub, Kunerton, kiu forkondukis kaj sur sofon kuŝigis sian leŭtenanton.

La leŭtenanto Dub subite estis kiel malgranda infano; li prenis Kunerton je la mano, komencis trarigardi lian manplaton, ĉe kio li diris, ke el lia manplato li divenos la nomon de lia estonta edzino.

"Kia esta via nomo? Elprenu el mia surbrusta poŝo de la jako notlibron kaj krajonon. Via nomo estas do Kunert; venu ĉi tien post kvaronhoro kaj mi lasos al vi ĉi tie paperfolieton kun nomo de via sinjorino edzino."

Apenaŭ li tion diris, li komencis ronki, sed li denove el tio vekigis kaj komencis skribaĉi en sian notlibron; kion li skribis, tion li elŝiris, ĵetis teren, kaj metante mistere fingron al la buŝo, diris balbute: "Nun ankoraŭ ne, nur post kvaronhoro. Plej bone estos serĉi la papereton kun vualitaj okuloj."

Kunert estis tia bona bruto, ke post kvaronhoro li vere venis, kaj kiam li disvolvis la papereton, li legis el tiuj zigzagaĵoj



de la leŭtenanto Dub: "La nomo de via estonta edzino estas: sinjorino Kunert."

Kiam post momento li montris tion al Ŝvejk, tiu al li diris, ke Kunert nepre bone kaŝu tiu papereton, ke tiajn dokumentojn de soldataj ranguloj ĉiu devas estimi, tio iam en aktiva soldatservo ne ekzistis, ke oficiro skribu al sia servosoldato kaj alparolu lin sinjoro.

\*

Kiam estis finitaj preparoj por ekmarŝi laŭ la donitaj dispozicioj, brigada generalo, kiun tiel bele elpuŝis la Hanovra kolonelo, igis amasigi la tutan batalionon en kutiman kvadraton kaj havis al ĝi parolon. Scie, tiu viro tre ŝatis oratori, saltis de unua al deka, kaj kiam li havis jam nenion kion diri, li rememoris ankoraŭ feldpoŝton:

"Soldatoj," tondris el lia buŝo al la kvadrato, "nun ni proksimiĝas al fronto de la malamiko, de kiu dividas nin kelke da tagmarŝoj. Ĝis nun dum via marŝo vi ne havis la okazon, soldatoj, sciigi viajn adresojn al viaj karaj, kiujn vi forlasis, por ke viaj malproksimaj sciu, kien ili al vi skribu kaj por ke vi ĝojigu vin per leteroj de viaj karaj postvivantoj."

Li ne kapablis iel el tio eliri, ripetis tion sennombre sinsekve: "Karaj malproksimaj — karaj parencoj — karaj postvivantoj" ktp., ĝis fine li ekimpetis el tiu ĉi rondo per forta ekvoko: "Por tio ni havas feldpoŝtojn ĉe la fronto!"

Lia plua parolo aspektis tiel, kvazaŭ ĉiuj tiuj ĉi homoj en grizaj uniformoj kun la plej granda ĝojo devus lasi sin mortigi nur pro tio, ke en la fronto estas establita feldpoŝtoj, kaj se grenado forŝiros al iu ambaŭ piedojn, ke la morto devas ŝajni al li bela, se li rememoros, ke lia feldpoŝto havas la nu-

meron 72, kie eble kuŝas letero el hejmo de liaj karaj proksimuloj kun sendaĵo, enhavanta pecon da fumaĵita viando, lardo kaj hejmaj biskvitoj.

Post tiu ĉi parolo, kiam brigada muzikistaro finludis imperiestran himnon kaj oni vokis gloron al la imperiestro, unuopaj grupoj de tiu ĉi homa brutaro, destinita por esti buĉita ie malantaŭ Bug, ekmarŝis unu post la alia laŭ donitaj dispozicioj.

La dekunua kompanio ekiris duonhoron antaŭ la sesa al Turowa-Wolska. Ŝvejk trenis sin malantaŭe kun stabo de la kompanio kaj sanitara servo, kaj la ĉefleŭtenanto Lukáš ĉirkaŭrajdis la tutan soldatkolonon, ĉe kio li ĉiumomenete rajdis malantaŭen por konvinkiĝi ĉe la sanitara servo, kie sur ĉareto sub tukoj oni veturigis la leŭtenanton Dub al novaj heroaj faroj en nekonatan estonton, kaj ankaŭ por mallongiĝi al si la vojon per interparolo kun Ŝvejk, kiu pacience portis sian dorsosakon kaj fusilon, rakontante al si kun la ĉefserĝento-kontisto Vaněk pri tio, kiel antaŭ jaroj oni bele marŝis dum manovroj ĉe Velké Meziříčí.

”Tio estis ĝuste tia regiono kia estas ĉi tie, sed tiam ni ne marŝis en tia batalpreteco, ĉar tiam ni ankoraŭ eĉ ne sciis, kio estas rezervaj konservaĵoj, kiam ni ricevis konservaĵon, ni ĉe nia plotono forvoris ĝin tuj ĉe la plej proksima tranokto kaj en dorsosakojn ni metis anstataŭ tio brikojn. En unu vilaĝo venis inspektistoj, elĵetis ĉiujn brikojn el niaj dorsosakoj kaj estis da ili tiom, ke poste ia homo tie finkonstruis al si el ili familian domon.”

Momenton pli poste Ŝvejk energis iris apud ĉevalo de la ĉefleŭtenanto Lukáš kaj parolis pri feldpoŝtoj: ”Bela estis tiu parolo kaj ĉiun certe tre ĝojigos, se li dum la soldatservo ri-

cevos ian belan leteron el sia hejmo. Sed kiam mi soldatis antaŭ jaroj en Budějovice, dum la soldatservo mi ricevis en la kazernon nur unu leteron kaj tiun mi havas ankoraŭ kaŝita.”

El malpurigita ledsako Ŝvejk eltiris grasmakulitan leteron kaj legis, tenante la paŝon kun la ĉevalo de la ĉefleŭtenanto Lukáš, kiu komencis iom troti:

”Kanajlo mizera, murdisto kaj senhontulo! Sinjoro kaporalo Kříž alveturis Pragon cele de forpermeso, mi dancis kun li ’Ĉe Kocan’ kaj li al mi diris, ke vi laŭdire dancas ’Ĉe la verda rano’ en Budějovice kun ia stulta diboĉkadukulino kaj ke min vi tute forlasis. Por ke vi sciu, mi skribas tiun ĉi leteron en necesejo sur sidbreto apud la truo, inter ni estas fino. Via estinta Božena. Por ke mi ne forgesu, tiu kaporalo tion scipovas kaj li vin ankoraŭ ĉikanos, mi petis lin pri tio. Kaj ankoraŭ por ne forgesi, kiam vi alveturos cele de forpermeso, vi jam ne trovos min inter vivuloj.”

”Kompreneble,” daŭrigis Ŝvejk ĉe malrapida trotado, ”ke kiam mi alveturis cele de forpermeso, ŝi estis inter vivuloj, kaj ankoraŭ inter kiel viglaj vivuloj. Mi trovis ŝin ankaŭ ’Ĉe Kocan’, vestis ŝin du soldatoj de alia regimento kaj unu el ili estis tiel vigla, ke li tute publike palpis al ŝi sub la korsajon, kvaŝaŭ li volus, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, eltiri de tie polenon de ŝia senkulpeco, kiel diras Věnceslava Lužická<sup>61</sup>, aŭ kiel simile diris tion foje laŭte kun ploro juna, proksimume deksesjara knabino dum danclecionoj al gimnazio, kiam tiu pinĉis ŝin sur la ŝultro: ’Sinjoro, vi forviŝis polenon de mia virgeco.’ Kompreneble, ke ĉiuj ridis, kaj ŝia panjo, kiu ŝin tie

61 (propranome Anna Srb, 1835-1920): redaktorino de porvirina revuo ”Lada”, ĉeĥa verkistino de popolaj rakontoj kaj romanoj, el literatura vidpunkto ne tro altkvalitaj, kun naivaj amimplikaĵoj

gardis, forkondukis ŝin en koridoron en 'Beseda' kaj tie tiun sian stultan sensprutilon piedbatis. Mi venis al tiu konvinko, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke tiuj kamparaj ulinoj estas tamen nur pli sinceraj ol diboĉlacaj urbaj fraŭlinetoj, kiuj vizitas danclecionojn. Kiam antaŭ jaroj ni havis soldatan tendaron en Mníšek, mi iradis danci al Starý Knín kaj tie mi trovis al mi ulinon, certan Karola Vekl, sed mi ne plaĉis al ŝi tro. Foje dimanĉe vespere mi akompanis ŝin al lageto, tie ni sidiĝis sur akvobaraĵon kaj kiam subiris la suno, mi demandis ŝin, ĉu ankaŭ ŝi amas min. Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke aero estis tia varmeta, ĉiuj birdoj kantis kaj ŝi respondis al mi kun terura rido: 'Mi amas vin kiel linlignaĵon en la pugo, vi estas ja idiota.' Kaj mi estis vere idiota, tiel terure idiota, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke antaŭ tio mi paŝis inter kampoj, inter altkreskiĝinta greno en senhoma spaco, eĉ unufoje ni ne sidiĝis kaj mi montris al ŝi nur tiun dian benon, mi, idioto, al tiu kampista ulino klarigadis, ke tio ĉi estas sekalo, tio tritiko kaj tio ĉi ke estas aveno."

Kaj kvazaŭ por konfirmi tiun ĉi avenon ie antaŭe finsonis kunigitaj voĉoj de soldatoj, daŭrigantaj en kanto, kun kiu ĉeĥaj regimentoj iris verŝi la sangon por Aŭstrio jam ĉe Solferino:

*"Noktomezo jam kvietas,  
aven' el sak' ekimpetas.*

*Laŭ ordono de l' destino  
donos ĉiu ĉi ulino!"*

*En tion tuj enfalis aliaj:*

*"Donos — kion ŝi profitus,  
se ŝi timus kaj hezitus?*

*Kisojn du ŝi al vi donos*

*sur la vangojn, ne oponos.*

*Laŭ ordono de l' destino*

*donos ĉiu ĉi ulino.*

*Donos — kion ŝi profitus,*

*se ŝi timus kaj hezitus...”*

Poste komencis germanoj kanti la samon germane.

Tio estas tiel malnova soldata kanto, ke kantis ĝin en ĉiuj lingvoj eble jam soldataro dum napoleonaj militoj. Nun ĝi ĝoje sonis sur polvokvrita ŝoseo al Turowa-Wolska, en ebenaĵo de Galicio, kie ĉe ambaŭ flankoj de la ŝoseo ĝis tien al verdaj arbaroj sude, la kampoj estis piedpremegitaj kaj detruitaj sub ĉevalaj hufoj kaj sub botplandoj de miloj kaj miloj de pezaj soldataj botoj.

”Tiel ĉi simile ni detruis tion foje dum manovroj ĉe Písek,” ekparolis Ŝvejk, ĉirkaŭrigardante. ”Kun ni estis tie ia arkiduko, tio estas tiel justa sinjoro, ke kiam li veturis kun sia stabo pro strategiaj kaŭzoj tra grenkampo, tuj malantaŭ li pritaksis tiun tutan damaĝon lia adjutanto. Kampisto Pícha havis nenian ĝojon pro tiu vizito kaj de la armea administrantaro ne akceptis dek ok kronojn da kompenso por piedtreditaj kvin buŝeloj da kampo, li volis, sinjoro ĉefleŭtenanto, procesi, kaj ricevis pro tio dek ok monatojn en malliberejo.

Mi opinias, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke li propre povis ĝoji, se iu el la imperiestra genero vizitis lin sur lia terpeco. Alia kampisto, kiu estus konscia, vestus ĉiujn siajn ulinojn en blankajn robojn kiel fianĉknabinojn, enmanigus al ili bukedojn kaj starigus ilin sur sia terpeco, kaj ĉiu el ili devus bonvenigi la altrangan sinjoron, kiel mi legis pri Hindio, kie subuloj de ia regnestro lasis sin de tiu elefanto dispremi.”

”Kion vi tion diras, Ŝvejk?” vokis al li de sur la ĉevalo la ĉefleŭtenanto Lukáš.

”Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke mi havas en la menso tiu elefanton, kiu portis sur sia dorso la regnestron, pri kiu mi legis.”

”Ĉefe, ke vi scias, Ŝvejk, ĉion ĝuste klarigi,” diris la ĉefleŭtenanto Lukáš kaj rajdis antaŭen. Tie la soldatkolono jam ŝiriĝis, marŝo kun plena, perfekta ekipaĵo, al kiu oni ne alkutimiĝis post ripozo en la trajno, kaŭzis, ke al ĉiuj komencis dolori la ŝultroj kaj ĉiu tion al si plifaciligis, kiel li povis. Ili transmetis fusilojn de unu flanko al la alia, plejparto da ili jam ne portis ilin sur rimeno, sed surŝultre kiel rastilon aŭ forkegon. Iuj opiniis, ke ili helpos al si pli bone, se ili iros tra fosaĵo aŭ sur kamplimo, kie la grundo sub la piedoj ŝajnis al ili esti tamen nur pli mola ol sur la polvokovrita ŝoseo.

Plejparto da ili iris kun la kapo klinita teren kaj ĉiuj suferis de granda soifo, ĉar malgraŭ tio, ke la suno jam subiris, estis same sufoke kaj varmege kiel tagmeze kaj en la ladbotelo neniu havis jam eĉ guton da akvo. Tio estis la unua tago de la marŝo kaj tiu ĉi nekutima situacio, kiu prezentis kvazaŭ eniron al pli grandaj kaj grandaj suferoj, ju pli longe, des pli multe faris ĉiujn senfortaj kaj lacaj. Ili ĉesis ankaŭ kanti kaj reciproke inter si divenis, kiel malproksime ili havas probable al Turowa-Wolska, kie ili opiniis tranokti. Iuj de tempo al tempo sidiĝis en fosaĵo, kaj por ke tio tiel ne aspektu, ili malligis siajn botetojn kaj ĉe la unua vido faris impreson de homo, kiu malĝuste volvis al si piedvindojn kaj klopodas volvi ilin tiel, ke ili ne premu lin dum plua marŝo. Kontraŭe aliaj mallongigadis aŭ plilongigadis rimenon de sia fusilo aŭ malfermis dorsosakon kaj translokis objektojn en ĝi lokitajn, kon-

vinkante sin mem, ke ili faras tion por ĝuste dividi la pezon, por ke la rimenoj de la dorsosako ne malsuprentiru al ili unu aŭ alian ŝultron. Kiam la ĉefleŭtenanto Lukáš al ili proksimiĝis, unu post la alia leviĝis kaj raportis, ke io lin premas aŭ simile, se antaŭ tio kadetoj aŭ serĝentoj, kiam tiuj de malproksime ekvidis la ĉevalon de la ĉefleŭtenanto Lukáš, ne pelis ilin antaŭen.

La ĉefleŭtenanto Lukáš rajdante laŭlonge de ili tute afable ilin admonis, ke ili leviĝu, ke al Turowa-Wolska estas ankoraŭ tri kilometroj, tie ke estos ripozo.

Intertempe la leŭtenanto Dub rekonsciiĝis per senĉesa ruliĝado sur la sanitara ĉareto. Li ne rekonsciiĝis ankoraŭ plene, sed li povis leviĝi, klini sin el la ĉareto kaj voki al la stabo de la kompanio, kiu libere moviĝis ĉirkaŭe, ĉar ĉiuj, komencante per Baloun kaj finante per Chodounský, metis siajn dorsosakojn sur la ĉareton. Nur Ŝvejk paŝis sentime antaŭen eĉ kun la dorsosako, havante la fusilrimenon sur la brusto laŭ la maniero de dragonoj, fumis pipon kaj kantis al si dum marŝo:

*"Kiam ni la vojdirekton  
al Jaroměř ŝanĝis,  
kredu aŭ ne: ni enmarŝis,  
oni vespermanĝis..."*

Sur la ŝoseo pli ol kvincent paŝojn antaŭ la leŭtenanto Dub leviĝis nuboj da polvo, el kiu elprofundiĝis staturoj de soldatoj; la leŭtenanto Dub, al kiu denove revenis lia entuziasmo, klinis la kapon el la ĉareto kaj komencis kriegi al la ŝosea polvo: "Soldatoj, via nobla tasko estas malfacila, por ni komenciĝas penplenaj marŝoj, la plej diversaj mankoj en ĉio kaj ĉiu-

specaj malfacilaĵoj. Sed kun plena konfido mi rigardas renkonten al via persistemo kaj via forta volo.”

”Idioto,” diris Ŝvejk poete.

La leŭtenanto Dub daŭrigis: ”Por vi, soldatoj, neniu malhelpo estas tiel granda, por ke vi ĝin ne superu! Mi ripetas al vi ankoraŭfoje, soldatoj, ke mi ne kondukas vin al facila venko. Por vi estos tio kaprompa problemo, sed vi en tio sukcesos! Vin gloros la historio de epokoj.”

”Ŝovu al vi fingron en la gorgon,” diris Ŝvejk denove poete.

Kaj kvazaŭ la leŭtenanto Dub obeus, li komencis subite vomi en polvon de la ŝoseo, kiel li havis la kapon klinita, kaj kiam li elvomis, li ankoraŭ ekkriis: ”Soldatoj, antaŭen,” denove renversiĝis sur dorsosakon de la telegrafisto Chodounský kaj dormis ĝis Turowa-Wolska, kie oni fine starigis lin sur la piedojn kaj demetis de sur la ĉareto laŭ ordono de la ĉefleŭtenanto Lukáš, kiu kondukis kun li tre longan kaj tre malfacilan parolon, ĝis la leŭtenanto Dub rekonsciiĝis el ĉio tiagrade, ke li fine povis proklami: ”Logike konkludante, mi faris stultaĵon, kiun mi kompensas antaŭ vizaĝo de la malamiko.”

Sed kompreneble li ankoraŭ ne rekonsciiĝis plene, ĉar forirante al sia plotono, li diris al la ĉefleŭtenanto Lukáš: ”Vi min ankoraŭ ne konas, sed kiam vi min ekkonos...!”

”Pri tio, kiel vi ekscesis, vi povas informiĝi ĉe Ŝvejk.”

La leŭtenanto Dub iris do unue ne al sia plotono, sed al Ŝvejk, kiun li trovis en kompanio de Baloun kaj la ĉefserĝento-kontisto Vaněk.

Baloun ĝuste parolis pri tio, ke hejme en la muelejo li ĉiam havis en puto botelon da biero. Ke la biero estis tiel malvarma, ĝis agaciĝis la dentoj. En aliaj muelejoj oni trinkis tian



bieron vespere post kazeo kun butero, sed li en sia avideco je voraĵo, pro kiu sinjoro dio nun lin punis, post kazeo ĉiam ankoraŭ englutis grandan pecon da viando. Ke nun la dia justeco punis lin per fetora varma akvo el putoj en Turowa-Wolska, en kiun ĉiuj devas ŝuti — por eviti ĥoleron — citratan acidon; tiun oni disdonis ĝuste antaŭ momento, kiam po taĉmentoj oni ricevis akvon el tiuj putoj. Baloun esprimis opinion, ke tiu ĉi citrata acido servas ŝajne por malsatigi la homojn. Estas vero, en Sanok li iom satiĝis, eĉ la ĉefleŭtenanto Lukáš lasis al li denove la tutan duonon el sia porcio da bovidaĵo, kiun Baloun alportis al li de la brigado, sed ke tio estas terura, li tamen nur opiniis, kiam oni venos ĉi tien kaj estos ripozo kun tranokto, ke oni denove ion kuiras. Li estis pri tio ankaŭ jam konvinkita, kiam soldataj kuiristoj ĉerpis akvon en kaldronojn. Li iris tuj demandi al la militkuirejoj, kio kaj kiel okazos, kaj ili al li respondis, ke estas nur ordono provizore ĉerpi akvon kaj ke post momento povas veni ordono denove tiun akvon elverŝi.

Ĝuste en tiu momento venis la leŭtenanto Dub, kaj ĉar li estis tre necerta pri si mem, li demandis: "Ĉu vi amuziĝas?"

"Ni amuziĝas, sinjoro leŭtenanto," respondis nome de ĉiuj Ŝvejk, "la amuzo ĉe ni plene torentas. Ĉiuflanke estas plej bone ĉiam gaje sin amuzi. Ĝuste nun ni parolas pri citrata acido. Sen amuzo povas esti neniu soldato, tiel oni almenaŭ pli bone forgesas ĉiujn malfacilaĵojn."

La leŭtenanto Dub diris al Ŝvejk, ke tiu iru kun li, ke li volas ion demandi. Kiam ili estis flanke, li diris al li per terure necerta voĉo: "Ĉu vi ne parolis pri mi?"

"Ho ne, neniam, sinjoro leŭtenanto, nur pri tiu citrata acido kaj pri fumaĵita viando."

”La ĉefleŭtenanto Lukáš al mi diris, ke mi laŭdire iel ekscesis kaj ke vi tre bone pri tio scias, Ŝvejk.”

Ŝvejk tre serioze kaj emfaze proklamis: ”Vi faris nenion, sinjoro leŭtenanto, vi estis nur gaste en certa bordelo. Sed ŝajne temis pri eraro. Ankaŭ lutiston Pimpr el Kozí plácek oni ĉiam serĉis, kiam li iris en la urbon por aĉeti ladon, kaj trovis lin ĉiam ankaŭ en simila ĉambro, aŭ ’Ĉe Ŝuha’ aŭ ’Ĉe Dvořák’, en kiu mi trovis vin. Sube estis kafejo kaj supre en nia okazo ulinoj. Vi, sinjoro leŭtenanto, ŝajne estis en eraro, kie vi propre troviĝas, ĉar varmegis, kaj homo ne al kutimiĝinta trinki ebriiĝas en tia varmo eĉ per ordinara rumo, des pli per sorpa likvoro kiel vi, sinjoro leŭtenanto. Mi ricevis ankaŭ ordonon alporti al vi invitilon al konsiliĝo, antaŭ ol ni ekmarŝis, kaj mi trovis vin ankaŭ ĉe tiu ulino tie supre; kaŭze de tiu varmeĝo kaj sorpa likvoro vi min eĉ ne ekkonis kaj kuŝis tie sur sofo senvestita. Tie vi neniel ekscesis eĉ ne diris: ’Vi min ankoraŭ ne konas’, sed tia afero povas okazi al kiu ajn, se varmegas. Iun homon kaptas tio ĉiufoje, alia venas al tio kiel blinda kokino al grajno. Se vi konus la maljunan Vejvoda, masonestron el Vršovice, sinjoro leŭtenanto, tiu ekintencis, ke li trinkos nenion, post kio li ebriiĝus. Li do eltrinkis ankoraŭ glaseton por la vojo kaj eliris el la hejmo serĉi tiujn senalkoholajn trinkaĵojn. Unue li haltis en la gastejo ’Ĉe la haltejo’, tie mendis pokalon da vermuto kaj komencis diskrete eldemandi la gastejestron, kion propre trinkas abstinuloj. Li tute ĝuste konjektis, ke pura akvo estas eĉ por abstinuloj tamen nur kruda trinkaĵo. La gastejestro al li do klarigis, ke abstinuloj trinkas sodakvojn, limonadojn, lakton kaj ankaŭ vinojn sen alkoholo, malvarman oŭkropon kaj aliajn senalkoholajn trinkaĵojn. El tio al la maljuna Vejvoda tamen nur pla-

ĉis tiuj senalkoholaj vinoj. Li demandis ankoraŭ, ĉu ekzistas ankaŭ senalkoholaj brandoj, eltrinkis ankoraŭ unu pokalon, interparolis kun la gastejestro pri tio, ke estas vere peko ofte ebrigiĝi, al kio la gastejestro al li diris, ke li toleras ĉion en la mondo, nur ne ebrigan homon, kiu ie alie ebrigiĝis, venas al li malebriiĝi ĉe botelo da sodakvo kaj ankoraŭ faras skandalon. 'Li ebrigiĝu ĉe mi,' diras ka gastejestro, 'poste li estas mia homo, sed alie mi lin ne konas.' La maljuna Vejvoda do fintrinkis kaj iris pluen, ĝis li venis, sinjoro leŭtenanto, sur Karolo-placon en komercejon per vinoj, kien li antaŭe ankaŭ iam venis, kaj tie demandis, ĉu oni ne havas senalkoholajn vinojn. 'Senalkoholajn vinojn ni ne havas, sinjoro Vejvoda,' oni diris al li, 'sed vermuton aŭ ŝereon'. La maljuna Vejvoda iel hontis, li eltrinkis tie do pokalon da vermuto kaj pokalon da ŝereo, kaj kiel li tiel sidas, li konatiĝis, sinjoro leŭtenanto, kun ia ankaŭabstinulo. Vorto naskis vorton, ili trinkas ankoraŭ po pokalo da ŝereo kaj fine ili interkonsentis, ke tiu sinjoro scias pri ejo, kie oni kranas senalkoholajn vinojn. 'Estas tio en Bolzan-strato, oni iras tien tra ŝtuparo malsupren kaj oni havas tie gramofonon.' Pro tiu ĉi bona sciigo la maljuna Vejvoda starigis sur tablon plenan botelon da vermuto kaj poste ambaŭ foriris al Bolzan-strato, kie oni iras malsupren tra ŝtuparo kaj kie oni havas gramofonon. Kaj oni vere kranis tie nur fruktivinojn, ne nur senalkoholajn, sed eĉ sen alkoholo. Unue ĉiu el ili mendis la si duonlitron da grosvino, poste duonlitron da ribvino, kaj kiam ili eltrinkis ankoraŭ duonlitron da senalkohola grosvino, liaj piedoj komencis rigidiĝi-vibri post ĉiuj tiuj antaŭaj vermutoj kaj ŝereo, ili komencis krii, ke oni alportu al ili ofican ateston, ke tio, kion ili ĉi tie trinkas, estas senalkohola vino. Ke ili estas abstinuloj, kaj se

oni ne alportos tion al ili tuj, ke ili ĉion ĉi tie dishakos eĉ kun la gramofono. Poste policistoj devis treni ilin ambaŭ tra tiu ŝtuparo supren al Bolzan-strato, meti ilin en veturilon kaj ĵeti en izolejon — kaj ambaŭ estis kondamnitaj pro ebriegiĝo kiel abstinuloj.”

”Kial vi tion al mi diras,” ekkris la leŭtenanto Dub, kiu post tiu ĉi parolo plene malebriiĝis.

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke ambaŭ aferoj propre ne apartenas unu al la alia, sed kiam ni jam tiel interparolas...”

Ĉar la leŭtenanto Dub jam iel klare perceptis, venis al li en la menson, ke Ŝvejk denove lin ofendis kaj kriis al li: ”Foje vi min ekkonos! Ĉu tio estas soldatpozo?”

”Obee mi raportas, ke mi havas malbonan pozon, mi forgesis, obee mi raportas, kunfrapi la kalkunumojn. Mi faros tion tuj.” Ŝvejk jam denove staris en la plej bona atentopozo.

La leŭtenanto Dub meditis, kion ankoraŭ diri, sed fine li elbuŝigis nur: ”Atentu vin antaŭ mi, por ke mi ne devu diri tion al vi lastfoje,” al kio li aldone korektis sian malnovan eldiron: ”Vi min ankoraŭ ne konas, sed mi vin konas.”

Forirante de Ŝvejk, la leŭtenanto Dub ekpensis pri sia postdiboĉa stato: ”Povas esti, ke pli bone efikus, se mi al li dirus: ’Mi konas vin, ulo, jam longe de tiu malbona flanko.’

Poste la leŭtenanto Dub igis alvoki al si la servosoldaton Kunert kaj ordonis al li, ke tiu havigu al li kruĉon da akvo.

Honore al Kunert estu dirite, ke en Turowa-Wolska li longe serĉis kruĉon kaj akvon.

Fine li sukcesis ŝteli la kruĉon de pola sinjoro parokestro kaj en la kruĉon ĉerpi akvon el puto, tute garnita per alnajlitaj bretoj. Tiucele li devis kompreneble forigi kelke da bre-

toj, ĉar la puto estis tiel garnita tiukaŭze, ke akvo en ĝi estis suspekta kiel tifoza.

Sed la leŭtenanto Dub eltrinkis la tutan kruĉon da akvo sen ajnaj pluaj sekvoj, per kio li konfirmis la proverbon: "Bona porko toleras ĉion."

Ĉiuj ege eraris, opiniante, ke en Turowa-Wolska ili eble tranoktos.

La ĉefleŭtenanto Lukáš alvokis la telefoniston Chodounský, la ĉefserĝenton-kontiston Vaněk, la kompanian kurieron Ŝvejk kaj Balounon. La ordonoj esti simplaj. Ĉiuj lasos sian ekipaĵon ĉe la sanitara servo, tuj iros tra kampovojo al Maly Polanec kaj poste laŭlonge de rivereto suben en sudorienta direkto al Liskowiec.

Ŝvejk, Vaněk kaj Chodounský estas enloĝigantoj. Ĉiuj devas prizorgi tranoktadon por la kompanio, kiu sekvos ilin post unu, maksimume post unu kaj duono de horo. Baloun intertempe surloke, kie tranoktos li, la ĉefleŭtenanto Lukáš, devas igi rosti anseron kaj ĉiuj tri devas atenti Balounon, ke tiu duonon da ĝi ne forvoru. Krom tio Vaněk kun Ŝvejk devas aĉeti porkon por la kompanio laŭ tio, kiom da viando apartenas al la tuta kompanio. Nokte oni kuiras gulaŝon. La tranoktejoj por la viraro devas esti en ordo; eviti pedikople-najn kabanojn, por ke la viraro bone ripozu, ĉar la kompanio formarŝas el Liskowiec tra Kroščienko al Starosol jam duon-horon post la sesa matene.

Scie, la bataliono jam ne estis malriĉa. La brigada intendantaro en Sanok elpagis al la batalino antaŭpagojn pro la estonta hombuĉado. En la kompania kaso estis pli ol cent mil kronoj kaj la ĉefseĝento-kontisto Vaněk ricevis jam ordonon, kiam ili estos ie surloke, per kio kompreniĝis en tranĉeoj, an-

taŭ la morto de la kompanio, elkalkuli kaj elpagi al la viraro sumojn, sendube al ĝi apartenantajn pro la nericevita soldatpano kaj manĝo.

Dum ĉiuj kvar ekiris la vojon, ĉe la kompanio aperis loka sinjoro parokestro kaj laŭ la nacieco de la soldatoj disdonis al ili folieton kun "Lurda kanto" en ĉiuj ligvoj. Li havis da tiuj kantoj paketon, kiun cele de disdono al trairantaj soldataj taĉmentoj lasis al li ĉi tie ia altranga eklezia soldatrangulo, traveturanta la ruinigitan Galicion en aŭtomobilo kun malĉastulinoj.

*"En valo, kie monto kliniĝas al rivero,  
mesaĝon sonorilo sciigas ĝis vespero.  
Ave, ave, ave Maria! — Ave, ave, ave Maria!  
Bernardan — etulinon spirito supertera  
kondukas al herbriĉa arbaro ĉerivera. — Ave!  
Sur roko ŝi ekvidis rebrilon stelsimilan,  
figuron adorindan, sanktegan kaj gracilan. — Ave!  
Ornamas la figuron lilia rob' tre bela,  
ĉe koksoj ĉielblua rubando simpla, hela. — Ave!  
En manoj kunmetitaj amplena Sinjorino  
jen! — tenas rozarion, ĉiela ĉi Reĝino. — Ave!  
Vizaĝo de Bernarda ŝanĝiĝas, supertera  
trembrilo ŝiajn vangojn vualas tre tenera. — Ave!  
Rigardas ŝin Maria, ŝi preĝas, surgenuas,  
el buŝo de l' Reĝino parol' ĉiela fluas. — Ave!  
'Ke naskis mi sen peko, ekkredu, ho, infano,  
la tutan homan genton protektas mia mano.' — Ave!  
'Popol' en procesioj ĉi tien tuj pilgirmu,  
trankvilon sian serĉu, min laŭdu kaj estimu!' — Ave!*

*'Atestu al nacioj preĝejo el marmoro,  
 ĉi tie ke mi restas, en dom' de mia gloro.' — Ave!  
 'La fonto, kiu ŝprucas sub roko kaj deglitas,  
 esprimas mian amon, ĉi tien vin invitas.' — Ave!  
 Ni vokas al vi gloron, vi, valo korfavora,  
 loĝejon en vi havas Patrino Sepdolora. — Ave!  
 Kaverno, ho, mirakla troviĝas en la roko,  
 edenon al ni donis Reĝino sur ĉi loko. — Ave!  
 Aj, inter ĉiuj tagoj ĉi tiu vere gloras,  
 de tiu tag' amasoj grandegaj Vin adoras. — Ave!  
 Vi volis procesiojn de adorantoj havi,  
 do venu nin, petantojn, en temp' malbona savi. Ave!  
 Vi, sava stel', nin gvidu sur vojoj de la bono,  
 konduku viajn idojn al sankta Dia trono. — Ave!  
 Sanktega Virgulino, ameman havu koron,  
 infanoj viaj spertu patrinan korfavoron. — Ave!'*

En Turowa-Wolska estis multe da latrinoj kaj ĉe tiuj ĉie kuŝaĉis paperetoj kun la "Lurda kanto".

Kaporalo Nachtigal de ie ĉe Kaŝperské Hory havigis al si botelon da brando de timigita judo, amasigis kelke da kamaradoj kaj nun ĉiuj komencis kanti la "Lurdan kanton" laŭ la germana teksto sen refreno "Ave!" en melodio de la kanto "Princ' Eŭgeno".

Estis tio terure malbela vojo, kiam mallumiĝis kaj tiuj kvar, kiuj havis la taskon prizorgi tranoktadon por la dekunua kompanio, venis en arbareton super rivereto, eble kondukanta al Liskowiec.

Baloun, kiu je unua fojo troviĝis en situacio, ke li iras ien en nekonataĵon kaj al kiu ĉio: mallumo kaj tio, ke ili iras unue

serĉi loĝejojn, ŝajnis neordinare mistera, subite ricevis teruran suspekton, ke tio ne estas nur tiel senkaŭze.

”Kamaradoj,” li diris mallaŭte, stumblante sur la vojo super rivereto, ”ili nin oferis.”

”Kion vi per tio pensas?” mallaŭte ekkriegis al li Ŝvejk.

”Kamaradoj, ni ne kriegu tiom,” petis Baloun mallaŭte, ”mi sentas tion jam en la korpo, oni nin aŭdos kaj tuj komencos kontraŭ ni pafi. Mi tion scias. Tiuj niaj sendis nin antaŭen por elgvati, ĉu ne estas tie la malamiko, kaj se ili aŭdos pafadon, ili tuj scios, ke ne eblas iri pluen. Kamaradoj, ni estas antaŭpatrolo, kiel instruis al mi tion kaporalo Terna.”

”Iru do kiel unua,” diris Ŝvejk. ”Ni iros bele malantaŭ vi, por ke vi ŝirmu nin per via korpo, se vi estas tia giganto. Kiam oni vin pafos, sciigu al ni tion, por ke ni povu ĝustatempe fari ’Al la tero’. Vi estas ja soldato, li timas, ke oni kontraŭ li pafos. Ĝuste tion devas ĉiu soldato ege ŝati, ĉiu soldato devas scii, ke ju plioble la malamiko kontraŭ li ekpafos, des pli ankaŭ malgrandiĝos lia provizo da municio. Per ĉiu pafado, kiun malamika soldato sendas kontraŭ vi, malfortiĝas lia batalkapablo. Li ĉe tio ĝojas, ke li povas kontraŭ vi pafi, ĉar li almenaŭ ne devas kuntreni kartoĉojn kaj pli facile kuras.”

Baloun peze ekĝemis: ”Sed mi havas hejme bienon.”

”Fajfu pri via bieno,” konsilis al li Ŝvejk, ”prefere falu por sinjoro imperiestro. Ĉu oni ne instruis al vi tion dum la soldatservo?”

”Oni tion nur menciis,” diris la stulta Baloun. ”Oni kondukis min nur al ekzercejo, kaj poste jam neniam mi aŭdis pri io simila, ĉar mi iĝis servosoldato... Sinjoro imperiestro povus nin almenaŭ pli bone nutri...”

”Vi estas ja malbeninda nesatigebla porkino. Soldaton



antaŭ batalo oni absolute ne povas nutri, tion klarigis al ni kapitano Untergriez jam antaŭ jaroj en la lernejo. Tiu ĉiam al ni diris: 'Damnindaj buboj, se iam eksplodus milito, oni venus sur batakampon, ne troŝtopu vin antaŭ la batalo! Kiu estos troŝtopita kaj ricevos pafon en la ventron, tiu estas por la vivo perdita, ĉar post tia pafo ĉiu supo kaj soldatpano eliĝos al li el intesto kaj tia soldato tuj ricevos inflamon. Sed se li havas en la stomako nenion, tia pafo en la ventron estas por li bagatelo, kiel se pikus lin vespo, vera ĝojo.' "

"Mi digestas rapide," diris Baloun, "ĉe mi en la stomako neniam restas da tio multe. Ekzemple, mi forvoros la tutan pladon da knedlikoj kun porkaĵo kaj saŭrkrafto, kamarado, kaj post duonhoro mi ne elfekos el ĉio tio pli ol proksimume por tri supokuleroj, tio cetera en mi perdiĝos. Iu ekzemple diras, ke kiam li formanĝos kantarelojn, ke ili eliras el li tiel, kiel ili estis, nur ilin lavpurigi kaj denove meti en vinagron, kaj ĉe mi male. Mi forvoros tiom da kantareloj, ke iu alia de tio krevus, kaj kiam mi poste iras al necesejo, mi ellasos nur iom da flava kaĉo, kiel de infano, tio cetera en mi ankaŭ perdiĝis.

En mi, kamarado," sciigis Baloun intime al Ŝvejk, "solviĝas fiŝostoj kaj prunkernoj. Foje mi tion intence kalkulis. Mi formanĝis sepdek knedbulojn farĉitajn per prunoj kun kernoj, kaj kiam venis mia momento, mi iris malantaŭ la domon, fositis en tio per ligna stangeto, metis la kernojn flanken kaj kalkulis. El sepdek kernoj solviĝis en mi pli ol duono."

El la buŝo de Baloun eliris mallaŭta longa ĝemo: "Mia dommastrino preparis knedbulojn farĉitajn per prunoj el terpoma pasto, en kiun ŝi aldonis iom da kazeo, ke ili estu pli satigaj. Ŝi preferis ilin ĉiam supersŭtitaj per papavo ol per

raspita fromaĝo, kaj mi ĝuste male, tiel ke foje mi ŝin pro tio vangobatis... Mi ne sciis pritaksi mian familian feliĉon!”

Baloun haltis, ekŝmancis, per la lango prilekis la palaton kaj diris malgaje kaj mole: ”Sciu, kamarado, ke nun, kiam mi tion ne havas, ŝajnas al mi, ke la edzino tamen nur pravis, ke ili estas kun tiu ŝia papavo pli bongustaj. Tiam ĉiam al mi ŝajnis, ke tiu papavo ŝtopiĝas al mi inter la dentojn, kaj nun mi pensas, se ĝi ŝtopiĝus... Mia edzino spertis kun mi oftajn kaj grandajn suferojn. Plurfoje ŝi ploris, kiam mi volis, ke ŝi donu pli da majorano en tripkolbasojn, kaj ĉe tio mi ĉiam donis al ŝi ian baton. Foje mi ŝin, kompatindulinon, draŝis tiom, ke ŝi kuŝis du tagojn, ĉar ŝi ne volis morttranĉi al mi vespermanĝe meleagron, laŭdire ke sufiĉas por mi koko.

Jes, kamarado,” ekploris Baloun, ”havi nun tripkolbason sen majorano kaj kokojn. Ĉu vi ŝatas anetan saŭcon? Nu vidu, pro tiu ofte estis kriego, kaj nun mi trinkus ĝin kiel kafon.”

Baloun iom post iom forgesis la imagon de supozata danĝero kaj en nokta silento, ankoraŭ kiam ili descendis suben al Liskowiec, senĉese plu rakontis al Ŝvejk kun emocio, kion li antaŭe ne pritaksis kaj kion li nun manĝus, ke liaj okuloj plorus de ĝojo.

Malantaŭ ili iris la telefonisto Chodounský kun la ĉefserĝento-kontisto Vaněk.

Chodounský rakontis al Vaněk, ke laŭ lia opinio la mond-milito estas idiotaĵo. La plej malbona en ĝi estas, ke kiam ie ŝiriĝis telefona linio, oni devas nokte iri tion ripari, kaj ankoraŭ pli malbona ĉe tio estas, ke en pasintaj militoj oni ne konis reflektorojn. Sed nun, ĝuste kiam oni riparas tiujn damnindajn dratojn, la malamiko tuj trovas tian telefoniston hel-

pe de reflektoro kaj komencas kontraŭ li pafi per la tuta artillerio.

Sube en la vilaĝo, kien ili iris por elserĉi tranoktejon por la kompanio, estis mallumo kaj komencis boji ĉiuj hundoj, kio devigis la ekspedicion halti kaj mediti pri tio, kiel procedi kontraŭ tiuj ĉi bestaĉoj.

”Kion vi dirus, se ni revenus,” ekflustris Baloun.

”Baloun, Baloun, se ni tion anoncus, vi estus mortpafita pro malkuraĝo,” diris al tio Ŝvejk.

Hundoj bojis ĉiam pli kaj pli, kaj komencis boji eĉ tiuj sude malantaŭ la rivero Ropa en Kroščienko kaj en kelkaj aliaj vilaĝoj, ĉar Ŝvejk kriegis en noktan silenton:

”Ekkuŝi — ekkuŝi — ekkuŝi,” kiel li iam kriegis al siaj hundoj, kiam li per ili ankoraŭ komercis.

Hundoj komencis boji ankoraŭ pli, tiel ke la ĉefserĝentokontisto Vaněk diris al Ŝvejk:

”Ne kriegu al ili, Ŝvejk, aŭ vi ekbojigos la tutan Galicion.”

”Io simila,” respondis Ŝvejk, ”okazis al ni dum manovroj en la regiono ĉe Tábor. Ni almarŝis tien nokte en iun vilaĝon kaj hundoj komencis fari teruran bruegon. La ĉirkaŭaĵo estas tie abunde loĝigita, tiel ke tiu hunda bojado iris de unu vilaĝo al la alia, senĉese pluen kaj pluen, kaj kiam tiuj hundoj en la vilaĝo, kie ni tendumis, jam silentiĝis, ili ekaŭdis denove bojadon de malproksime, ekzemple de ie ĉe Pelhřimov, komencis denove boji kaj post momento bojis ĉio en la regionoj ĉe Tábor, Pelhřimov, Budějovice, Humpolec, Třeboň kaj Jihlava. Nia kapitano, tio estis tia nervoza maljunulaĉo, tiu ne povis elteni hundan bojadon, li ne dormis dum la tuta nokto, senĉese paŝis tien kaj reen kaj demandis la gardistaron: ’Kiu bojas, kio bojas?’ La soldatoj obee raportis, ke bojas hundoj, kaj

tio lin tiel iritis, ke tiuj, kiuj tiam gardostaris, ricevis malpermeson forlasi la kazernon, kiam ni revenis el manovroj. Poste li ĉiam elektis 'hundan patrolon', kaj sendis ĝin antaŭ ni. Tiu havis la taskon anonci al la loĝantaro en la vilaĝo de nia tranokto, ke neniuj hundo nokte ekbojnu, alie ke ĝi estos mortigita. Ankaŭ mi estis en tia patrolo, kaj kiam ni venis en ian vilaĝon de la regiono ĉe Milevsko, mi eraris kaj anoncis al vilaĝestro, ke ĉiu posedanto de hundo, kiu nokte ekbojnos, estos mortigita pro strategiaj kaŭzoj. La vilaĝestro ektimis, tuj jungis ĉevalojn kaj veturis al la ĉefa stabo por elpeti pardonon por la tuta vilaĝo. Tien oni lin tute ne enlasis, gardantoj preskaŭ lin mortpafis, li do revenis hejmen, kaj antaŭ ol ni enmarŝis la vilaĝon, laŭ lia konsilo ĉiuj ĉirkaŭvolvis la muzelojn de la hundoj per ĉifonoj, ke tri hundoj ricevis pro tio rabion.”

Ili descendis al la vilaĝo, kiam estis akceptita ĝenerala instruo de Ŝvejk, ke hundoj nokte timas fajreton el ekbruligita cigaredo. Malfeliĉe neniuj el ili fumis cigaredojn, tiel ke tiu ĉi konsilo de Ŝvejk ne havis pozitivajn rezultojn. Sed montriĝis, ke hundoj bojas pro ĝojo, ĉar ili amplene rememoris trairantajn soldatarojn, kiuj ĉiam lasis al ili ian manĝon.

Ili sentis jam de malantaŭe, ke proksimiĝas tiuj kreaĵoj, kiuj lasas post si ostojn kaj ĉevalajn kadavrojn. Dio scias, de kie ĉirkaŭ Ŝvejk subite aperis kvar bojuloj, kiuj komencis amike sur lin salteti kun vostoj levitaj supren.

Ŝvejk ilin karesis, plaŭdbatetis kaj parolis kun ili en malumo kiel kun infanoj:

”Ni estas do jam ĉi tie, ni venis al vi dormeti, manĝeti, ni donos al vi ostetojn, pankrustetojn, kaj poste matene ni denove marŝos pluen kontraŭ la malamiko.”

En kabanjoj de la vilaĝo oni komencis eklumigi lampojn,

kaj kiam ĉe la unua kabano ili komencis bategi la pordon por ekscii, kie loĝas la vilaĝestro, oni aŭdis de interne kriaĉantan kaj jelpan virinan voĉon, kiu ne pole kaj ankaŭ ne ukraine anoncis, ke ŝi havas la edzon en la milito, la infanojn malsanaj je varioloj kaj ke Moskaloj<sup>62</sup> ĉion forprenis kaj la edzo, antaŭ ol li iris en la militon, ordonis al ŝi nokte al neniu malfermi. Nur post kiam ili intensigis atakon kontraŭ la pordo kun certigo, ke ili estas enloĝigantoj, la pordo malfermiĝis helpe de nekonata mano, kaj kiam ili eniris internen, montriĝis, ke ĉi tie propre loĝas la vilaĝestro, kiu vane klopodis konvinki Ŝvejkon, ke li ne imitis tiun kriaĉantan virinan voĉon. Li sin ekskuzis, ke li dormis en fojno kaj ke lia edzino ne scias, kion ŝi diras, se iu subite vekas ŝin el dormo. Koncerne la tranoktadon por la tuta kompanio, ke la vilaĝo estas tiel malgrandeta, ke ne estas en ĝi loko eĉ por unu soldato. Tute ne ekzistas loko, kie eblus dormi. Ankaŭ aĉeti eblas ĉi tie nenion, Moskaloj ĉion forprenis.

Se sinjoroj bonfardzantoj tion ne malŝatus, li forkondukus ilin al Kroščienko, tie estas grandaj bienoj, estas tio nur tri kvaronhoroj de ĉi tie, tie estas sufiĉe da loko, ĉiu soldato povos kovri sin per ŝafa pelto, oni havas tie tiom da bovinoj, ke ĉiu soldato ricevos gamelon da lakto, akvo estas tie bongusta, sinjoroj oficiroj povas dormi tie en kasteleto, sed ĉi tie en Lis-kowiec? Mizero, skabio kaj pedikoj. Li mem havis iam kvin bovinojn, sed Moskaloj ĉiujn de li forprenis, tiel ke li mem, se li volas lakton por siaj malsanaj infanoj, devas iri ĝis Kroščienko.

Kiel atesto de tio ekmuĝis en apuda stalo ĉe li bovinoj kaj

62 pola moknomo por rusaj soldatoj

oni aŭdis jelpan virinan voĉon, kiu alkriis la kompatindajn bovinon kaj deziris al ili, ke tordu ilin ĥolero.

Sed la vilaĝestroj tio ne konfuzis kaj li daŭrigis, surmetante botojn:

”Unusolan bovinon havas ĉi tie najbaro Vojciek, ĝin vi bonvolis aŭdi, miaj sinjoroj bonfardzantoj, nun ekmuĝi. Tiu bovino estas malsana, malgaja. Moskaloj forprenis de ĝi bovidon. De tiu tempo ĝi ne donas lakton, sed la mastro bedaŭras ĝin morttranĉi, li opinias, ke Dipatrino de Czestochowa<sup>63</sup> alkondukos ĉion denove en ordon.”

Dum sia parolo li surmetis mantelon:

”Ni iros, sinjoroj bonfardzantoj, al Krościenko, daŭros tio eĉ ne tri kvaronhorojn, kion mi, kulpulo, tion diras, daŭros tio eĉ ne duonhoron. Mi konas vojon trans rivereton, poste tra betula arbareto laŭlonge de kverko... Tiu vilaĝo estas granda, kaj tre forta brando en drzinkejoj. Ni iru, sinjoroj bonfardzantoj! Kial heziti? Por sinjoroj soldatoj de via glora regimento necesas, ke ili kuŝiĝu en ordo, en komforto. Sinjoro imperiestra kaj reĝa soldato, kiu batalas kontraŭ Moskaloj, nepre bezonas puran tranoktejon, komfortan tranoktejon... Kaj ĉe ni? — Pedikoj, skabio, varioloj kaj ĥolero. Hieraŭ ĉe ni, en nia malbenita vilaĝo tri uloj nigriĝis kaŭze de ĥolero... La plej mizerikorda Dio malbenis la vilaĝon Liskowiec...”

En tiu momento Ŝvejk majeste mansignis.

”Sinjoroj bonfarantoj,” li diris, imitante la voĉon de la vilaĝestro. ”En ia libro mi foje legis, ke kiam dum la svedaj militoj estis ordono loĝiĝi en tiu aŭ alia vilaĝo kaj la vilaĝestro iel sin ekskuzis kaj ne volis esti al la enloĝigantoj ĉemane, ke oni

63 bildo de Maria la Virgulino en granda klostro en Czestochowa (urbo en suda Polio). Al la bildo oni atribuas miraklajn ecojn

lin pendumis sur la plej proksima arbo. Krom tio rakontis al mi hodiaŭ pola kaporalo en Sanok, ke kiam venas enloĝigantoj, vilaĝestro devas kunvoki ĉiujn vilaĝestraranojn, kaj nun oni iras kun ili de kabano al kabano kaj diras simple: ĉi tie estas loko por tri, ĉi tie por kvar viroj, en la parokejo estos sinjoroj oficiroj kaj ĉio devas esti preparita post duonhoro.

Sinjoro bonfaranto,” turnis sin Ŝvejk serioze al la vilaĝestro, ”kie vi havas ĉi tie la plej proksiman arbon?”

La vilaĝestro ne komprenis, kion signifas la vorto 'arbo', kaj tial Ŝvejk al li klarigis, ke tio estas betulo, kverko, pirarbo, pomarbo, mallonge ĉio, kio havas fortikajn branĉojn. La vilaĝestro denove tion ne komprenis, kaj kiam li aŭdis nomi iujn fruktarbojn, li ektimis, ĉar ĉerizoj jam maturiĝis, kaj diris, ke li scias pri nenio tia, nur ke antaŭ la domo li havas kverkon.

”Bone,” diris Ŝvejk, per la mano montrante internacian geston de pendumo, ”ni pendumos vin ĉi tie antaŭ via kabano, ĉar vi devas konscii, ke estas milito kaj ke ni havas ordonojn dormi ĉi tie kaj ne en ia Kroščienko. Vi, ulo, ne ŝanĝos niajn strategiajn planojn, aŭ vi balanciĝos sur pendumilo, kiel tio estas en tiu libro pri la svedaj militoj... Tia okazo, sinjoroj, estis foje dum manovroj ĉe Velké Meziříčí...”

En tiu momento interrompis Ŝvejkon la ĉefserĝento-kontisto Vaněk:

”Tion vi diros al ni nur poste, Ŝvejk,” kaj turnante sin al la vilaĝestro, ordonis: ”Do, nun alarmon kaj loĝejojn!”

La vilaĝestro komencis tremi, balbutis ion pri tio, ke li pensis tion por sinjoroj bonfarantoj plej bone, sed se ne eblas alie, ke io en la vilaĝo tamen eble nur troviĝos, por ke ĉiuj sinjoroj estu kontentaj, ke li tuj alportos lanternon.

Kiam li foriris el la ĉambro, kiun tre sporade lumigis malgranda petrola lampeto sub bildo de sanktulo, kiu sur la bildo tordiĝis kiel la plej granda kriplulo, Chodounský subite ekvokis:

”Kien malaperis al ni Baloun?”

Sed antaŭ ol ili povis bone ĉirkaŭrigardi, senbrue malfermiĝis pordeto malantaŭ kameno, kondukanta ien eksteren, kaj tra tiu enŝoviĝis Baloun, ĉirkaŭrigardis, ĉu ne estas tie la vilaĝestro, kaj diris nazparole, kvazaŭ li havus la plej grandan nazkataron:

”Mhi esthis en manĝhoprovizhejo, palphis en ion, phrenis thion en la faŭkhon, khaj nun ĉhio thio ghluigās al mhi sur la palathon. Ĝhi esthas nek sala nek dolĉha, esthas thio pana phasto.”

La ĉefserĝento-kontisto Vaněk lumigis lin per elektra lampeto kaj ĉiuj konstatis, ke en la vivo ili ankoraŭ ne vidis tiel malpurigitan aŭstran soldaton. Poste ili ektimis, ĉar ili vidis, ke la jako de Baloun ŝvelis tiom, kvazaŭ li estus en la plej alta grado de gravedeco.

”Kio al vi okazis, Baloun?” demandis Ŝvejk kunsente, fingropuŝante lin ĉe la ŝvelinta ventro.

”Tio estas kukumetoj,” stertoris Baloun, sufokiĝante per pasto, kiu moviĝis nek supren, nek malsupren, ”atentu, tio estas kukumetoj en salo. Rapidante mi formanĝis tri kaj la ceterajn mi al vi alportis.”

Baloun komencis tiri el sub la jako kukumeton post kukumeto kaj disdonis ilin ĉirkaŭe.

Sur la sojlo staris jam la vilaĝestro kun lanterno, kiu, vidante tiun ĉi scenon, krucosignis sin kaj eklamentis:

”Moskaloj forprenis eĉ niaj forprenas.”



Ĉiuj eliris en la vilaĝon, akompanataj per aro da hundoj, kiuj plej persiste tenis sin ĉe Baloun kaj nun saltatakis poŝon de lia pantalono, kie Baloun havis pecon da lardo, ankaŭ akiritan en la manĝoprovizejo, sed pro avideco perfide malkonfesitan al la kamaradoj.

”Kial la hundoj vin postkuras?” demandis Ŝvejk Balounon. Baloun respondis post iom pli longa medito:

”Ili sentas en mi bonan homon.”

Sed ĉe tio li ne diris, ke li havas la manon sur lardo en poŝo kaj ke unu hundo senĉese dentkaptas al li la manon...

Dum rondiro cele de tranokto oni konstatis, ke Liskowiec estas granda vilaĝo, sed kiu estis vere jam tre elsuĉita de la milita bruego. Ĝi ja ne suferis per incendioj, ambaŭ militantaj partioj kvazaŭ mirakle ne alprenis ĝin en sferon de militaj operacioj, sed estis ĉi tie lokita loĝantaro de nemalproksimaj detruitaj vilaĝoj Chyrov, Grabowa kaj Golubla.

En iuj kabanoj vivis eĉ ok familioj en la plej granda mize-ro post ĉiuj tiuj perdoj, kiujn ili suferis de la rabista milito, kies unu periodo traflugis ilin kiel sovaĝaj torentoj de inundo.

La kompanion necesis loki en malgranda duonruinigita distilejo sur alia rando de la vilaĝo, kie en fermentejo trovis lokon duono de la kompanio. La ceteraj estis lokitaj po dek viroj en kelke da bienoj, kie monhavaj nobeloj ne allasis al si malriĉan feĉon de povrigitaj senbienuloj.

La stabo de la kompanio kun ĉiuj oficiroj, la ĉefserĝentokontisto Vaněk, servosoldatoj, la telefonisto, sanitara servo, kuiristoj kaj Ŝvejk loĝiĝis en parokejo ĉe sinjoro parokestro, kiu ankaŭ ne akceptis al si eĉ unu ruinigitan familion el la ĉirkaŭaĵo, tiel ke li havis tie sufiĉe da loko.

Estis tio altstatura, magra, maljuna sinjoro en paliĝinta kaj

grasmakula sutano, kiu pro granda avareco preskaŭ ne manĝis. Li estis edukita de sia patro al granda malamo kontraŭ rusoj, sed tiun malamon li subite perdis, kiam rusoj cedis kaj venis aŭstri-hungaraj soldataroj kaj tiuj forvoris ĉiujn liajn anserojn kaj kokinojn, kiujn la rusoj lasis senatente — kaj loĝis ĉe li kelke da hirtaj kozakoj el malantaŭ Bajkalo.

Poste li ekmalamis la soldatarojn de la monarkio ankoraŭ pli, kiam en la vilaĝon venis hungaroj kaj elprenis ĉiun mieron el liaj abelujoj. Nun li rigardis siajn neatenditajn gastojn kun granda malamo kaj faris al li tre bone, kiam li povis ĉirkaŭ ili paŝi, skui la ŝultrojn kaj ripeti:

”Mi havas nenion. Mi estas vera almozulo, ĉe mi, sinjoroj, vi ne trovos eĉ pantranĉeton.”

Plej malgaje mienis ĉe tio kompreneble Baloun, kiu nur mirakle ne ekploris pro tia mizero. Li havis senĉese en la kapo nekularan imagon pri ia porkido, kies kuprekolora haŭteto kraketas kaj bonodoras. Baloun ĉe tio dormetis en kuirejo de sinjoro parokestro, kien de tempo al tempo enrigardis altkreska junulo, kiu servis ĉe sinjoro parokestro kiel stalservisto kaj kuiristino samtempe kaj havis severan ordonon ĉie atenti, por ke oni ne ŝtelu.

En la kuirejo Baloun trovis ankaŭ nenion, nur en papere-to sur salujo iom da kumino, kiun li ŝtopis al si en la buŝon kaj kies aromo vekis ĉe li gustajn halucinojn pri porkido.

Sur korto de la malgranda distilejo malantaŭ la parokejo brulis jam fajro sub kaldronoj de militkuirejo, akvo jam boligis kaj en tiu akvo oni kuiris nenion.

La ĉefserĝento-kontisto kun kuiristoj kuris tien kaj reen tra la tuta vilaĝo, serĉdemandis porkon, sed vane. Ĉie ili ricevis

la saman respondon, ke Moskaloj ĉion formanĝis kaj forprenis.

Ili vekis ankaŭ judon en drinkejo, kiu komencis ŝiregi al si la tempiobuklojn kaj montri bedaŭron super tio, ke li ne povas al sinjoroj soldatoj helpi, kaj fine li ilin devigis, ke ili aĉetu de li maljunan, cetjaran bovinon, magran mortaĉaĵon, kiu estis nenio alia ol ostoj kaj haŭto. Li volis pro ĝi grandegan sumon, ŝiris al si la barbojn kaj ĵuris, ke tian bovinon ili ne trovos en la tuta Galicio, en la tuta Aŭstrio kaj Germanio, en la tuta Eŭropo kaj sur la tuta mondo, ĉe tio li hurlis, ploris kaj ĵuris, ke tio estas la plej grasa bovino, kiu laŭ la ordono de Jehovo<sup>64</sup> kiam ajn naskiĝis. Li alvokis kiel atestantojn ĉiujn prapatrojn, ke por rigardi tiun bovinon oni alveturas ĝis de Wolocziska, ke en la tuta regiono oni parolas pri tiu bovino kiel pri io fabela, ke tio eĉ ne estas bovino, sed la plej sukriĉa bubalo. Fine li antaŭ ili genuiĝis, kaj ĉirkaŭpremante la genuojn de unu post alia, vokis ĉe tio:

”Prefere mortigu la maljunan, kompatindan judon, sed ne foriru sen la bovino.”

Li konfuzis ĉiujn per sia jelpado tiel, ke tiun bestaĉon, kiun ĉiu bestotombisto abomenus, ili fine fortrenis al militkuirejo. Poste, kiam li jam havis monon en poŝo, ankoraŭ longe li antaŭ ili ploris kaj lamentis, ke ili lin tute pereigis, detruis, ke li mem sin povrigis, se tian belegan bovinon li vendis al ili tiel malmultekoste. Li petis ilin, ke ili lin pendumu pro tio, ke ĉe siaj maljunaj ostoj li faris tian stultaĵon, pro kiu liaj prapatroj devas sin turni en la tomboj.

Kiam li ankoraŭ satruliĝis antaŭ ili en polvo, li deskuis su-

bite de si ĉian bedaŭron, foriris hejmen, kie li diris en kamero al sia edzino:

”Kara Elseta, soldatoj stultaj kaj via Natano ege saĝa.”

La bovino postulis ege da laboro. En iuj momentoj ŝajnis, ke tute ne eblas ĝin senhaŭtigi. Ĉe detirado oni kelkfoje ŝiris la haŭton, sub kiu aperis muskolaro, tordita kiel sekiĝinta ŝipa ŝnurego.

Intertempe oni altrenis de ie sakon da terpomoj kaj komencis senespere kuiru tiujn tendenojn kaj ostojn, dum apude en pli malgranda kuirejo oni kuiris en plena senespero manĝon por oficiroj el peco de tiu skeleto.

Tiu ĉi kompatinda bovino, se tiun ĉi fenomenon de la naturo propre eblas nomi bovino, fiksiĝis al ĉiuj partoprenantoj en vivan memoron kaj preskaŭ certas, ke se pli poste antaŭ la batalo ĉe Sokal<sup>65</sup> la komandantoj almemorigus al la viraro la bovinon el Liskowiec, la dekunua kompanio kun terura kriego kaj kolerego ĵetigus sin kun bajonetoj kontraŭ la malamiko.

La bovino estis tia malhontulino, ke absolute ne eblis fari el ĝi bovinan supon. Ju pli longe la viando kuiriĝis, des pli ĝi restis ĉe ostoj, formante kun ili unu tuton, rigidiĝis kiel burokrato, kiu duonon de la vivo adoras oficajn laŭliteraĵojn kaj voras nur aktojn.

Ŝvejk, kiu kiel kuriero konservis senĉesan kontakton inter la stabo kaj la kuirejo por sciiĝi, kiam tio estos jam kuirita, raportis fine al la ĉefleŭtenanto Lukáš:

”Sinjoro ĉefleŭtenanto, jam estas el tio porcelano. Tiu bovino havas tiel malmolan viandon, ke per ĝi eblas tranĉi vit-

65 la batalo okazis de la 1a ĝis 15a de aŭgusto 1915

ron. Kiam la kuiristo Pavlíček kun Baloun provis la viandon, Pavlíček elrompis al si antaŭan denton kaj Baloun molaron.”

Baloun serioze alpaŝis antaŭ la ĉefleŭtenanton Lukáš kaj balbutante, enmanigis al li sian elrompitan denton volvitan en ”Lurda kanto”:

”Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke mi faris, kion mi povis. Tiu dento estas elrompita en oficira kuirejo, kiam ni provis, ĉu el tiu viando tamen nur ne eblus prepari bifstekon.”

Post tiuj ĉi vortoj leviĝis de apogseĝo ĉe fenestro trista staturo. Estis tio la leŭtenanto Dub, kiun oni alveturigis per sanitara ĉareto kiel tute ruinigitan homon.

”Mi petas silenton,” li diris per senespera voĉo, ”al mi estas malbone!”

Li denove sidiĝis sur malnovan apogseĝon, kie en ĉiu fendeto estis miloj da pedikaj ovoĵoj.

”Mi estas laca,” li diris per tragika voĉo, ”mi estas malsaneta kaj malsana, mi petas, ke oni antaŭ mi ne parolu pri elrompitaj dentoj. Mia adreso estas: Smíchov, Královská-ŝtrato 18. Se mi ne ĝisatendos la matenon, mi petas, ke mia familio estu pri ĉio delikate informita kaj ke oni ne forgesu rimarki sur mia tombo, ke mi estis ankaŭ antaŭ la milito i.r. gimnazio profesoro.”

Li komencis milde ronki kaj jam ne aŭdis, kiel Ŝvejk eldiris verson el kanto pro mortintoj:

*”Ame vi deprenis pekon de Maria,  
vi kanajlon alvenigis de l’ kruc’ al cel’ lia,  
eĉ min savi, Dio, estu volo via.”*

Poste estis konstatite de la ĉefserĝento-kontisto Vaněk, ke la eminenta bovino devas kuirigi ankoraŭ du horojn en la

oficira kuirejo, ke pri bifsteko ne eblas eĉ paroli kaj ke anstataŭ bifsteko oni kuiros gulaŝon.

Estis decidite, ke antaŭ ol oni trumpetos manĝosignalon, la viraro dormetu, ĉar la vespermanĝo estos preta nur antaŭmatene.

La ĉefserĝento-kontisto Vaněk altrenis de ie garbeton da fojno, metis ĝin sub sin en la parokeja kuirejo, nervoze torĉis al si la lipharojn kaj diris mallaŭte al la ĉefleŭtenanto Lukáš, kiu ripozis super li sur malnova sofo:

”Kredu al mi, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke dum la tuta milito mi ankoraŭ ne voris tiajn bovinojn...”

En la kuirejo antaŭ ekbruligita stumpo de preĝeja kandelilo sidis la telefonisto Chodousnký kaj anticipis skribis leterojn hejmen, por ke li ne devu per tio peni, kiam ili fine havos destinita la numeron de feldpoŝto. Li skribis:

”Mia amata kaj kara edzino, la plej kara Boženka!

Estas nokto kaj mi senĉese rememoras vin, mia oro, kaj vidas vin, kiel ankaŭ vi min rememoras, kiam vi ekrigardos vakan liton apud vi. Vi devas al mi pardoni, ke ĉe tio venas al mi en la menson diversaj aferoj. Vi scias bone, ke jam ekde komenco de la milito mi estas sur batalkampo kaj ke mi aŭdis jam multon de miaj kamaradoj, kiuj estis vunditaj, ricevis forpermeson kaj kiam ili venis hejmen, ĉiu el ili preferus vidi sin sub la tero ol esti atestanto de tio, ke iu fripono amindumas lian edzinon. Estas tio por mi tre doloriga, kara Boženka, kiam mi devas tion ĉi al vi skribi. Mi tion al vi eĉ ne skribus, sed vi mem bone scias, ke vi al mi konfidis, ke mi ne estas la unua, kiu serioze pri vi interesiĝis kaj ke antaŭ mi havis vin jam sinjoro Kraus el Mikulášská-avenuo. Kiam mi nun tion rememoras en tiu ĉi nokto, ke tiu fripono povus ankoraŭ

vin pretendi dum mia foresto, mi opinias, kara Boženka, ke mi strangolmortigus lin surloke. Longe mi kaŝis tion en mi, sed se mi ekpensas, ke li povus denove vin postkuri, mia koro kunpremiĝas kaj mi atentigas vin nur pri tio, ke mi ne toleros ĉe mi malĉastulinon, kiu amorus kun ĉiu kaj farus malhonoron al mia nomo. Pardonu al mi, kara Boženka, miajn akrajn vortojn, sed atentu, ke mi ne eksciuj pri vi ion malbonan. Alie mi estus devigita sentripigi vin ambaŭ, ĉar mi decidigis jam al ĉio, eĉ se tio kostus al mi la vivon. Milfoje vin kisas, salutas la paĉjon kaj panjon

Via Antoĉjo.

PS. Ne forgesu, ke mi donis al vi mian nomon!”

Li daŭrigis en skribado de leteroj por provizo:

”Mia la plej kara Boženka!

Kiam vi ricevos tiujn ĉi liniojn, sciuj, ke ni estas post granda batalo, en kiu la milita fortuno turnis sin al nia flanko. Ni forpafis interalie proksimume dek malamikajn aeroplanojn kaj generalon kun granda veruko sur la nazo. En la plej kruza batalo, kiam super ni krevis ŝrapneloj, mi pensis pri vi, kara Boženka, kion vi probable faras, kiel vi fartas kaj kio nova estas hejme? Ĉe tio mi ĉiam rememoras, kiel ni kune estis en bierfarejo 'Ĉe Tomaso', kiel vi kondukis min hejmen kaj kiel la sekvanta tago doloris al vi la mano de tiu peno. Nun ni denove iras antaŭen, tiel ke ne restas al mi jam pli da tempo por daŭrigi la skribadon. Mi esperas, ke vi restis al mi fidela, ĉar vi bone scias, ke koncerne tion mi estas senkompata. Sed estas jam tempo por marŝi! Mi kisas vin milfoje, kara Boženka, kaj esperu, ke ĉio tio bone finiĝos.

Via sincera Antoĉjo.”

Le telefonisto Chodounský komencis dormeti kaj ekdormis super la tablo.

La parokestro, kiu ne dormis kaj senĉese paŝis tra la parokejo, malfermis pordon al la kuirejo kaj pro ŝparemo blovestingis finbrulantan stumpon de preĝeja kandelo apud Chodounský.

En la manĝoĉambro dormis neniu krom la leŭtenanto Dub. La ĉefserĝento-kontisto Vaněk, kiu en kancelario de la brigado en Sanok ricevis novan budĝeteton koncerne provizadon de la soldataro per produktoj, zorge ĝin studis kaj konstatis, ke propre ju pli la soldataro proksimiĝas al la fronto, des pli malaltiĝas ĝiaj porcioj. Li devis eĉ ekrideti al paragrafo de la ordono, en kiu oni malpermesas uzi safranon kaj zingibron ĉe preparo de supo por la viraro. En la ordono estis ankaŭ noto, ke ĉe militkuirejoj oni kolektu ostojn kaj sendadu ilin al diviziaj magazenoj en la ariero. Tio estis iom neklara, ĉar oni ne sciis, pri kiuj ostoj temas, ĉu pri homaj aŭ pri ostoj el alia buĉota brutaro.

”Aŭdu, Ŝvejk,” diris la ĉefleŭtenanto Lukáš, oscedante pro enuo, ”antaŭ ol ni ricevos ian manĝon, vi povus rakonti al mi ian okazintaĵon.”

”Ho,” respondis Ŝvejk, ”antaŭ ol ni ricevos manĝon, en tia okazo mi devus al vi rakonti, sinjoro ĉefleŭtenanto, la tutan historion de la ĉeĥa nacio. Mi konas nur tre mallongan okazintaĵon pri certa sinjorino poŝtestrino el la regiono ĉe Sedlčany, al kiu post morto de ŝia edzo oni konfidis tiun poŝton. Tio pri ŝi venis al mi en la kapon tuj, kiam mi aŭdis paroli pri feldpoŝtoj, kvankam kun tiuj tio havas tute nenion komunan.”



”Ŝvejk,” ekparolis la ĉefleŭtenanto Lukáš de sur la sofo, ”vi komencas denove per viaj teruraj idiotaĵoj.”

”Kompreneble, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, tio estas vere terure idiota okazintaĵo. Mi mem ne scias, kiel povis veni al mi en kapon io tiel idiota, pri io tia paroli. Tio estas aŭ denaska idioteco, aŭ rememoroj el la junaĝo. Sur nia terglobo, sinjoro ĉefleŭtenanto, estas diversaj karakteroj kaj tiu kuiristo Jurajda havis tamen nur veron, kiam li estis foje en Bruck ebriega, falis en fosaĵon kaj ne povis de tie surgrimpi, ke li de tie kriis:

’La homo estas destinita kaj alvokita al tio, ke li ekkonu la veron, regu per sia spirito en harmonio de la eterna universo, ke li senĉese evoluu kaj kleriĝu, iom post iom eniru en pli altajn sferojn, en pli inteligentajn kaj pli amplenajn mondojn.’ Kiam ni volis lin de tie eltiri, li gratis kaj mordis. Li opiniis, ke li estas hejme, kaj nur kiam ni deĵetis lin tiel denove, li komencis flatpeti, ke ni lin de tie eltiru.”

”Sed kio estas pri tiu poŝtestrino?” senespere ekvokis la ĉefleŭtenanto Lukáš.

”Ŝi estis tre bonanima ulino, sed tamen nur kanajla, sinjoro ĉefleŭtenanto, en la poŝto ŝi plenumis ĉiujn siajn devojn, sed ŝi havis unu mankon, ke ŝi opiniis, ke ĉiuj ŝin persekutas, insidas ŝin, kaj tial post taglaboro ŝi donis pri ili anoncojn al oficejoj laŭ tio, kiel ĉiuj tiuj cirkonstancoj kuniris. Foje matene ŝi iris en arbaron por kolekti fungojn kaj tre bone rimarkis, kiam ŝi iris laŭlonge de lernejo, ke sinjoro instruisto jam maldormis, salutis ŝin kaj demandis, kien ŝi iras tiel frumatene. Kiam ŝi al li diris, ke ŝi iras kolekti fungojn, li respondis, ke li venos post ŝi. El tio ŝi konkludis, ke li havis pri ŝi, la maljuna ulino, iajn nehonestaĵajn intencojn, kaj poste, kiam ŝi ek-

vidis lin vere eliri el densejo, ŝi ektimis, forkuris kaj tuj skribis anoncon al loka lerneja konsilantaro, ke li intencis ŝin perforti. La instruiston oni submetis al enketo kontraŭ la disciplino, kaj por ke el tio eble ne estu publika malhonoro, alveturis enketi tion mem la lerneja inspektoro, kiu turnis sin al ĉefĝendarmo, ke tiu donu prijuĝon, ĉu la instruisto estas eble kapabla je tia faro. La ĉefĝendarmo ekrigardis en aktojn kaj diris, ke tio ne eblas, ĉar tiu instruisto estis jam foje akuzita de parokestro ke li postkuris lian nevinon, ĉe kiu tiu parokestro dormis, sed ke tiu instruisto prenis al si ateston de distrikta kuracisto, ke li estas impotenta ekde siaj ses jaroj, kiam li rajdside falis el subtegmento sur timonon de garbveturilo. Tiu kanajla ulino faris do anoncon pri la ĉefĝendarmo, distrikta kuracisto kaj lerneja inspektoro, ke ili ĉiuj estas subaĉetitaj de tiu instruisto. Ili ĉiuj ŝin akuzis, ŝi estis kondamnita kaj apelaciis, ke ŝi estas spiritmalforta. Esploris ŝin kriminalaj kuracistoj kaj tiuj donis al ŝi bontrovon, ke kvankam ŝi estas idiota, ke ŝi tamen povas plenumi kiun ajn ŝtatan servon.”

La ĉefleŭtenanto Lukáš ekkriis:

”Jesuo Maria!”, al kio li ankoraŭ aldonis: ”Ion mi al vi dirus, Ŝvejk, sed mi ne volas abomenigi al mi la vespermanĝon,” al kio Ŝvejk proklamis:

”Mi diris al vi, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke tio, kion mi al vi rakontos, estas io terura idiota.”

La ĉefleŭtenanto Lukáš nur eksvingis la manon kaj diris: ”De vi mi jam eksciis da ’saĝaĵoj’, vere...”

”Ĉiu ne povas esti saĝa, sinjoro ĉefleŭtenanto,” diris Ŝvejk konvinke, ”tiuj malsaĝaj devas fari escepton, ĉar se ĉiu estus saĝa, en la mondo estus tiom da prudento, ke ĉiu dua homo el tio tute idiotiĝus. Se ekzemple, obee mi raportas, sinjoro

ĉefleŭtenanto, ĉiu konus la leĝojn de la naturo kaj scius el kalkuli al si la distancojn en la universo, li nur ĝenus siajn ĉirkaŭulojn, kiel certa sinjoro Čapek, kiu iradis en la gastejon 'Ĉe la kaliko', nokte ĉiam eliris el la bierejo surstraten, ĉirkaŭrigardis la stelplenan firmamenton kaj kiam li revenis, paŝis de unu al la alia kaj diris: 'Hodiaŭ bele lumas Jupitero, vi eĉ ne scias, kanajlo, kion vi havas super la kapo. Tio estas distancoj, ke se oni vin, fripono, elpaŭsus el kanono, vi flugus tien per rapideco de kanona kuglo milionojn kaj milionojn da jaroj.' Ĉe tio li estis tiel vulgara, ke poste li mem kutime elflugis el la gastejo per rapideco de elektra tramo, proksimume, sinjoro ĉefleŭtenanto, per dek kilometroj en horo. — Aŭ ni havas ekzemple, sinjoro ĉefleŭtenanto, formikon..."

La ĉefleŭtenanto Lukáš rektiĝis sur la sofo kaj kunmetis la manojn:

"Mi devas miri al mi mem, ke mi ĉiam kun vi parolas, Ŝvejk, mi konas vin ja, Ŝvejk, tiel longan tempon— —"

Ŝvejk ĉe tio konsente kapjesis:

"Tio dependas de kutimo, sinjoro ĉefleŭtenanto, tio estas ĝuste en tio, ke ni konas nin reciproke jam longe kaj ke ni kune travivis jam diversajn aferojn. Ni kune trasuferis jam multon kaj ĉiam ni venis al tio kiel blinda kokido al grajno. Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke tio estas la sorto. Kion sinjoro imperiestro direktas, tion bone li direktas, li nin kunvenigis kaj mi deziras ankaŭ nenion alian ol povi esti al vi iam tre multe utila. — Ĉu vi ne havas malsaton, sinjoro ĉefleŭtenanto?"

La ĉefleŭtenanto Lukáš, kiu intertempe denove ekkuŝis sur la malnovan sofion, diris, ke la lasta demando de Ŝvejk estas la plej bona solvo de ĝena amuzo, ke li iru nur demandi, kiel

statas la afero pri manĝo. Estos nepre pli bone, se Ŝvejk iros por momento eksteren kaj forlasos lin, ĉar tiuj idiotaĵoj, kiujn li de li aŭdas, lacigas lin pli ol la tuta marŝo de Sanok. Li tre volonte por momento ekdormus, sed li ne povas.

”Tion faras cimoj, sinjoro ĉefleŭtenanto. Tio estas jam malnova superstiĉo, ke parokestroj naskas cimojn. Nenie vi trovos tion da cimoj kiel en parokejoj. Parokestro Zamastil en Horní Stodólky verkis pri cimoj eĉ libron, ili rampis sur lin eĉ dum la prediko.”

”Kion mi do diris, Ŝvejk, ĉu vi iros al la kuirejo, aŭ ne?”

Ŝvejk foriris kaj kiel ombro eliris malantaŭ li piedfingre Baloun...

Kiam matene ili ekmarŝis el Liskowiec al Starasol, ili kunveturigis en militkuirejo la kompatindan bovinon, kiu ankoraŭ ne finkuirigis. Estis decidite, ke oni kuiras ĝin dumvoje, kaj formanĝos ĝin, kiam estos ripozo en duono de la vojo el Liskowiec al Starasol.

Al la viraro oni kuiris por la vojo nigran kafon.

La leŭtenanton Dub oni denove tiris sur la sanitara ĉareto, ĉar post la hieraŭo estis al li ankoraŭ pli malbone. Pleje elsuferis de li lia servosoldato, kiu devis seninterrompe kuri apud la ĉareto, ĉe kio la leŭtenanto Dub senĉese al li kriis, ke Kunert hieraŭ pri li tute ne zorgis, ke li reguligos kun li la kontojn, kiam ili venos sur la lokon. Ĉiumomente li petis, ke oni donu al li akvon, kiun li eltrinkis kaj tuj denove elvomis.

”Al kiu — al kio vi ridas?” li kriis de sur la ĉareto. ”Mi instruos vin, kun mi ne ludu, vi min ekkonos!”

La ĉefleŭtenanto Lukáš rajdis sur ĉevalo kaj kiel kompaniulon havis apud si Ŝvejkon, kiu paŝis vigle antaŭen, kvazaŭ li

ne povus ĝisatendi la momenton, kiam li kunpuŝiĝos kun la malamiko. Ĉe tio li rakontis:

”Ĉu vi rimarkis, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke iuj niaj homoj estas vere kiel muŝoj? Ili havas eĉ ne tridek kilogramojn sur la dorso kaj jam ne povas tion elteni. Necesus fari al ili prelegojn, kiel faris ilin al ni la mortinto sinjoro ĉefleŭtenanto Buchánek; tiu sin mortpafis pro kaŭcio, kiun li prenis al si cele de edziĝo de sia estonta bopatro<sup>66</sup> kaj kiun li fordiboĉis kun malĉastulinoj. Poste li prenis al si duan kaŭcion de tiu dua estonta bopatro, per tiu li mastrumis jam pli ekonomie, tiun li iom post iom malgajnis en ludkartoj kaj ulinetojn li flanklasis. Ankaŭ tio ne sufiĉis al li por longa tempo, tiel ke li devis turni sin cele de kaŭcio al tria estonta bopatro. Por tiu tria kaŭcio li aĉetis al si ĉevalon, araban virĉevalon, nepurangan...”

La ĉefleŭtenanto Lukáš desaltis de sur la ĉevalo.

”Ŝvejk,” li diris per minaca tono, ”se vi parolos ankoraŭ pri kvara kaŭcio, mi deĵetos vin en fosajon.”

Li denove eksaltis sur la ĉevalon kaj Ŝvejk serioze daŭrigis:

”Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke pri kvara kaŭcio oni ne povas eĉ paroli, ĉar post la tria kaŭcio li sin mortpafis.”

”Fine,” diris la ĉefleŭtenanto Lukáš.

”Por ke ni do ne forgesu la parolon,” daŭrigis Ŝvejk, ”tiajn prelegojn, kiajn ĉiam faris al ni sinjoro ĉefleŭtenanto Buchánek, kiam soldatoj dum marŝo falis, necesus laŭ mia modes-

66 aŭstraj oficiroj povis edziĝi nur kun tia fianĉino, kiu havis doton minimume en valoro de ofice destinita sumo — ekzemple ĉe leŭtenanto estis tio minimume sesdek mil aŭstraj kronoj. Per tio la armea administrantaro sekvis la celon, ke en oficirajn rondojn kaj familiojn ne penetru iu el malriĉaj tavoloj de la loĝantaro

ta opinio fari al la tuta viraro, kiel li tion kutimis. Li faris paŭzon, amasigis nin ĉiujn kiel kokidojn ĉirkaŭ kovkokino kaj komencis al ni klarigadi: 'Kanajloj, vi tute ne scias pritaksi, ke vi marŝas sur la terglobo, ĉar vi estas tia nekulturita bando, ke la homo ekrigardante vin emas vomi, lasi vin tiel marŝi sur la suno, kie homo — kiu sur nia mizera planedo havas pezon de sesdek kilogramoj — pezas pli ol mil sepcent kilogramojn, tiam vi duonmortaĉus, tio estus marŝado, se vi havus en la tornistro pli ol ducent okdek kilogramojn, ĉirkaŭ tri kvintalojn, kaj la fusilo pezus unu kaj duonon de kvintalo. Tiam vi ĝemegus kaj elŝovus la langon kiel mortlaciĝintaj hundoj.' Inter ni estis kompatinda instruisto, kiu aŭdacis ankaŭ anonci sin por ekparoli: 'Kun via permeso, sinjoro ĉefleŭtenanto, sur la luno sesdekkilograma homo pezas nur dek tri kilogramojn. Sur la luno ni havus pli facilan marŝadon, ĉar nia tornistro pezus tie nur kvar kilogramojn. Sur la luno ni ŝvebus kaj ne marŝus.' 'Tio estas terura,' diras al tio la mortinto, sinjoro ĉefleŭtenanto Buchánek, 'ulo mizera, vi logas de mi vangobaton, ĝoju, ke mi donos al vi nur tian ordinaran surteran, se mi donus al vi tiun lunan, ĉe via malgranda pezo vi flugus ien ĝis Alpoj kaj frakasiĝus je ili. Se mi donus al vi tiun pezan sunan, la uniformo sur vi ŝanĝiĝus al kaĉo kaj via kapo foflugus ien ĝis Afriko.' Li donis al li do tiun ordinaran surteran vangobaton, la scivolulo komencis plori kaj ni marŝis pluen. Li ploris dum la tuta tempo ĉe marŝo kaj parolis, sinjoro ĉefleŭtenanto, pri homa digno, ke oni lin traktas kiel ian parolnekapablan animalon. Poste sinjoro ĉefleŭtenanto sendis lin al raporto, oni malfermis lin por dek kvar tagoj kaj li servis aldone an-

koraŭ ses semajnoj<sup>67</sup>, sed li ilin ne finservis, ĉar li havis her-  
nion, oni lin iel devigis, ke li turnu sin en la kazerno sur reko,  
li tion ne eltenis kaj mortis kiel simulanto en malsanulejo.”

”Tio estas vere stranga, Ŝvejk,” diris la ĉefleŭtenanto Lukáš,  
”ke, kiel mi diris al vi jam kelkfoje, vi havas kutimon per ku-  
riza maniero malestimigi la oficiraron.”

”Tion mi ne havas,” respondis Ŝvejk kun sincero. ”Mi vo-  
lis al vi nur rakonti pri tio, sinjoro ĉefleŭtenanto, kiel iam en  
soldatservo la homoj mem venigis sin en malfeliĉon. Tiu ho-  
mo opiniis, ke li estas pli klera ol sinjoro ĉefleŭtenanto, per  
tiu luno li volis lin humiligi en okuloj de la viraro, kaj kiam li  
ricevis tiun surteran baton sur la faŭkon, ĉiuj iel respiris, ne-  
niun tio ĉagrenis, male, ĉiuj ĝojis, ke sinjoro ĉefleŭtenanto  
faris tian bonan ŝercon per tiu surtera vangobato; tion oni  
nomas savita situacio. Al la homo io tuj devas veni en la men-  
son kaj jam estas bone. Antaŭ jaroj en Prago kontraŭ preĝejo  
en Karmelitská-strato, sinjoro ĉefleŭtenanto, havis butikon de  
kunikloj kaj alia birdaro sinjoro Jenom. Tiu ekamindumis fili-  
non de librobindisto Bílek. Sinjoro Bílek tiun interkonatiĝon  
ne favoris kaj publike ankaŭ proklamis en gastejo, ke se sinj-  
oro Jenom venus peti la manon de lia filino, ke li deĵetegos lin  
de sur la ŝtuparo tiel, ke la mondo tion ne vidis. Sinjoro Je-  
nom ektrinkis por kuraĝo kaj tamen nur iris al sinjoro Bílek,  
kiu bonvenigis lin en antaŭĉambro kun granda tranĉilo, per  
kiu oni pritrancas randon de libroj kaj kiu aspektas kiel tran-  
ĉilego por mortigi ranojn. Li alkriegis lin, kion li ĉi tie faras,  
kaj en tiu momento kara sinjoro Jenom ekfurzis tiel forte, ke

67 la tempon, dum kiu la soldato estis malliberigita, oni ne enkalkulis  
en la tempodaŭron de lia soldatservo. Tiun ĉi tempon la soldato de-  
vis do ankoraŭ servi aldone post finiĝo de sia normala soldatservo

pendolhorloĝo sur la vando ekhaltis. Sinjoro Bílek komencis ridi, tuj metis al li la manon kaj parolis nur: 'Bonvolu eniri, sinjoro Jenom — bonvolu sidiĝi — espereble vi ne surkakiĝis — mi ja ne estas tiel malbona homo, estas vero, ke mi volis vin elĵeti, sed nun mi vidas, ke vi estas tute agrabla sinjoro, vi estas originala homo. Mi estas librobindisto, mi tralegis multe da romanoj kaj rakontoj, sed en neniuj libroj mi legis, ke fianĉo prezentus sin ĉi-maniere.' Ĉe tio li ridis, ĝis li devis teni al si la ventron, kaj kun ega ĝojo diris, ke tio ŝajnas al li esti kvazaŭ ili konus sin reciproke ekde la naskiĝo, kvazaŭ ili estus denaskaj fratoj, tuj portis al li cigaron, sendis por biero, por italaj kolbasetoj, alvokis la edzinon, prezentis lin al ŝi kun ĉiuj detaloj de tiu furzoellaso. Tiu forkraĉis kaj iris for. Poste li alvokis la filinon kaj diras al ŝi: 'Tiu ĉi sinjoro venis peti vian manon ĉe tiuj ĉi cirkonstancoj.' Li filino tuj komencis plori kaj proklamis, ke ŝi lin ne konas, ke ŝi ne volas lin eĉ vidi, restis do nenio alia ol ke ambaŭ sinjoroj eltrinku la bieron, formangu la italajn kolbasetojn kaj disiru. Poste sinjoro Jenom havis ankoraŭ malhonoron en tiu gastejo, kien iradis sinjoro Bílek, kaj fine ĉie en la tuta kvartalo oni ne nomis lin alie ol 'La surfekiĝinto Jenom' kaj ĉie oni al si rakontis, kiel li volis savi la situacion. — La homa vivo, obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, estas tiel komplika, ke la nura vivo de homo estas kompare kun tio bagatelo. — Al ni en la gastejon 'Ĉe la kaliko' en la strato Na bojiŝti iradis ankoraŭ antaŭ la milito ĉefpolicisto, certa sinjoro Hubička, kaj ankaŭ sinjoro redaktoro, kiu kolektis sciigojn pri rompitaĵoj, surveturigitaj homoj, memmortigantoj kaj publikigis tion en gazeto. Tio estis tiel gaja sinjoro, ke li pasigis pli da tempo en polica gardistejo ol en sia redakcio. Tiu foje ebriigis sinjoron ĉefpoliciston Hu-



biĉka kaj en la kuirejo ili interŝanĝis al si la vestojn, tiel ke la ĉefpolicisto estis vestita civile kaj el sinjoro redaktoro iĝis ĉefpolicisto, li nur kovris numeron de sia revolvero kaj ekiris Pragon por patroli. En nokta silento en Ressel-strato, malantaŭ iama pundomo de sankta Venceslao, li renkontis iom aĝan sinjoron en cilindra ĉapelo kaj pelto, kiu iris brak-en-brake kun aĝeta sinjorino en peltmantelo. Ambaŭ rapidis hejmen kaj diris eĉ ne unu vorton. Li saltis antaŭ ilin kaj ekkriegis al tiu sinjoro en la orelon: 'Ne kriegu tiom, aŭ mi vin forkondukos!' Imagu, sinjoro ĉefleŭtenanto, tiun ilian ekrimon. Vane ili al li klarigis, ke tio estas ŝajne eraro, ĉar ili ambaŭ veturas de festeno ĉe sinjoro regento. Ke la kaleŝo alveturigis ilin ĝis malantaŭ la Nacia teatro kaj ke nun ili volas uzi freŝan aeron, ili loĝas nemalproksime, ĉe Moráň, li estas regenta ĉefkonsilisto kun la edzino. 'Vi ne kondukos min je la nazo', alkiiegis lin plu la alivestita redaktoro, 'vi devas honti, se vi estas, kiel vi diras, regenta ĉefkonsilisto kaj kondutas ĉe tio kiel bubo. Mi observas vin jam tre longe, kiel vi bategis per bastono rulkurtenojn de ĉiuj butikoj, kiuj estis dumvoje, kaj ĉe tio via, kiel vi diras, edzino, al vi helpis.' 'Mi ja, kiel vi vidas, havas neniun bastonon. Tio estis eble iu antaŭ ni.' 'Kiel vi povus ĝin havi', diras al tio la alivestita redaktoro, 'se vi ĝin batrompis, kiel mi vidis, tie malantaŭ angulo je maljunulinaĉo, kiu vizitas gastejojn por vendi rostitajn terpomojn kaj kaŝtanojn.' Tiu sinjorino eĉ plori jam ne kapablis kaj sinjoro regenta ĉefkonsilisto ekscitiĝis tiom, ke li komencis paroli ion pri vulgareco, post kio li estis arestita kaj alkondukitata al la plej proksima patrolo en distrikto de komisarejo en Salma-strato, al kiu la alivestita redaktoro diris, ke ĝi forkonduku tiun paron al la komisarejo, ke li estas de la sankta Hen-

riko<sup>68</sup> kaj estis ofice en Vinohrady, tiujn ambaŭ li trafis ĉe rompo de la nokta silento, ĉe nokta interbatiĝo, kaj ke ili samtempe ankoraŭ kulpiĝis per ofendo de la polica gardistaro. Ke li plenumos sian aferon en komisarejo ĉe la sankta Henriko kaj post unu horo ke li venos al komisarejo en Salma-strato. La patrolo do fortrenis ilin ambaŭ kun si, kie ili sidis ĝis mateno kaj atendis tiun ĉefpoliciston, kiu intertempe flankvoje revenis al 'Ĉe la kaliko' en la strato Na Bojišti, tie vekis la ĉefpoliciston Hubička kaj ege delikate al li sciigis, kio okazis kaj kia enketado el tio rezultos, se Hubička ne tenos la langon malantaŭ la dentoj..."

La ĉefleŭtenanto Lukáš ŝajnis esti jam lacigita per tiu parolo, sed antaŭ ol li instigis la ĉevalon troti por antaŭrajdi la avangardon, li diris al Ŝvejk:

"Se vi parolus ĝis vespero, estus tio ĉiam pli idiota."

"Sinjoro ĉefleŭtenanto," vokis Ŝvejk malantaŭ la forrajdanta ĉefleŭtenanto, "ĉu vi ne deziras scii, kiel tio finiĝis?"

La ĉefleŭtenanto Lukáš rapidigis al galopo.

La stato de la leŭtenanto Dub pliboniĝis tiagrade, ke li elrampis el la sanitara ĉareto, amasigis ĉirkaŭ si la tutan stabon de la kompanio kaj kiel en duonkonscio komencis ĉiujn instrui. Li havis al ili ege longan parolon, kiu ŝarĝis ĉiujn pli ol municio kaj fusiloj.

Estis tio miksaĵo de diversaj alegorioj.

Li komencis: "La amo de soldatoj al sinjoroj oficiroj faras nekredablajn oferojn eblaj kaj de tio ne dependas, kaj male, se tiu ĉi amo ne estas ĉe la soldato denaska, oni devas ĝin eldevigi. En civila vivo eldevigita amo de unu al la alia, ni diru

68 iama polica komisarejo en Jindřišská-strato en Prago (Jindřišská-strato = strato de Henriko)

de lernejservisto al profesorado, eltenos tiel longe kiel la ekstera potenco, kiu ĝin eldeigas, sed en la soldatservo ni vidas veran malon, ĉar la oficiro ne povas permesi al la soldato eĉ la plej etan malfirmigon de tiu amo, kiu ligas la soldaton al lia superulo. Tiu ĉi amo ne estas nur ordinara amo, sed temas propre pri estimo, timo kaj disciplino.”

Ŝvejk dum la tuta tempo iris apude ĉe la maldekstra flanko, kaj kiel la leŭtenanto Dub parolis, li estis per la vizaĝo senĉese turnita al li dekstren.

La leŭtenanto Dub komence tion iel ne rimarkis kaj daŭrigis plu en sia parolo:

”Tiu ĉi disciplino kaj devo obei, deviga amo de la soldato al la oficiro estas ege lakona, ĉar la rilato inter la soldato kaj la oficiro estas tute simpla: unu obeas, la alia ordonas. Jam antaŭlonge ni legis en libroj pri milita arto, ke ĝuste la soldata lakonismo, la soldata simpleco estas tiu virto, kiun devas alproprigi al si ĉiu soldato, amanta, vole nevole, sian superulon, kiu en liaj okuloj devas por li esti la plej granda, preta, kristaliĝinta objekto de firma kaj perfekta volo.”

Nur nun li ekrimarkis ”Rigardi dekstren!” de Ŝvejk, kiel tiu lin okulsekvas; tio estis al li tre malagraba, ĉar subite sentis li mem, ke en sia parolo li iel implikiĝas kaj povas nenien elveturi el tiu ĉi vojo de soldata amo al la superulo, kaj tial li alkriis Ŝvejkon:

”Kial vi gapas al mi kiel bovido al nova pordego?”

”Laŭ la ordono, obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, vi mem bonvolis min foje atentigi, ke mi sekvu per la rigardo vian buŝon, kiam vi parolas. Ĉar ĉiu soldato devas plenumi ordonojn de sia superulo kaj memori ilin eĉ por la estonta tempo, mi estis al tio devigita.”

”Rigardu,” kriis la leŭtenanto Dub, ”al la alia flanko, nur ne rigardu min, stula ulo, vi scias, ke mi tion ne ŝatas, ke mi ne toleras, se mi vin vidas, mi ekcelos mian atenton al vi...”

Ŝvejk faris per la kapo turnon maldekstren kaj paŝis plu apud la leŭtenanto Dub tiel rigide, ke la leŭtenanto Dub ekkriis:

”Kien vi rigardas, se mi parolas kun vi?”

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke laŭ via ordono mi estas en la pozo ’rigardi maldekstren’.”

”Aĥ,” ekĝemis la leŭtenanto Dub, ”vi prezentas ja krucon. Rigardu rekte antaŭen kaj pensu pri vi: mi estas tia stultulo, ke pri mi ne estos domaĝe. Ĉu vi tion memoras?”

Ŝvejk rigardis antaŭ sin kaj diris:

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ĉu mi al tio respondu?”

”Kion vi aŭdacas,” alkriegis lin la leŭtenanto Dub. ”Kiel vi kun mi parolas, kion vi per tio pensas?”

”Obee mi raportas, sinjoro leŭtenanto, ke per tio mi pensas nur pri tiu via ordono en iu stacio, kie vi min riproĉis, ke mi tute ne respondu, kiam vi finos la parolon.”

”Vi min do timas,” diris ĝojiĝe la leŭtenanto Dub, ”sed vi min ankoraŭ ne ekkonis. Antaŭ mi tremis aliaj homoj ol estas vi, memoru tion. Mi sciis bridi alijn ulojn, tial fermu la faŭkon kaj restu bele malantaŭe, ke mi vin ne vidu!”

Tiel Ŝvejk restis malantaŭe ĉe la sanitara servo kaj komforte veturis per ĉareto ĝis la loko destinita por ripozo, kie ĉiuj fine ĝisatendis supon kaj viandon el la kompatinda bovino.

”Tiun bovinon necesis marini en vinagro almenaŭ dek kvar tagojn, kaj se jam ne tiun bovinon, do tiun homon, kiu ĝin aĉetis,” proklamis Ŝvejk.

De la brigado ĉevale algalopis kuriero kun nova decido por la dekunua marŝkompanio, ke la marŝordono ŝanĝiĝas al Felsztyn, Woralycze kaj Sambor lasi flanken, tie ne eblas loĝigi la kompanion, ĉar tie estas du regimentoj el Poznań. La ĉefleŭtenanto Lukáš faris tujajn dispoziciojn. La ĉefserĝento-kontisto Vaněk kun Ŝvejk elserĉos tranokton por la kompanio en Felsztyn.

"Atentu, Ŝvejk, ke vi ne faru ion dumvoje," atentigis lin la ĉefleŭtenanto Lukáš. "Ĉefe kondutu ĝentile al la loĝantaro!"

"Obee mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, ke mi klopodos. Mi havis ja malbelan songon, kiam antaŭmatene mi iom ekdormis. Mi songis pri trogo, kiu en koridoro de domo, kie mi loĝis, tralasadis akvon dum la tuta nokto, ĝis tio elfluis kaj tramalsekigis plafonon ĉe sinjoro dommastro, kiu tuj matene min malluigis. Tia okazaĵo, sinjoro ĉefleŭtenanto, jam vere estis; en Karlín, malantaŭ la viadukto..."

"Donu al ni trankvilon, Ŝvejk, pri viaj stultaj paroloj kaj prefere rigardu kun Vaněk la mapon, tra kie vi iru. Do ĉi tie vi vidas tiujn vilaĝojn. De tiu ĉi vi iros dekstren al rivereto kaj laŭlonge de ĝia fluo ĝis la plej proksima vilaĝo kaj de tie, kie enfluas unua rivereto, kiu estos ĉe via dekstra mano, vi iros tra kampovojo supren, precize norden, kaj vi povas erarvojiĝi nenien alien ol en Felsztynon. Ĉu vi tion memoras?"

Ŝvejk do ekpaŝis kun la ĉefserĝento-kontisto Vaněk laŭ la marŝordono.

Estis post tagmezo; la regiono peze respiris en varmeĝo kaj malbone surŝutitaj kavoj kun entombigitaj soldatoj eldonadis putran haladzon. Ili venis en regionon, kie oni kondukis batalojn ĉe marŝoj al Przemysł kaj kie maŝinpafiloj falĉis la tutajn batalionojn. En malgrandaj arbaretaj ĉe rivereto vidi-

ĝis, kiel furiozis artilerio. Anstataŭ arboj sur grandaj areoj kaj deklivoj elstaris el la tero iaj stumpoj kaj tiun ĉi dezerton sul-kigis tranĉeoj.

”Ĉi tie tio aspektas alie ol ĉe Prago,” diris Ŝvejk por interrompi la silenton.

”Ĉe ni estas rikoltosezono jam for,” diris la ĉefserĝento-kontisto Vaněk. ”En regiono ĉe Kralupy ni komencas kiel unuaj.”

”Ĉi tie estos post la milito tre bona rikolto,” diris Ŝvejk post momento. ”Ĉi tie oni ne devos aĉeti ostosterkaĵon, tio estas tre avantaĝa por kampistoj, se sur iliaj kampoj dispolviĝos la tuta regimento; mallonge, tio estas vivrimedo. Mi havas zorgon nur pri tio, ke tiuj kampistoj ne lasu al si pendigi ion de iu ĉe la nazo kaj superflue ne vendu tiujn ostojn de soldatoj al sukerfarejo por fabriki el ili ostan karbon<sup>69</sup>. En la kazerno en Karlín estis iam ĉefleŭtenanto Holub, tiu estis tiel klera, ke ĉiuj ĉe la kompanio rigardis lin kiel idioton, ĉar pro sia kle-reco li ne ellernis insulti soldatojn kaj pri ĉio li meditis nur el scienca vidpunkto. Foje soldatoj al li raportis, ke ricevita soldatpano ne estas vorebla. Alia oficiro ekscitiĝus pro tia aroganteco, sed li ne, li restis trankvila, nomis neniun porko aŭ porkino, eĉ sur la faŭkon li donis al neniun. Li nur kunvokis ĉiujn siajn virojn kaj diras al ili per sia agrabla voĉo: ’Unue, soldatoj, vi devas konscii, ke la kazerno ne estas delikataĵvendejo, ke vi povu tie elekti marinitajn angilojn, fiŝetojn en oleo kaj sandviĉojn. Ĉiu soldato devas esti tiel inteligenta, ke li forvoru sen replikoj ĉion, kion li ricevas, kaj havi en si tiom da disciplino, ke li ne miru al kvalito de tio forvorenda. Ima-

69 karbon el ostoj, ostan cindron, oni uzas en sukerfarejoj ĉe rafinado de sukero

gu, soldatoj, ke estus milito. Al tiu tero, en kiun oni vin post batalo entombigos, estus tute egale, per kia soldatpano vi ŝtopiĝis antaŭ via morto. La panjo tero vin malkomponiĝos kaj forvoros eĉ kun botoj. En la mondo nenio povas perdiĝi, el vi, soldatoj, elkreskos nova greno, el kiu estos soldatpanoj por novaj soldatoj, kiuj eble denove kiel vi ne estos kontentaj, iros plendi kaj renkontos iun, kiu igos ilin malliberigi por eterne, ĉar tion li rajtas. Nun, soldatoj, mi ĉion tion al vi bele klarigis kaj eble mi ne devas plurfoje al vi almemorigi, ke kiu venontfoje iros plendi, tiu tre ŝatos, kiam li denove ekvidos la dian lumon.’ — ‘Se li nin almenaŭ insultus’, diradis la soldatoj inter si kaj ĉiuj tiuj delikataj paroloj en prelegoj de sinjoro ĉefleŭtenanto terure ilin ĉagrenis. Foje oni do elektis el la kompanio min, ke mi iel al li diru, ke ĉiuj lin amas kaj ke tio ne estas vera soldatservo, se li ne insultas. Mi iris do al li en la loĝejon kaj petis lin, ke li forĵetu ĉian singĝenemon, ke la soldatservo devas esti akra kiel zono, la soldatoj estas alkutimiĝintaj al tio, ke oni al ili ĉiutage almemorigu, ke ili estas hundoj kaj porkoj, alie ke ili perdas estimon al siaj superuloj. Komence li kontraŭstaris, parolis ion pri inteligenteco, pri tio, ke en la nuna tempo estas jam malpermesite servi sub kanvergo, sed fine li tamen lasis sin konvinki, vangobatis min kaj elĵetis tra la pordo, ke altiĝu lia aŭtoritato. Kiam mi anoncis la rezulton de mia traktado, ĉiuj havis el tio grandan ĝojon, sed li denove neniigis tion al ili tuj la sekvantan tagon. Li venas al mi kaj antaŭ ĉiuj diras: ‘Ŝvejk, hieraŭ mi trofervoriĝis, jen vi havas florenon kaj trinku je mia sano. Necesas scii, kiel trakti la soldataron.’

Ŝvejk ĉirkaŭrigardis la regionon.

”Mi opinias,” li diris, ”ke ni iras malbonan direkton. Sin-

jero ĉefleŭtenanto klarigis al ni tion ja bone. Ni devas iri supren, suben, poste maldekstren kaj dekstren, poste denove dekstren, poste maldekstren — kaj ni iras ĉiam rekten. Aŭ ni eble jam trapasis ĉion tion senatente dum la parolo? Mi vidas ĉi tie antaŭ mi nepre du vojojn al tiu Felsztyn. Mi proponas, ke ni nun iru tiun vojon maldekstre.”

La ĉefserĝento-kontisto Vaněk, kiel tio jam kutime estas, se du troviĝas sur vojkruciĝo, komencis aserti, ke oni devas iri dekstren.

”Tiu mia vojo,” diris Ŝvejk, ”estas pli komforta ol tiu via. Mi iros laŭlonge de rivereto, kie kreskas miozotoj, kaj vi vagaĉos ie tra sekejo. Mi tenas min je tio, kion diris al ni sinjoro ĉefleŭtenanto, ke ni absolute ne povas erarvojiĝi, kaj se ni ne povas erarvojiĝi, kial mi grimpus ien sur monteton; mi iros bele tra herbejaro, ornamos mian kepon per eta floro kaj ŝirkolektos la tutan florbukedon por sinjoro ĉefleŭtenanto. Cetero ni povas konvinkiĝi, kiu el ni du pravas, kaj mi esperas, ke ni ĉi tie disiros kiel bonaj kamaradoj. Ĉi tie estas tia regiono, ke al tiu Felsztyn devas konduki ĉiuj vojoj.”

”Ne faru stultaĵojn, Ŝvejk,” diris Vaněk, ”laŭ la mapo ni devas ĉi tie iri, kiel mi diras, ĝuste dekstren.”

”Mapo povas ankaŭ erari,” respondis Ŝvejk, descendante en valon de rivereto. ”Foje nokte fumaĵisto Křenek el Vinohrady iris hejmen laŭ urbplano de Prago el ’Ĉe Montág’ en Malá Strana al Vinohrady kaj antaŭmatene li venis ĝis Rozdělov ĉe Kladno, kie oni trovis lin matene tute frostorigidiĝintan en sekala kampo, kien li falis pro laciĝo. Se vi do ne lasas vin konvinki, sinjoro ĉefserĝento-kontisto, kaj havas obstinan kapon, ni devas do disiri kaj ni renkontiĝos nur surloke en Felsztyn. Rigardu nur la poŝhorloĝon, por ke ni sciu,



kiu estos tie pli frue. Kaj se eble minacus al vi ia danĝero, ekpafu en aeron, por ke mi sciu, kie vi estas.”

Posttagmeze Ŝvejk ĝisiris al malgranda lageto, kie li renkontiĝis kun forkurinta rusa militkaptito, kiu ĉi tie sin banis kaj ĉe ekvido de Ŝvejk komencis fuĝi nuda, kiel li eliris el akvo.

Ŝvejk scivolis, kiel eble konvenus al li rusa uniformo, kiu kuŝaĉis ĉi tie sub saliketoj, demetis tiun sian kaj vestis sin en rusan uniformon de kompatinda nuda militkaptito, kiu fuĝis de transporto, loĝigita en vilaĝo malantaŭ arbaro. Ŝvejk deziris vidi sin detale speguliĝi en akvo, tial li paŝis sur bordo de la lago tiel longe, ĝis trovis lin tie patrolo de soldata ĝendarmaro, kiu serĉis la rusan dizertinton. Estis tio hungaroj kaj tiuj fortrenis Ŝvejkon malgraŭ liaj protestoj al etapo en Chyrov, kie ili alvicigis lin al transporto de rusaj militkaptitoj, destinitaj al laboro ĉe riparo de fervoja trako direkte al Przemysł.

Ĉio tio okazis tiel rapide, ke Ŝvejk ekkonsciis la situacion nur la sekvantan tagon kaj per peceto da ligna brulstumpo skribis sur blankan muron de lerneja ĉambro, kie oni loĝigis parton de la militkaptitoj: Ĉi tie dormis Jozefo Ŝvejk el Prago, kompania kuriero de la dekunua marŝko de la naŭdekunua regimento, kiu kiel enloĝiganto pro eraro falis en aŭstran kaptitecon ĉe Felsztyn.

## VORTOJ, NETROVEBLAJ EN PLENA ILUSTRITA VORTARO

<i>anabaso</i>	tre longa marŝo, migrado (origine longa marŝo de dek mil grekaj (el la greka anabasis): soldatoj el Mezopotamio al Eŭropo)
<i>apuntato</i>	subkaporalo, la plej malsupera rango en aŭstri-hungara armeo; interŝtupo inter soldatoj kaj suboficiroj
<i>betlo</i>	esprimo el kartludo mariaĝo — la ludanto, kiu anoncas intencon ludi (el la germana Bettel) betlon ( "almozi", Bettel = almuzulo), devas ludi tiel, ke li ne havu eĉ unu prenon dum la ludo
<i>buĥtetoj buĥtoj</i>	ĉeĥaj brikformaj kukoj, farĉitaj per marmelado, papavo, kazeo k.s. Buĥtetoj — malgrandaj nefarĉitaj buĥtoj, kiujn oni manĝas plej ofte kun ŝodo
<i>burjatoj</i>	nacio en orienta Siberio
<i>buŝelo</i>	1. vidu PIV 2. malnova mezurunuo por kampoj (unu buŝelo egalas proksimume al 28,77 aroj)
<i>cviko</i>	(el la germana Zwick) speco de hazarda kartludo kun kvar kartoj
<i>dratumisto</i>	iama migranta riparisto de potoj kaj similaj objektoj, kiujn li riparis per drato, pecetoj da lado k.s., kaj samtempe vendis diversajn tiuspeciajn objektojn
<i>durĥo</i>	esprimo el kartludo mariaĝo — la ludanto, kiu anoncas intencon ludi (el la germana "durch") durĥon, devas ludi tiel, ke li akiru ĉiujn prenojn dum la ludo

<i>ementala fromaĝo:</i>	malmola fromaĝo kun diversgrandaj truoj, ordinare bulforma, nomata laŭ svisa valo kaj regiono Emmental
<i>feldkurato</i>	aŭstra soldatpastro en rango kaj kun rajtoj de oficiro
<i>feldpoŝto</i>	provizora poŝtoficejo, establita por militantaj soldatoj en la fronto
<i>ferblo</i>	hazarda kartludo
<i>foksteriero</i>	speco de malgranda ĉashundo
<i>gorgonzola fromaĝo:</i>	ŝimeca fromaĝo, nomata laŭ la samnoma itala urbo
<i>honvedo</i>	hungara miliciano, soldato de landodefenda armeo en iama Aŭstri-Hungario
<i>kaki</i>	milda vorto por "feki", precipe parolante pri infanoj
<i>kaŭbojo</i>	(el la angla cowboy): paŝtisto de brutaro en iama Sovaĝa okcidento. Kaŭbojoj elstaris per eminenta rajdista arto
<i>kneditoj</i>	ĉeĥaj kneditaj farunbuloj, tipa ĉeĥa manĝaĵo
<i>kriminalistiko</i>	scienco, okupiĝo pri kriminalaj aferoj
<i>kriptografio</i>	scienco pri sistemoj de sekreta (ĉifrita) skribo
<i>kriptogramo</i>	sekreta (ĉifrita) skribaĵo
<i>kurato</i>	feldkurato (vidu supre)
<i>leonbegro</i>	granda hundo, hibrido de San-Bernarda kaj Novlanda hundoj
<i>makao</i>	hazarda kartludo
<i>mariaĝo</i>	francdevena kartludo
<i>mustango</i>	sovaĝa ĉevalo de nordamerikaj prerioj
<i>opodeldoko</i>	solvaĵo de sapo en alkoholo, kun aldono de kamforo, amoniako kaj eteroleoj
<i>oŭkropo</i>	ĉeĥa supo el graso, ajlo, pipro kaj salo, kun proporcia kvanto da rostitaj pankubetoj, sen kia ajn alia aldonaĵo (viando, legomo ktp.)
<i>perkelto</i>	paprika stufita bovaĵo

<i>piaristoj</i>	latine "Patres piarum scholarum" — romkatolika ordeno, kies anoj zorgis pri eduko de lerneja junularo en la spirito de la romkatolika eklezio
<i>rizlingo</i> <i>soŭleto</i>	speco de dolĉeta vino, speco de vinberoj (el la hebrea lingvo): pecetoj da ansera viando, stufitaj en kuirita grio
<i>ŝodo</i>	(france Chateau): dolĉa kremo el vino, ovoflavoj kaj sukero
<i>telefonogramo</i>	urĝa telegramo, kies enhavon oni sciigas telefone
<i>transporto</i>	1. vidu PIV 2. translokigo (transveturigado) de homo, objekto aŭ aro da ili pro diversaj celoj (ekz. transporto de varo, retenito, militkaptitoj)

[www.omnibus.se/inko](http://www.omnibus.se/inko)

**ISBN 91-7303-093-7**